A.Strugackij
B.Strugackij

# Aĉaj cignoj

Hajfo
2014

Tradukis A.Kerbel

# Aĉaj cignoj

Arkadij Strugackij (1925–1991)
Boris Strugackij (1933–2012)

## Ĉapitro unua

Kiam Irma eliris, akurate ferminte post si la pordon, magra, longpieda, adolt-ĝentile **smajl**ante[1] per la granda buŝo kun intense ruĝaj, kiel ĉe la patrino lipoj, Viktor komencis peneme bruligi la cigaredon.

*«Tio tute ne estas infano», – pensis li konsternite. – «Infanoj ne parolas tiel. Tio estas eĉ ne krudeco, tio estas krueleco, kaj eĉ ne krueleco sed simple tutegale estas al ŝi. Kvazaŭ ŝi pruvis al ni ĉi tie teoremon – prikalkulis ĉion, analizis, afereme informis la rezulton, kaj foriris tute trankvila, tremetante per la harplektaĵetoj».*

Superante la ĝenecon Viktor ekrigardis **na**[2] Lola. Ŝia vizaĝo estis kovrita per ruĝaj makuloj, la intenskoloraj lipoj tremis, kvazaŭ ŝi intencis ekplori,

---

**1.** smajlo: utilas por indiki ĝoj-esprimon mienan, **sensonan**, kontraste al rido, kiu estas ĝoj-esprimilo **sona:** smajlo, smajleto, smajlego; rido, rideto, ridego. (Propono).

**2.** na: akuzativiga prepozicio. Utilas por konservi rekoneblon de propraj nomoj. Komparu: a) «Ĉu vi konas Ĉeĥovon?». b) «Ĉu vi konas **na** Ĉeĥov?». Propono de sinjoro G.F.Mak-Kink.

sed ŝi, certe, ne intencis plori, ŝi estis furioza.

– Ĉu vi vidas? – diris ŝi per alta voĉo. Knabinaĉo, nazmukulino... Aĉulino! Nenio estas sankta al ŝi, ĉiu vorto – moko, kvazaŭ mi estas ne patrino sed surplanka tuko por purigi piedojn. Antaŭ la najbarinoj estas honte! Fiulino, vulgarulino…

*«Jes», – pensis Viktor, – «kaj kun tiu ĉi virino mi vivis. Mi promenis kun ŝi en montoj, mi voĉlegis al ŝi na Bodler (Baudelaire), mi tremetis kiam tuŝis ŝin, kaj memoris ŝian odoron... Ŝajne eĉ pugnobatalis pro ŝi. Ĝis nun mi ne komprenas kion ŝi pensis kiam mi voĉlegis al ŝi na Bodler? Simple mirindas ke mi sukcesis fuĝi de ŝi. Ne kompreneblas eĉ kial ŝi liberigis min? Verŝajne ankaŭ mi ne estis sukero. Verŝajne ankaŭ nun mi ne estas sukero, sed tiam mi drinkis eĉ pli ol nun kaj, krom tio, opiniis min granda poeto».*

– Por vi tio certe ne gravas, – diris Lola. – Ĉefurba vivo, ĉiuj baletistinoj, aktorinoj... Mi scias ĉion. Ne imagu ke ni, ĉi tie, scias nenion. Kaj monrimedoj, certe, frenezaj, kaj amorantinoj, kaj senĉesaj skandaloj... Por mi, se vi volas scii, tio indiferentas, mi ne malhelpis al vi, vi vivis kiel vi volis...

*«Al ŝi, entute, malutilas tio ke ŝi parolas tro multe. Fraŭline ŝi estis modesta, silentema, mistera. Estas tiaj fraŭlinoj kiuj de naskiĝo mem scias kiel konduti sin. Ŝi sciis. Cetere ankaŭ nun ŝi ne malbonas kiam,*

*ekzemple, sidas silente sur sofo kun cigaredo, elmontrante la genuojn... Aŭ metos subite la manon post la nukon, kaj etendiĝos. Sur provincan advokaton tio devas efiki eksterordinare...».*

Viktor imagis komfortan vespereton, tiu ĉi tableto estas ŝovita al tiu jen sofo, botelo, ĉampano siblas en la pokaloj, rubandita ĉokolad-skatolo, kaj la advokato mem, forĝita en amelon, bant-kravato. Ĉio kiel decas, sed subite eniras Irma...

*«Koŝmaro» – pensis Viktor. – «Ja Lola estas malfeliĉa virino».*

– Vi mem devas kompreni, – diris Lola, – ke ne pri mono temas, ke ne mono decidas nun ĉion. – Ŝi jam trankviliĝis, la ruĝaj makuloj malaperis. – Mi scias, si-maniere vi estas honesta homo, ne malracia, maldisciplina sed ne malica. Vi ĉiam helpis al ni, kaj ĉi-flanke mi havas al vi neniujn pretendojn. Sed nun mi bezonas ne tian helpon. Mi ne povas nomi min feliĉa, sed ankaŭ malfeliĉa vi ne sukcesis min fari. Ĉe vi estas via vivo, ĉe mi – la mia. Mi, cetere, ne estas ankoraŭ maljunulino, kaj ĉe mi estas multo antaŭe.

*«La knabinon mi devos forpreni», – pensis Viktor, – «ŝi jam ĉion, ŝajne, decidis. Se lasi na Irma ĉi tie, en la domo komenciĝos vera infero... Bone, sed kien mi ŝovu ŝin? Jen kio, ja parolu mi honeste», – proponis li al si. – «Nur honeste. Ĉi tie necesas agi honeste, tio ne estas ludiloj...».*

Li tre honeste ekmemoris sian vivon en la ĉefurbo.

*«Malbone», – pensis li. – «Certe eblas dungi ekonominon. Tio signifas lui konstantan loĝejon... Sed ne pri tio temas: la knabino devas esti kun mi, ne kun ekonomino... Onidire infanoj kiujn edukis patroj estas plej bonaj infanoj. Krom tio ŝi plaĉas al mi, kvankam ŝi estas tre stranga knabino... Kaj entute mi devas. Estiel honesta homo, estiel patro. Mi estas kulpa antaŭ ŝi. Sed tio estas beletro. Kaj se honeste? Se honeste, – mi timas. Poste ŝi staros antaŭ mi, adolte smajlos per sia granda buŝo, kaj kion mi scipovos diri al ŝi? Legu, pli multe legu, ĉiutage legu, pri nenio alia okupiĝu, nur legu. Tion ŝi scias ankaŭ sen mi, kaj mi havas nenion plu por diri al ŝi. Tial mi timas... Sed ankaŭ tio estas ne tute honeste. Ne deziras mi, jen kio. Mi kutimiĝis esti sola. Mi ŝatas esti sola. Mi ne volas alie... Jen kiel aspektas tio, se honeste. Abomene aspektas, same al ĉiu vero, cinike, egoisme, aĉe. Honeste».*

– Kial vi silentas? – demandis Lola. – Ĉu vi intencas daŭre silenti?

– Ne, ne, mi aŭskultas vin, – haste diris Viktor.

– Kion vi aŭskultas? Mi jam duonhoro atendas kiam vi bonvolos reagi. Ja tio, finfine, estas ne nur mia infano...

*«Ĉu ankaŭ kun ŝi mi devas honeste?» –*

*pensis Viktor. – «Sed kun ŝi mi tute ne volas honeste. Ŝi, ŝajne, imagas ke tiun ĉi problemon mi povas solvi tuj, inter du cigaredoj».*

– Komprenu, – diris Lola, – mi ne diras ke vi prenu ŝin kaj okupiĝu pri ŝi. Mi ja scias ke vi ne povas, kaj dank al Dio ke vi ne prenos, ja vi tute ne taŭgas por io tia. Sed ĉe vi estas rilatoj, konatecoj, ja vi estas sufiĉe konata persono, helpu aranĝi ŝin! Ja estas ĉe ni iuj privilegiaj entreprenoj, edukpensionoj, specialaj lernejoj. Ja ŝi estas kapabla knabino, ĉe ŝi estas lingvaj kapabloj, matematikaj kaj muzikaj...

– Edukpensiono, – diris Viktor, – Jes, certe... Edukpensiono. Orfejo... Ne, ne, mi ŝercas. Valoras pripensi tion.

– Sed kion pripensi? Ĉiu estus ĝoja aranĝi sian infanon en bonan edukpensionon aŭ en specialan lernejon. Edzino de nia direktoro...

– Aŭskultu, Lola, – diris Viktor, – tio estas bona ideo, mi provos fari ion. Sed por tio bezonatas tempo, tio ne estas simple. Mi, certe, skribos...

– Skribos! Ĝuste tia vi estas. Necesas ne skribi sed veturi persone, viziti! Ja tutegale vi estas ĉi tie senhejmulo! Tutegale vi nur drinkaĉas kaj kuniĝas kun virinaĉoj. Ĉu vere por propra filino estas tiel malfacile...

*«Ho, diablo», – pensis Viktor, – «ja ne povas mi klarigi al ŝi ĉion».*

Li denove ekfumis, leviĝis, kaj paŝadis en la ĉambro. Post la fenestro vesperiĝis kaj, kiel antaŭe,

falis pluvo, grandmezura, peza, malhasta – pluvo, da kiu estis tre multe, kaj kiu sendube rapidis nenien.

– Ho kiel vi tedis al mi! – diris Lola kun neatendita kolero. Se vi nur scius kiel vi tedis al mi...

*«Venis jam tempo foriri», – pensis Viktor. – «Komenciĝas sankta patrina kolero, furiozo de lasita, kaj ĉio tia cetera; tutegale mi nenion respondu al ŝi hodiaŭ. Kaj nenion promesu al ŝi».*

– Pri nenio eblas kalkuli je vi, – daŭrigis ŝi, – sentaŭga edzo, sentalenta patro... Moda verkisto, vidu vi, eĉ propran filinon ne sukcesis eduki... Ja ĉiu kamparano komprenas homojn pli bone ol vi! Nu kion mi faru nun? Ja de vi estas neniu utilo. Mi sola penadas, povas nenion. Mi estas por ŝi nulo, iu ajn malsekulaĉo gravas por ŝi centfoje pli ol mi. Sed sciu, iam vi bedaŭros! Se vi ne instruos ŝin, do ili ŝin instruos! Ĝisatendos vi ke ŝi kraĉos vian muzelon same kiel la mian...

– Ĉesu, Lola, – diris Viktor, grimacante, – vi ja ne tiel... Mi estas patro, jes, sed vi estas la patrino. Ĉiuj ĉirkaŭ vi kulpas...

For! – diris ŝi.

– Nu, jen kio, – diris Viktor – Mi ne intencas malpaciĝi kun vi. Decidi tuj mi ankaŭ ne intencas. Mi pensos. Kaj vi...

Ŝi staris nun rektiĝinte, antaŭgustumante riproĉon, preta delice ĵetiĝi en kverelaĉon.

– Kaj vi, – trankvile diris li, – penu ne nervumi. Ion ni elpensu. Mi telefonos al vi.

Li venis enirĉambron, kaj vestis la pluvmantelon. Ĝi estis ankoraŭ malseka. Viktor enrigardis ĉambron de Irma, por adiaŭi, sed Irma forestis. La fenestro estis vaste malfermita, la fenestran breton vipis pluvo. Sur la muro paradis afiŝo kun surskribo per grandaj belaj literoj: "Mi petas neniam fermi la fenestron". La afiŝo estis ĉifita, iom difektita, kovrita per grizaj makuloj, kvazaŭ ĝi ne unufoje estis deŝirita kaj tretita per piedoj. Viktor fermetis la pordon.

– Ĝis revido Lola, – diris li. Lola ne respondis.

Sur la strato estis jam mallume. La pluvo ekfrapadis la ŝultrojn, la kapuĉon. Viktor ĝibetis, kaj ŝovis la manojn en la poŝojn.

*«En tiu ĉi skvaro ni unuafoje interkisis», – pensis li. – «Sed tiu ĉi domo forestis tiam, tie estis neuzita tereno, kaj post ĝi – rubejo. Tie ni, per katapultoj, ĉasadis katojn, sed nun mi vidis ial neniun. Kaj nenion ni legis tiam, sed ĉe Irma – plena ĉambro da libroj. Kio estis en mia tempo dek-du-jara knabino? Lentuga hihianta estaĵo, bantetoj, ŝtrumpoj, bildetoj kun kunikletoj kaj neĝulinoj, ĉiam duope-triope, sukeraĵoj, difektitaj dentoj. Pur-emulinoj, denuncinoj, kaj plej bonaj el ili – ĝuste samaj al ni: genuoj kun gratvundoj, sovaĝaj linkaj okuloj, kaj ŝato al piedstumbligo. Ĉu vere nova tempo finfine venis? Ne», – pensis li, – «tio ne tempo. Kvankam, certe, ankaŭ la tempo... Sed ĉu ne povas okazi ke ŝi estas ĉe mi mirinfano? Ja okazas mirinfanoj. Mi – patro de mirinfano. Honore sed klopode, kaj ne tiom honore kiom*

*klopode, kaj, finfine, tute ne honore, sed tiel... Kaj tiun ĉi strateton mi ĉiam ŝatis, ĉar ĝi estas plej mallarĝa. Kaj jen pugnobatalo. Ĝuste, ĉe ni ne eblas sen tio, sen tio ni tute ne povas. Tio ĉe ni de antikveco. Kaj duopo kontraŭ unuopulo...».*

Sur la angulo staris lanterno. Ĉe limo de la lumigita tereno malsekiĝis aŭto kun tola supro, kaj apud la aŭto duopo en brilantaj pluvmanteloj fleksigis al la pavimo trian, – vestitan nigre, kaj malsekan. Ĉiuj tri streĉe kaj mallerte tretiĝis sur la pavimo. Viktor haltis, poste li venis pli proksimen. Ne estis klare kio fakte okazas ĉi tie. Pugnobatalon tio ne similas: neniu neniun batas. Baraktadon pro superfluo da junaj fortoj tio des pli ne similas, – ne aŭdiĝas entuziasmaj kriaĉoj kaj ĉevalida jeno... La tria, vestita nigre, subite elŝiriĝis, falis sur la dorson, kaj la duopo en la pluvmanteloj tuj falis sur lin. Ĉi tie Viktor rimarkis ke pordetoj de la aŭto estas malfermitaj, kaj ekpensis ke tiun ĉi nigran oni aŭ elaŭtigis antaŭnelonge, aŭ penas enpuŝi tien. Li venis proksimen, kaj elbojis militiste:

– Ĉesu!

Duopo en la pluvmanteloj tuj turniĝis, kaj dum kelkaj sekundoj rigardis na Viktor el sub la surŝovitaj kapuĉoj. Viktor rimarkis nur ke ili estas junaj, kaj ke iliaj buŝoj estas malfermataj pro la streĉiĝo, sed poste ili kun neverŝajna rapideco enplonĝis la aŭton, la aŭto ekbruegis kaj forimpetis en la mallumon. La homo vestita nigre malrapide leviĝis kaj, ekvidinte lin, Viktor faris retropaŝon. Tio estis malsanulo el la leprulejo – "malsekulaĉo" aŭ "okulvitru-

lo", kiel oni nomis ilin ĉi tie pro flavaj ringoj ĉirkaŭ la okuloj, – en strikta nigra tuko, kiu kaŝis suban parton de la vizaĝo. Li turmente peze spiris, sufere levante restaĵon de la brovoj. Sur lian kalvan kapon verŝiĝis akvo.

– Kio okazis? – demandis Viktor.

La okulvitrulo rigardis ne lin sed preter, liaj okuloj eliĝis. Viktor volis retrorigardi, sed tiam oni kun kraketo frapis lin je la nukon, kaj kiam li rekonsciiĝis, okazis ke li kuŝas sub pluvtubo per vizaĝo supren. La akvo torentis en lian buŝon, ĝi estis flaveta kaj rusta laŭguste. Dekraĉante kaj tusante li deŝoviĝis kaj eksidis, apoginte la dorson al brika muro. La akvo, kolektiĝinta ĉe la kolumo, ekrampis sur lia trunko. En la kapo bruis sonoriloj, trumpetoj, kaj krakadis tamburoj. Tra tiu ĉi bruo Viktor ekvidis antaŭ si magran malhelan vizaĝon. Knaban vizaĝon. Konatan.

*«Ie mi vidis lin. Antaŭ ol ĉe mi klakis la makzeloj».*

Li movis la langon kaj la makzelon. La dentoj estis en ordo. La knabo prenis manplenon da akvo el sub la pluvtubo, kaj ŝprucis ĝin en liajn okulojn.

– Kara, – diris Viktor, – sufiĉas.

– Al mi ŝajnis, – diris la knabo serioze, – ke vi ankoraŭ ne rekonsciiĝis.

Viktor singarde enŝovis la manon sub la kapuĉon, kaj palpis la nukon. Tie estis tubero – neniuj rompitaj ostoj, eĉ sango forestis.

– Kiu ja min tiel? – enpensiĝe demandis li. – Espereble ne vi, ĉu?

– Ĉu vi povas iri, sinjoro Banev? – demandis la knabo, – aŭ mi voku iun? Ja vi estas tro peza por mi.

Viktor elmemoris kiu estas tio.

– Mi konas vin, – diris li. – Vi estas Bol-Kunac, amiko de mia filino.

– Jes, – diris la knabo.

– Jen kiel bone. Ne estas bezonate voki iun kaj diri al iu, sed sidu ni iom kaj rekonsciiĝu.

Nun li rimarkis ke ankaŭ ĉe Bol-Kunac ne ĉio estas en ordo, sur lia vango malhelis freŝa grataĵo, kaj la supra lipo iom ŝvelis kaj sangis.

– Tamen mi vokos iun, – diris Bol-Kunac.

– Ĉu valoras?

– Vidu, sinjoro Banev, al mi ne plaĉas kiel konvulsias via vizaĝo.

– Ĉu vere? – Viktor palpis la vizaĝon. La vizaĝo ne konvulsiis...

– Tio nur ŝajnas al vi... Kaj nun ni ekstaru. Kio bezonatas por tio? Por tio bezonatas subtiri la piedojn... – Li subtiris la piedojn, kaj la piedoj ekŝajnis al li malpropraj. – Poste, iom depuŝinte sin de la muro, transigi ĉi-maniere la gravitcentron...

Li neniel sukcesis transigi la gravitcentron, ĉar io malhelpis.

*«Per kio oni min?» – pensis li, – «kaj kiel lerte...».*

– Vi piedpremis vian pluvmantelon, – sciigis la knabo, sed Viktor jam mem distingis siajn manojn kaj piedojn, sian pluvmantelon kaj orkestron en sub la kranio. Li ekstaris. Komence li devis teni sin je la

muro, sed poste la afero pliboniĝis.

– Do, – diris li, – tio signifas ke vi tiris min ĝis tiu ĉi tubo. Dankon.

La lanterno staris sur sia loko, sed estis nek aŭto nek okulvitrulo. Nenio estis. Nur Bol-Kunac singarde karesis sian gratvundon per la malseka manplato.

– Kien ili ĉiuj malaperis? – demandis Viktor.

La knabo ne respondis.

– Ĉu mi kuŝis ĉi tie sola? – demandis Viktor. – Ĉu ĉirkaŭe estis neniu?

– Permesu al mi akompani vin, – diris Bol-Kunac. – Kien vi iru prefere? Ĉu hejmen?

– Momenton, – diris Viktor. – Ĉu vi vidis ke ili volis kapti okulvitrulon?

– Mi vidis kiel oni frapis vin, – diris Bol-Kunac.

– Kiu?

– Mi ne distingis. Li staris dorse.

– Kaj kie estis vi?

– Mi kuŝis ĉi tie post la angulo...

– Nenion mi komprenas, – diris Viktor. – Ĉu pro mia kapo... Kial vi kuŝis post la angulo? Ĉu vi loĝas tie?

– Vidu, mi kuŝis ĉar oni frapis min eĉ pli frue. Ne tiu kiu frapis vin, sed alia.

– Ĉu okulvitrulo?

Ili iris malrapide, penante teni sin sur la pavimo, por ke sur ilin ne fluu de la tegmentoj.

– N-ne, – respondis Bol-Kunac, pripense. – Laŭ mi ili ĉiuj estis sen okulvitroj.

– Ho Dio, – diris Viktor. – Li ŝovis la manon sub la kapuĉon, kaj tuŝis la tuberon. – Mi parolas pri la

leprulo, oni nomas ilin okulvitruloj. Vi scias ja, el la leprulejo. Malsekulaĉoj...

– Ne, mi ne scias, laŭ mi ili ĉiuj estis tute sanaj, – diskrete diris Bol-Kunac.

– Nu-nu! – diris Viktor. Li eksentis iun mal-trankvilon, kaj eĉ haltis. – Ĉu vi volas certigi min ke tie ne estis leprulo? Kun nigra tuko, vestita nigre...

– Tio tute ne estas leprulo! – kun neatendita emocio diris Bol-Kunac. – Li estas pli sana ol vi... Unuafoje en tiu ĉi knabo evidentiĝis io knaba, kaj tuj malaperis. – Mi ne tute komprenas kien ni iras, – post ioma silento diris li per la antaŭa serioza ĝis senpasieco tono. – Komence al mi ŝajnis ke vi di-rektiĝas al la hejmo, sed nun mi vidas ke ni iras kontraŭan direkton.

Viktor daŭre staris, rigardante lin de sia alteco.

*«Du botoj estas paro», – pensis li. – «Li kalkulis, analizis, kaj afereme decidis ne in-formi la rezulton. Ne rakontos li al mi kio okazis ĉi tie. Ĉu eble krimaĵo? Novaj, ĉu vi scias, tempoj... Stultaĵo, konas mi nunajn krimulojn...».*

– Ĉio estas en ordo, – diris li, kaj ekiris pluen. – Ni iras en la hotelon, mi loĝas tie.

La knabo, rekta, severa kaj malseka paŝadis apude. Venkinte ioman nedecidemon Viktor metis la manon sur lian ŝultron. Okazis nenio eksterordinara – la knabo toleris tion. Tamen, verŝajne, li decidis ke lia ŝultro ekestis bezonata estiel utilaĵo, estiel apogaĵo por la traŭmatulo.

– Mi devas diri al vi, – per plej konfida tono in-

formis Viktor, – ke ĉe vi kaj Irma estas tre stranga maniero konversacii. Ni, infanaĝe, parolis ne tiel.

– Ĉu vere? – ĝentile diris Bol-Kunac. – Kaj kiel vi parolis?

– Nu, ekzemple, tiu ĉi via demando ĉe ni sonus tiel: Kijo?

Bol-Kunac levetis la ŝultrojn.

– Ĉu vi volas diri ke tio estus pli bone?

– Gardu Dio. Mi volas diri nur, ke tio estus pli nature.

– Ĝuste tio kio estas plej natura, – rimarkis Bol-Kunac, – malplej decas al homo.

Viktor eksentis iun internan malvarmon. Iun maltrankvilon. Aŭ eĉ timon. Kvazaŭ al li, en la vizaĝon, ekridegis katino.

– Ĉio natura ĉiam estas primitiva, – daŭrigis Bol-Kunac. – Sed homo estas estaĵo komplika, natureco ne konvenas al ĝi. Ĉu vi komprenas min, sinjoro Banev?

– Jes, – diris Viktor, – certe...

Estis io mirinde falsa en tio ke li patre tenas la manon sur ŝultro de tiu ĉi knabo, kiu ne estas knabo. Li eksentis eĉ malkomforton en la kubuto, singarde deprenis la manon, kaj ŝovis ĝin en la poŝon.

– Kiom aĝa vi estas? – demandis li.

– Dek-kvar-jara. – malkoncentriĝe respondis Bol-Kunac.

– Ha-a...

Ĉiu alia knabo, sur loko de Bol-Kunac, nepre ekinteresiĝus pri tiu ĉi incite-nedifina "ha-a", sed Bol-Kunac ne estis unu el ĉiuj ajn knaboj. Li respondis nenion. Lin ne interesis incite-nedifinaj interjekcioj.

Li meditis pri interrilato de natura kaj primitiva. Li bedaŭris ke trafis tiel neintelektan konversaciulon, kaj eĉ kapbatitan...

Ili eniris Prezident-avenuon. Ĉi tie estis multe da lanternoj, kaj renkontiĝis pasantoj, rapidantaj viroj kaj virinoj kurbitaj per la multtaga pluvo. Ĉi tie estis lumigitaj eksponfenestroj, kaj eniro en la kinejon, lumigita per neona lumo, kie sub la pluvŝirmejo amasiĝis tre samaj junaj homoj de nedistingebla sekso en brilaj pluvmanteloj ĝis la kalkanoj. Kaj tra la pluvo, super ĉio ĉi tio, brilis oraj kaj bluaj sorĉvortoj: "Prezidento – patro de la popolo", "Legio de Libero – fidela filo de la Prezidento", "Armeo – nia minaca gloro"...

Ili, inercie, iris sur la pavimo, kaj preterveturanta aŭto ekblekis ilin, alpelis sur la trotuaron, kaj verŝis per malpura akvo...

– Sed mi opiniis ke vi estas okdek-jara, – diris Viktor.

– Kijo-kijo? – per abomena voĉo diris Bol-Kunac, kaj Viktor liberiĝe ekridis.

Malgraŭ ĉio tio estis knabo, ordinara normala mirinfano, satleginta na Gejbor, na Zurzmansor, na Frem, kaj eble eĉ pene **pe**[3]-leginta na Ŝpengler (Spengler).

– Ĉe mi, infanaĝe, estis konato, – diris Viktor, – kiu iniciatis pe-legi originalon de Gegel (Hegel), li pe-legis, sed ekestis skizofreniulo. Vi, viaaĝe, certe

---

**3.** pe-: Prefikso **pe** utilas por indiki kompletan plenumon, realigon, efektivigon de la ago: konstruis pe-konstruis; kuiros pe-kuiros; kuracus pe-kuracus. Propono.

scias kio estas skizofrenio.

– Jes, mi scias, – diris Bol-Kunac.

– Kaj ĉu vi ne timas?

– Ne timas.

Ili venis al la hotelo, kaj Viktor proponis:

– Eble vi venu al mi, sekiĝu?

– Mi dankas vin. Mi ja intencis peti vian permeson eniri. Unue mi devas diri ion al vi kaj, due, mi devas konversacii telefone. Ĉu vi permesas?

Viktor permesis. Ili trairis la turniĝantan pordon preter la pordisto, demetinta la ĉapon antaŭ Viktor, preter la riĉaj statuoj kun elektraj kandeloj, en tute malplenan vestiblon, saturitan per restoraciaj odoroj, kaj Viktor eksentis kutiman pliviglîĝon, antaŭgustumante la venantan vesperon, kiam eblos drinki, babili senrespondece, kaj per la kubuto forŝovi al morgaŭo tion kio incite premas hodiaŭ, antaŭgustumante na Jul Golem kaj doktoron Kvadriga...

*«Kaj eblas ke ankoraŭ kun iu mi konatiĝos, kaj eble okazos io: interbatiĝo, aŭ temo subite ekludos; kaj mendu mi hodiaŭ* **lampridon**[4]*. Kaj iru ĉio bone, kaj per lasta buso veturu mi al Diana».*

Dum Viktor prenis ŝlosilon de la akceptisto, post lia dorso okazis konversacio. Bol-Kunac konversaciis kun la pordisto.

– Vi por kio venaĉis ĉi tien? – siblis la pordisto.

– Ĉe mi estas konversacio kun sinjoro Banev.

4. lamprido: granda mara fiŝo, tre bongusta (PIV).

– Mi montros al vi konversacion kun sinjoro Banev, – siblis la pordisto, – vizitaĉas vi restoraciojn...

— Ĉe mi estas konversacio kun sinjoro Banev, – ripetis Bol-Kunac. – Restoracio min ne interesas.

– Nur tio mankas ke vin, hundidon, restoracio interesu... Jen forĵetos mi vin de ĉi tie.

Viktor prenis la ŝlosilon, kaj returnis.

– E... – diris li. Li denove forgesis nomon de la pordisto. – La knabeto venas kun mi, ĉio estas en ordo.

La pordisto respondis nenion, lia vizaĝo estis malkontenta.

Ili leviĝis en la ĉambron. Viktor delice deĵetis la pluvmantelon, kaj kliniĝis por delaĉi la malsekajn botetojn. La sango verŝiĝis al la kapo, kaj li eksentis interne dolorajn neoftajn puŝojn en tiu loko kie estis la ŝvelaĵo, peza kaj ronda kiel plumba plateto. Li tuj rektiĝis kaj, tenante sin je la fosto, komencis deŝiri la boteton, apogante la ŝu-postaĵon per ŝupinto de la dua piedo. Bol-Kunac staris apude, de li falis gutoj.

– Senvestiĝu, – diris Viktor. – Pendu ĉion sur la radiatoron, kaj mi donos al vi viŝtukon.

– Permesu telefoni, – diris Bol-Kunac, ne moviĝante de la loko.

– Agu, – Viktor deŝiris la duan boteton, kaj en malsekaj ŝtrumpetoj foriris en la banĉambron. Senvestiĝante li aŭdis kiel la knabo mallaŭte konversacias, trankvile kaj neklare. Nur foje li distingeble kaj laŭte prononcis "Mi ne scias". Viktor viŝiĝis per la bantuko, vestis la negliĝan mantelon kaj, pren-

inte puran bantukon, eliris el la banĉambro.

– Jen al vi – diris li, kaj tuj ekvidis ke tio ne bezonatas. Bol-Kunac, kiel antaŭe, staris ĉe la pordo, kaj de li, kiel antaŭe, falis gutoj.

– Mi dankas vin, – diris li. – Sed mi devas iri. Mi nur volus ankoraŭ...

– Malvarmumos vi, – diris Viktor.

– Ne, ne maltrankviliĝu, mi dankas vin. Mi ne malvarmumos. Mi volis nur klarigi unu aferon. Ĉu Irma diris ion al vi?

– Viktor ĵetis la bantukon sur la kanapon, kaŭriĝis antaŭ la drink-ŝranketo, kaj eltiris botelon kaj glason.

– Irma sufiĉe multe diris al mi, – respondis li moroze. Li verŝis en la glason fingroalte da ĝino, kaj alverŝis iom da akvo.

– Ĉu ŝi transdonis al vi nian inviton?

– Ne, invitojn ŝi ne transdonis al mi. Prenu, drinku.

– Mi dankas vin, ne estas bezonate. Se ŝi ne transdonis, transdonos mi. Ni volus renkontiĝi kun vi, sinjoro Banev.

– Kiu – ni?

– Gimnazianoj. Ĉu vi scias, ni legis viajn librojn, kaj volus prezenti al vi kelkajn demandojn.

– Hm, – diris Viktor dube. – Ĉu vi estas certa ke tio interesos ĉiujn?

– Mi opinias ke jes.

– Tamen mi verkas ne por gimnazianoj, – memorigis Viktor.

– Tio ne gravas, – diris Bol-Kunac kun mola insisto. – Ĉu vi konsentas?

Viktor pripense turnis en la glaso la travideblan miksaĵon.

– Eble vi tamen drinkos? – demandis Viktor. – Plej bona rimedo kontraŭ malvarmumo. Ne? Tiam drinkos mi. – Li sekigis la glason. – Bone. Mi konsentas. Nur neniujn afiŝojn, avizojn, kaj tiel plu. Malvasta rondo. Vi kaj mi... Kiam?

– Kiam estos oportune al vi. Pli bone sekvontsemajne. Matene.

– Post du tagoj, ekzemple. Sed ne tro frue. Vendrede je la dek-unua. Ĉu taŭgas?

– Jes. Vendrede je la dek-unua. En gimnazio. Ĉu memorigi al vi?

– Nepre, – diris Viktor. – Mi ĉiam penas forgesi pri larĝaj vesperakceptoj, invitvesperoj, bankedoj, kaj ankaŭ pri mitingoj, renkontiĝoj kaj kunsidoj.

– Bone, mi memorigos, – diris Bol-Kunac. – Kaj nun, laŭ via permeso, mi foriros. Ĝis la revido, sinjoro Banev.

– Atendu, mi akompanos vin, – diris Viktor. – Por ke tiu ĉi... pordisto ne ofendu vin. Ial li estas malbonhumora hodiaŭ, kaj pordistoj, ĉu vi scias, estas popolo tia...

– Mi dankas vin – ne maltrankviliĝu, – oponis Bol-Kunac. – Tio estas mia patro.

Kaj li foriris. Viktor verŝis al si ankoraŭ fingroalton da ĝino, kaj falis en la brakseĝon.

*«Tiel», – pensis li. – «Bedaŭrinda pordisto. Tamen kio estas lia nomo? Malagrablas eĉ, malgraŭ ĉio ni estas kamaradoj je la malfeliĉo, kolegoj. Mi devas konversacii kun li, interŝanĝi la sperton. Li, verŝajne, estas pli sperta... Kia*

*tamen koncentriĝo da mirinfanoj en mia intima mucida urbetaĉo. Ĉu tio pro la altiĝinta humideco...» – Li retroklinis la kapon, kaj grimaciĝis pro la doloro. – «Jen serpentaĉo, tamen per kio li min?»*

Li palpis la ŝvelaĵon.

*«Similas je kaŭĉuka bastono. Tamen de kie mi sciu kio okazas pro kaŭĉuka bastono? Kio okazas pro moderna seĝo en "Rostita Pegazo" – tion mi scias. Kio okazas pro mitraleta kolbo, aŭ, ekzemple, pro pistoltenilo, mi ankaŭ scias. Pro ĉampanbotelo, kaj pro botelo da ĉampano... Demandu mi na Golem... Entute tio estas stranga okazaĵo, estus bone primediti ĝin...»*

Kaj li komencis primediti la okazaĵon, por forpeli duaplane aperintan penson pri Irma, pri bezono rifuzi de io, kaj iel limigi sin, skribi ien al iu, peti iun:

*«Pardonu ke mi maltrankvilas vin, grizulo, sed ĉe mi aperis ĉi tie iom pli ol dek-du-jara filino, tre simpatia knabino, sed patrino ŝia estas stultulino, ankaŭ la patro estas stultulo, do necesas lokigi ŝin ien malproksimen de la stultaj homoj... Ne volas mi hodiaŭ pensi pri tio, morgaŭ mi pensos».*

Li rigardis la horloĝon.

*«Kaj sufiĉas pensi. Entute.»*

Li leviĝis, kaj komencis vesti sin antaŭ la spegulo.

*«La ventraĉo kreskas, diable, sed de kie la ventraĉo? Ĉiam mi estis tia svelta, tendeneca. Eĉ ne ventrego, fakte – kiu aperas pro egalritma vivo kaj bona nutraĵo – sed iu aĉa opozicia ventreto. Ĉe sinjoro prezidento ĝi ja ne estas tia. Ĉe sinjoro prezidento tio estas nobla, nigre volvita brila zepelino...»*

Ligante la kravaton li ŝovis la vizaĝon al la spegulo, kaj subite ekpensis:

*«Kiel aspektis tiu ĉi decida fortika vizaĝo, tiel ŝatata per inoj de konata speco, ne bela, sed aŭdaca vizaĝo de batalanto kun kvadrata mentono, kiel ĝi aspektis fine de la historia renkontiĝo. Vizaĝo de sinjoro prezidento, ankaŭ ne senigita de aŭdaco kaj elementoj de kvadrateco memorigis, al fino de la historia renkontiĝo, diru ni rekte, muzelaĉon de apro. Sinjoro prezidento bonvolis eksciti sin ĝis lasta grado, el lia dentega faŭko flugis ŝprucoj, kaj mi elpoŝigis la buŝtukon, kaj demonstre purigis mian vangon, kaj tio estis, verŝajne, plej kuraĝa ago en mia vivo, se ne kalkuli tiun okazon kiam mi batalis kun tri tankoj samtempe. Sed kiel mi batalis kun la tankoj mi ne memoras, mi konas tion nur laŭ rakontoj de la atestantoj, sed la buŝtuketon mi elpoŝigis konscie, kaj komprenis la konsekvencojn... En ĵurnaloj oni ne informis pri tio. En ĵurnaloj oni*

*honeste kaj aŭdace, kun severa rekteco informis ke "beletristo Banev sincere dankis sinjoron prezidenton pro ĉiuj rimarkoj kaj klarigoj faritaj dum la konversacio". Estas strange kiel bone mi memoras tion.»*

Li rimarkis ke ĉe li blankiĝis vangoj kaj la nazpinto.

*«Jen tia mi estis tiam, do estis tute nature kriaĉi sur tiun. Ja ne sciis li, bedaŭrinda, ke ne pro timo mi paliĝas sed pro kolero, kiel Ludoviko la Dek-kvara... Sed ne svingu ni la pugnojn post la interbatiĝo. Ĉu vere gravas pro kio mi paliĝis tie, ĉe li. Bone, ĉesu mi. Sed por trankviliĝi, por ordigi min antaŭ veno al homoj, por redoni normalan koloron al la nebela sed aŭdaca vizaĝo, mi devas noti, memorigi al vi, sinjoro Banev, ke se vi ne demonstrus al sinjoro prezidento vian buŝtuketon, troviĝus vi nun plej bonorde en nia glora ĉefurbo, sed ne en tiu ĉi malseka truo.*

Viktor unuglute eldrinkis la ĝinon, kaj malleviĝis en la restoracion.

## Ĉapitro dua

– Certe eblas ke huliganoj, – diris Viktor, – sed en mia tempo neniu huligano okupiĝus pri okulvitrulo. Ĵeti en lin ŝtonon, – tio pli-malpli, sed kapti, tiri, kaj entute tuŝi... Ĉiuj ni timis ilin kiel infekton.

– Sed mi diras al vi: tio estas genetika malsano, – diris Golem. – Ĝi estas absolute ne infekta.

– Kial ne infekta, – refutis Viktor, – se pro ĝi aperas verukoj kiel pro bufo! Ja ĉiuj konas tion.

– Pro bufoj ne okazas verukoj, – bonanime diris Golem. – Ankaŭ pro malsekulaĉoj. Hontu, sinjoro verkisto. Tamen verkistoj estas popolo griza.

– Same al ĉiu popolo. Popolo estas griza sed raciega. Kaj se popolo asertas ke pro bufoj kaj malsekulaĉoj aperas verukoj...

– Kaj jen proksimiĝas mia inspektisto, – diris Golem.

Venis Pavor en malseka pluvmantelo, senpere de la strato.

– Bonan vesperon, – diris li. – Tuta mi malsekiĝis, volas drinki.

– Denove li per ŝlimo fetoras – indigne prononcis doktoro R.Kvadriga, vekiĝinta el la alkohola stuporo. – Ĉiam li fetoras per ŝlimo. Kiel baraĵ-lago. **Lemnoj**[5].

– Kion vi drinkas? – demandis Pavor.

– Kiu – ni? – informiĝis Golem. – Mi, ekzemple, kiel ĉiam drinkas konjakon. Viktor drinkas ĝinon. Kaj la doktoro – ĉion laŭvice.

– Malhonorego! – diris doktoro R.Kvadriga kun indigno. – Skvamoj! Kaj kapoj.

– Duoblan konjakon! – kriis Pavor al kelnero.

Lia vizaĝo estis malseka pro la pluvo, la densaj haroj kungluiĝis, kaj de la tempioj sur la razitajn vangojn defluis brilaj strietoj.

*«Ankaŭ ĉe li estas firma vizaĝo», – pensis*

---

**5.** lemnoj: tre malgrandaj flosantaj verdaj plantoj (PIV)

*Viktor, – «multaj, eble, envias. De kie ĉe sanitara inspektisto tia vizaĝo? Firma vizaĝo tio – ŝutiĝas pluvo, lumĵetiloj, sur malsekaj vagonoj tumultas kaj rompiĝas ombroj... Ĉio estas nigra kaj brila, nur nigra kaj brila, kaj neniuj konversacioj, neniu babilado, nur ordonoj, kaj ĉiuj obeas... Ne nepre vagonoj, tio povas esti avioj, flughaveno, kaj poste neniu scias kie li estis kaj de kie venis... knabinoj retrofalas, sed viroj volas fari ion aŭdacan – ekzemple rektiĝi kaj entiri la ventregon. Jen al Golem ne estus malutile entiri la ventregon, sed malverŝajnas tio, kien li entiros ĝin, ĉio ĉe li estas okupata tie, ne estas kien entiri. Doktoro R.Kvadriga jes povus, tamen li ne rektiĝos. Jam multajn tagojn kaj por ĉiam li estas ĝibeta. Dum vesperoj li ĝibetas ĉe la tablo, matene – super la pelveto, kaj tage, – pro la malsana hepato. Kaj, sekve, ĉi tie nur mi kapablas rektiĝi kaj entiri la ventraĉon, sed pli bone mi aŭdace eldrinku glaseton da ĝino.*

– Nimfomaniulo, – malgaje diris doktoro R.Kvadriga al Pavor. – Najadomano. Kaj algoj.

– Ŝtopiĝu, doktoro – diris Pavor. Li viŝadis la vizaĝon per paperaj buŝtuketoj, ĉifis ilin, kaj ĵetis sur la plankon. Poste li komencis purigi la manojn.

– Kun kiu vi interbatiĝis? – demandis Viktor.

– Perfortita per malsekulaĉo, – prononcis doktoro R.Kvadriga, turmente penanta surlokigi la okulojn, kiuj kuniĝis ĉe li ĉe la nazradiko.

– Dume kun neniu, – respondis Pavor, kaj fikse alrigardis la doktoron, sed R.Kvadriga ne rimarkis

tion.

Kelnero alportis la pokaleton. Pavor nehaste eldrinkis la konjakon, kaj leviĝis.

– Iru mi lavi min, – diris li trankvil-voĉe, – ekster la urbo estas kote, tuta mi merdiĝis. – Kaj li foriris, tuŝante dum la iro la seĝojn.

– Io okazas pri mia inspektisto, – diris Golem. Li per fingrobato deĵetis de sur la tablo ĉifitan buŝtuketon. – Io de tutmonda skalo. Ĉu vi, hazarde, scias kio ĝuste?

– Tion vi devas scii, – diris Viktor. – Li insperktas ne min sed vin. Kaj tio estas vi kiu scias ĉion. Parenteze, Golem, de kie vi scias ĉion?

– Neniu scias ĉion, – oponis Golem. Iuj konjektas. Tre malmultaj – kiuj volas. Sed ne eblas demandi de kie ili konjektas, – tio estas lingvo-perforto. Kien iras pluvo? Per kio leviĝas suno? Ĉu vi par¯donus na Ŝekspir, se li verkus ion similan? Tamen na Ŝekspir vi pardonus. Al Ŝekspir ni pardonas multon, malsame al Banev... Aŭskultu, sinjoro beletristo, mi havas ideon. Mi eldirnkos la konjakon, kaj vi finigu tiun ĉi ĝinon. Aŭ vi jam cedas?

– Golem, – diris Viktor, – ĉu vi scias ke mi estas fera homo?

– Mi konjektas.

– Kaj kio sekvas el tio?

– Ke vi timas rustiĝi.

– Supozu ni ke jes, – diris Viktor. – Sed mi konsideras ne tion. Mi konsideras mian kapablon drinki multe kaj longe, ne perdante la moralan ekvilibron.

– Ha, jen pri kio temas, – diris Golem, verŝante al si el la karafeto. – Bone do. Ni ankoraŭ revenos

al tiu ĉi temo.

– Mi ne memoras, – klarvoĉe diris subite doktoro R.Kvadriga. – Ĉu mi prezentiĝis, sinjoroj, aŭ ne? Rem Kvadriga, pentristo, doktoro **honoris kauza**[6], honora ano... Vin mi memoras, – diris li al Viktor. – Ni lernis kune, kaj ankoraŭ io... Sed vi, pardonu...

– Mia nomo estas Jul Golem, – malzorge diris Golem.

– Tre agrable. Ĉu skulptisto?

– Ne, kuracisto.

– Ĉu ĥirurgo?

– Mi estas ĉefkuracisto de leprulejo, – tolereme klarigis Golem.

– Ha, jes! – diris doktoro R.Kvadriga, ĉevale svingante la kapon. Certe. Pardonu min, Jul... Sed kial vi sekretas? Kia ja kuracisto vi estas tie? Ja vi bredas malsekulaĉojn... Mi prezentos vin. Tiaj homoj estas bezonataj al ni... Pardonu, – diris li neatendite. – Mi tuj.

Li elgrimpis el la brakseĝo, kaj ekimpetis al la eliro, vagante inter la malplenaj tabletoj. Al li alsaltis kelnero, kaj doktoro R.Kvadriga brakumis lin je la kolo.

– Ĉio tio pro pluvoj, – diris Golem. – Ni spiras akvon. Jam tri jaroj tiu ĉi urbo spiras akvon. Sed ni ne estas fiŝoj, ni aŭ mortos, aŭ foriros de ĉi tie. – Li serioze kaj malgaje rigardis na Viktor. – Kaj pluvo daŭre falados sur la malplenan urbon, disfluante la pavimojn, gutante tra tegmentoj, tra la putraj

---

**6.** honoris kauza (honoris causa): vortoj aldonitaj al la scienca titolo, se ĝi estas alproprigita sen la defendo.

tegmentoj... Poste ĝi forlavos ĉion, dissolvos la urbon, transformos ĝin en la praan teron, tamen ne ĉesiĝos, sed falos kaj falos...

– Apokalipso, – diris Viktor, por diri ion.

– Jes, apokalipso... Ĝi falos kaj falos, kaj poste la tero saturiĝos, kaj elĝermos nova semitaĵo, kiu ne okazis antaŭe, kaj forestos trudherbaĉoj inter la seninterrompaj grenplantoj. Sed forestos ankaŭ ni, kaj ne sukcesos plezuriĝi pri tiu ĉi nova universo.

*«Se ne tiuj ĉi bluaj saketoj sub la okuloj, se ne la pendanta gelatena ventraĉo, se tiu ĉi belega semida nazo ne similus topografian mapon... Tamen, se pripensi, ĉiuj profetoj estis alkoholuloj, ĉar estas ja tre angore: vi scias ĉion, sed neniu kredas al vi. Se en departementojn oni enigus etatan postenon de profeto, tiam oni devus promocii al ili titolon de ne malpli ol tria-ranga* **konsilisto**[7] *– por la prestiĝo. Sed ankaŭ tio verŝajne ne helpus...».*

– Pro sistemeca pesimismo, – diris Viktor voĉe, – kiu subfosas servan disciplinon kaj kredon je racia estonto, mi ordonas ekzekuti tria-rangan konsiliston Golem per ŝtonĵetado.

– Hm, – diris Golem. – Mi estas nur ses-ranga konsilisto, – informis li. – Kaj, entute, ĉu ekzistas en nia tempo profetoj? Mi konas neniun. Multege da misprofetoj, kaj neniu profeto. En nia tempo ne eblas antaŭvidi estonton – tio estas perforto super la lingvo. Kion vi dirus leginte na Ŝekspir: antaŭvidi

---

**7.** Temas pri ofic-rangoj, kie rango unua estas plej alta.

estanton? Ĉu oni povas antaŭvidi ŝrankon en propra ĉambro... Kaj jen iras mia inspektisto. Kiel vi sentas vin, inspektisto?

– Perfekte, – diris Pavor, eksidante. – Kelnero, duoblan konjakon! Tie, en vestiblo, nian pentriston tenas kvaropo, – informis li. Ili klarigas al li kie troviĝas la restoracia eniro. Mi decidis ne enmiksiĝi, ĉar li kredas al neniu, kaj batadas... Pri kiuj ŝrankoj vi konversacias?

Li estis seka, eleganta, freŝa, kaj odoris parfumon.

– Ni konversacias pri estonto, – diris Golem.

– Ĉu estas senco konversacii pri estonto? – oponis Pavor. – Pri estonto oni ne konversacias, estonton oni faras. Jen pokaleto da konjako. Ĝi estas plena. Mi faros ĝin malplena. Jen tiel. Unu saĝa homo diris ke estonton oni ne povas antaŭvidi, sed eblas inventi ĝin.

– Alia saĝa homo, – rimarkis Viktor, – diris ke estonto entute ne ekzistas, ekzistas nur estanto.

– Mi ne ŝatas klasikan filozofion, – diris Pavor. – Tiuj homoj scipovis nenion, kaj deziris nenion. Al ili simple plaĉis rezoni, kiel al Golem drinki. Estonto estas zorgeme sendanĝerigita estanto.

– Ĉe mi ĉiam aperas stranga sento, – diris Golem, – kiam civila homo rezonadas kiel militisto.

– Militistoj tute ne rezonas, – oponis Pavor. – Ĉe militistoj estas nur refleksoj kaj iom da emocioj.

– Ankaŭ ĉe plimulto da civiluloj, – diris Viktor, palpante sian nukon.

– Nun neniu havas tempon rezoni, – diris Pavor, – nek militistoj, nek civiluloj. Nun oni sukcesu

turniĝi. Se vin interesas estonto, inventu ĝin rapide, dum la iro, konforme al la refleksoj kaj emocioj.

– Al diablo inventistojn, – diris Viktor.

Li sentis sin ebria kaj gaja. Ĉio troviĝis sur siaj lokoj.

*Li volis iri nenien, resti ĉi tie, en tiu ĉi malplena duonluma halo, ankoraŭ tute ne kaduka, sed jam kun lik-spuroj sur la muroj, kun movebliĝintaj planktabuloj, kun kuireja odoro; precipe se ekmemori ke ekstere en tuta mondo iras pluvo, super pavimitaj stratoj – pluvo, super pintaj tegmentoj– pluvo, pluvo superverŝas montojn kaj valojn, kaj iam ĝi forlavos ĉion ĉi tion, sed tio okazos tute ne baldaŭ... Kvankam, se pripensi, pri nenio eblas diri nun ke tio okazos ne baldaŭ. Jes, karaj miaj, delonge jam pasis tiu tempo kiam esonto estis ripeto de la estanto, kaj ĉiuj ŝanĝoj svage videblis ie post malproksima horizonto. Golem pravas, ne ekzistas en mondo iu ajn esonto, ĝi kunverŝiĝis kun la estanto, kaj nun ne eblas disting kie estas kio.*

– Perfortita per malsekulaĉo! – diris Pavor venĝeme.

En pordo de la restoracio aperis doktoro R.K-vadriga. Kelkajn sekundojn li staris, pez-atente pririgardante la vicojn da malplenaj tabletoj, poste lia vizaĝo klariĝis, kaj li, abrupte kliniĝinte antaŭen, ekimpetis al sia loko.

– Kial vi nomas ilin malsekulaĉoj? – demandis Viktor. – Ĉu ili ekestis malsekaj ĉe vi pro pluvo?

– Sed kial ne? – diris Pavor. – Kiel laŭ vi oni nomu ilin?

– Okulvitruloj, – diris Viktor. – Bona malnova vorto. Ni ĉiam nomis ilin okulvitruloj.

Doktoro R.Kvadriga proksimiĝis. Li estis tute malseka antaŭe, verŝajne oni lavis lin super lavabo. Li aspektis laca kaj disiluziita.

– Diablo scias kio, – abomene diris li ankoraŭ de malproksime, – tio neniam okazis al mi: forestas eniro! Kien ajn mi puŝiĝu – ĉie nur fenestroj... Ŝajnas ke mi igis vin atendi, sinjoroj. – Li falis en sian brakseĝon, kaj ekvidis na Pavor. – Denove li estas ĉi tie, – informis li na Golem per kredema flustro. – Mi esperas ke li ne ĝenas vin... Kaj min, ĉu vi scias, trafis mirinda okazaĵo. Oni malsekigis min tutan...

Golem verŝis al li konjakon.

– Mi dankas vin, – diris doktoro R.Kvadriga, – sed prefere mi preterlasos paron da rondoj. Estas necese sekiĝi.

– Kaj mi – deklaris Viktor, – entute estas pro ĉio malnova kaj bona. – Okulvitruloj restu okulvitruloj. Kaj entute ĉio restu sen ŝanĝoj. Mi estas konservativulo... Atenton! – diris li laŭte. – Mi proponas toston pro konservatismo. Momenton... – Li verŝis al si ĝinon, leviĝis, kaj apogis la manon je dorson de la brkseĝo. – Mi estas konservativulo, – diris li. – Kaj ĉiujare mi iĝas pli konservativa, ne pro tio ke mi maljuniĝas, sed pro tio ke mi sentas bezonon pri tio...

Sobra Pavor kun preparita jam pokaleto en la mano rigardis lin desobe kun substrekita atento. Golem malrapide manĝis la lampridon, kaj doktoro

R.Kvadriga, ŝajne, penis kompreni de kie venas al li la voĉo, kaj kies. Ĉio estis tre bona.

– Homoj ŝategas kritiki registarojn pro koservativismo, – daŭrigis Viktor. – Homoj ŝategas laŭdegi progreson. Tio estas nova influo, kaj ĝi stultas, same al ĉio nova. Homoj devus preĝi al Dio por ke Li donu al ili plej inertan, plej stagneman kaj konformisman registaron.

Nun ankaŭ Golem levis la okulojn, kaj rigardis lin, kaj Teddi, post sia vendobreto, ĉesis repurigi la botelojn, kaj ankaŭ ekaŭskultis, sed jen la nuko ekdoloris subite, kaj venis bezono surtabligi la pokaleton, kaj karesi la ŝvelaĵon.

– Registara aparato, sinjoroj, dum ĉiuj tempoj opiniis sia ĉefa tasko konservi *status qvo*. Mi ne scias kiom tio estis pravigita antaŭe, sed nun tiu funkcio de la registaro estas simple bezonata. Mi difinus tiun funkcion tiel: ĉiel kontraŭstari al peno de estonto enigi siajn palpilojn en nian tempon, forhaki tiujn palpilojn, kaŭterante ilin per arda fero. Malhelpi al inventistoj, stimuli skolastikulojn kaj babilulojn... En ĉiujn gimnaziojn enigi ekskluzive klasikan klerigadon. Sur superajn ŝtatajn postenojn enoficigi oldulojn, troŝarĝitajn per familioj kaj ŝuldoj, ne malpli ol kvindek-jaraĝajn, por ke ili prenu koruptaĵojn, kaj dormu en kunsidoj.

– Kion vi babilaĉas, Viktor? – diris Pavor riproĉe.

– Sed kial ne, – diris Golem, – estas nekutime agrable aŭdi tiajn moderajn lojalajn paroladojn.

– Mi ankoraŭ ne finis, sinjoroj!... Talentajn sciencistojn postenigi je administristoj kun grandaj

salajroj. Ĉiujn senescepte inventojn akcepti, pripagi malbone, kaj sendi en arĥivojn. Enigi superimpostojn sur ĉiun varan kaj produktadan novismon.

*«Sed kial mi, fakte, staras?» – ekpensis Viktor, kaj sidis.*

– Nu, kiel vi aprezas tion? – demandis li na Golem.

– Vi tute pravas, – diris Golem. – Ĉar ĉiuj ĉe ni estas nun radikaluloj. Eĉ direktoro de la gimnazio. Konservativismo, tio estas nia savo.

Viktor drinketis ĝinon, kaj diris malĝoje:

– Estos neniu savo. Ĉar ĉiuj stultuloj-radikaluloj ne nur kredas je progreso, ili eĉ ŝatas progreson, ili imagas ke ne eblas sen progreso. Ĉar progreso, interalie, estas ĉipaj aŭtoj, elektronikaj varoj, kaj entute ebleco fari malpli, kaj ricevi pli. Kaj tial ĉiu registaro estas devigata per unu mano... Tio estas, ne per mano, certe... per unu piedo premi la bremsilon, kaj per la dua – akcelilon. Kiel konkurs-stiristo dum la turniĝo. Sur la bremsilon – por ne perdi la stireblecon. Kaj sur la akcelilon – por ne perdi rapidecon ĉar, se ne fari tion, iu ajn demagogo, progres-defendanto, nepre forĵetos lin de la stirista loko.

– Kun vi estas malfacile diskuti, – ĝentile diris Pavor.

– Do vi ne diskutu, – diris Viktor. – Ne valoras diskuti: en diskutoj naskiĝas vero, estu ĝi malbenata, – li singarde karesis la tuberon, kaj aldonis: – tamen ĉe mi tio aperis, verŝajne, pro la profaneco. Ĉiuj sciencistoj estas batalantoj pro progreso, sed

mi ne estas sciencisto. Mi estas simple pli-malpli konata strofisto.

– Kial vi ĉiam kaptas vian nukon? – demandis Pavor.

– Iu bastardo frapis min, – diris Viktor. – Per **kaprompilo**[8]... Ĉu ĝuste mi diras, Golem? Ĉu per kaprompilo?

– Miaopininie per kaprompilo – diris Golem. – Sed eblas ke per briko.

– Ja kion vi diras? – miris Pavor. – Per kiu kaprompilo? Ĉu en tiu ĉi ursa angulo?

– Do vidas vi, – edife diris Viktor. – Progreso! Drinku ni denove je konservativismo.

Ili vokis la kelneron, ankoraŭfoje drinkis je konservativismo. Venis la naŭa, kaj en la halo aperis konata paro – juna homo kun potencaj okulvitroj, kaj lia altstatura kunulo. Eksidinte ĉe sia tableto ili ŝaltis la surplankan lampon, humile ĉirkaŭrigardis, kaj komencis pristudi la menuon. La juna homo denove venis kun sia teko. La tekon li metis sur liberan lokon apud si. Li ĉiam estis tre bonkora al sia teko. Pe-diktinte la mendon al la kelnero, ili komencis silente rigardi iun malproksimon.

*«Stranga paro» – pensis Viktor. – «Mirinda nekonformeco. Ili aspektas kvazaŭ tra difektita binoklo: unu estas fokusita, alia svaga, kaj inverse. Plena nekongrueco. Kun la okulvitra juna homo eblus konversacii pri progreso, sed kun la altstatura – ne. Altstatura povus bati min per kaprompilo, sed la juna kun la okulvit-*

---

**8.** Temas pri metala plata pezaĵo kun por-fingraj truoj.

*roj – ne... Sed nun mi kongruos vin. Kiel mi vin kongruu? Nu, ekzemple, tiel ... Iu ŝtata banko, keletaĝoj... cemento, betono, signalado, la altstatura kunmetas per la disko nombron, la ŝtala turo turniĝas, malfermiĝas eniro en trezorejon, la ambaŭ eniras, la altstatura kunmetas alian nombron per alia disko, pordo de la gardoŝranko malfermiĝas, kaj la juna ĝis la kubutoj enigas siajn manojn en la briliantojn.»*

Doktoro R.Kvadriga subite ekploris, kaj kaptis na Viktor je la mano.

– Nokti, – diris li. – Al mi. Ha?

Viktor senprokraste verŝis al li ĝinon. R.Kvadriga pe-drinkis, purigis sub la nazo, kaj daŭrigis:

– Al mi. Vilao. Fontano estas. Ha?

– Fontano – tio estas bona elpensaĵo, – rimarkis Viktor devie. – Kaj ankoraŭ kio?

– Kelo, – malgaje diris Kvadriga. – Spuroj. Timas mi. Aĉetu, ĉu vi volas?

– Pli bone donacu, – proponis Viktor.

R.Kvadriga ekpalpebrumis.

– Bedaŭras mi, – diris li.

– Avarulaĉo, – diris Viktor riproĉe. – Tio ĉe vi de la infaneco. Vilaon li bedaŭras! Do ŝtopiĝu vi per via vilao.

– Ne amas vi min, – amare konstatis doktoro R.Kvadriga. – Kaj neniu.

– Kaj sinjoro prezidento? – agrese demandis Viktor.

– "Prezidento – patro de la popolo" – vigliĝinte diris R.Kvadriga. – skizo je oraj tonoj... "Prezidento

en la pozicioj". Fragmento de pentraĵo: "Prezidento en pripafitaj pozicioj".

– Kaj ankoraŭ kio? – interesiĝis Viktor.

– "Prezidento kun la pluvmantelo" – diris R.Kvadriga pretece. Panelo. Panoramo.

– Viktor, enuiĝinte, fortranĉis peceton de la lamprido, kaj komencis aŭskulti na Golem.

– Jen kio, Pavor, – diris tiu. – Lasu vi min. Kion mi ankoraŭ povas? Tabelkalkulojn mi prezentis al vi. Raporton vian mi pretas subskribi. Se vi volas plendi pri la militistoj – plendu. Se vi volas plendi pri mi...

– Ne volas mi plendi pri vi, – respondis Pavor, premante la manon al la brusto.

– Tiam ne plendu.

– Sed konsilu vi ion al mi! Ĉu vere vi nenion povas al mi konsili?

– Sinjoroj, – diris Viktor. – Enuego. Foriru mi.

Neniu atentis lin. Li deŝovis la seĝon, leviĝis kaj, sentante sin tre ebria, direktiĝis al la vendobreto. Kalva Teddi repurigis la botelojn kaj rigardis lin seninterese.

– Kiel kutime? – demandis li.

– Momenton, – diris Viktor. – Pri kio mi volis demandi vin? Ha! Kiel vi fartas, Teddi?

– Pluvo, – mallonge diris Teddi, kaj verŝis al li la distilitan.

– Damna vetero ekregis en nia urbo, – diris Viktor, – kaj apogis sin je la vendobreto. – Kio estas tie sur via barometro?

– Teddi ŝovis la manon sub la vendobreton, kaj elprenis *"veteraĵon"*. Ĉiuj tri dornaĵoj kompakte

premiĝis al la brila, kvazaŭ polurita korpeto.

– Sen lumeto da espero, – diris Teddi, atente pririgardante la *"veteraĵon"*. – Diabla elpensaĵo. – Pripensinte li aldonis: – Kaj entute nur Dio scias, eble ĝi delonge jam difektiĝis – tiom da jaroj pluvas jam, kiel kontroli?

– Eblas viziti Saharon, – diris Viktor.

Teddi eksmajlis.

– Ridinde, – diris li. – Tiu ĉi sinjoro via, Pavor, ridinda afero, ducent kronojn proponas kontraŭ tiu ĉi aĵo.

– Pro ebrieco verŝajne, – diris Viktor. – Por kio ĝi al li...

– Ĝuste tiel mi diris al li, – Teddi turnis *"veteraĵon"*, kaj proksimigis ĝin al la dekstra okulo. – Ne fordonos mi, – diris li decide. – Li mem serĉu.

Li metis la *"veteraĵon"* sub la vendobreton, rigardis kiel Viktor turnas en la fingroj la pokaleton, kaj informis:

– Diana via estis alveturinta.

– Ĉu antaŭdelonge? – malatente demandis Viktor.

– Je la kvina, proksimume. Mi donis al ŝi keston da konjako. Rosŝeper sendadas, neniel haltos li. Sendadas li la personaron por konjako, grasa muzelaĉo. Tia, vidu vi, – ano de la parlamento... Ĉu vi ne maltrankvilas pri ŝi?

Viktor levetis la ŝultrojn.

*Subite li ekvidis apud si na Diana. Ŝi aperis ĉe la vendobreto, sur ŝi estis malseka pluvmantelo kun dekapigita kapuĉo. Ŝi ne*

*rigardis lian flankon, li vidis nur ŝian profilon, kaj pensis ke el ĉiuj virinoj kiujn li antaŭe konis, ŝi estas plej bela, kaj ke tia, eble, neniam plu estos ĉe li. Ŝi staris apoginte sin je la vendobreto, kaj ŝia vizaĝo estis tre pala, kaj tre indiferenta, kaj ŝi estis plej bela – ĉio estis bela ĉe ŝi. Kaj ĉiam. Kaj kiam ŝi ploris, kaj kiam ŝi ridis, kaj kiam koleris, kaj kiam ŝi estis indiferenta, kaj eĉ kiam ŝi malvarmis, kaj precipe kiam venis al ŝi* ***tia*** *stato... «Ĝis kiom mi estas ebria» – pensis Viktor, – «kaj odoraĉas de mi, ŝajne, kiel de R.Kvadriga».*

Li elstreĉis la suban lipon, kaj spiretis en la nazon. Nenio percepteblas.

– Vojoj estas malsekaj, glitaj, – diris Teddi. – Nebulo... Krom tio mi diru al vi ke tiu Rosŝeper certe estas in-ŝatanto, olda virkapro.

– Rosŝeper estas impotento,– refutis Viktor, senpense pe-glutinte la distilitan.

– Ĉu tion ŝi rakontis al vi?

– Lasu, Teddi, – diris Viktor. – Ĉesu.

Teddi atente alrigardis lin, poste suspiris, grakis, kaŭriĝis, serĉetis sub la vendobreto, kaj metis antaŭ Viktor boteleton da amoniaka akvo kaj komencitan pakaĵeton da teo. Viktor rigardetis la horloĝon, kaj komencis spekti kiel Teddi nehaste prenas puran pokalon, verŝas en ĝin sodan akvon, gutas el la boteleto, kaj same senhaste kirligas la miksaĵon per vitra bastoneto. Poste li alŝovis la pokalon al Viktor. Viktor eltrinkis, kaj fermis la okulojn, detenante la spiradon. Freŝa kaj aĉa, aĉe-freŝa strio de la amoniaka akvo frapis la cerbon kaj dis-

verŝis ie post la okuloj. Viktor entiris per la nazo aeron, kiu ekestis netolereble malvarma, kaj enigis la fingrojn en pakaĵeton da teo.

– Bone, Teddi, – diris li. – Dankon. Enskribu al mi kiom decas. Ili diros al vi kiom decas. Iru mi.

Peneme maĉante la teon li revenis al sia tableto. Okulvitra juna homo kun sia altstatura kunulo haste glutis la vespermanĝon. Antaŭ ili staris sola botelo – kun loka minerala akvo. Pavor kaj Golem, liberiginte lokon sur la tablotuko, ludis je ĵetkuboj, kaj doktoro R.Kvadriga, kaptinte la nekombitan kapon, monotone zumis:

– "Legio de Libero – apogo de la prezidento". Mozaiko... En feliĉa nomtago de via ekscelenco... "Prezidento – patro de infanoj". Alegoria pentraĵo...

– Foriras mi, – diris Viktor.

– Bedaŭrindas, – diris Golem. – Tamen mi deziras al vi sukceson.

– Saluton al Rosŝeper, – diris Pavor, okuluminte.

– "Ano de la parlamento Rosŝeper Kant", – vigliĝis R.Kvadriga. – Portreto. Nemultekoste. Ĝistalie...

Viktor prenis sian bruligilon, cigared-skatolon, kaj ekiris al la eliro. Post li doktoro R.Kvadriga per klara voĉo prononcis:

– Mi opinias, sinjoroj, ke venis tempo konatiĝi. Mi estas Rem Kvadriga, doktoro *honoris kauza*, sed vin, sinjoro mi ne memoras...

En la pordo Viktor kunpuŝiĝis kun dika trejnisto de futbala teamo "Fratoj je racio". La trejnisto estis tre zorgita, tre malseka, kaj cedis al Viktor la vojon.

# Ĉapitro tria

La buso haltis, kaj la ŝoforo diris:

– Venis ni.

– Ĉu sanatorio? – demandis Viktor. Ekstere estis nebulo, densa, lakta. Lumo de la lumĵetiloj difuzis en ĝi, kaj videblis nenio.

– Sanatorio, sanatorio, – elgrumblis la ŝoforo, ekfumante la cigaredon.

Viktor venis al la pordo kaj, malleviĝante, diris:

– Jen kia nebulego. Nenion mi vidas.

– Orientiĝos vi, – indiferente promesis la ŝoforo. Li sputis trans la fenestron. – Trovis ili lokon sanatorion establi. Tage nebulo, vespere nebulo.

– Bonan vojaĝon, – diris Viktor.

La ŝoforo ne respondis. Ekmuĝis la motoro, fermiĝis la pordoj, kaj la grandega malplena buso, tute vitrigita, kaj lumigita interne kiel vendejo ŝlosita pro nokto, returnis, tuj transformiĝinte je malklara lum-makulo, kaj forruliĝis reen en la urbon.

Viktor malfacile trovis la pordegon, tuŝante per la manoj la kradan barilon, kaj palpe ekiris sur la aleo. Nun, kiam la okuloj alkutimiĝis al la mallumo, li neklare distingis antaŭe lumigitajn fenestrojn de la dekstra alo, kaj iun aparte profundan mallumon sur loko de la maldekstra alo, kie dormis laciĝintaj tage "Fratoj je racio". En la nebulo kiel tra vato aŭdiĝis kutimaj sonoj – ludis gramofono, tintis manĝilaro, iu kriaĉis raŭke.

Viktor moviĝis, penante teni sin meze de la sabligita aleo, por ne stumbli je iun gipsan vazon. Botelon da ĝino li zorge premis al la brusto, kaj estis tre singarda, tamen post nelonge li stumblis je io

mola, kaj ekiretis kvarpiede. Post li oni malvigle kaj dorme damnis en senco ke oni devas ŝaltadi lumon. Viktor pe-palpis en la mallumo la falintan botelon, denove premis ĝin al la brusto, kaj ekiris pluen, etendinte la liberan manon. Post nelonge li stumblis je aŭto, palpe preteriris ĝin, kaj stumblis je la alia. Diablo, ĉi tie okazis amaso da aŭtoj. Viktor, blasfemante, vagis inter ili kiel en labirinto, kaj longe ne povis elgrimpi al la neklara aŭreolo kiu signifis eniron en la vestiblon. Glataj aŭtoflankoj estis malsekaj pro la rosiĝinta nebulo. Ie apude oni hihiis kaj depuŝiĝis.

Ĉi foje la vestiblo estis malplena. Neniu ludis blindludon kaj kuradis tuŝlude, skuante la grasan postaĵon, neniu dormis en brakseĝoj. Ĉie kuŝaĉis ĉifitaj pluvmanteloj, kaj iu ŝercemulo pendigis la ĉapelon sur la fikuson.

Sur tapiŝita ŝtuparo Viktor leviĝis la duan etaĝon. Tondris muziko. En la koridoro ĉiuj dekstraj pordoj en apartementon de la parlamentano estis vaste malfermitaj, de tie disvastiĝis grasa odoro de manĝaĵoj, fumaĵoj kaj de varmigitaj korpoj. Viktor turniĝis maldekstren kaj frapetis pordon de Diana. Respondis neniu. La pordo estis ŝlosita, la ŝlosilo elstaris el la ŝlosiltruo. Viktor eniris, ŝaltis lumon kaj metis la botelon sur la televidilan tableton.

Ekaŭdiĝis paŝoj, kaj li elrigardis eksteren. Sur la koridoro, per vasta kaj firma irmaniero, malproksimiĝis dekstren altstatura homo en malhela vespera kostumo. Sur la ŝtuparplaceto li haltis antaŭ la spegulo, ĵetlevinte la kapon korektis la kravaton (Viktor sukcesis pririgardi la flavete-brunhaŭtan

aglan profilon kaj la pikan mentonon), kaj poste io ŝanĝiĝis en li: li ĝibetis, iom kliniĝis flanken kaj, aĉe svingante la femurojn, malaperis en iu el la vaste malfermitaj pordoj.

*«Dandaĉo», – necerte ekpensis Viktor. – «Vomi li iris».*

Li ekrigardis maldekstren. Tie estis mallume. Viktor demetis la pluvmantelon, ŝlosis la ĉambron, kaj ekiris serĉi na Diana.

*«Necesas eniri al Rosŝeper» – pensis li, – «kie ankoraŭ ŝi povas esti?».*

Rosŝeper okupis tri ĉambrojn. En la unua oni antaŭnelonge manĝaĉis: sur la tabloj, kovritaj per malpurigitaj tablotukoj, amasiĝis malpuraj teleroj, cindrujoj, boteloj, ĉifitaj buŝtukoj, kaj troviĝis neniu, se ne kalkuli solan ŝvitan kalvaĵon, ronkantan en viando-plado.

En la apuda ĉambro estis bruege. Sur la giganta lito de Rosŝeper kalcitris duonvestitaj ne lokaj knabinoj. Ili ludis iun strangan ludon kun apopleksie-purpura urbestro, kiu enfosiĝis en ilin, kiel porko en glanojn, kaj ankaŭ kalcitris kaj gruntis pro la plezuro. Ĉi tie ankaŭ ĉeestis: sinjoro policestro sen la kitelo, sinjoro urba juĝisto kun la okuloj elstarantaj pro la nerva anhelo, kaj iu nekonata turniĝema persono vestita violkolore. Tiu ĉi triopo entuziasme batalis je infana bilardo, metita sur la tualetan tablon, kaj en angulo sidis, apogante sin al la muro, kaj disigante la piedojn, direktoro de la gimnazio, kun idiota smajlo sur la lipoj. Viktor intencis jam

foriri, kiam iu kaptis lian krurumon. Li ekrigardis soben kaj resaltis. Sub li staris, kvarpiede, ano de la parlamento, ordenportanto, aŭtoro de multdiskutata projekto pri fiŝigo de kitĉiganaj akvejoj Rosŝeper Kant.

– Je ĉevaletoj mi volas, – pete blekis Rosŝeper. – Ludu ni je ĉevaletoj. Jo-ho-ho! – Li estis malracia.

Viktor delikate liberiĝis, kaj enrigardis la lastan ĉambron. Tie li ekvidis na Diana.

Komence li ne komprenis ke tio estas Diana, sed poste acide ekpensis:

*«Tre amuze!».*

Ĉi tie estis multe da homoj, iuj duonkonataj viroj kaj virinoj, ili staris ronde kaj klakis la manplatojn, kaj en centro de la rondo viglege dancis Diana kun la flavvizaĝa dandaĉo, havanto de la agla profilo. Ĉe ŝi brilis la okuloj, ruĝegis la vangoj, la haroj flugadis super la ŝultroj, kaj nenio alia estis grava por ŝi. La agla profilo tre penis konformi.

*«Strange,» – pensis Viktor, – «kio okazas?... – Io ĉi tie estas malĝusta. – Dancas li bone, bonege li dancas. Kiel danc-instruisto. Ne dancas li, sed montras kiel oni dancu... Eĉ ne kiel instruisto, sed kiel lernanto dum la ekzameno. Tre volas li ricevi altan poenton... Ne, ne tio. Aŭskultu, karulo, ja vi dancas kun Diana! Ĉu vere vi ne rimarkas tion?»*

Viktor kutimmaniere streĉis la imagon.

*«Aktoro dancas sur podio, ĉio iras glate,*

*bonege, kiel decas, senerare, sed hejme – malfeliĉo... Ne, ne nepre malfeliĉo, simple oni jam atendas kiam li revenos, kaj ankaŭ li atendas kiam oni fermos la kurtenon kaj malŝaltos la lumon... Kaj eĉ ne aktoro li estas, sed ekstera homo, prezentanta aktoron kiu ludas jam tute eksteran homon... Ĉu eblas ke Diana ne sentas tion? Ja tio estas falsaĵo. Manekeno. Eĉ ne guto da proksimeco inter ili, eĉ ne guto da logo, eĉ ne ombro da deziro... Oni diras unu al alia ion tute sensencan... "Ĉu vi ne ekŝvitis?" "Jes, legis, eĉ dufoje"...»*

Ĉi tie li ekvidis ke Diana dispuŝas la gastojn kaj kuras al li.

– Iru ni danci! – kriis ŝi ankoraŭ de malproksimo. Iu baris al ŝi la vojon, iu kaptis ŝin je la mano, ŝi elŝiriĝis, ridante, kaj Viktor daŭre serĉis per la okuloj la flavvizaĝulon sed ne trovis, kaj tio malagrable maltrankviligis lin.

Ŝi alkuris al li, kroĉiĝis je lia mano, kaj ektiris lin en la rondon.

– Iru ni, iru! Ĉiuj ĉi tie estas niaj homoj – drinkularo, fiularo, aĉaro... Montru al ili kiel decas! Tiu knabaĉo scipovas nenion...

Ŝi entiris lin en la rondon, kaj iu plenvoĉe elkriis:

– Al vekristo Banev – hura!

La gramofono, kiu por sekundo silentiĝis, denove ekbojis kaj ekklakis, Diana premiĝis al li, poste depuŝiĝis, ŝi odoris per parfumo kaj vino, ŝi estis arda, kaj Viktor vidis nun nenion krom ŝia ekzaltita vizaĝo kaj la flugantaj haroj.

– Dancegu! – elkriis ŝi, kaj li komencis dancegi. – Bonegas ke vi alveturis.

– Jes, jes.

– Kial vi estas sobra? Ĉiam vi estas sobra kiam ne bezonatas tio.

– Mi estos ebria.

– Hodiaŭ mi bezonas vin ebria.

– Mi estos.

– Por ke mi faru pri vi kion mi volas. Ne vi pri mi, sed mi.

– Jes.

Ŝi kontentiĝe ridis, kaj ili dancadis silente, vidante nenion, kaj pri nenio pensante. Kiel en sonĝo. Kiel en batalo. Tia ŝi estis nun – kiel sonĝo, kiel batalo. Diana, kiu ekscitiĝis... Ĉirkaŭe oni klakis manplatojn kaj kriadis, ŝajnas ke ankoraŭ iu penis danci, sed Viktor forpuŝis lin, por ne malhelpu, kaj Rosŝeper tire kriis: "Ho mia malfeliĉa ebria popolo!"

– Ĉu li estas impotento?

– Certe. Mi lavas lin.

– Kaj kio?

– Absolute.

– Ho mia malfeliĉa ebria popolo, – ĝemis Rosŝeper.

– Iru ni de ĉi tie, – diris Viktor.

Li kaptis ŝian manon kaj ekkondukis. La drinkularo kaj fiularo dispaŝis antaŭ ili, fetorante per alkoholo kaj ajlo, kaj ĉe la pordo la vojon baris diklipa vangruĝa bubo, kaj diris ion impertinentan, liaj pugnoj jukis, sed Viktor diris al li: "Poste, poste", kaj la suĉbubo malaperis. Tenante la manojn ili trakuris la malplenan koridoron, poste Viktor, ne

lasante ŝian manon, ŝlosis la pordon de interne, kaj estis varme, ekestis netolereble varme, sufoke, kaj la ĉambro estis komence larĝa kaj vasta, kaj poste ekestis mallarĝa kaj malvasta, kaj tiam Viktor larĝe malfermis la fenestron, kaj la nigra humida aero priverŝis liajn nudajn ŝultrojn kaj bruston. Li revenis en la liton, pe-palpis en la mallumo la botelon da ĝino, deglutis, kaj transdonis al Diana. Poste li ekkuŝis, kaj de maldekstre fluis malvarma aero, kaj dekstre estis arde, silke kaj tenere. Nun li aŭdis ke la drinkado daŭriĝas, la gastoj kantas ĥore.

– Ĉu tio estas porlonge? – demandis li.

– Kio? – diris Diana dormeme.

– Ĉu longe ili hurlos?

– Ne scias mi. Ĉu tio koncernas nin? – Ŝi turniĝis sur la flankon kaj ekkuŝis per la vango sur lian ŝultron. – Malvarme, – plendis ŝi.

Ili baraktetis, por grimpi sub la litkovrilon.

– Ne dormu, – diris li.

– Uhu, – elbalbutis ŝi.

– Ĉu estas bone al vi?

– Uhu.

– Kaj se je la orelo?

– Uhu... Ĉesu, doloras.

– Aŭskultu, ĉu eblas loĝi ĉi tie dum ĉirkaŭ semajno?

– Eblas.

– Sed kie?

– Mi volas dormi. Donu dormi al la bedaŭrinda ebria virino.

Li eksilentis kaj kuŝis senmove. Ŝi jam dormis.

*«Ĝuste tion mi faru» – pensis li. – «Ĉi tie*

*estos bone, trankvile. Tamen ne vespere. Sed ne drinkados li ĉiuvespere, li devas esti kuracata... Vivi ĉi tie tri-kvar tagoj... kvin-ses, drinki malpli, tute ne drinki, kaj eklabori... Delonge mi ne laboris... Por komenci labori mi devas forte ekenuiĝi, por nenio alia estu dezirata al mi...» Li ektremetis, dormetante. – «Pri Irma... Pri Irma mi skribu al Rec-Tusov, jen kion mi faru. Estus bone ke li ne ektimu, timulo li estas. Li ŝuldas al mi naŭcent kronojn... Kiam temas pri sinjoro prezidento, ĉio tio ne gravas, ĉiuj ni iĝas timuloj. Kial, tamen, ni ĉiuj estas timuloj? Kion ni, fakte, timas? Ŝanĝojn ni timas. Ne eblos veni en verkistan drinkejon kaj enigi glaseton da distilita... la pordisto ne kliniĝos... Kaj entute forestos pordisto, min oni faros pordisto. Malbone se al minejo... Tio vere malbonas... Sed tio maloftas, ne tia ja estas la tempo... Moliĝo de moroj... Centfoje pensis mi pri tio, kaj centfoje trovis ke, fakte, estas nenio por timi, sed malgraŭ ĉio mi timas. Ĉar tio estas stulta forto», – pensis li. – «Tio estas terura afero, kiam kontraŭ vi staras stulta, pork-hirta forto, nevundebla per logiko, nevundebla per emocioj... Kaj Diana forestos...»*

Li ekdormetis, kaj denove vekiĝis, ĉar sub la malfermita fenestro oni laŭte konversaciis kaj henis kiel animaloj. Ekkrakis la arbustoj.

– Ne povas mi prizonigi ilin, – diris ebria voĉo de la policestro. – Forestas tiu ĉi leĝo...

– Estos, – dirs voĉo de Rosŝeper. – Ĉu estas mi

deputito aŭ ne?

– Kaj ĉu estas leĝo, por ke apud la urbo – fonto de infekto? – elblekegis la urbestro.

– Estos, – obstine diris Rosŝeper.

– Ili ne estas infektaj, – falsete elbalbutis direktoro de la gimnazio. – Se paroli de medicina vidpunkto.

– Hej, gimnazio, – diris Rosŝeper, – ne forgesu la piszipon malfermi.

– Kaj ĉu estas leĝo por ke oni bankrotigu honestajn homojn? – elblekis la urbestro.– Por ke oni bankrotigu, ĉu estas tiu leĝo?

– Estos, mi diras al vi! – diris Rosŝeper, – Ĉu mi estas deputito aŭ ne?

*«Per kio mi ilin?» – pensis Viktor.*

– Rosŝeper! – diris la policestro. – Ĉu vi estas al mi amiko? Mi vin, kanajlon sur la manoj portadis. Mi elektis vin, kanajlon. Sed nun ili, infektuloj, promenaĉas en la urbo, sed mi povas nenion. Forestas la leĝo, ĉu vi komprenas?

– Estos, – diris Rosŝeper. – Mi diras al vi ke estos. Pro infektado de la atmosfero...

– Morala! – enigis direktoro de la gimnazio. – De morala atmosfero.

– Kio?..

– Lige, mi diras, kun venenigo de la atmosfero, kaj kaŭze de la nesufiĉa fiŝigado de ĉeurbaj akvejoj... La infektejon oni likvidu kaj reestablu en fora loko. Ĉu taŭgas?

– Donu al mi kisi vin, – diris la policestro.

– Bravulo, – diris la urbestro. – Kapo. Donu

ankaŭ al mi...

– Stultaĵo, – diris Rosŝeper, – simplegas la afero... Ĉu kantu ni? Ne, ne deziras mi. Iru ni, drinku ankoraŭ po glaseto.

– Ĝuste. Po glaseto – kaj hejmen.

Denove ekkraketis la arbustoj, Rosŝeper diris jam el iu malproksimo: "Hej, gimnazio, ja forgesis vi la piszipon fermi!". Kaj ĉe la fenestro ekestis silente. Viktor denove ekdormetis, spektis iun ne-signifan sonĝon, kaj poste eksonoris la telefono.

– Jes, – diris Diana raŭke. – Jes, tio estas mi... – Ŝi detusis. – Ne, nenio, mi aŭskultas... Ĉio bonordas, li, ŝajne, estis kontenta... Kio?

Ŝi konversaciis, apoginte sin je Viktor, kaj subite li eksentis kiel streĉiĝis ŝia korpo.

– Strange, – diris ŝi. – Bone, mi tuj rigardos... Jes... Bone... mi diros al li.

Ŝi metis la aŭskultilon, transgrimpis na Viktor, kaj ŝaltis la noktan lampon.

– Kio okazis, – demandis Viktor dormeme.

– Nenio. Dormu. Mi tuj revenos.

– Tra la iom fermitaj palpebroj li rigardis kiel ŝi kolektas la disĵetitajn vestaĵojn, kaj vizaĝo ĉe ŝi es-tis tiel serioza ke li ekmaltrankviliĝis. Ŝi rapide vestiĝis kaj eliris, ordigante dumire la robon.

*«Rosŝeper malbonstatas» – pensis li, aŭskultante. – «Ĝisdrinkis li, olda kastrulo».*

En la grandega konstruaĵo estis silente, kaj li klare aŭdis paŝojn de Diana en la koridoro, sed ŝi iris ne dekstren, al ĉambroj de Rosŝeper, kiel li atendis, sed liven. Poste knaris pordo, kaj la paŝoj

silentiĝis. Li turniĝis flanken, kaj provis denove ekdormi, sed dormo ne venis, kaj li komprenis ke li atendas na Diana, kaj ke li ne povos ekdormi ĝis ŝi revenos. Tiam li eksidis kaj ekfumis. Ŝvelaĵo sur la nuko komencis pulsadi, kaj li sulkiĝis. Diana ne revenis. Ial li ekmemoris flavvizaĝan danculon kun agla profilo.

*«Sed kiel li povas koncerni min?» – pensis Viktor. – «Aktoro, kiu ludas alian aktoron, kiu ludas la trian... Ha, jen kio: li eliris ĝuste de tie, de liva flanko, kien foriris Diana. Venis li ĝis la ŝtupara placeto, kaj transformiĝis je dandaĉo. Komence li ludis dandon, poste li ekludis virinloganton...» – Viktor denove ekaŭskultis. «Nekutime trankvile, ĉiuj dormas... Ronkas iu...»*

Poste denove knaris pordo, kaj ekaŭdiĝis proksimiĝantaj paŝoj. Diana eniris, ŝia vizaĝo daŭre estis serioza. Nenio finiĝis, la aventuro daŭriĝas. Diana venis al la telefono kaj kunmetis la numeron.

– Li forestas, – diris ŝi. – Ne, ne, li foriris... Ankaŭ mi... Ne, nenio, pri kio vi... Bonan nokton.

Ŝi metis la aŭskultilon, iom da tempo staris, rigardante la transfenestran mallumon, poste eksidis sur la liton apud Viktor. En ŝia mano estis cilindra lanterneto. Viktor ekfumis cigaredon kaj donis al ŝi. Ŝi fumis silente, streĉe pensante pri io, kaj poste demandis:

– Kiam vi ekdormis?

– Ne scias mi, malfacilas diri.

– Sed ĉu post mi?

– Jes.

Ŝi turnis al li sian vizaĝon.

– Ĉu vi aŭdis ion? Iun interbatiĝon, skandalon...

– Ne, – diris Viktor. – Laŭ mi ĉio estis tre paca. Komence ili kantis, poste Rosŝeper kun la kompanio urinis ĉe nia fenestro, poste mi ekdormis... Ili intencis jam disveturi.

Ŝi ĵetis la cigaredon trans la fenestron, kaj leviĝis.

– Vestiĝu, – diris ŝi.

Viktor smajlis kaj etendis la manon por preni la kalsoneton.

*«Aŭskultas kaj obeas» – pensis li. – «Bona afero estas tio, obeado. Nur demandu mi pri nenio».*

Li demandis:

– Ĉu ni iru aŭ veturu?

– Kio?... Komence ni iru, kaj poste vidos ni.

– Ĉu iu perdiĝis?

– Ŝajnas ke jes.

– Ĉu Rosŝeper?

Subite li kaptis sur si ŝian rigardon. Ŝi rigardis lin kun dubo. Ŝi iom bedaŭris jam ke vokis lin. Ŝi demandis sin: kio li fakte estas por preni lin kun si?

– Mi estas preta, – diris li.

Ŝi daŭre dubis, pripense ludante per la lanterneto.

– Nu bone... iru ni, – ŝi jam ekmoviĝis.

– Ĉu mi forrompu piedeton de seĝo? – proponis Viktor. – Aŭ, ekzemple, de la lito...

Ŝi ekvigliĝis.

– Ne, piedeto ne taŭgas. – Ŝi malfermis keston de la tablo, kaj elprenis grandegan nigran pistolon. – Prenu, – diris ŝi.

Viktor jam streĉiĝis, sed okazis ke tio estas etkalibra sporta pistolo. Krom tio sen kartoĉujo.

– Donu kartoĉojn, – diris Viktor.

Ŝi nekomprene alrigardis lin, poste rigardis la pistolon kaj diris:

– Ne, kartoĉoj ne estos bezonataj. Iru ni.

Viktor levetis la ŝultrojn, kaj ŝovis la pistolon en la poŝon. Ili malleviĝis en la vestiblon, kaj eliris sur la peronon. La nebulo maldensiĝis, gutis pluveto. Aŭtoj ĉe la perono forestis. Diana turnis sin en aleon inter la malsekaj arbustoj, kaj ŝaltis la lanterneton.

*«Stulta situacio» – pensis Viktor. – «Ege dezirindas demandi pri kio temas, sed ne eblas demandi. Estus bone elpensi kiel demandi. Ne demandi, sed eligi rimarkon kun kaŝita demando. Eble necesos interbatiĝi? Ne volas mi. Hodiaŭ mi ne volas... Batos mi per la tenilo. Rekte inter la okuloj... Sed kiel fartas tie mia ŝvelaĵo?» La ŝvelaĵo okazis sur sia loko, kaj doloretis. – «Strangaj, tamen, taskoj estas ĉe flegistino en tiu ĉi sanatorio... Tamen mi ĉiam opiniis ke Diana – ino kun mistero. De la unua rigardo kaj ĉiujn kvin tagojn... Jen kia humideco, engluti mi devis antaŭ la foriro. Tuj mi glutos kiam revenos... Sed mi estas bravulo», – pensis li. – «Neniujn demandojn. Aŭskultas kaj obeas».*

Ili ĉirkaŭiris la alon, trapuŝiĝis tra la siringo-arbustoj, kaj okazis antaŭ la barilo. Diana lumigis. En la barilo forestis unu fera stango.

– Viktor, – diris ŝi nelaŭte. – nun ni iru sur pado. Vi iru post mi. Rigardu sub la piedojn kaj eĉ ne paŝon flanken. Ĉu vi komprenas?

– Komprenas, – humile diris Viktor. – **Paŝo dekstren, paŝo maldekstren – pafas mi**[9].

Diana tragrimpis unua kaj lumigis al Viktor. Poste ili tre malrapide ekmoviĝis malsupren. Tio estis orienta deklivo de la holmo sur kiu staris la sanatorio. Ĉirkaŭe bruis sub pluvo nevideblaj arboj. Foje Diana ekglitis, kaj Viktor pene sukcesis kapti ŝiajn ŝultrojn. Ŝi malpacience elturniĝis, kaj ekiris pluen. Ĉiuminute ŝi ripetis: "Rigardu sub la piedojn... Tenu vi vin post mi"... Viktor obeeme rigardis soben, sur piedojn de Diana, kiuj intermitis en la saltanta luma rondo. Komence li atendis frapon je la nukon, ĝuste sur la ŝvelaĵon, aŭ ion similan, sed poste decidis: malverŝajnas. Simple forkuris, eble, iu psikozulo – na Rosŝeper, ekzemple, trafis alkohola deliro, kaj necesos konduki lin reen, timigante per la senkartoĉa pistolo...

Diana neatendite haltis, kaj diris ion, sed ŝiaj vortoj ne trafis konscion de Viktor, ĉar dum sekva sekundo li ekvidis apud la padeto ies brilajn okulojn, senmovajn, grandegajn, atente rigardantajn el sub la malseka konveksa frunto – nur okulojn kaj frunton, kaj nenion pli, nek buŝon, nek la korpon, nenion. Humida peza mallumo, kaj en la lumigita

9. Averto de soveti-tempa malliberul-eskortisto.

rondo – brilantaj okuloj kaj nenature blanka frunto.

– Kanajloj – diris Diana per sufokiĝinta voĉo. Ĝuste tion mi atendis. Animaloj.

Ŝi falis sur la genuojn, la lumrondo glitis laŭ la nigra korpo, kaj Viktor ekvidis iun brilan metalan arkon, ĉenon en la herbo, kaj Diana ordonis: "Rapide, Viktor".

Li kaŭre eksidis apud ŝi, kaj nur tiam komprenis ke tio estas kaptilo, kaj en la kaptilo – homa piedo. Per la ambaŭ manoj li kroĉiĝis en la ferajn makzelojn, kaj penis disigi ilin. Ili iomete cedis, sed denove kuniĝis.

– Stultulo! – kriis Diana. – Per la pistolo.

Li grincis per la dentoj, kaptiĝis pli oportune, streĉis ĉiujn muskolojn tiel, ke kraketis en la ŝultroj, kaj la makzeloj disiris.

– Tiru, – raŭke diris li. La piedo malaperis, la feraj arkoj kuniĝis denove kaj premis liajn fingrojn.

– Tenu la lanterneton, – diris Diana.

– Mi ne povas, – kulpe diris Viktor. – Kaptiĝis mi. Prenu el mia poŝo la pistolon...

Diana elblasfemis, ŝovis la manon en lian poŝon. Li denove disigis la arkojn, ŝi enigis inter ili la pistolon, kaj li liberiĝis.

– Tenu la lanterneton, – ripetis ŝi. – Mi pririgardos la piedon.

– La osto estas dispecigita, – diris el la mallumo streĉita voĉo. – Portu min en la sanatorion kaj voku la aŭton.

– Ĝuste, – diris Diana. – Tuj. Viktor, donu la lanterneton, prenu lin.

Ŝi lumigis. La homo sidis sur la sama loko,

apoginte sin al arba trunko. Soba duono de lia vizaĝo estis kovrita per nigra tuko.

*«Okulvitrulo» – ekpensis Viktor. – «Malsekulaĉo. Kiel li trafis ĉi tien?»*

– Ja prenu vi, – senpacience diris Diana. – Sur la dorson.

– Momenton, – resonis li. Li ekmemoris la flavajn rondojn ĉirkaŭ la okuloj. Al la gorĝo ekruliĝis naŭzo. – Momenton.

Li kaŭriĝis apud la malsekulaĉo kaj turniĝis al li per la dorso.

– Prenu min je la kolo, – diris li.

La malsekulaĉo okazis magra kaj malpeza. Li ne moviĝis kaj, ŝajne, eĉ ne spiris, kaj li ne ĝemis kiam Viktor glitiĝis, sed ĉiufoje lian korpon trafis konvulsio. La padeto estis multe pli kruta ol Viktor opiniis, kaj kiam ili alvenis la barilon, li signife ekanhelis. Ekestis malfacile traigi la malsekulaĉon tra fendo en la barilo, sed finfine ili venkis tion.

– Kien lin? – demandis Viktor, kiam ili venis al la perono.

– Dume en la vestiblon, – respondis Diana.

– Ne, – per sama streĉa voĉo diris la malsekulaĉo. – Lasu min ĉi tie.

– Ĉi tie estas pluvo, – oponis Viktor.

– Ĉesu babilaĉi, – diris la malsekulaĉo. – Mi restos ĉi tie.

Viktor prisilentis tion kaj komencis leviĝi per la ŝtupoj.

– Lasu lin, – diris Diana.

– Al diablo, – diris li, – ja ĉi tie pluvas.

– Ne estu stultulo, – ripetis la malsekulaĉo. – Lasu... ĉi tie...

Viktor, dirante eĉ ne vorton, kaj paŝante tra la tri ŝtupoj leviĝis al la pordo kaj eniris la vestiblon.

– Kreteno, – mallaŭte diris la malsekulaĉo, – kaj faligis la kapon sur ŝultron de Viktor.

– Ŝtipulo, – diris Diana, atingante na Viktor kaj kaptante lin je la manumo. – Vi murdos lin, idioto! Tuj elportu lin kaj metu sub la pluvon! Tuj, ĉu vi aŭdas? Nu, kial vi staras?

– Freneziĝis vi ĉiuj, – kolere kaj embarase diris Viktor.

Li turniĝis, piedbatis la pordon, kaj eliris sur la peronon. Pluvo kvazaŭ atendis ĝuste tion. Ĵus ĝi gutetis maldiligente, sed nun ekfalis subite torente. La malsekulaĉo mallaŭte ekĝemis, levis la kapon, kaj subite ekspiris ofte-ofte, kiel pe-persekutita. Viktor daŭre prokrastis, instinkte serĉante iun aleron.

– Metu min, – diris la malsekulaĉo.

– Ĉu en flakon? – sarkasme kaj amare demandis Viktor.

– Tio indiferentas... Metu.

Viktor atente metis lin sur ceramikajn platojn de la perono, kaj la malsekulaĉo tuj dismetis la brakojn kaj etendiĝis, lia dekstra piedo estis nenature turniĝita, la grandega frunto, ĉe lumo de forta lampo, ŝajnis bluete-blanka. Viktor eksidis apude sur la ŝtupon. Li tre volis foriri en la vestiblon, sed tio estis neeble: lasi la vunditan homon sub la pluvego, kaj foriri en la varmon.

*«Kiomfoje oni nomis min hodiaŭ stultulo?»*

*– pensis li, frotante la vizaĝon per la manplato. – «Ho, ial tro multe. Kaj, ŝajne, estas en tio parto da vero, ĉar stultulo, kiu estas ankaŭ idioto, kreteno, kaj tiel plu – tio estas profano kiu obstinas en sia profaneco. Sed je Dio, al li vere ekestis pli bone sub la pluvo! Kaj la okulojn li malfermis, kaj ne tiom timigaj estas ili ĉe li... Malsekulaĉo», – pensis li. – «Jes, ŝajne malsekulaĉo sed ne okulvitrulo. Kiel li trafis en la kaptilon? Kaj de kie ĉi tie la kaptilo? Jam duan malsekulaĉon mi renkontas hodiaŭ, kaj ĉe ambaŭ ili – malagrablaĵoj. Ĉe ili malagrablaĵoj, kaj ankaŭ ĉe mi pro ili – malagrablaĵoj».*

Diana konversaciis en la vestiblo per telefono. Viktor ekaŭskultis.

– Piedo!... Jes. La osto estas dispecigita... Bone... Rapide, ni atendas.

Tra la vitra pordo Viktor ekvidis kiel ŝi pendigis la aŭskultilon kaj ekkuris supren per la ŝtuparo.

*«Ial malbone ekestis ĉe ni en la urbo pro la malsekulaĉoj. Iu baraktado ĉirkaŭ ili. Al ĉiuj ili ekmalhelpis ial, eĉ al direktoro de la gimnazio. Eĉ al Lola», – ekmemoris li subite. – «Ŝajnas ke ankaŭ ŝi ion neamikan diris pri ili...»*

Li ekrigardis la malsekulaĉon. La malsekulaĉo rigardis lin.

– Kiel vi fartas? – demandis Viktor. La malsekulaĉo silentis. – Ĉu vi bezonas ion, – demandis Viktor, altigante la voĉon. – Ĉu gluton da ĝino?

– Ne kriaĉu, – diris la malsekulaĉo. – Mi aŭdas.
– Ĉu doloras? – kompate diris Viktor.
– Sed kion vi opinias?

*«Neordinare malagrabla homo», – pensis Viktor. – «Tamen ne gravas. Renkontiĝis ni kaj disiris. Sed ĉe li – doloroj...»*

– Tenu vi vin, – diris li. – Toleru ankoraŭ kelkajn minutojn. Post nelonge oni venos preni vin.
La malsekulaĉo respondis nenion, lia frunto sulkiĝis, la okuloj fermiĝis. Li eksimilis kadavron – plata kaj senmova sub la pluvego.
Sur la peronon elsaltis Diana kun kuracista valizeto, eksidis apude, kaj ekfaris ion pri la kripligita piedo. La malsekulaĉo mallaŭte ekgraŭlis, sed Diana ne diris trankviligajn vortojn kiujn tiuokaze kutimas diri medicinistoj.
– Ĉu mi helpu al vi? – demandis Viktor.
Ŝi ne respondis. Li leviĝis, kaj Diana, ne turnante la kapon diris:
– Atendu, ne foriru.
– Mi ne foriras, – diris Viktor. Li rigardis kiel lerte ŝi surmetas la splintojn.
– Vi ankoraŭ estos bezonata, – diris Diana.
– Mi ne foriras, – ripetis Viktor.
– Fakte vi povas kuri supren. Kuru, glutu ion, dum estas la tempo, sed poste tuj revenu.
– Ne gravas, – diris Viktor. – ne tro bezonatas.
Poste ie, post kurteno de la pluvo ekbruis motoro, ekbrilis lumĵetiloj. Viktor ekvidis ĵipon, singarde turnantan en la pordegon. La ĵipo alruliĝis al la perono, kaj el ĝi peze elgrimpis Jul Golem en sia

malgracia pluvmantelo. Li leviĝis per la ŝtupoj, kliniĝis ĉe la malsekulaĉo, prenis lian manon. La malsekulaĉo diris obtuze:

– Neniujn injektojn.

– Bone, – diris Golem, kaj alrigardis na Viktor. – Prenu lin.

Viktor prenis la malsekulaĉon sur la manojn, kaj ekportis lin al la ĵipo. Golem devancis lin, malfermis la pordeton, kaj engrimpis enen.

– Metu lin ĉi tien, – diris li el la mallumo. – Ne, per piedoj antaŭen... Pli kuraĝe. Subtenu la ŝultrojn...

Li snufis kaj ŝoviĝis en la aŭto. La malsekulaĉo denove ekgraŭlis, kaj Golem diris al li ion nekomprenan, eble sakris, ion similan al "Ses injektojn je la kolon..." Poste li elgrimpis, batfermis la pordeton kaj, eksidante ĉe la stirilo, demandis na Diana:

– Ĉu vi telefonis al ili?

– Ne, – respondis Diana. – Ĉu mi telefonu?

– Ne valoras jam, – diris Golem, – ĉar ili ŝtopos ĉion. Ĝis revido.

La ĵipo ekmoviĝis, ĉirkaŭveturis la florbedon, kaj forruliĝis.

– Iru ni, – diris Diana.

– Naĝu ni, – diris Viktor. Nun, kiam ĉio finiĝis, li sentis nenion krom incito.

En la vestiblo Diana prenis lian brakon.

– Ne gravas, – diris ŝi. – Tuj vi vestos la sekan, drinketos la vodketon, kaj ĉio ekestos bona.

– Fluas kiel de malseka hundo, – kolere plendis Viktor. Kaj, eble, vi klarigos kio okazis ĉi tie?

Diana lace suspiris.

– Ja nenio specifa okazis ĉi tie. Ne devis li forgesi la lanterneton.

– Kaj kaptiloj sur vojoj, ĉu tio estas ĉe vi afero normala?

– La urbestro metas ilin, kanajlo...

Ili leviĝis sur la duan etaĝon, kaj ekiris en la koridoro.

– Ĉu li estas frenezulo? – informiĝis Viktor. – Ja tio estas krimafero. Eble li vere estas frenezulo?

– Ne. Simple li estas kanajlo, kaj malamegas malsekulaĉojn. Same al la tuta urbo.

– Tion mi rimarkis. Ni ankaŭ ne ŝatas ilin, sed kaptiloj... Sed kion malsekulaĉoj faris al ili?

– Ja oni devas malamegi iun, – diris Diana. – En iuj lokoj oni malamas judojn, en iuj aliaj – negrojn, kaj ĉe ni – malsekulaĉojn.

Ŝi haltis antaŭ la pordo. Diana turnis la ŝlosilon, eniris kaj ŝaltis lumon.

– Momenton, – diris Viktor, ĉirkaŭrigardante. – Kien vi alkondukis min?

– Tio estas labo, – respondis Diana. – Mi tuj...

Viktor restis ĉe la pordo, kaj rigardis kiel ŝi iras en la grandega ĉambro kaj fermas la fenestrojn. Sub la fenestroj nigriĝis flakoj.

– Kaj kion li faris ĉi tie nokte? – demandis Viktor.

– Kie, – demandis Diana, ne turniĝante.

– Sur la pado... Ja vi sciis ke li estas tie, ĉu?

– Ĉu vi komprenas, – diris ŝi, – en la leprulejo estas malbone pri medikamentoj. Iam ili venas al ni, petas...

Ŝi fermis la lastan fenestron, kaj trairis la

labon, pririgardante la tablojn, okupatajn per aparatoj kaj kemia vazaro.

– Aĉas ĉio ĉi tio, – diris Viktor. Malbonas la regno. Kien ajn oni veturu, ĉie iu fiaĵo... Iru ni, ĉar malvarmas mi.

– Momenton, – diris Diana.

Ŝi prenis de la seĝo iun malhelan veston kaj skuis ĝin. Tio estis vira vespera kostumo. Ŝi akurate pendis ĝin en ŝrankon por profesia vesto.

*«De kie ĉi tie kostumo?» – pensis Viktor. – «Krom tio iu konata kostumo».*

– Kaj nun, – diris Diana, – vi kiel vi volas, sed mi engrimpos varmegan bankuvon.

– Aŭskultu, Diana, – diris Viktor singarde. – Kio estis tiu kun jen tia nazo... Flavvizaĝa? Kun kiu vi dancis...

Diana prenis lin je la mano.

– Ĉu vi scias, – diris ŝi post ioma silento, – tio estas mia edzo... Estinta edzo.

# Ĉapitro kvara

– Longe mi ne vidis vin en la urbo, – diris Pavor per nazkatara voĉo.

– Ne tiom longe, – oponis Viktor. – Nur du tagoj.

– Ĉu mi povas iom sidi kun vi, aŭ vi preferas esti duopaj? – demandis Pavor.

– Sidu, – ĝentile diris Diana.

Pavor eksidis kontraŭ ŝi kaj kriis: "Kelnero, duoblan konjakon!". Vesperiĝis, la pordisto kurtenis

la fenestrojn. Viktor ŝaltis la plankan lampon.

– Mi admiras vin, – alparolis Pavor na Diana. – Loĝi en tia klimato kaj konservi belegan koloron de la vizaĝo... – Li ternis. – Pardonu. Tiuj ĉi pluvoj finigos min... – Kiel prosperas la laboro? – demandis li na Viktor.

– Ne tro. Ne povas mi labori kiam ĉielo malserenas: ĉiam aperas deziro drinki.

– Sed kiun skandalon ordigis vi ĉe la policestro? – demandis Pavor.

– Bagatelaĵo, – diris Viktor. – Mi serĉis justecon.

– Sed kio okazis?

– Animalo urbestro ĉasis malsekulaĉojn per kaptiloj. Unu kaptiĝis, difektis la piedon. Mi prenis la kaptilon, iris en la polican administrejon, kaj postulis esploron.

– Tiel, – diris Pavor. – Kaj poste?

– En tiu ĉi urbo estas strangaj leĝoj. Ĉar ne venis plendo de la suferito, oni opinias ke krimo forestis, sed estis malfeliĉa okazo, pri kiu kulpas neniu krom la suferito. Mi diris al la policestro ke mi konsideros tion, kaj li deklaris al mi ke tio estas minaco; post kio ni separiĝis.

– Sed kie okazis tio? – demandis Pavor.

– Apud la sanatorio.

– Apud la sanatorio? Sed kion bezonas malsekulaĉo apud sanatorio?

– Laŭ mi tio koncernas neniun, – akre diris Diana.

– Certe, – diris Pavor. – Mi simple miris... – Li sulkiĝis, fermis la okulojn, kaj sonore ternis. – Dia-

ble, – diris li. – Mi petas pardonon.

Li ŝovis la manon en la poŝon, kaj eltiris grandan naztukon. Io frapobrue falis sur la plankon. Viktor kliniĝis. Tio estis kaprompilo. Viktor levis ĝin kaj etendis al Pavor.

– Por kio vi portaĉas tion? – demandis li.

Pavor, enŝovinte la vizaĝon en la naztukon, rigardis la kaprompilon per ruĝiĝintaj okuloj.

– Tio estas pro vi, – diris li per premita voĉo, kaj purigis la nazon. – Tio vi timigis min per via rakonto... Sed, interalie, ĉi tie, onidire, agas iu loka bando. Ĉu banditoj ĉu huliganoj, sed mi, ĉu vi scias, ne ŝatas kiam oni batas min.

– Ĉu oni ofte vin batis? – demandis Diana.

Viktor alrigardis ŝin. Ŝi sidis en la brakseĝo, metinte la gambon sur la gambon, kaj fumis, mallevinte la okulojn.

*«Bedaŭrinda Pavor», – pensis Viktor. – «Nun estos vi forigita».*

Li etendis la manon kaj ŝiretis la jupon sur ŝiaj genuoj.

– Min? – demandis Pavor. – Ĉu vere mi aspektas kiel homo kiun oni ofte batas? Tion necesas korekti. Kelnero, ankoraŭ duoblan konjakon!... Tiel do, sekvonttage mi eniris seruristejon, kaj tie oni senprokraste faris tiun ĉi aĵon. – Kun kontenta aspekto li pririgardis la kaprompilon. – Bona aĵo, eĉ al Golem ekplaĉis ĝi...

– Ĉu malgraŭ ĉio oni ne enlasis vin en la leprulejon? – demandis Viktor.

– Jes, ne enlasis, kaj eblas opinii ke ne enlasos.

Mi perdis jam la esperon. Mi sendis plendojn en tri departementojn, kaj nun sidas kaj verkas la raporton, – plendis Pavor. Je kiu sumo la leprulejo ricevis pasintjare kalsonojn. Aparte virajn, aparte inajn. Diable pasiiga laboro.

– Skribu ke ĉe ili mankas medikamentoj, – konsilis Viktor.

Pavor mire levis la brovojn, kaj Diana maldiligente diris:

– Pli bone ĉesu vi la skribaĉadon, pe-drinku glason da varma vino kaj kuŝu dormi.

– La aludon mi komprenis, – diris Pavor kun suspiro. – Do devas mi foriri... Ĉu vi scias kiun ĉambron mi okupas? – demandis li na Viktor. – Estus bone se vi vizitus min.

– Ducent-tridek-trian, – diris Viktor.

– Nepre. – Ĝis revido, – diris Pavor leviĝante. – Agrablan vesperon.

Ili rigardis kiel li aliris la vendobreton, prenis botelon da ruĝa vino, kaj ekiris al la eliro.

– Lango ĉe vi estas longa, – diris Diana.

– Jes, – konsentis Viktor. – Kulpas mi. Ĉu vi scias, per io li plaĉas al mi.

– Sed al mi – ne, – diris Diana.

– Kaj ankaŭ al doktoro R.Kvadriga li ne plaĉas. Interese, kial?

– Vizaĝaĉo lia estas fia, – respondis Diana. – Blonda bestaĉo. Konas mi tiajn. Veraj viroj. Sen honoro, sen konscienco, regantoj super stultuloj.

– Jen kiel, – miris Viktor. – Sed mi opiniis ke tiaj viroj devas plaĉi al vi.

– Nun forestas viroj, – oponis Diana. – Nun aŭ

faŝistoj, aŭ virinaĉoj.

– Kaj mi? – kun intereso informiĝis Viktor.

– Vi? Vi tro ŝatas marinitajn lampridojn. Kaj samtempe – justecon.

– Ĝuste. Sed laŭ mi tio estas bone.

– Tio ne estas malbone. Sed se vi devus elekti, vi elektus lampridojn, jen kio malbonas. Al vi prosperis ke vi havas talenton.

– Kial vi estas tiel kolera hodiaŭ? – demandis Viktor.

– Sed mi entute estas kolera. Ĉe vi – talento, ĉe mi – kolereco. Se forpreni de vi la talenton, kaj de mi – kolerecon, tiam restos du kopulantaj nuloj.

– Nuloj diferencas, – rimarkis Viktor. – El vi eĉ nulo rezultiĝus ne malbona: svelta, gracia nulo. Kaj, krom tio, se forpreni de vi la kolerecon vi ekestos bonkora, kio ankaŭ estas ne malbone.

– Se forpreni de mi la kolerecon mi ekestos meduzo. Por ke mi ekestu bonkora oni devas anstataŭigi la kolerecon per bonkoreco.

– Amuze, – diris Viktor. – kutime virinoj ne ŝatas rezoni. Sed kiam komencas, ili iĝas mirinde kategoriaj. Kial vi opinias ke ĉe vi estas nur kolereco sed neniu bonkoreco? Tiel ne okazas. Ankaŭ bonkoreco estas ĉe vi, sed ĝi ne rimarkeblas pro la kolereco. En ĉiu homo miksiĝas ĉio poiome, kaj tio estas vivo kiu elpremas sur la surfacon ion el tiu ĉi miksaĵo...

En la halon enrompiĝis kompanio da junaj homoj, kaj tuj ekestis brue. La junaj homoj tenis sin senĝene: ili ekinsultis la kelneron, pelis lin alporti bieron, ĉirkaŭsidigis tableton en malproksima angu-

lo, kaj komencis laŭte paroli kaj ridegi plengorĝe. Fortega diklipa grandegulo kun ruĝaj vangoj direktiĝis al la vendobreto, klakante per la fingroj, kaj aldancante. Teddi verŝis al li ion, kaj li, flanken movinte la etfingron, prenis per la du fingroj la glaseton, turniĝis al la vendobreto per la dorso, apogis je ĝi siajn kubutojn, kaj krucigis la piedojn, venke pririgardante la malplenan halon.

– Saluton, Diana! – elkriaĉis li. – Kiel vi fartas?

Diana indiferente smajlis al li.

– Kio li estas, tiu ĉi mirindaĵo? – demandis Viktor.

– Iu Flamin Juventa, – respondis Diana. – Neveto de la policestro.

– Ie mi vidis lin, – diris Viktor.

– Al diablo lin, – senpacience diris Diana, – ĉiuj homoj estas meduzoj, kaj nenio specifa estas miksita en ili. Trafiĝas iam veraj homoj, ĉe kiuj estas io propra: bonkoreco, talento, koleremo... Forprenu tion de ili, kaj restos nenio, ili iĝos meduzoj, kiel ĉiuj aliaj. Vi, ŝajne, imagas ke vi plaĉas al mi pro via ŝato al lampridoj kaj al justeco, ĉu? Stultaĵo! Ĉe vi estas talento, ĉe vi estas libroj, sed en ĉio alia vi estas sama flegma simplulo kiel ĉiuj aliaj.

– Tio kion vi diras, – deklaris Viktor, – ĝis tiom malĝustas, ke mi eĉ ne ofendiĝas. Sed vi daŭrigu, ĉe vi tre interese ŝanĝiĝas vizaĝo, kiam vi parolas. Li ekfumis kaj transdonis al ŝi la cigaredon. – Daŭrigu.

– Meduzoj, – diris ŝi amare. – Glitaj kaj stultaj meduzoj. Baraktaĉas, rampas, pafas, mem ne scias kion ili volas, nenion scipovas, nenion vere amas...

Kiel vermoj en elĉerpa necesejo.

– Tio sonas maldece, – diris Viktor. – La metaforo sendube estas konveksa, sed decide ne apetita. Kaj entute ĉio ĉi tio estas banalaĵoj. Diana, kara mia, vi ne estas pensulo. En pasinta jarcento, en provinco, tio pli-malpli sonus... La komunumo, minimume, estus dolĉe ŝokita, kaj palaj junuloj kun brilantaj okuloj iraĉus post vin ĉien. Sed hodiaŭ tio estas evidentaĵoj. Hodiaŭ ĉiuj scias jam kio estas homo. Kion fari pri homo, – jen estas problemo. Sed ankaŭ tio, verdire, jam enuigas.

– Kaj kion oni faras pri meduzoj?

– Kiu? Ĉu meduzoj?

– Ni.

– Ĝis kiom mi scias, – nenion. Konservaĵojn, ŝajne, oni faras el ili.

– Nu bone, – diris Diana. – Ĉu vi ellaboris ion dum tiu ĉi tempo?

– Certe! Mi verkis terure kortuŝan leteron al mia amiko Rec-Tusov. Se post tiu ĉi letero li ne ordigos na Irma en iun edukpensionon, do mi taŭgas al nenio.

– Ĉu tio estas ĉio?

– Jes, – diris Viktor. – Ĉion alian mi forĵetis.

– Dio mia! – diris Diana. – Sed mi vin priservis, penis ne malhelpi, forpeladis na Rosŝeper...

– Lavis min en bankuvo, – memorigis Viktor.

– Lavis vin en bankuvo, drinkigis al vi kafon...

– Momenton, – diris Viktor. – Sed ankaŭ mi lavis vin en bankuvo...

– Tutegale.

– Kio estas tutegale? Ĉu vi opinias ke estas

simple labori post lavi vin en bankuvo? Mi faris ses variantoj da priskribo de tiu ĉi procezo, kaj ĉiuj ili tute ne taŭgas.

– Donu legi.

– Nur por viroj, – diris Viktor. – Krom tio mi forĵetis ilin, ĉu mi ne diris al vi? Kaj entute tie estis ĝis tiom malmulte da patriotismo kaj da nacia sinkonscio, ke tutegale tion eblus montri al neniu.

– Diru, kiel ĉe vi, ĉu komence vi verkas kaj poste enigas la nacian sinkonscion?

– Ne, – diris Viktor. – Komence mi saturiĝas per la nacia sinkonscio ĝis profundoj de la animo: legas paroladojn de sinjoro prezidento, parkerigas sagaojn pri herooj, vizitas patriotismajn kunvenojn. Poste, kiam trafas min vomado, ne naŭzo sed vomado, – mi komencas labori... Parolu ni pri io alia. Ekzemple, kion ni faru morgaŭ.

– Morgaŭ ĉe vi estas renkonto kun gimnazianoj.

– Tio pasos rapide. Kaj poste?

Diana ne respondis. Ŝi rigardis preter li. Viktor turniĝis. Al ili proksimiĝis malsekulaĉo je tuta sia beleco: nigra, malseka, kun tuko sur la vizaĝo.

– Saluton, – diris li al Diana. – Ĉu Golem jam revenis?

– Viktor estis trafita per tio kiel ŝanĝis vizaĝo de Diana. Kiel sur pentraĵo. Kaj eĉ ne sur pentraĵo, – sur ikono. Stranga senmoveco de la trajtoj, kaj oni embarasiĝas, ĉu tio estas intenco de la majstro aŭ senpovo de metiisto. Ŝi ne respondis. Ŝi silentis, ankaŭ la malsekulaĉo rigardis ŝin silente, kaj en tiu ĉi silento estis neniu ĝeno – ili estis kune, sed Viktor kaj ĉiuj aliaj estis aparte de ili. Al Viktor tio ege

ne ekplaĉis.

– Golem venos, verŝajne, post nelonge, – diris li laŭte.

– Jes, – diris Diana. – Sidu vi kaj atendu.

Ŝia voĉo estis kutima, kaj ŝi smajlis al la malsekulaĉo per la kutima indiferenta smajlo. Ĉio estis kiel kutime: Viktor estis kun Diana, kaj la malsekulaĉo kaj ĉiuj aliaj estis aparte de ili.

– Mi petas! – gaje diris Viktor, montrante brakseĝon de doktoro R.Kvadriga.

La malsekulaĉo sidis, metinte la manojn en nigraj gantoj sur la genuojn. Viktor verŝis al li konjakon. La malsekulaĉo per kutime-malzorga gesto prenis la pokaleton, balancetis ĝin, kvazaŭ pesante, kaj denove metis sur la tablon.

– Mi esperas ke vi ne forgesis? – diris li al Diana.

– Jes, – diris Diana. – Jes. Tuj mi alportos. Viktor, donu al mi slosilon de la ĉambro, mi tuj revenos.

Ŝi prenis la ŝlosilon, kaj rapide ekiris al la eliro. Viktor ekfumis.

*«Kio pri vi, amiko?» – diris li al si. – «Ial tro multaj aferoj ŝajnas al vi lastatempe. Delikata vi ekestis, sentema... Ĵaluza. Sed vane, tio tute ne koncernas vin – ĉiuj tiuj estintaj edzoj, ĉiuj tiuj strangaj konatecoj. Diana – tio estas Diana, kaj mi – tio estas mi. Rosŝeper estas impotento. Impotento. Do sufiĉas al vi...»*

Li sciis ke ĉio tio ne estas tro simpla, ke li jam

pe-glutis iun venenaĵon, sed li diris al si: sufiĉas. Kaj hodiaŭ, nun, li sukcesis portempe konvinki sin ke vere sufiĉas.

La malsekulaĉo sidis kontraŭe, senmova kaj timiga kiel birdotimigilo. Li odoris per malsekeco, kaj ankoraŭ per io, per iu medicinaĵo.

*«Ĉu povis mi imagi ke iam sidos mi en restoracio ĉe sama tablo kun malsekulaĉo... Progreso, knaboj, poiome ĝi moviĝas ien... Aŭ tio estas ni kiuj ekestis ĉiumanĝuloj: ankaŭ nin atingis tio ke ĉiuj homoj estas fratoj, ĉu? Homaro, amiko mia, mi fieras pri vi... Kaj vi, sinjoro, ĉu vi fordonus vian filinon je malsekulaĉo?»*

– Mia familnomo estas Banev, – prezentis sin Viktor, kaj demandis: – kiel fartas via... suferito? Tiu kiu trafis en kaptilon?

La malsekulaĉo rapide turnis al li la vizaĝon.

*«Rigardas kiel el malamika tranĉeo», – pensis Viktor.*

– Kontentiĝe, – respondis la malsekulaĉo seke.

– Sur lia loko mi prezentus petskribon en polican administrejon.

– Tio ne havas sencon, – diris la malsekulaĉo.

– Kial ja? – diris Viktor. – Oni ne devas adresi sin nepre en lokan polican administrejon, eblas en la distriktan...

– Al ni tio ne bezonatas.

Viktor levetis la ŝultrojn.

– Ĉiu nepunita krimo naskas novan krimon.

– Jes, sed tio ne interesas nin.

Ili silentis. Poste la malsekulaĉo diris:

– Mia nomo estas Zurzmansor.

– Fama familnomo, – ĝentile diris Viktor. – Ĉu vi estas parenco de Pablo Zurzmansor, sociologo?

– La malsekulaĉo duonfermis la okulojn. – Eĉ ne samnomulo, – diris li. – Oni diris al mi, Banev, ke morgaŭ vi elpaŝos en gimnazio...

Viktor ne sukcesis respondi. Post lia dorso ekmoviĝis brakseĝo, kaj bravula baritono prononcis:

– Nu, vi, infektulo, for de ĉi tie!

Viktor turniĝis. Super li leviĝis diklipa Flamin Juventa, aŭ kio estas lia nomo, unuvorte neveto. Viktor rigardis lin ne pli ol sekundon, sed eksentis jam fortegan ekscitiĝon.

– Al kiu vi diras tion, juna homo? – Informiĝis li.

– Al via kamarado, – ĝentile diris Flamin Juventa, kaj denove elkriegis: – Ĉu vi ne aŭdas, malseka felaĉo!

– Unu momenton, – diris Viktor, kaj leviĝis.

Flamin Juventa, aĉsmajle rigardis lin desupre. Tia juna goljato en sporta jako, brilanta per multnombraj emblemoj, nia simplega patruja ŝturmfjurer, fidela filo de la nacio kun kaŭĉuka bastoneto en la malantaŭa poŝo, minaco por liv-uloj, dekstruloj kaj moderuloj.

Viktor etendis la manon al lia kravato kaj diris, figurante zorgemon kaj scivolon:

– Kio estas ĉi tie ĉe vi?

Kaj kiam la juna goljato aŭtomate klinis la kapon por rigardi kio estas ĉe li tie, Viktor forte

pinĉis lian nazon per dika kaj montra fingroj.

– E! – konsternite kriis la juna goljato, kaj penis elŝiriĝi, sed Viktor ne ellasis lin, kaj iom da tempo peneme kaj kun glacia delico turnadis kaj tiradis tiun ĉi impertinentan fortikan nazon, alparolante:

– Kondutu vi vin dece, pedika hundido, neveto, vulgarulo...

Lia pozicio estis ekstreme oportuna: la juna goljato terure kalcitris, sed inter ili estis brakseĝo, juna goljato knedis la aeron per la pugnoj, sed manoj de Viktor estis longaj, kaj Viktor daŭre turnadis kaj tiradis, ĝis kiam super lia kapo traflugis botelo. Tiam li retrorigardis: sur lin, disŝovante tablojn kaj renversante seĝojn, kun bruego kuris la tuta bando – kvinopo, duopo el kiuj estis tre altstaturaj. Por momento ĉio eksenmoviĝis, kiel sur fotografaĵo: nigra Zurzmansor, trankvile sidanta en la brakseĝo, Teddi, pendanta ene de la salto super la vendotabulo, Diana kun blanka volvaĵo meze de la halo, kaj sur malantaŭa fono – furioza liphara vizaĝo de la pordisto, kaj tre apude – malicaj muzelaĉoj kun malfermitaj buŝoj. Poste la fotografaĵo finiĝis, kaj komenciĝis kino.

Unuan el la altstaturaj Viktor tre sukcese faligis per bato je la vangosto. Tiu malaperis, kaj iom da tempo ne estis videbla. Sed alia altstaturulo trafis orelon de Viktor. Ankoraŭ iu batis lian vangon per la manplata rando. Verŝajne li maltrafis la kolon. Kaj ankoraŭ iu, – ĉu liberiĝinta goljato? – saltis sur lin de malantaŭe. Ĉiuj ili estis krudaj huliganoj, apogo de la nacio, – nur unu el ili konis bokson, sed aliaj

deziregis ne tiom interbatiĝi kiom kripligi, elpremi okulon, ŝiri la buŝon, kalcitri je la ingveno. Se Viktor estus sola, ili kripligus lin, sed de malantaŭe ilin alkuris Teddi, kiu sankte sekvis oran regulon de ĉiuj elĵetistoj – estingi ĉiun interbatiĝon je la ĝermo mem, kaj de flanko aperis Diana, Diana Furioza, dent-nudigita pro la malamo, ne simila al si, jam sen la blanka pakaĵo, sed kun peza plektita botelego en la mano; krom tio alrapidis la pordisto, homo kvankam nejuna, sed, laŭ la sperto, iama soldato – li agis per ligaĵo da ŝlosiloj kvazaŭ tio estus rimeno kun bajoneto en la bajonetingo. Do kiam el la kuirejo alkuris du kelneroj, estis jam nenio al ili por fari. La neveto forkuris, forgesinte sur la tableto la transistoran radioricevilon. Unu el la bravuloj restis kuŝi sub la tableto – tio estis kiun Diana faligis per la botelego, restintan kvaropon Viktor kaj Teddi, kuraĝigante unu la alian per bravaj alkrioj, elportis el la halo, senmetafore, sur la pugnoj, pelis ilin tra la vestiblo, kaj per la piedbatoj enigis en la turniĝantan pordon. Laŭinercie ili elflugis eksteren, kaj nur tie, sub la pluvo, konsciis sian plenan venkon kaj iom trankviliĝis.

– Nazmukuloj fiaj, – diris Teddi, ekfumante samtempe du cigaredojn: – por si kaj por Viktor. – Kutimiĝis ili diboĉi ĉiuvendrede. Pasintfoje preterrigardis mi – du brakseĝojn rompis ili. Kaj kiu pagu? Mi!

Viktor palpis la ŝvelintan orelon.

– La neveto foriris, – diris li bedaŭre. – Do ne atingis mi lin kiel decas.

– Tio estas bone, – diris Teddi afereme. – Kun

tiu ĉi diklipulo oni prefere ne havu aferojn. Onkleto lia, vi ja scias kio li estas, kaj ankaŭ li mem... Apogo de la patrujo kaj de la ordo, aŭ kiel ili nomas sin tie. Sed pri interbatiĝoj, sinjoro verkisto, lertiĝis vi bone. Tia, memoras mi, nazmukulo vi estis – oni frap! kaj vi jam sub la tablon. Bravulo.

– Ja tia estas mia profesio, – suspiris Viktor. – Rezulto de porekzista lukto. Ja ĉe ni jen kiel: – ĉiuj sur unuopulon. Kaj sinjoro prezidento pro ĉiuj.

– Ĉu vere ĝis interbatiĝo venas? – simple anime miris Teddi.

– Sed kiel vi opinias! Verkos oni pri vi laŭdan artikolon ke vi, kvazaŭ, estas saturita per la nacia memkonscio, do iras vi serĉi la kritikiston, sed li jam kun kompanio. Kaj ĉiuj junaj, batalemaj, fortaj, infanoj de la prezidento...

– Jen kiel, – diris Teddi kompate. – Kaj kio?

– Diverse. Kaj tiel okazas, kaj alie.

Al la enirejo alruliĝis ĵipo, malfermiĝis la pordeto, kaj sub la pluvon, kovrante sin per unu pluvmantelo, elgrimpis la juna homo kun okulvitroj kaj lia altstatura akompananto. El ĉe la stirilo elgrimpis Golem. La altstatura kun akra, iel profesia intereso rigardis kiel la pordisto elbatas tra la turniĝanta pordo la lastan diboĉulon.

– Bedaŭrindas ke tiu forestis, – flustre diris Teddi, montrante la altstaturan, – jen kiu estas majstro! Ne kiel vi. Profesiulo, ĉu vi komprenis?

– Komprenis, – same flustre respondis Viktor.

La juna homo kun la teko kaj la altstatura trote preterkuris ilin kaj plonĝis en la eniron. Golem senrapide ekmoviĝis post ili, de malproksime smajlante

al Viktor, sed lian vojon baris Zurzmansor kun la blanka pakaĵo sub la brako. Li diris ion duonvoĉe al Golem, post kio Golem ĉesis smajli, kaj revenis en la aŭton. Zurzmansor engrimpis la postan sidlokon kaj la ĵipo forruliĝis.

– Tiel do – diris Teddi. – Ne tiun ni batis, sinjoro Banev. Homoj sangon pro li perdas, sed li eksidis en malpropran aŭton kaj forveturis.

– Nu, tion vi vane, – diris Viktor. – Malsana malfeliĉa homo, hodiaŭ li, morgaŭ vi. Ni iros nun kaj drinkos, sed li estas en leprulejon veturigata.

– Scias ni kien li estas veturigata! – senpaciĝe diris Teddi. – Nenion vi komprenas en nia vivo, verkisto.

– Deŝiriĝis mi de la nacio, ĉu?

– De nacio aŭ ne de nacio, sed vivon nian vi ne konas. Provu vi vivi ĉe ni: kioman jaron pluvoj, sur la kampoj putris ĉio, infanoj senbridiĝis... Ja pri kio paroli –eĉ ne unu kato en la urbo restis, neniu savo de musoj... E-eĥ! – diris li, svinginte la manon. – Iru ni jam.

Ili revenis en la vestiblon, kaj Teddi demandis la pordiston, kiu okupis jam sian postenon:

– Nu, ĉu multas la perdoj?

– Ne, – respondis la pordisto, – eblas opinii ke evitis ni. Unu surplanka lampo estas kripligita, la muron ili malpurigis, sed monon mi forprenis de tiu... de lasta, jen, prenu. Kalkulante dumire la monon, Teddi eniris la restoracion. Viktor sekvis lin.

En la halo denove regis trankvilo. La juna homo kun la okulvitroj kaj la altstatura enuis jam super botelo da minerala akvo, melankolie maĉante sian

vespermanĝon. Diana sidis kie ŝi sidis antaŭe, tre vigla, tre beleta, kaj eĉ smajlis al preninta sian lokon doktoro R.Kvadriga, kiun kutime ŝi ne toleris. Antaŭ R.Kvadriga staris botelo da rumo, sed li ankoraŭ estis sobra, kaj tial aspektis strange.

– Je la venko! – malserene salutis li na Viktor. – Bedaŭras mi ke ne ĉeestis tion en rango eĉ de kadeto.

Viktor falis en la brakseĝon.

– Bela orelo, – diris R.Kvadriga. – Kie vi akiris tian? Kiel koka kresto.

– Konjakon! – postulis Viktor. Diana verŝis al li konjakon. – Pro ŝi, nur pro ŝi akiris mi tiun ĉi venkon, – diris li, montrante na Diana. – Ĉu vi pripagis la botelon?

– La botelo ne rompiĝis, – diris Diana. – Je kiu vi min konsideras? Sed kiel li falis! Dio mia, kiel mirinde li falis! Se ĉiuj tiel...

– Komencu ni, – malgaje diris R.Kvadriga, kaj verŝis al si plenan glason da rumo.

– Ekruliĝis li kiel manekeno, – diris Diana. – Kiel keglo... Viktor, ĉu ĉe vi ĉio estas en ordo? Mi vidis ke oni batis vin per piedoj.

– Plej grava estas en ordo, – diris Viktor. – Mi speciale gardis.

Doktoro R.Kvadriga brue ensuĉis lastan guton da rumo el la glaso, ĝuste kiel kuireja lavabo ensuĉas restaĵojn post lavo de manĝilaro. Liaj okuloj tuj malklariĝis.

– Ni estas konataj, – haste diris Viktor, – vi estas doktoro Rem Kvadriga, mi – verkisto Banev...

– Lasu, – diris R.Kvadriga. – Mi estas tute so-

bra. Sed mi alkoholiĝos. Tio estas sola afero pri kiu mi estas nun certa. Vi ne povas imagi tion, sed mi alveturis ĉi tien antaŭ duonjaro, estante tute nedrinka homo. Ĉe mi malsanas hepato, kataro de la intestoj, kaj io pri la stomako. Al mi estas absolute malpermesate drinki, sed nun mi drinkas seninterrompe... Mi estas bezonata absolute al neniu. Neniam en la vivo okazis al mi tio. Mi eĉ leterojn ne ricevas, ĉar la malnovaj amikoj perdis rajton korespondi, kaj la novaj – analfabetas...

– Neniujn ŝtatajn sekretojn, – diris Viktor. – Mi estas nekonfidinda.

R.Kvadriga denove plenigis la glason kaj komencis eldrinki rumon kiel malvarmiĝintan teon.

– Tiel pli bone efikas, – informis li. – Provu, Banev, tio utilos... Kaj ĉesu vi rigardi min! – subite furioze diris li al Diana. Mi petas kaŝi viajn sentojn. Kaj se al vi ne plaĉas...

– Trankvile, trankvile, – diris Viktor, kaj R. Kovriga malvarmiĝis.

– Ili neniel komprenas min, – diris li plende. – Neniu. Nur vi iomete komprenas. Vi ĉiam komprenis min. Sed vi estas tre kruda, Banev, kaj vi ĉiam vundis min. Mi tuta estas vundita... Nun ili timas min insulti, nun ili nur laŭdas min. Kiam laŭdos iu kanajlo – vundo. Alia kanajlo laŭdos – alia vundo. Sed nun ĉio tio estas malantaŭe. Ili ankoraŭ ne scias... Aŭskultu, Banev, ĝis kiom mirinda ino estas ĉe vi... Mi petas vin... Petu vi ŝin, venu ŝi en mian atelieron... Sed ne, stultulo! Modelistino! Vi nenion komprenas, tian modelistinon mi serĉas jam dek jaroj...

– Alegoria pentraĵo, – klarigis Viktor al Diana. – "La prezidento kaj la ĉiam juna nacio"...

– Stultulo, – malgaje diris R.Kvadriga. – Vi ĉiuj opinias ke mi vendas min... Nu jes, estis! Sed plu mi ne pentras prezidentojn... Memportreto! Ĉu vi komprenas?

– Ne, – konfesis Viktor. – Mi ne komprenas. Ĉu vi volas pentri vian memportreton de Diana?

– Stultulo, – diris R.Kvadriga. Tio estos vizaĝo de artisto...

– Mia pugo, – klarigis Diana al Viktor.

– Vizaĝo de artisto! – ripetis R.Kvadriga. – Ja ankaŭ vi estas artisto... Kaj ankaŭ ĉiuj kiuj sidas sen korespondrajto... Kaj ĉiuj kiuj kuŝas sen korespondrajto... Kaj ĉiuj kiuj loĝas en mia domo, tio estas ne loĝas... Ĉu vi scias, Banev, mi timas. Ja petis mi vin: venu, loĝu ĉe mi eĉ iomete. Ĉe mi estas vilao, fontano... Sed la ĝardenisto forkuris. Timulo... Loĝi tie sola mi ne povas, en hotelo estas pli bone... Ĉu vi opinias ke mi drinkas ĉar vendiĝis mi? Tute ne, tio ne estas moda romano... Vivos vi iom ĉe mi kaj komprenos... Eblas ke vi eĉ rekonos ilin. Eble tio tute ne estas miaj konatoj, sed la viaj. Tiam mi scius kial ili ne rekonas min. Vagas ili nudpiedaj... Ridas... – Liaj okuloj subite pleniĝis per larmoj. – Gesinjoroj! – diris li – kia feliĉo ke ĉe ni forestas tiu Pavor. Je via sano!

– Estu sana, – diris Viktor, interrigardante kun Diana.

Diana rigardis na R.Kvadriga kun abomena maltrankvilo.

– Neniu ŝatas ĉi tie na Pavor, – diris Viktor. –

Nur mi estas iu monstro.

– Trankvila profundejo, – prononcis doktoro R.Kvadriga. – Kaj saltinta rano. Babilulo. Ĉiam silentas.

– Simple li estas jam preta, – diris Viktor al Diana. – Nenio terura.

– Gesinjoroj! – diris doktoro R.Kvadriga. – Sinjorino! Mi opinias ke mia devo estas prezenti min! Rem Kvadriga, doktoro honoris kauza.

## Ĉapitro kvina

Viktor venis en la gimnazion duonhoron antaŭ la interkonsentita tempo, sed Bol-Kunac jam atendis lin. Tamen li estis knabo takteca, li nur informis na Viktor ke la renkonto okazos en la aŭlo, kaj tuj foriris, pretekste je urĝaj aferoj. Restinte sola Viktor ekvagis en la koridoroj, enrigardante malplenajn klasĉambrojn, enspirante forgesitajn odorojn de inko, kreto, de ĉiam ŝvebanta polvo, odorojn de interbatiĝoj "ĝis unua sango", de turmentaj esplorpridemandoj ĉe la tabulo, odorojn de prizono, de senrajteco, de mensogo, suprenigita je principo. Li daŭre esperis elvoki el la memoro iujn dolĉajn rememorojn pri la infaneco kaj juneco, pri la kavalireco, kamaradeco, pri unua pura amo, sed nenio el tio rezultiĝis, kvankam li tre penis, preta kortuŝiĝi ĉe unua jam ebleco. Ĉio restis ĉi tie sama – kaj lumaj mucidaj klasĉambroj, kaj la gratitaj tabuloj; pupitroj, tranĉitaj per surfarbitaj surskriboj kaj komencliteroj, kaj kazemataj muroj, farbitaj ĝis duono per gaja verda farbo, kaj forbatita stuko en la anguloj: ĉio restis sama: malama, aĉa, veniganta

al kolero kaj senespero.

Li trovis sian klasĉambron, kvankam ne tuj; sed la pupitro estis alia, nur sur la fenestrobreto videblis ankoraŭ profunde entranĉita emblemo de Legio de Libero, kaj li vigle ekmemoris narkotan entuziasmon de tiu tempo, blank-ruĝajn manik-ligaĵojn, ladajn monerkolektujojn por "fonduso de Legio", frenezajn sangajn interbatiĝojn kontraŭ ruĝuloj, kaj portretojn en ĉiuj ĵurnaloj, en ĉiuj lernolibroj, sur ĉiuj muroj – vizaĝo, kiu ŝajnis tiam signifa kaj belega, kaj nun ekestis molaĉa, stulta, simila al apra muzelaĉo, kun grandega kojnodenta ŝprucanta buŝo. Tiaj junaj, tiaj grizaj, tiaj similaj... kaj stultaj. Kaj tiu ĉi stulteco ne ĝojigas nun, ne eblas ĝoji ke ekestis pli saĝa, sed nur honto brulvundas pri tiama mi, pri griza aferema birdido, imaganta sin brila, neanstataŭebla, elektita... Kaj ankoraŭ hontaj infanaj deziregoj, kaj turmenta timo antaŭ knabino, pri kiu vi tiom fanfaronis, ke nun jam ne eblas retiriĝi, kaj sekvonttage – surdiga kolero de la patro, kaj brulantaj oreloj, kaj ĉio tio nomiĝas feliĉa tempo: grizeco, dezirego, entuziasmo...

*«Malbonas la afero», – pensis li. – «Sed kio se post dek kvin jaroj okazos ke ankaŭ nuna mi estas same griza kaj mallibera kiel en la infaneco, kaj eĉ pli malbona, ĉar nun mi opinias min adolta, sufiĉe multe scianta kaj sufiĉe travivinta por havi kaŭzojn je memkontento kaj rajto juĝi.*

*Modesteco kaj nur modesteco, ĝis sinhumiligo... Kaj vero, nur vero, neniam mensogu, precipe ne al mi mem. Sed tio teruras:*

*memhumiligo, kiam ĉirkaŭe estas tiom da idiotoj, malĉastuloj, profitemaj mensoguloj; eĉ plej bonaj estas kovritaj per makuloj, kvazaŭ lepruloj... Ĉu vi volas denove ekesti juna? Ne. Ĉu vi volas vivi ankoraŭ dek kvin jaroj? Jes. Ĉar vivi – tio estas bone. Eĉ kiam vi ricevas batojn. Kondiĉe ke ekzistas ebleco bati responde... Nu, bone, sufiĉas. Haltu mi ĉe tio ke vera vivo estas maniero ekzisti, permesanta apliki respondajn batojn. Kaj nun iru mi kaj rigardu kiaj ili ekestis...»*

En la halo estis sufiĉe multe da infanoj, kaj regis kutima bruo kiu kvietiĝis kiam Bol-Kunac enkondukis na Viktor sur la scenejon, kaj sidigis lin sub grandegan portreton de la prezidento – donaco de doktoro R.Kvadriga – ĉe la tablo, kovrita per ruĝblanka tablotuko. Poste Bol-Kunac venis al rando de la podio kaj diris:

– Hodiaŭ kun ni konversacios Viktor Banev, konata verkisto, naskito de nia urbo. – Li turniĝis al Viktor, – kion vi preferas, sinjoro Banev, ĉu la demandojn oni prezentu al vi voĉe aŭ skribe?

– Tutegale, – diris Viktor facilanime. – Gravas nur ke ili estu multaj.

– Do mi petas vin.

Bol-Kunac desaltis la podion, kaj eksidis en la unua vico. Viktor gratetis la brovon, ĉirkaŭrigardante la halon. Ili estis ĉirkaŭ kvindekopaj – knaboj kaj knabinoj de dek ĝis dek kvar jaroj – kaj ili rigardis lin kun trankvila atendo.

*«Similas ke ĉi tie estas nur mirinfanoj» –*

*ekpensis li pretere.*

En dua vico dekstre li ekvidis na Irma, kaj smajlis al ŝi. Ŝi smajlis responde.

– Mi lernis en tiu ĉi gimnazio, – komencis Viktor, – kaj sur tiu ĉi podio okazis al mi ludi na Ozrik (Ozric). Rolon mi ne konis, do devis elpensi ĝin surloke. En mia vivo tio estis unua verko kiun mi kreis ne sub minaco de malbona poento.

Oni diras ke nun estas pli malfacile lerni ol en mia tempo. Onidire ĉe vi aperis novaj lernobjektoj, kaj tio kion ni lernis dum tri jaroj, vi devas pe-lerni dum unu jaro. Sed eblas ke vi eĉ ne rimarkas ke ekestis pli malfacile. Sciencistoj opinias ke cerbo kapablas asimili multe pli da informoj ol ŝajnas al pretere rigardanta ordinara homo. Oni devas nur scii kiel enŝovi tiujn ĉi informojn...

*«Ha», – pensis li – «nun mi rakontos al vi pri hipnozpedagogio».*

Sed tiam Bol-Kunac transdonis al li skribaĵeton: "Ne rakontu al ni pri atingoj de scienco. Parolu vi al ni kiel al egaluloj. Valeriano. 6 kl."

– Tiel, – diris Viktor. – Ĉi tie iu Valeriano el sesa klaso proponas al mi konversacii kun vi kiel kun egaluloj, kaj avertas ke mi ne klarigu atingojn de scienco. Mi devas diri al vi, Valeriano, ke mi vere intencis konversacii nun pri atingoj de hipnozpedagogio. Tamen mi volonte rifuzos de tiu ĉi intenco, kvankam mi opinias ke mia devo estas informi vin ke plimulto da egalaj al mi adoltoj havas pri hipnotpedagogio nur tre svagan imagon.

Al li estis neoportune paroli side, li leviĝis, kaj promenis sur la podio.

– Mi devas konfesi, infanoj, ke mi ne ŝatas renkontiĝi kun la legantoj. Kutime tute ne eblas kompreni kun kiu leganto mi konversacias, kion li volas de mi kaj kio, fakte, interesas lin. Tial mi penas ĉiun mian elpaŝon transformi en renkonton de demandoj kaj respondoj. Iam okazas sufiĉe amuze. Ĉu vi ne kontraŭas se demandi komencu mi? Do... Ĉu ĉiuj legis miajn verkojn?

– Jes, – respondis infanaj voĉoj. – Legis... Ĉiuj...

– Bonege, – diris Viktor mirigite. – Mi estas flatita, kvankam mirigita. Nu bone, iru ni pluen... Ĉu deziras la kunveno ke mi rakontu verkad-histori-on de iu el miaj romanoj?

Sekvis silento, poste en mezo de la halo leviĝis magra akna knabo, diris "Ne" kaj eksidis.

– Bonege, – diris Viktor. – Tio des pli bonas ke, spite al vasta opinio, en historioj de verkado estas nenio interesa. Iru ni pluen... Ĉu deziras la esti-mataj aŭskultantoj scii pri miaj verk-planoj?

Leviĝis Bol-Kunac, kaj ĝentile diris:

– Vidu, sinjoro Banev, demandoj senpere ligitaj kun tekniko de via kreado estus pli bone pridiskuti fine de la konversacio, kiam klariĝos la plena bildo.

Li eksidis. Viktor enŝovis la manojn en la poŝo-jn, kaj denove promenis sur la podio. Iĝis interese, aŭ, ĉiuokaze, nekutime.

– Ĉu, eble, vin interesas literaturaj anekdotoj? – flateme demandis li, – kiel mi ĉasadis kun Heminguej (Hemingway). Kiel Erenburg donacis al

mi rusan samovaron. Aŭ kion diris al mi Zurzmansor, kiam mi renkontis lin en buso...

– Ĉu vi vere renkontiĝis kun Zurzmansor? – oni demandis el la halo.

– Ne, mi ŝercas, – diris Viktor. – Do kio pri literaturaj anekdotoj?

– Ĉu eblas demandi? – diris, leviĝante, akna knabo.

– Jes, certe.

– Kiaj vi volus vidi nin en estonto?

*«Sen aknoj» – preterflugis en kapo de Viktor, sed li forpelis tiun ĉi penson ĉar komprenis: iĝas varme. La demando estis forta. «volas mi ke iu diru al mi kia mi mem volas vidi min en la nuno», – pensis li. Tamen estis necese respondi.*

– Ŝaĝaj, – diris li divene. – Honestaj. Bonkoraj... Volus mi ke vi ŝatu vian laboron... Kaj ke laboru vi nur por bono de homoj.

*«Banalaĵo» – pensis li. – «sed kiel mi evitu tion?»*

– Proksimume tiel...

La halo ekbruetis, poste iu demandis, ne leviĝante:

– Ĉu vi vere opinias ke soldato estas pli grava ol fizikisto?

– Mi?! – indigniĝis Viktor.

– Tion mi komprenis el via novelo "Plago venas nokte".

Tio estis blonda etulo ne pli ol dek-jara. Viktor

grakis. – "Plago" povis esti malbona libro, kaj povis esti bona libro, sed ĝi neniokaze estis infana libro. Ĝis tiom ĝi ne estis infana, ke neniu el kritikistoj komprenis ĝin: ĉiuj decidis ke tio estas porna legaĉaĵo, kiu subfosas moralon kaj nacian memkonscion. Kaj plej terura estis tio ke la blonda etulo havis ĉiujn kaŭzojn supozi ke aŭtoro de "Plago" opinias soldaton "pli grava" ol fizikisto – ĉiuokaze en kelkaj rilatoj.

– Fakto estas tio, – diris Viktor emocie-sincere, – ke... kiel mi diru al vi... Ĉio okazas.

– Mi tute ne konsideras fiziologion, – oponis la blonda etulo. – Mi parolas pri komuna koncepto de la verko. Eblas ke "pli grava" – ne estas ĝusta esprimo...

– Ankaŭ mi ne konsideras fiziologion, – diris Viktor. – Mi volas diri ke okazas situacioj kiam nivelo de scioj signifas nenion.

Bol-Kunac akceptis el la halo kaj transdonis al li du skribaĵetojn: "Ĉu oni povas opinii honesta kaj bonkora homon kiu laboras por milito" kaj "Kio estas saĝa homo?" Viktor komencis de la dua demando – ĝi estis pli simpla.

– Saĝa homo, – diris li, – tio estas homo kiu konscias neperfektecon, nesufiĉon de siaj scioj, penas pligrandigi ilin kaj sukcesas pri tio... Ĉu vi konsentas kun mi?

– Ne, – dirs leviĝinte beleta knabino.

– Sed kio problemas?

– Via difino ne estas funkcia. Ĉiu stultulo, uzante tiun ĉi difinon, povas opinii sin saĝa. Precipe, se ĉirkaŭantoj subtenas tiun ĉi lian opinion.

*– «Jes», – ekpensis Viktor. – Lin kaptis eta paniko. – «Tio ne estas al vi konversacio kun fratoj-verkistoj».*

– Iugrade vi pravas, – diris li, neatendite por si transirante de "ci" al "vi". – Fakto estas tio ke, entute, "stulta" kaj "saĝa" estas konceptoj historiaj kaj, pli ĝuste, subjektivaj.

– Do vi, persone, ne estas preta distingi stultulon de saĝulo? – Tio el malantaŭaj vicoj, – brunhaŭta ĝisnude tondita estaĵo kun belegaj bibliaj okuloj.

– Kial ne, – diris Viktor, – mi pretas. Sed mi ne estas certa ke vi ĉiam konsentos kun mi. Estas antikva aforismo: stultulo – tio simple estas alipensulo...

Kutime tiu ĉi frazo elvokis ridon de la aŭskultantoj, sed nun la halo silentis kaj atendis daŭrigon. – Aŭ alisentulo, – aldonis Viktor.

Li akre sentis disiluziiĝon de la halo, sed li ne sciis kion aldoni. Kontakto ne okazadis. Kutime la ĉeestantoj leĝere transiras sur pozicion de la prelegganto, konsentante liajn rezonojn, kaj al ĉiuj iĝis klare kio estas stultulo, dum kio oni subkomprenis ke ĉi tie, en tiu ĉi halo, stultuloj forestas. Iam, malbonokaze, la aŭskultantaro ne konsentis, kaj agordiĝis malamike, sed ankaŭ tiam estis facile, ĉar restis ebleco sarkasmi kaj priridi. Kaj disputi sola kontraŭ multaj ne estas malfacile, ĉar la kontraŭuloj ĉiam kontraŭas unu al la alia, kaj inter ili ĉiam troviĝas plej brua kaj plej stulta, sur kiu eblas danci al ĉies plezuro.

– Mi ne plene komprenas, – prononcis beleta knabino. – Vi volas ke ni estu saĝaj, tio signifas, laŭ via aforismo, ke ni pensu kaj sentu same al vi. Sed mi pe-legis ĉiujn viajn librojn, kaj trovis en ili nur neon. Neniu pozitiva programo. De alia flanko vi volus ke ni laboru por bono de homoj. Tio estas, fakte, por bono de tiuj malpuraj kaj malagrablaj homaĉoj per kiuj estas plenigitaj viaj libroj. Sed vi respegulas ja realon, ĉu?

Al Viktor ekŝajns ke li pe-palpis, finfine, fundon sub la piedoj.

– Vidu, – diris li, – sub laboro por bono de homoj mi komprenas ĝuste transformon de homoj en purajn kaj agrablajn. Tamen tiu ĉi mia deziro havas neniun rilaton al mia verkado. En la libroj mi penas prezenti ĉion tia kia ĝi estas, mi ne penas instrui aŭ montri kion oni faru. En plej bona okazo mi montras objekton por apliko de fortoj, atentigas kontraŭ kio oni devas lukti. Mi ne scias kiel ŝanĝadi homojn, se mi scius, mi estus ne moda verkisto, sed elstara pedagogo aŭ fama psikosociologo. Al beletro, entute, ne decas instrui, gvidi, proponi konkretajn vojojn, kaj krei konkretan metodikon. Tion oni povas vidi per ekzemplo de plej elstaraj verkistoj. Mi admiras na Leo Tolstoj, sed nur ĝis kiam li estas originala, unika talento, respegulanta realon. Sed tuj kiam li komencas instrui min paŝadi nudpiede kaj submeti la vangon, min kaptas kompato kaj angoro... Verkisto – tio estas aparato, montranta staton de la komunumo, kaj nur en sensignifa grado – ilo por ŝanĝi la komunumon. Historio montras ke komunumon oni ŝanĝas ne per beletro, sed per re-

formoj kaj mitraloj, kaj nun ankaŭ per scienco. Beletro, en plej bona okazo, montras kiun oni devas pafi aŭ kio devas esti ŝanĝita... – Li faris paŭzon, elmemorinte ke estas ankaŭ Dostojevskij kaj Folkner (Faulkner). Sed dum li pripensis kiel ekparoli pri rolo de beletro en esploro de subkonscio de individuo, el la halo oni informis:

– Pardonu, sed ĉio tio estas sufiĉe triviala, ĉar temas ne pri tio. Gravas tio ke prezentitaj per vi personoj tute ne deziras esti ŝanĝitaj. Kaj, krom tio, ili estas ĝis tiom malagrablaj, ĝis tiom neglektitaj, ĝis tiom senesperaj, ke forestas deziro ŝanĝi ilin. Ĉar ili, ĉu vi komprenas, ne valoras tion. Pli bone ĝisputru ili: ja ili tute ne ludas iun ajn rolon. Do, laŭ vi, por kies bono ni devas labori?

– Ha, jen vi pri kio! – malrapide diris Viktor.

*Subite li komprenis: Dio mia, ja tiuj ĉi nazmukuloj serioze opinias ke mi verkas nur pri ŝlimuloj, ke mi ĉiujn opinias ŝlimuloj, sed ili nenion komprenis, kaj kial ili komprenu – ja tio estas infanoj, strangaj infanoj, malsanece saĝaj infanoj, kun infana vivsperto kaj kun infana kono de homoj plus amaso da pe-legitaj libroj, kun infana idealismo kaj kun infana strebo dismeti ĉion tion sur bretetoj kun avizoj "malbone" kaj "bone". Ĝuste kiel la fratoj-beletristoj.*

– Min trompis tio ke vi parolas kiel adoltoj, – diris li. – Mi eĉ forgesis ke vi ne estas adoltoj. Mi komprenas ke estas nepedagogie diri tion, sed diri tion estas necese, alie ni neniam elkomplikiĝos. Ja

temas pri tio ke vi, ŝajne, ne komprenas kiel nerazita, histeria, ĉiam ebria viro povas esti bonega homo, kiun ne eblas malŝati, kiun oni admiru, kaj opiniu ke estas honoro premi lian manon, ĉar li trairis tiun inferon, ke teruras eĉ pensi, sed tamen restis homo. Ĉiujn protagonistojn de miaj libroj vi opinias malpuraj ŝlimuloj, tamen tio estas duonplago. Vi opinias ke ankaŭ mi rilatas al ili same kiel vi. Sed tio estas jam vera plago. Plago en tiu senco, ke tiel ni neniam komprenos unu la alian...

Diablo scias kiun reagon li atendis al sia bonanima riproĉo. Ĉu ili komencos konfuze interrigardi, ĉu iliaj vizaĝoj eklumiĝos per kompreno, aŭ iu suspiro de faciliĝo traflugos la halon, montranta ke la miskompreno bonorde klariĝis, kaj nun oni povas ĉion komenci sur nova, pli reala bazo... Tamen okazis nenio tia. En la malantaŭaj vicoj denove leviĝis knabo kun bibliaj okuloj, kaj demandis:

– Ĉu vi povus diri al ni kio estas progreso?

Viktor eksentis sin ofendita.

*«Nu certe», – pensis li, – «kaj poste ili demandos ĉu povas maŝino pensi, kaj ĉu estas vivo sur Marso. Ĉio revenas sur rondojn siajn».*

– Progreso, – diris li, – tio estas movo de komunumo al tiu stato kiam homoj ne mortigas, ne tretas kaj ne turmentas unu alian.

– Sed pri kio ili okupiĝas? – demandis dika knabo dekstre.

– Drinkas kaj postmanĝas *kvantum satis* (ĝissate) – elgrumblis iu maldekstre.

– Sed kial ne? – diris Viktor. – Historio de homaro konas ne tiom multajn epokojn kiam homoj povis dirnki kaj postmanĝi *kvantum satis*. Por mi progreso – tio estas movo al stato kiam oni ne tretas kaj ne mortigas. Sed per kio ili okupiĝos tie, – tio, laŭ mi, ne tiom gravas. Por mi, se vi volas scii, antaŭ ĉio gravas necesaj kondiĉoj por progreso, sed aldonaj – ili venos poiome...

– Permesu al mi, – diris Bol-Kunac. – Pririgardu ni la skemon. Aŭtomatigo disvolviĝas samrapide kiel nun. Tiam, post kelkdeko da jaroj, plimulto da aktiva loĝantaro de Tero ekestos elĵetita el sfero de produktado kaj priservo pro nebezono. Estos tre bone: ĉiuj estas sataj, ne estos por kio treti unu alian, neniu malhelpas al aliaj... Kaj neniu estas bezonata al iu. Estas, certe, kelkaj cent-miloj da homoj kiuj garantias senmankan funkcion de malnovaj maŝinoj kaj kreon de la novaj, sed aliaj miliardoj simple ne estos bezonataj unu al alia. Ĉu tio estas bone?

– Mi ne scias, – diris Viktor. Entute tio estas ne tre bone. Tio estas iel ofende... Sed mi devas diri al vi, ke tio, tamen, estas pli bona ol tio kion ni vidas nun. Do iugrada progreso jam videblas.

– Kaj vi mem, ĉu vi volus vivi en tia mondo?

Viktor pensis.

– Ĉu vi scias, – diris li, – mi iel malbone imagas ĝin, sed, se paroli honeste, estus tute ne malbone provi tion.

– Sed ĉu vi povas imagi homon kiu absolute ne volas vivi en tia mondo?

– Certe povas. Estas homoj, kaj mi konas tiajn,

kiuj ekenuus tie. Potenco tie ne bezonatas, ne estas kiun komandi, ne estas por kio treti. Tamen malverŝajnas ke ili rifuzos – ja tio estas maloftega ebleco transformi paradizon je porkejon... aŭ en kazernon. Ili plezure ekruinigos tiun ĉi mondon...

– Kaj viaj protagonistoj, kiujn vi tiel ŝatas, ĉu ili konsentos pri tia estonto?

– Certe jes. Ili akiros tie merititan trankvilon.

Bol-Kunac eksidis, sed leviĝis la akna knabo kaj, ĉagrene kapjesante diris:

– Problemas ĝuste tio. Ne tio gravas komprenas ni realan vivon aŭ ne, sed gravas tio ke por vi kaj por viaj protagonistoj tia estonteco estas tute akceptebla, sed por ni – tio estas tombejo... Fino de esperoj. Fino de homaro. Sakstrato. Ĝuste tial ni diras ke forestas deziro perdi la fortojn por labori je bono de viaj trankvil-dezirantoj kaj uloj ĝis la oreloj malpurigitaj. Jam ne eblas enspiri en ilin energion por vera vivo. Do kiel ajn vi volas, sinjoro Banev, sed vi, en viaj libroj, – en interesaj libroj, mi estas plene "pro" – vi montris al ni ne objektojn por apliki la fortojn, sed ke en homaro forestas objektoj por apliki fortojn, apenaŭ en via generacio... Vi pe-voris vin, bonvolu pardoni min, vi elspezis vin por interbatiĝo, por mensogo kaj lukto kontraŭ mensogo, kiun vi gvidas elpensante novan mensogon... Jen kiel ĉe vi sonas tio:

Ver' kaj mensogo ne tiom malsamas:
ver' hieraŭa okazas mensogo;
isan mensogon novtago proklamas:
ver', ne cedanta eĉ al Dekalogo

Jen tiel vi ĵetiĝas de mansogo al mensogo. Vi simple ne povas kompreni ke vi estas kadavroj, ke vi per propraj manoj kreis mondon kiu ekestis por vi surtomba ŝtono. Vi putris en tranĉeoj, vi eksplodiĝis sub tankoj, sed al kiu pro tio ekestis pli bone? Vi insultis la registaron kaj la ordojn, kvazaŭ vi ne scias ke pli bonan registaron kaj pli bonajn ordojn via generacio... ja simple ne meritas. Oni batis vin, pardoni, je la vizaĝon, sed vi obstine balbutis ke homo, laŭ la naturo, estas bona... aŭ eĉ pli aĉe, ke homo – tio sonas honore. Kaj kiun ja vi ne nomis homo!..

La akna oratoro svingis la manon, kaj eksidis. Venis silento. Poste li denove leviĝis kaj informis:

– Kiam mi diris "vi", mi ne opiniis persone vin, sinjoro Banev.

– Mi dankas vin, – kolere diris Viktor.

Li sentis agacon: tiu ĉi akna nazmukulo ne rajtas paroli tiel kategorie, tio estas impertinento kaj aroganteco... Frapi lin je la nuko kaj forkonduki je la orelo el la halo. Li sentis inciton – multo el la dirita estis vero, li mem pensis same, kaj nun li trafis pozicion de homo kiu estas devigata defendi tion kion li malamas. Li sentis konfuziĝon – estis nekomprene kiel konduti sin, kiel daŭrigi la konversacion, kaj ĉu valoras, entute, daŭrigi. Li ĉirkaŭrigardis la halon, kaj ekvidis ke oni atendas lian respondon, ke Irma atendas lian respondon, ke ĉiuj tiuj ĉi ruĝvangaj kaj aknaj monstoj opinias same, kaj ke la akna impertinentulo eldiris komunan opinion, kaj formulis ĝin sinceranime, kun profunda konvinko, sed ne ĉar li pe-legis hieraŭ malpermesa-

tan broŝuron; ke ili vere sentas neniun dankemon aŭ eĉ elementan estimon al li, Banev, pro tio ke li libervole ekiris esti husaro, kaj iradis kontraŭ "Rejnmetal"-oj en ĉevala vicaro, kaj preskaŭ mortaĉis pro disenterio, trafinte **ĉirkaŭumon**[10], kaj tranĉis gardistojn per memfarita tranĉilo, kaj poste, estante jam civilulo, frapis vizaĝaĉon de unu specialrajtigito, proponinta al li subskribi denuncon, kaj restis sen laboro kun truo en la pulmo, kaj spekuladis fruktojn, kvankam oni proponis al li tre profitajn postenojn...

*«Tamen kial, fakte, ili devas estimi min pro ĉio tio? Ĉu pro tio ke mi iris kontraŭ tankoj kun elingita sabro? Sed oni devas esti idioto por havi registaron kiu venigis la landon ĝis tiu stato».*

Ĉi tie li ektremetis, imaginte kiun teruran sendankan laboron devis fari tiuj ĉi birdidoj por tute memstare veni al konkludoj, al kiuj adoltoj venas deŝirinte de si la tutan haŭton, ruiniginte sian animon, kripliginte sian vivon, kaj multegon da najbaraj vivoj... Sed al tio venis ne ĉiuj, nur kelkaj, sed plimulto ankaŭ ĝis nun opinias ke ĉio estis ĝusta kaj tre brava, kaj, se necesos, – ili pretas denove komenci ĉion... Ĉu vere, malgraŭ ĉio, venis nova tempo? Li rigardis en la halon preskaŭ kun timo. Ŝajnas ke estonto jam vere sukcesis enigi la palpilojn en koron mem de la estanto, kaj tiu ĉi estonto

---

**10.** ĉirkaŭumo: dummilita stato de armeanoj, ĉirkauigitaj per la malamikaro (PIV).

estis malvarma, senkompata, al ĝi estis tute indiferentaj ĉiuj meritoj de estanto – kiel veraj tiel ŝajnaj.

– Geknaboj, – diris Viktor. – Vi verŝajne ne rimarkas tion, sed vi estas kruelaj. Vi estas kruelaj pro plej bonaj intencoj, sed krueleco – tio ĉiam estas krueleco. Kaj nenion ĝi povas alporti krom nova malfeliĉo, krom novaj larmoj kaj novaj malnoblaĵoj. Jen kion vi konsideru. Kaj ne imagu ke vi diras ion specife novan. Detrui malnovan mondon kaj konstrui sur ĝiaj ostoj la novan, – tio estas tre malnova ideo. Kaj neniam ĝis nun ĝi venigis deziratajn rezultojn. Ĝuste tio kio en malnova mondo elvokas precipan deziron senkompate ruinigi, precipe leĝere adaptiĝas al procezo de ruinigo, al krueleco kaj senkompato, iĝas bezonata al tiu procezo, kaj nepre konserviĝas, iĝas mastro en la nova mondo kaj, finfine, mortigas la kuraĝajn detruantojn. Korvo al korvo okulon ne elbekos, per krueleco oni ne neniigos kruelecon. Ironio kaj kompato, geknaboj! Ironio kaj kompato!

Subite la tuta halo leviĝis. Tio estis tute neatendite, kaj ĉe Viktor preterbrilis freneza penso ke li sukcesis finfine diri ion tian kio trafis imagon de la aŭskultantoj. Sed li jam vidis ke de la pordo iras malsekulaĉo, facila, preskaŭ nemateria, kvazaŭ ombro, kaj la infanoj rigardas lin, kaj ne nur rigardas, sed tiriĝas al li, sed li diskrete kapklinis al Viktor, elmurmuris pardonon, kaj eksidis flanke, apud Irma, kaj ĉiuj geknaboj ankaŭ eksidis, kaj Viktor rigardis na Irma kaj vidis ke ŝi estas feliĉa, ke ŝi penas ne montri tion, sed plezuro kaj ĝojo kvazaŭ

ŝprucas el ŝi. Kaj antaŭ ol li sukcesis rekonsciiĝi ekparolis Bol-Kunac.

– Mi timas ke vi ne tiel komprenis nin, sinjoro Banev, – diris li. – Ni tute ne estas kruelaj. Tamen se ni, de via vidpunkto, estas kruelaj, do nur teorie. Ja ni tute ne intencas detrui vian malnovan mondon. Ni intencas konstrui la novan. Sed vi vere estas kruela: vi ne imagas konstruon de novo sen ruinigo de malnovo. Sed ni imagas tion tre bone. Ni eĉ helpos al via generacio krei tiun ĉi vian paradizon, drinku kaj postmanĝu plezure. Konstrui, sinjoro Banev, nur konstrui. Nenion detrui, nur konstrui.

Viktor, finfine, deŝiris la rigardon de Irma, kaj kolektis la pensojn.

– Jes, – diris li. – Certe. Agu, konstruu. Mi estas tute kun vi. Vi konsternis min hodiaŭ, sed tutegale mi estas kun vi... Kaj eble ĝuste pro tio mi estas kun vi. Se estos bezonate, mi eĉ rifuzos de drinkado kaj postmanĝado... Ne forgesu nur ke malnovajn mondojn estis bezonate detrui ĝuste pro tio ke ili malhelpis... Malhelpis konstrui novon, malŝatis la novon, tretis ĝin...

– Nuna malnova mondo, – enigme diris Bol-Kunac, – ne malhelpos al ni. Ĝi eĉ helpos. Oni ne devas jam konsideri antaŭan historion: ĝi ĉesis sian fluon.

– Kio do, des pli bone, – diris Viktor lace. – Mi estas tre ĝoja ke ĉe vi ĉio ordiĝas tiel sukcese...

*«Simpatiaj geknaboj», – pensis li. – «Strangaj, sed simpatiaj. Bedaŭras mi ilin, jen kio... Pe-kreskos ili, ekgrimpos unu sur la alian, plimultiĝos, kaj komenciĝos laboro por*

*pano ĉiutaga... Ne, ekpensis li despere. Eble ili evitos tion. Ja ili estas tute ne tiaj kiel ni. Eblas ke ili elturniĝos...»*

Li forprenis de la tablo la skribaĵetojn. Akumuliĝis sufiĉe multe da ili: "Kio estas fakto?", "Ĉu oni povas opinii honesta kaj bona homon kiu laboras por milito?", "Kial vi drinkas tiel multe?", "Kion vi opinias pri Ŝpengler?"...

– Ĉi tie estas ĉe mi kelkaj demandoj, – diris li. – Ne scias mi, ĉu valoras nun?...

La akna nihilisto leviĝis kaj diris:

– Vidu, sinjoro Banev, mi ne scias kiuj demandoj estas tie, sed, entute, tio ne gravas. Ja ni simple volis konatiĝi kun nuntempa konata verkisto. Ĉiu fama verkisto esprimas ideologion de la komunumo aŭ de parto de la komunumo, kaj ni devas scii ideologion de nuntempa socio. Nun ni scias pli ol sciis ĝis renkonto kun vi. Dankon.

En la halo oni ekmoviĝis, ekparolis samtempe: "Dankon... Dankon, sinjoro Banev...". Oni komencis leviĝi, elgrimpi el siaj lokoj, kaj Viktor staris, premegante en la pugno la skribaĵetojn, li sentis sin ŝtipo kaj sciis ke estas ruĝa, ke aspekton li havas konfuzitan kaj bedaŭrindan, sed li ekposedis sin, enŝovis la skribaĵetojn en la poŝon, kaj malleviĝis de la podio.

Plej malfacila estis tio ke li ne sukcesis kompreni kiel decas rilati al tiuj ĉi infanetoj. Ili estis nerealaj, ili estis neeblaj, iliaj eldiroj, ilia rilato al tio kion li verkis kaj kion li diris, havis neniun ligon al iliaj elstaraĉaj harplektaĵoj, hirtaj hararanĝoj, kun nesufiĉe lavitaj koloj, kun multaj difektetoj sur haŭ-

toj de iliaj magraj brakoj, kaj kun pepa bruo kiu regis ĉirkaŭe. Kvazaŭ iu forto, amuzante, koincidis en la spaco infanĝardenon kaj disputon en scienca labo. Koincidis nekoincideblan. Verŝajne ĝuste tion sentis tiu eksperimentita katino al kiu oni donis peceton da fiŝo, karesis je post la orelo, kaj samtempe frapis ĝin per elektra kurento, eksplodis sub la nazo pulvoron, kaj blindigis per lumĵetilo.

*«Jes», – kompate diris Viktor al la katino, staton de kiu li imagis nun tre bone. – «Niaj psikoj ne estas adaptitaj al tiaj ŝokoj, pro tiaj ŝokoj ni eĉ morti povas…».*

Ĉi tie li trovis ke estas kaptita. Oni ĉirkaŭigis lin, kaj ne donis iri. Por momento lin kaptis panika teruro. Li ne mirus se ili silente kaj afereme renversus lin kaj komencus sekci por esplori la ideologion... Sed ili ne intencis sekci lin. Ili etendis al li malfermitajn librojn, ĉipajn notlibretojn, paperfoliojn. Ili balbutetis: "Aŭtografon, bonvolu!" Ili pepis: "Ĉi tie, bonvolu!" Ili raŭkis per rompiĝintaj voĉoj: "Estu bonvola, sinjoro Banev!"

Kaj li elprenis la fontoplumon, komencis deŝraŭbi la ŝirmilon, kun intereso de eksterulo kontrolante siajn sentojn. Kaj li ne miris ke eksentis fieron. Tio estis fantomoj de estonto, kaj agrablis esti konato ĉe ili.

## Ĉapitro sesa

Veninte sian ĉambron li tuj malfermis la vinŝranketon, verŝis ĝinon, kaj pe-drinkis ĝin unug-

lute, kiel kuracilon. Sur la vizaĝon kaj post la kolumon verŝiĝis de sur la haroj akvo – okazis ke li forgesis surmeti la kapuĉon. La pantalono malsekiĝis ĝis la genuoj, kaj gluiĝis al la kruroj – verŝajne li paŝis sur la flakoj ne rimarkante la vojon. Deziro fumi estis besteca, ĉar li eĉ ne unufoje fumis dum tiuj ĉi pli ol du horoj...

*«Infanakcelado», – ripetadis li mense, deĵetante la malsekan pluvmantelon senpere sur la plankon, alivestiĝante, sekigante la kapon per la bantuko. – «Tio estas ne pli ol infanakcelado», – trankviligis li sin, bruligante la cigaredon kaj farante unuajn avidajn enspirojn. – «Jen ĝi estas, akcelado aganta», – kun teruro pensis li, memorante la konvinkajn infanajn voĉojn, asertantajn al li neeblaĵojn. – «Dio, savu adoltojn, Dio, savu gepatrojn de tiuj ĉi infanoj, edifu kaj saĝigu ilin, ĝuste nun... Por via ja utilo mi petas vin, Dio, alie konstruos ili babilonan turon al vi, tomban monumenton al ĉiuj stultuloj kiujn vi enlasis sur tiun ĉi teron por ke ili multiĝu, ne pripensinte, kiel decus, sekvojn de infanakcelado... Simplulo vi estas, frateto...»*

Viktor elkraĉis la cigaredstumpon sur la tapiŝon, kaj ekbruligis novan cigaredon.

*«Sed kial mi ekmaltrankviliĝis?» – pensis li. – «La fantazio ekfuriozis... Nu, infanoj, nu, akcelado, nu, disvolviĝintaj ne kongrue kun la aĝo. Ĉu mi ne vidis infanojn disvolviĝintajn tro*

*frue? Kial mi opinias ke ĉion tion ili elpensis mem? Spektadis ili diversajn kotaĵojn en la urbo, satlegis librojn, ĉion simpligis kaj, nature, venis al konkludo ke oni devas konstrui novan mondon. Kaj tute ne ĉiuj ili estas tiaj. Estas ĉe ili gvidantoj, kriuloj: Bol-Kunac... Aknulo tiu... Kaj tiu beleta knabineto. Iniciantoj. Kaj ceteraj – ordinaraj infanoj. Sidis ili, aŭskultis kaj enuis...». Li sciis ke tio ne estas vero. Nu, fakte, ili ne enuis, aŭskultis kun intereso: malgraŭ ĉio – provinco, fama verkisto... Sed nenio igus min en ilia aĝo legi miajn nunajn verkojn. Diablo prenu min se mi en ilia aĝo ekirus ien krom al kinofilmo kun pafado, kaj en migrantan cirkon, spekti femurojn de ŝnurdancistinoj. Tute indiferentaj estis al mi malnova kaj nova mondoj, absolute neniun imagon havis mi pri tio. Futbalon ĝis plena senfortiĝo, elŝraŭbi elektran lampon kaj frapi ĝin sur muron, aŭ embuski iun dandaĉon kaj purigi lian muzelon...»*

Viktor apogis sin al la brakseĝa dorso, kaj etendis la piedojn.

*«Ĉiuj ni elmemoras okazaĵojn de la feliĉa infaneco kun kortuŝo, kaj estas certaj ke de tempo de Tom Sojer estis, estas kaj estos ĝuste tiel. Devas esti. Se estas ne tiel, do la infano ne estas normala, elvokas en eksteruloj ioman kompaton, kaj ĉe senpera kunpuŝiĝo – pedagogian indignon. Sed la infano rigardas vin milde kaj pensas: vi, certe estas adolta,*

*fortega, jes, vi povas min vergi, tamen kiel vi estis stultulo de la infaneco mem, tia vi restis, ankaŭ mortos vi estiel stultulo, sed tio al vi ne sufiĉas, vi ankaŭ min volas stultigi...».*

Viktor alverŝis al si ankoraŭ ĝinon, kaj komencis elmemori kiel ĉio okazis, kaj li devis fari hastan gluton por ne ekhurli pro la honto.

*Kiel li venaĉis al tiuj ĉi geknaboj, memama, memfida stultulo, rigardanta desupre, disblovita ŝtipo, moda idioto, kiel li tuj komencis de banalaĵoj, edukstultaĵoj kaj pseŭdoheroa lispado, kaj kiel ili haltis lin, sed li ne trankviliĝis, kaj daŭrigis demonstri sian akran intelektan nesufiĉon; kiel ili honeste penis venigi lin sur bonan vojon, ili ja avertis lin, sed li daŭre diris banalaĵojn kaj trivialaĵojn, daŭre imagis ke elturniĝos li – kio ja, ankaŭ tion ili akceptos, – sed kiam, perdinte finfine la toleremon, ili ekfrapadis lian muzelon, li etanime ekploris, kaj komencis plendi ke ili malbone rilatas lin; kaj kiel honte li ekjubilis kiam ili, pro la kompato, komencis preni de li aŭtografojn...»*

Viktor ekgraŭlis, kompreninte ke pri la hodiaŭo li, malgraŭ tuta sia pena honesteco, kuraĝos rakonti al neniu kaj neniam, kaj ke post ne pli ol duonhoro li, por konservi la animan ekvilibron, ruze transformos ĉion tiel, kvazaŭ la malbonago, kiun li toleris hodiaŭ, estis plej alta triumfo en lia vivo, aŭ, ĉiuokaze, sufiĉe kutima kaj ne tro interesa renkonto

kun periferiaj mirinfanoj kiuj, – kion atendi de ili? – estas infanoj, kaj tial malbone komprenas beletron kaj vivon...

*«Oni devas sendi min en departementon de klerigado», – pensis li kun malamo – tiaj ĉiam estas bezonataj tie... Unu konsolo», – pensis li. – «Tiaj infanetoj estas dume tre malmultaj, kaj eĉ se la akcelado iros per nuna ritmo, do ĝis tempo kiam ili ekestos multaj, mi, donu Dio, bonstate jam mortos. Ĝis kiom tio estas bone, morti ĝustatempe!».*

Oni frapis je la pordo. Viktor kriis "Jes!", kaj eniris Pavor en vatigita robo, taŭza, kun ŝvelinta nazo.

– Finfine, – diris li per nazkatara voĉo, eksidis kontraŭe, elprenis grandan malsekan naztukon, kaj komencis purigi la nazon kaj terni. Kompatinda vidaĵo – nenio restis de antaŭa Pavor.

– Kio – finfine? – demandis Viktor. – Ĉu vi volas ĝinon?

– Oĥ, eĉ ne scias mi... – resonis Pavor, hihiante kaj ronkante. – Finigos min tiu ĉi urbo... R-r-rumĉiĥ! Oĥ...

– Estu sana, – diris Viktor.

Pavor ekrigardis lin per la larmantaj okuloj.

– Kien vi malaperadas? – demandis li kaprice. – Mi trifoje puŝiĝis al vi, volis preni ion por legi. Ja pereas mi, unu okupo ĉi tie – legi kaj purigi la nazon... La hotelo estas malplena, mi turnis min al la pordisto, kaj li, olda stultulo, proponis al mi telefonlibron kaj malnovajn prospektojn... "Vizitu nian

sunan urbon"... – Ĉu vi havas ion por legi?

– Malverŝajnas, – diris Viktor.

– Sed kial, diable, ja vi estas verkisto! Jes, mi komprenas, verkojn de aliuloj vi legas neniam, sed siajn verkojn vi sendube foliumas... Ĉirkaŭe nur tion diras: Banev, Banev... Kiel ĉe vi nomiĝas tio? "Morto post la tagmezo"? "Tagmezo post la morto"? Ne memoras mi...

– "Malfeliĉo venas tagmeze", – diris Viktor.

– Jen-jen. Donu legi.

– Ne donos mi. Forestas, – decide diris Viktor. – Sed, se estus, tutegale ne donus mi. Vi ĝin tutan nazmukus, kaj komprenus en ĝi nenion.

– Kial ja – ne komprenus? – indigne informiĝis Pavor. – Tie ĉe vi, onidire, el vivo de samseksemuloj, do kion eblas ne kompreni ĉi tie?

– Vi mem... – diris Viktor. – Pli bone drinku ni ĝinon. Ĉu al vi kun akvo?

Pavor ternis, grumblis, malespere pririgardis la ĉambron, retroklinis la kapon kaj denove ternis.

– Kapaĉo doloras, – plendis li. – Jen ĉi tie... Sed kie vi estis? Onidire renkontiĝis vi kun legantoj. Kun lokaj samseksemuloj.

– Pli malbone, – diris Viktor. – Mi renkontiĝis kun lokaj mirinfanoj. Ĉu vi scias kio estas infanakcelado?

– Infanakcelado? Ĉu io ligita kun antaŭtempa matureco? Aŭdis mi. Pri tio oni bruis iom da tempo, sed poste en nia departemento oni kreis komision, kaj ĝi pruvis ke tio estas rezulto de persona zorgo de sinjoro prezidento pri kreskanta generacio de leonoj kaj revuloj, do ĉio venis al siaj lokoj. Sed mi,

persone, mi scias pri kio vi parolas, vidis mi tiujn ĉi lokajn mirinfanojn. Gardu Dio de tiaj leonoj, ĉar ilia loko estas en muzeo de kuriozaĵoj.

– Ĉu eble nia loko estas en muzeo de kuriozaĵoj? – oponis Viktor.

– Eble, – konsentis Pavor. – Sed infanakcelado tute ne kulpas ĉi tie. Infanakcelado – tio estas afero biologia kaj foziologia. Kreskas pezo de novnaskitoj, poste ili elkreskas je du, proksimume, metroj, kiel ĝirafoj, kaj je dek-dua vivjaro pretas jam reproduktiĝi. Sed ĉi tie – eduksistemo. La infanoj estas tute ordinaraj, sed instruistoj ĉe ili...

– Kio – instruistoj?

– Pavor ternis. – Sed instruistoj – neordinaraj, – diris li nazkatare.

Viktor ekmemoris direktoron de la gimnazio.

– Kio neordinara estas en ĉi-lokaj instruistoj? – demandis li. – Ĉu tio ke ili piszipon forgesas fermi?

– Kiun piszipon? – demandis Pavor, mire rigardinte na Viktor. – Ĉe ili estas ja neniuj piszipoj.

– Kaj kio ankoraŭ? – demandis Viktor.

– En kiu senco?

– Kio ankoraŭ estas nekutima ĉe ili?

Pavor longe purigis la nazon, kaj Viktor drinketis la ĝinon kaj kompate rigardis lin.

– Diable, – diris Pavor, pririgardante la malsekan naztukon, – nenion, vidas mi, vi scias. – Kiel juste asertas sinjoro prezidento, ĉefa kvalito de niaj verkistoj – tio estas kronika nescio de la vivo kaj deŝiriĝo de interesoj de la nacio... Jen troviĝas vi ĉi tie jam pli ol semajno. Ĉu estis vi ie krom tavernaĉo kaj sanatorio? Ĉu konversaciis vi kun iu

krom tiu ebria bruto Kvadriga? Diablo scias kontraŭ kio oni al vi monon pagas...

– Nu bone, ĉesu, – diris Viktor. – Sufiĉas por mi ankaŭ ĵurnaloj. Jen kia kritikanto, tuta en mukoj, instruisto sen piszipo!

– Ha, ne ŝatas vi, ĉu? – diris Pavor kontentiĝe. – Do estu tiel, ĉesu mi... Rakontu kiel vi renkontadis kun la mirinfanoj.

– Ja kion rakonti, – diris Viktor, – Mirinfanoj kiel mirinfanoj...

– Sed tamen?

– Nu, venis mi. Prezentis ili al mi kelkajn demandojn. Interesajn demandojn, tute adoltajn... – Viktor silentis. – Entute, se diri honeste, ili forte draŝis min tie...

– Sed kiujn demandojn? – demandis Pavor. Li rigardis na Viktor kun sincera intereso kaj, ŝajne, kun kompato.

– Gravas ne demandoj, – suspiris Viktor. – Se diri honeste, plej konsternis min tio ke ili estas kiel adoltoj, sed ne simple kiel adoltoj, sed kiel adoltoj de alta klaso... Iu diable malsana nekonformeco...

Pavor kunsente klinadis la kapon.

– Unuvorte malbone estis al mi tie, – diris Viktor. – Malagrablas elmemori.

– Komprenas mi, – diris Pavor. – Ne vi estas unua, ne vi estas lasta. Mi devas diri al vi ke gepatroj de dek-du-jara infano estas kutime estaĵoj sufiĉe mizeraj, pezigitaj per amaso da zorgoj. Sed ĉilokaj gepatroj – tio estas io specifa. Ili memorigas al mi malfronton de okupacia armeo en regiono de aktiva partizana agado... Sed, tamen, pri kio ili de-

mandis vin?

– Nu, demandis ili kio estas progreso, – diris Viktor ĉagrene. – Sed progreso, laŭ ili – tio estas tre simple. Enpeli nin ĉiujn en rezervejojn, por ke ni ne malhelpu al ili, kaj poste, liberiĝinte, studi na Zurzmansor kaj Ŝpengler. Tia, ĉiuokaze, estas mia impreso.

– Kio ja, tio tute povas esti, – diris Pavor. – Kia pastro, tia la paroĥo... Jen vi diras akcelado, Zurzmansor... Sed ĉu vi scias kion diras pri tio la nacio?

– Kiu-kiu?

– La nacio!... Ĝi diras ke ĉiuj malfeliĉoj – pro malsekulaĉoj. La infanoj freneziĝis pro malsekulaĉoj...

– Tio ĉar en la urbo forestas judoj, – rimarkis Viktor.

Poste li elmemoris kiel la infanoj leviĝis, kiam en la halon venis la malsekulaĉo, kaj kiu vizaĝo estis ĉe Irma. – Ĉu vi tion serioze? – demandis li.

– Tio ne mi, – diris Pavor. – Tio estas voĉo de la nacio. *Vojs populi*. Katoj forkuris el la urbo, kaj infanetoj adoras malsekulaĉojn, iraĉas al ili en la leprulejon, pasigas tie tagojn kaj noktojn, obeas neniun. Ŝtelas monon de la gepatroj, kaj aĉetas librojn... Gepatroj, onidire, tre ĝojis komence ke la infanoj ne ŝiras la pantalonojn, grimpante barilojn, sed sidas trankvile hejme kaj legas librojn. Des pli ke la vetero estas malbona. Sed nun ĉiuj jam vidas al kio tio venigis, kaj kiu iniciatis ĉi tion. Nun neniu jam ĝojas. Tamen, kiel antaŭe, malsekulaĉojn oni timas, nur graŭlas post ili...

*«Voĉo de nacio», – pensis Viktor. – «Voĉo*

*de Lola kaj de sinjoro urbestro. Aŭdis ni tiun ĉi voĉon... Katoj, pluvoj, televidiloj. Sango de kristanaj beboj...»*

– Mi ne komprenas, – diris li. – Ĉu vi diras tion serioze, aŭ pro la enuo?

– Tio ne mi! – diris Pavor kortuŝe. – Tiel oni diras en la urbo.

– Kiel oni diras en la urbo estas klare al mi, sed vi mem, kion vi pensas pri tio?

Pavor levetis la ŝultrojn.

– Tempofluo, – diris li nebule. Babilado kun duono da vero. – Li alrigardis na Viktor de super la naztuko. – Ne opiniu min idioto, – diris li, – pli bone ekmemoru infanojn, kie ankoraŭ vidis vi tiajn infanojn? Aŭ, almenaŭ, tiom da tiaj infanoj?

*«Jes», – pensis Viktor, – «tiajn infanojn... Katoj tio estas katoj, sed tiu ĉi malsekulaĉo en la halo – tio ne estas kato kun duono da pluvo... Estas tia diraĵo: vizaĝo lumigita de interne. Ĝuste tia vizaĝo estis ĉe Irma, sed kiam ŝi konversacias kun mi, ŝia vizaĝo estas lumigita nur de ekstere. Kaj kun la patrino ŝi tute ne konversacias, sed tradentas ion malestime-indulgan... Sed se estas tiel, se tio estas ne stulta babilado sed vero, do tio aspektas ekstreme malpure. Kion ili volas de la infanoj? Ja ili estas homoj malsanaj, destinitaj... Kaj, entute, tio estas porkaĵo – inciti infanojn kontraŭ la gepatroj, eĉ por tiaj gepatroj kiel mi kaj Lola. Sufiĉas al ni sinjoro prezidento: nacio estas super gepatraj ligoj, Legio de Libero*

*estas via patro kaj via patrino, kaj knabo iras en proksiman stabon, kaj informas ke la patro nomis sinjoron prezidenton stranga homo, kaj ke la patrino nomis kamp-iron de Legio bankrotiga entrepreno. Kaj nun, aldone, aperas nigra malseka onklo, kaj klarigas ke via patro estas ebria sencerba bruto, kaj la patrino – stultulino kaj ĉiesulino. Supozu ni ke tio estas vero, tamen tutegale porkaĵo, ĉion tion ili devas fari ne tiel, kaj tio estas ne ilia hunda afero, ne ili respondecas pri tio, kaj neniu petas ilin okupiĝi pri tiu ĉi klerigado... Iu patologio estas tio... Se tio estas nur klerigado. Sed kio se io malpli bona? Bebo komencas balbuti pri progreso per siaj ruĝaj lipetoj, komencas diri terurajn kruelaĵojn, ne sciante kion ĝi balbutas, tamen de la infaneco mem kutimiĝante al intelekta krueleco, al plej terura krueleco kiun oni povas elpensi, kaj ili, kovrante la skvamantajn vizaĝaĉojn per nigraj tukaĉoj, staras post la muro kaj tiradas la fadenetojn... Do, sekve, estas neniu nova generacio, sed estas sama malnova kaj malpura ludo je marionetoj, kaj mi estis do duobla azeno kiam turmentiĝis hodiaŭ sur la podio... Ĝis kiom aĉa estas tiu ĉi entrepreno – nia civilizacio»...*

– ...havanta okulojn – vidu, – diris Pavor. – Oni ne enlasas nin en la leprulejon. Pikdrato, soldatoj, bone. Sed ion oni povas vidi ankaŭ ĉi tie, en la urbo. Mi vidis kiel malsekulaĉoj konversacias kun knaboj, kaj kiel kondutas ĉe tio la knaboj, kiaj

anĝeletoj ili iĝas, sed demandu lin kiel veni al la fabriko, kaj li superverŝos vin per malestimo...

*«Oni ne enlasas nin en la leprulejon», – pensis Viktor. – «Pikdrato, sed la malsekulaĉoj promenas en la urbo libere. Sed ja ne Golem elpensis tion... Jen kanajlo», – pensis li, – «patro de la nacio. Jen fiulo. Sekve ankaŭ ĉi tie – lia agado. Plej bona amiko de infanoj... Tre povas esti ke similas al tio. Sed ĉu vi scias, sinjoro prezidento, sur via loko mi penus varii viajn metodojn. Ekestis tro simple distingi vian voston de ĉiuj aliaj vostoj. Pikdrato, soldatoj, paspermesiloj – do, sinjoro prezidento; do, nepre iu aĉaĵo...»*

– Por kio, diable, la pikdrato? – demandis Viktor.

– Sed de kie mi sciu? – diris Pavor. – Neniam antaŭe estis tie pikdrato.

– Do vi estis tie?

– Kial? Ne, ne estis. Sed ne mi estas ĉi tie unua sanitara inspektisto... Tamen gravas eĉ ne la pikdrato, ĉu malmulte da pikdrato estas en la mondo! Oni senobstakle enlasas tien infanetojn, oni senobstakle ellasas de tie malsekulaĉojn, sed vin kaj min oni ne enlasos tien, – jen kio vere mirigas.

*«Ne, tio tamen ne estas ago de la prezidento», – pensis Viktor. – «Prezidento kaj lego de Zurzmansor, kaj eĉ de Banev – tio iel ne kongruas. Kaj tiu ĉi ruiniga ideologio... Se tion verkus mi, oni krucumus min. Nekomprene,*

*nekomprene... Kaj nepure. Demandu ja mi na Irma, – pensis li. – Simple demandu kaj rigardu kion ŝi faros... Cetere ankaŭ Diana devas scii ion...»*

– Vi ne aŭskultas min, ĉu? – demandis Pavor.

– Jes, pardonu, enpensiĝis mi.

– Mi diras ke ne estus mirinde se la urbo aplikus rimedojn, kaj, kiel decas, kruelajn.

– Ankaŭ mi ne mirus, – elbalbutis Viktor. – Mi ne miros eĉ se mi mem volos apliki iujn rimedojn.

Pavor leviĝis kaj venis al la fenestro.

– Jen kia vetereto, – diris li angore. – Forveturus mi de ĉi tie kiom eble plej frue... Do ĉu vi donos al mi libron aŭ ne?

– Ne estas ĉe mi libroj, – diris Viktor. – Ĉio kion mi kunveturis, ĉio en la sanatorio... Aŭskultu, sed por kio al malsekulaĉoj niaj infanoj?

Pavor levetis la ŝultrojn.

– Tio ja estas malsanaj homoj, – respondis li. – De kie ni sciu, ja ni estas sanaj.

La pordon oni frapetis, kaj eniris Golem, peza kaj malseka.

– Demandu ni na Golem, – diris Pavor. – Golem, por kio al malsekulaĉoj niaj infanoj?

– Viaj infanoj? – demandis Golem, atente pririgardante etikedon sur botelo da ĝino, – ĉu ĉe vi estas infanoj, Pavor?

– Pavor asertas, – diris Viktor, – kvazaŭ viaj malsekulaĉoj incitas urbajn infanojn kontraŭ siaj gepatroj. Kion vi scias pri tio, Golem?

– Hm, – diris Golem. – Kie ĉe vi estas puraj glasoj? Jen... Ĉu malsekulaĉoj incitas infanojn? Kio

ja... Ne ili estas unuaj, ne ili estas lastaj. – Li, ne formetante la pluvmantelon, faliĝis sur la kanapon, kaj ekflaris ĝinon en la glaso. – Kaj kial en nia tempo oni ne incitu infanojn kontraŭ la gepatroj, se oni incitas blankulojn kontraŭ nigruloj, flavulojn oni incitas kontraŭ blankuloj, kaj stultulojn – kontraŭ saĝuloj... Kio vin, propre, miras?

– Pavor asertas, – ripetis Viktor, – ke viaj malsekulaĉoj vagaĉas en la urbo kaj instruas infanojn al diversaj strangaj aferoj. Ankaŭ mi rimarkis ion similan, kvankam dume mi asertas nenion. Do mi miras al nenio kaj demandas vin: ĉu tio estas vero aŭ ne?

– Ĝis kiom mi scias, – diris Golem, – la malsekulaĉoj ĉiam havis tute liberan eniron en la urbon. Mi ne scias kion vi opinias kiam parolas pri instruo al diversaj strangaj aferoj, sed permesu al mi demandi vin, aborigenon de tiuj ĉi lokoj: ĉu estas konata al vi ludilo nomata "Kolera turbo"?

– Certe jes, – diris Viktor.

– Ĉu ĉe vi estis tia ludilo?

– Ĉe mi ne... sed ĉe knaboj, memoras mi, estis... – Viktor konfuziĝis. – Jes, vere, – diris li. – la knaboj diris ke tiun ĉi turbon donacis al ili malsekulaĉo. Ĉu vi parolas pri tio?

– Jes, ĝuste pri tio. Kaj ankaŭ pri "Veteraĵo", kaj pri "Ligna mano"...

– Pardonu, – diris Pavor, – Ĉu povas mi, ĉefurbano, ekscii pri kio parolas la aborigenoj?

– Ne, – diris Golem. Tio estas ekster via aŭtoritato.

– De kie vi scias kio eniras mian aŭtoritaton? –

demandis Pavor ofendmiene.

– Konas mi, – diris Golem. – Mi konjektas, ĉar mi volas tion... Kaj ĉesu mensogi, ja vi marĉandis de Teddi na "veteraĵo", kaj bonege scias kio estas tio.

– Iru al diablo, – diris Pavor kaprice. – Mi ne pri "veteraĵo"...

– Momenton, Pavor, – senpacience diris Viktor. – Golem, vi ne respondis al mia demando.

– Ĉu? Sed al mi, – diris Golem, – ŝajnis ke respondis... Vidu, Viktor, malsekulaĉoj estas profunde kaj senespere malsanaj homoj. Tio estas terura afero: genetika malsano. Tamen ili, dum tio, konservas bonanimecon kaj saĝon, do oni ne devas ofendi ilin.

– Sed kiu ofendas ilin?

– Ĉu vi ne ofendas ilin?

– Dume ne. Dume eĉ inverse.

– Nu, tiam ĉio estas en ordo, – diris Golem kaj leviĝis. – Tiam veturu ni.

Viktor elstreĉis la okulojn. – Kien veturu ni?

– En la sanatorion. Mi veturas en la sanatorion, vi, mi vidas, ankaŭ intencas viziti ĝin, sed vi, Pavor, enkuŝu la liton. Sufiĉas disvastigi gripon.

Viktor ekrigardis la horloĝon.

– Ĉu ne estas tro frue? – demandis li.

– Laŭdezire. Sed sciu ke de hodiaŭa tago oni nuligis la busojn. Pro foresto de profito.

– Ĉu eble ni antaŭe tagmanĝu?

– Laŭdezire, – ripetis Golem. – Mi neniam tagmanĝas. Kaj al vi ne rekomendas.

Viktor palpis sian ventron.

– Jes, – diris li. Poste li alrigardis na Pavor. – Pli bone veturu mi.

– Ĉu tio koncernas min? – diris Pavor. Li estis ofendita. – Nur librojn alveturigu.

– Nepre, – promesis Viktor, kaj komencis vestiĝi.

Kiam ili engrimpis la aŭton, sub la malsekan krudtolon, en la malsekan karoserion, fetorantan per tabako, benzino kaj medikamentoj, Golem diris:

– Ĉu vi komprenas aludojn?

– Iam, – diris Viktor. – Kiam mi scias ke tio estas aludoj. Sed kio?

– Jen kio, turnu vian atenton – aludo: ĉesu babilaĉi.

– Hm, – murmuris Viktor. – Kaj kiel vi ordonas kompreni tion?

– Estiel aludon. Ĉesu babilaĉi.

– Plezure, – diris Viktor, kaj eksilentis pensante.

Ili traveturis la urbon, preteris la konservaĵan fabrikon kaj senhoman urban parkon – senprizorgan, duonputrintan pro la malsekeco, preterhastis la stadionon, kie striigitaj pro la koto "Fratoj je racio" persiste batadis ŝvelitajn pilkojn per siaj ŝvelitaj futbalbotetoj, kaj ekruliĝis sur ŝoseo gvidanta al la sanatorio. Ĉirkaŭe, post la pluvstrioj, vastiĝis malseka stepo, glata kiel tablo, iam seka, forbruligita, pika, kaj nun poiome transformiĝanta je dronigeblan marĉon.

– Via aludo, – diris Viktor, – memorigis al mi unu el la konversacioj kun lia ekscelenco sinjoro referendario de sinjoro prezidento pri ŝtata ideolo-

gio... Lia ekscelenco vokis min en sian modestan kabineton: tridek je dudek, kaj informiĝis: "Viktuar, ĉu vi volas kiel antaŭe havi pecon da pano kun butero?". Mi, nature, respondis pozitive. "Tiam ĉesu tintadi!" – elkriis lia ekscelenco, kaj forlasis min per la mansigno.

– Golem smajletis. – Sed per kio vi, fakte, tintadis?

– Lia ekscelenco aludis miajn ekzercojn kun banĝo en junularaj kluboj.

Golem strabe alrigardis lin per dionfermitaj okuloj. – Kial vi, propre, tiel certas ke mi ne estas spiono?

– Sed mi ne estas certa pri tio, – oponis Viktor. – Simple kraĉas mi pri tio. Krom tio oni ne diras nun "spiono". "Spiono", tio estas arĥaikaĵo. Ĉiuj kulturaj homoj diras nun "pego".

– Mi ne sentas diferencon, – diris Golem.

– Ankaŭ mi, praktike, – diris Viktor. – Do ne babilu mi. Ĉu via paciento resaniĝis?

– Miaj pacientoj neniam resaniĝas.

– Vi havas bonegan reputacion. Sed mi demandas vin pri tiu malfeliĉulo kiu trafis en kaptilon. Kio pri lia piedo?

– Golem silentetis, kaj poste diris:

– Pri kiu el ili vi parolas?

– Mi ne komprenas, – diris Viktor. – Pri tiu, nature, kiu trafis en kaptilon.

– Ili estis kvaropaj, – diris Golem, rigardante la vojon. – Unu trafis en la kaptilon, duan vi portis sur via dorso, trian mi forveturis per la aŭto, kaj pro la kvara vi, antaŭnelonge, iniciatis aĉan interbatiĝon

en la restoracio.

Viktor konsterniĝe silentis. Ankaŭ Golem silentis. Li tre lerte stiris la aŭton, ĉirkaŭveturante multnombrajn kavetojn sur la malnova asfalto.

– Nu, nu, ne streĉiĝu tiel, – diris li fine. – Mi ŝercis. Li estis unuopa. Kaj lia piedo resaniĝis samnokte.

– Ĉu ankaŭ tio estas ŝerco? – Informiĝis Viktor. – Ĥa-ĥa-ĥa, nun mi komprenas kial viaj pacientoj neniam resaniĝas.

– Miaj pacientoj, – diris Golem, – neniam resaniĝas pro du kaŭzoj. Unue mi, same al ĉiu honesta kuracisto, ne scipovas kuraci genetikajn malsanojn. Kaj, due, ili ne volas resaniĝi.

– Amuze, – murmuris Viktor, – mi jam tiom aŭdis pri tiuj malsekulaĉoj, ke, je Dio, mi pretas jam kredi pri ĉio: kaj pri pluvoj, kaj pri katoj, kaj pri tio ke dispecigita osto povas resaniĝi dum unu nokto.

– Pri katoj? – demandis Golem.

– Jes, – diris Viktor. – Kial en la urbo ekforestis katoj? Malsekulaĉoj kulpas. Teddi pro musoj suferas... Estus bone se vi konsilus al la malsekulaĉoj forkonduki el la urbo ankaŭ musojn.

– Ĉu same al ratkaptisto el Hameleno? – diris Golem.

– Jes, – facilanime diris Viktor. – Ĝuste tiel. – Poste li elmemoris kiel finiĝis historio pri ratkaptisto el Hameleno. – En tio estas nenio ridinda, – diris li. – Hodiaŭ mi elpaŝis en la gimnazio, vidis la infanetojn. Kaj mi vidis kiel ili renkontis iun malsekulaĉon. Nun mi neniom miros se iutage sur ĉefan placon de

la urbo venos malsekulaĉo kun akordiono, kaj forkondukos ien la infanetojn.

– Vi ne miros, – diris Golem. – Kaj kion ankoraŭ vi faros?

– Mi ne scias... Eble forprenos de li la akordionon.

– Kaj ludos vi mem?

– Jes, – suspiris Viktor, – tio veras. Mi havas nenion por allogi ilin, tion mi komprenis. Interese, per kio ili allogas? Vi ja scias, Golem.

– Viktuar, ĉesu tintadi, diris Golem.

– Laŭdezire, – diris Viktor. – Vi tre pene kaj plimalpli lerte deflankiĝas de miaj demandoj. Mi remarkis tion. Stulte. Tutegale mi ekscios, sed vi perdos eblecon doni profitan por vi emocian koloron al tiu ĉi informo.

– Konservo de medicina sekreto! – diris Golem. – Kaj, krom tio, mi scias nenion. Mi povas nur konjekti.

Li bremsetis. Antaŭe, post vualo de la pluvo, aperis iuj figuroj starantaj sur la vojo. Tri grizaj figuroj kaj griza voja fosto kun montriloj: "Leprulejo – 6 km." kaj "San. 'Varmaj fontoj' – 2.5 km". La figuroj surpaŝis la vojrandon: adolta viro kaj du infanoj.

– Haltu, – diris Viktor, tuj raŭkiĝinte.

– Kio okazis? – Golem bremsis.

Viktor ne respondis. Li rigardis homojn ĉe la fosto, altan malsekulaĉon en sporta kostumo, saturita per akvo; knabon, kiu ankaŭ estis sen pluvmantelo, en malsekiĝinta kostumo kaj en sandaloj; kaj la knabinon, nudpiedan, en la robo, gluiĝinta al ŝia

korpo. Poste li bate malfermis la pordeton, kaj elsaltis sur la vojon.

Pluvo kaj vento ekfrapis lian vizaĝon, li eĉ sufokiĝis, sed ne rimarkis tion. Li eksentis paroksismon de netolerebla furiozo, kiam aperas deziro rompi ĉion, kiam oni ankoraŭ konscias ke intencas fari stultaĵojn, sed tiu ĉi penso nur gajigas. Sur la neflekseblaj gamboj li kontakte venis la malsekulaĉon.

– Kio okazas ĉi tie? – elpremis li tra la dentoj. Kaj poste al la knabino, rigardanta lin mire: Irma, tuj iru en la aŭton! – Kaj poste denove al la malsekulaĉo: – Diablo vin prenu, kion vi faras? – Kaj denove al Irma: – Irma, tuj en la aŭton, ĉu vi aŭdas?!

Irma ne moviĝis de la loko. Ĉiuj tri staris, kiel antaŭe, okuloj de la malsekulaĉo palpebrumetis super la nigra tuko. Poste Irma diris kun nekomprena intonacio: "Tio estas mia patro", kaj li subite komprenis, per la spina mjelo eksentis ke ĉi tie oni ne kriaĉu kaj ne batminacu, ne kaptu je la kolumo kaj ne tiru... Kaj entute ne furiozu. Li diris tre trankvile:

– Irma, iru en la aŭton, vi tuta malsekiĝis. Bol-Kunac, sur via loko ankaŭ mi irus en la aŭton.

Li estis certa ke Irma obeos, kaj ŝi obeis. Ne tute tiel kiel li volus. Ne, ŝi eĉ ne per la rigardo petis de la malsekulaĉo permeson foriri, sed ĉe li restis ombro de impreso ke io okazis, iu interŝanĝo per opinioj, iu mallonga konsiliĝo, rezulte de kiu la problemo estis solvita pozitive al li. Irma suprenigis la nazon, kaj direktiĝis al la aŭto, kaj Bol-Kunac

diris ĝentile:

– Mi dankas vin, sinjoro Banev, sed vere, pli bone mi restu.

– Laŭdezire, – diris Viktor. Bol-Kunac ne tro maltrankvilis lin. Nun estis necese diri ion adiaŭe al tiu ĉi malsekulaĉo. Viktor antaŭsciis ke tio estos io sufiĉe stulta, sed kion fari? – li ne povis simple foriri. El pure prestiĝa vidpunkto. Kaj li diris:

– Vin, estimata sinjoro, – diris li aroge, – mi ne invitas. Vi, ŝajne, sentas vin ĉi tie kiel fiŝo en akvo.

Poste li turniĝis kaj, forĵetinte imagitan ganton, ekiris for.

*«Prononcinte tiujn ĉi vortojn» – kun abomeno pensis li, – «la grafo digne mal-proksimiĝis...».*

Irma, engrimpinte kun la piedoj sur la antaŭan sidlokon, elpremis la harplektaĵetojn. Viktor grimpis la malantaŭan, grakante pro la honto. Kaj kiam Golem ekveturigis la aŭton, li diris:

– Prononcinte tiujn ĉi vortojn la grafo mal-proksimiĝis... Enŝovu ĉi tien la krurojn, Irma, mi masaĝos ilin.

– Por kio? – scivole demandis Irma.

– Ĉu vi volas ricevi pulm-inflamon? Metu ĉi tien la krurojn!

– Bonvolu, – diris Irma kaj, turniĝinte sur la sidloko, etendis al li unu piedon.

Antaŭgustumante ke jen li faros, finfine, ion naturan kaj utilan, Viktor prenis per la ambaŭ manoj tiun ĉi magran knabinan kruron, malsekan kaj kortuŝan, kaj ekintencis masaĝi ĝin – ĝis ruĝa

koloro, per la bonaj severaj patraj manoj, tiun ĉi malpuran, ostecan glacieton, ĉiaman kondukilon de nazkataroj, gripoj, kataroj de spiraj vojoj kaj duflankaj pneŭmonitoj, – kiam trovis ke liaj manplatoj estas malpli varmaj ol ŝiaj piedoj. Laŭ inercio li faris kelkajn masaĝmovojn, kaj poste delikate lasis la piedon.

*«Sed mi ja sciis tion», – ekpensis li subite, – «mi sciis tion eĉ kiam mi staris antaŭ ili, sciis ke ĉi tie estas iu insido, ke al la infanoj minacas nenio, neniuj kataroj kaj pulminflamoj, tamen mi volis ne tion, mi volis savi, elŝiri ŝin el la ungoj, juste koleri, plenumi sian devon, sed denove mi okazis trompita; mi ne scias kiel ili faras tion, sed ili denove trompis min, kaj mi denove estas stultulaĉo, jam duan fojon en tiu ĉi tago...»*

– Forprenu la piedon, – diris li al Irma.

Irma forprenis la piedon kaj demandis:

– Ni kien, ĉu en la sanatorion veturas?

– Jes, – respondis Viktor, kaj ekrigardis na Golem: ĉu rumarkis li la malhonoron. Golem senemocie rigardis la vojon, peze disfluinte sur la ŝofora sidloko, griza, malpureta, ĝibeta kaj ĉionscianta.

– Sed por kio? – demandis Irma.

– Alivestiĝos vi je seka, kaj kuŝos en liton, – diris Viktor.

– Jen kio! – diris Irma. Kion ja vi elpensis!

– Bone, bone... – murmuris Viktor, – Mi donos al vi libron, kaj vi legos.

*«Vere, je kiu diablo mi veturigas ŝin tien?» – ekpensis li. – «Diana... Nu, tion ni vidu. Neniujn drinkadojn, kaj tute nenion tian, sed kiel mi reveturigos ŝin? Diable, prenu mi ies ajn aŭton, kaj forveturigu... Estus bone gluti nun ion».*

– Golem... – komencis li, sed tuj rememoris. Diablo, ne eblas, maloportunas.

– Jes? – diris Golem, ne turniĝante.

– Ne, nenio, – suspiris Viktor, fiksrigardante gorĝeton de boteleto, elstaranta el pluvmantela poŝo de Golem.

– Irma, – diris li lace. – Kion vi faris tie, sur tiu vojkruciĝo?

– Ni pensis nebulon, – respondis Irma.

– Kion?

– Ni pensis nebulon, – ripetis Irma.

– Pri nebulo, – korektis Viktor.

– Por kio – pri nebulo? – diris Irma.

– Pensi estas netransitiva verbo, – klarigis Viktor. – Ĝi postulas prepozicion. Ĉu vi lernis jam transitivajn verbojn?

– Tio dependas, – diris Irma. – Pensi nebulon – tio estas unu afero, kaj pensi pri nebulo, – tio estas io tute alia... Kaj kiu bezonas tion: pensi pri nebulo, ne estas sciate.

Viktor elprenis cigaredon kaj ekfumis.

– Momenton, – diris li. – Pensi nebulon – tiel oni ne diras, tio estas malkleraĵo. Ekzistas tiaj verboj, netransitivaj: pensi, kuri, iri. Ili ĉiam postulas prepozicion. Iri sur strato. Pensi pri... io...

– Pensi stultaĵojn... – diris Golem.

– Nu, tio estas escepto, – diris Viktor, iom konsterniĝinte.

– Iri rapide, – diris Golem.

– Rapide – tio ne estas substantivo, – ekscite diris Viktor. – Ne konfuzu la infanon, Golem.

– Patro, ĉu vi povas ne fumi? – informiĝis Irma.

Ŝajnas ke Golem eligis iun sonon, sed eblas ke tio la motoro ternis ĉe la ascendo. Viktor ĉifis la cigaredon kaj distretis ĝin per la kalkanumo. Ili leviĝis al la sanatorio, kaj de flanko, el la stepo, renkonten al la pluvo tiriĝis kompakta blanketa muro.

– Jen nebulo al vi, – diris Viktor. – Vi povas pensi ĝin. Kaj ankaŭ flari, kuri kaj iri.

Irma volis diri ion, sed Golem interrompis ŝin.

– Interalie, – diris li,– verbo "pensi" agas kiel transitiva ankaŭ en subordigitaj frazoj. Ekzemple: mi pensas ke... Kaj tiel plu.

– Tio estas tute alia afero, – oponis Viktor. La konversacio jam tedis al li. Li tre volis fumi kaj drinki. Li volupte rigardetis gorĝeton de la botelo.

– Ĉu vi ne sentas malvarmon, Irma? – demandis li kun espero.

– Ne. Kaj vi?

– Malvarmetas, – konfesis Viktor.

– Necesas drinki ĝinon, – rimarkis Golem.

– Jes, ne malbonus... Ĉu vi havas?

– Havas, – diris Golem. – Sed ni jam preskaŭ venis.

La ĵipo enruliĝis la pordegon, kaj komenciĝis tio pri kio Viktor ial ne pensis. Unuaj stri-fluoj da nebulo nur komencis penetri tra kradoj de la barilo, do

videblo estis bonega. Sur la alporda vojeto kuŝis korpo en malsekiĝinta piĵamo, kuŝis tielaspekte, kvazaŭ ĝi troviĝis ĉi tie jam multajn tagojn kaj noktojn. Golem singarde preterveturis ĝin, preteris gipsan vazon, plibeligitan per ne tro decaj desegnoj kaj konvenaj surskriboj, kaj aliĝis al grego da aŭtoj, amasiĝintaj antaŭ pordoj de la dekstra alo. Irma ĵete malfermis la pordeton, kaj tuj iu drinkulaĉa muzelo elŝoviĝis el fenestro de plej proksima aŭto kaj elblekis:

– Infaneto, ĉu vi volas ke mi fordonu min al vi?

Viktor, rigidiĝante, ekis elgrimpi eksteren. Irma scivole ĉirkaŭrigardis. Viktor forte prenis ŝin je la mano, kaj ekkondukis al la eniro. Sur la ŝtupetoj, sub la pluvo, sidis du virinaĉoj en subvestoj, kaj per strataj voĉoj kantis pri la kruela apotekisto: li ne donas heroinon. Vidinte na Viktor ili eksilentis, sed kiam li preteriris, unu el ili penis kapti lin je la krurumo. Viktor enpuŝis na Irma en la vestiblon. Ĉi tie estis mallume, la fenestroj estis kurtenitaj, fetoris tabakfumo kaj iu acid-aĉaĵo, kraketadis projekcia aparato, kaj sur la blanka muro saltadis pornografiaj bildoj. Viktor, kunpreminte la dentojn, paŝis sur ies piedoj, trenante post si stumblantan Irma. Post ili aŭdiĝis koleraj maldecaĵoj. Ili elgrimpis el la vestiblo, kaj Viktor ekpaŝis triŝtupe sur la tapiŝita ŝtuparo. Irma silentis, kaj li ne kuraĝis rigardi ŝin. Sur la ŝtuparplaceto jam atendis lin, disvastiginte la brakoj, Rosŝeper Kant, blua kaj disblovita ano de la parlamento.

– Viktuar, – elraŭkis li. – A-amiko! – tiam li rimarkis na Irma kaj raviĝis: – Viktuar! Kaj ankaŭ

vi!... kun la et-jarulinoj!..

Viktor fermis la okulojn, forte surpaŝis lian piedon, kaj puŝis lin je la brusto. Rosŝeper falis retren, faliginte rubujon. Kovriĝinte per ŝvito Viktor ekiris sur la koridoro. Irma per neaŭdeblaj saltoj kuregis apude. Li puŝis pordon de Diana, – la pordo estis fermita, la ŝlosilo forestis. Li freneze ekfrapadis, kaj Diana senprokraste ekreagis:

– Iru al diabla patrino! – kriegis ŝi furioze. – Impotento fetoranta! Fekaĵo hunda!

– Diana! – elbojis Viktor – malfermu!

Diana eksilentis, kaj la pordo malfermiĝis. Ŝi staris sur la sojlo, armita per la ombrelo. Viktor depuŝis ŝin, enpuŝis na Irma en la ĉambron, kaj batfermis post si la pordon.

– Ha, tio estas vi, – diris Diana. – Mi pensis ke denove Rosŝeper, – ŝi odoris per alkoholo. – Dio! – diris ŝi. – Kiun vi alkondukis?

– Tio estas mia filino, – pene diris Viktor. – Ŝia nomo estas Irma. Irma, tio estas Diana.

Li fikse rigardis na Diana kun timo kaj espero. Dank al Dio ŝi, ŝajne, ne estas ebria. Aŭ tuj sobriĝis.

– Vi freneziĝis, – diris ŝi mallaŭte.

– Ŝi malsekiĝis, – diris li. – Alivestu ŝin en sekan, enlitigu... Kaj entute...

– Mi ne kuŝos, – deklaris Irma.

– Irma, – diris Viktor. – Bonvolu obei, alie mi vergu nun iun...

– Iun ajn oni devus vergi ĉi tie, – diris Diana senespere.

– Diana, – diris Viktor. – Mi helpos al vi.

– Bone, – diris Diana. – Iru al vi. Ordiĝos ni.

Viktor eliris kun grandega malpeziĝo. Li direktiĝis rekte en sian ĉambron, sed ankaŭ tie li ne trovis trankvilon. Antaŭ ĉio li devis forĵeti en la koridoron langvoriĝintan, tute nekonatan pareton, kaj la malpurigitajn tolaĵojn. Poste li ekfumis, ŝlosis la pordon, falis sur la nekovritan matracon, kaj komencis pensi kion ja li pe-faraĉis.

## Ĉapitro sepa

Sekvonttage Viktor vekiĝis malfrue, venis jam tempo tagmanĝi, la kapo doloretis, sed la humoro, neatendite, estis bona. Hieraŭ vespere, li pe-fumis pakaĵeton da cigaredoj, malleviĝis, per ina harpinglo malfermis ies aŭton, elkondukis na Irma tra la ofica elirejo, kaj forveturis ŝin al la patrino. Komence ili veturis silente. Li konvulsiis pro la malagrablegaj travivaĵoj, sed Irma sidis apude, pureta, kun laŭmoda hararanĝo – sen la harplektaĵoj, – kaj, ŝajne, eĉ kun ruĝigitaj lipoj. Li tre volis komenci konversacion, tamen necesus komenci de konfeso pri sia senlima stulteco, kio ŝajnis al li nepedagogia. Finiĝis per tio ke Irma, subite, permesis al li fumi (kondiĉe ke ĉiuj fenestroj estu malfermitaj), kaj komencis rakonti kiel interese estis al ŝi, kiel tio similas al tio pri kio ŝi legis antaŭe, sed ne tre kredis; kia li estas bravulo ke ordigis al ŝi tiun ĉi neatenditan kaj altgrade instruan aventuron, ke li, entute, estas sufiĉe bona, ne enuigas, kaj ne babilas stultaĵojn, ke Diana estas "preskaŭ nia", ĉiujn ŝi malamas, bedaŭrindas nur ke ĉe ŝi estas malmulte da scioj, kaj ke ŝi tro ŝatas drinki, sed tio finfine ne

estas terure, ĉar ankaŭ vi ŝatas drinki, sed al la geknaboj vi ekplaĉis, ĉar parolis vi honeste, sen ŝajnigi ke vi estas gardanto de iu supera scio, kaj ĝuste, ĉar vi tute ne estas iu ajn gardanto, kaj eĉ Bol-Kunac diris ke en la urbo vi estas sola valora homo, certe se ne kalkuli doktoron Golem, sed Golem, fakte, neniel rilatas al la urbo, kaj, krome, li ne estas verkisto, ne esprimas ideologion, kaj kion vi opinias, ĉu estas bezonata ideologio, aŭ pli bone sen ĝi, nun multaj opinias pri senideologia estonto...

Rezultiĝis bonega konversacio, la konversaciantoj estis plenaj per estimo de unu al la alia, kaj reveninte en la hotelon (la aŭton li enpelis en iun fatrasplenan korton), Viktor jam opiniis ke patreco estas ne tro sendanka okupo, precipe se oni komprenas vivon, kaj scias eluzi eĉ ombrajn ĝiajn flankojn por edukaj celoj. Tiukaŭze li drinkis kun Teddi, kiu ankaŭ estas patro, kaj ankaŭ interesiĝas pri edukado, ĉar lia unuanaskito estas jam dekkvar-jarulo – "malfacila rompa aĝo – vi ankoraŭ ploros pro via filino..." Fakte tio estis aĝo de lia unua nepo, sed pri eduko de la filo li ne okupiĝis, ĉar la filo pasigis la infanecon en germana koncentrejo.

"Oni ne batu infanojn", – asertis Teddi. – "Ankaŭ sen vi batados ilin ĉiu kiu ne estas maldiligenta, kaj se vi volos bati la infanon, frapu prefere sian vizaĝaĉon, tio estos pli utile".

Tamen post iu glaseto Viktor elmemoris ke Irma eĉ ne per unu vorto diris pri lia sovaĝa konduto ĉe la vojkruciĝo, kaj li venis al konkludo ke la knabino

estas ruza, kaj ke entute ne estas honeste uzi ĉiufoje helpon de la amorantino, kiam ne estas sciate kiel elgrimpi el malfacila stato en kiun li enpelis sin mem. Tiuj ĉi meditoj ĉagrenis lin, sed tiam venis doktoro R.Kvadriga, kaj mendis sian kutiman botelon da rumo, kaj ili eldrinkis tiun ĉi botelon, post kio ĉio denove ekaspektis irize, ĉar ekestis klare ke Irma simple ne volis ĉagreni lin, kaj tio signifas ke ŝi estimas la patron, kaj, eble, eĉ ŝatas... Poste venis ankoraŭ iu kaj mendis ankoraŭ ion. Poste, verŝajne, Viktor ekiris dormi... Tamen konserviĝis memoro: kahela planko, tute verŝita per akvo. Sed ne eblis elmemori kiu planko kaj kiu akvo estis tio. Kaj ne bezonatas tio...

Ordiginte sin Viktor malleviĝis, prenis ĉe la akceptisto freŝajn ĵurnalojn, kaj konversaciis kun li pri la malbenita vetero.

– Kiel mi hieraŭ? – demandis li malzorge. – Ĉu en ordo?

– Entute ne malbone, – diris la akceptisto ĝentile. – Teddi transdonos al vi la konton.

– Ha, – diris Viktor kaj, decidinte precizigi nenion, ekiris en la restoracion.

Al li ekŝajnis ke en la halo estas jam malpli da starlampoj.

– Diable, – ektimis li.

Teddi ankoraŭ forestis. Viktor kapklinis al juna homo kun okulvitroj, kaj al ties kunulo, eksidis ĉe sia tableto, kaj malfermis la ĵurnalon. En la mondo ĉio statis same. Unu regno haltigis komercajn ŝipojn de la alia, kaj tiu alia regno sendis memorandojn. Regnoj, kiuj plaĉis al sinjoro prezidento, militis jus-

tajn militojn por bono de siaj nacioj kaj demokratioj. Regnoj kiuj ial ne plaĉis al sinjoro prezidento, militis uzurpe, kaj eĉ ne militis sed simple okazigis bandecajn malicajn agresojn. Kaj sinjoro prezidento mem dum du horoj parolis pri neceso unufoje kaj por ĉiam neniigi koruptadon, kaj estis bonorde operaciita pri forigo de adenoidoj. Konata al li kritikisto – granda kanajlo, – laŭdegis novan libron de Rec-Tusov, kaj tio estis enigme, ĉar la libro okazis bona...

Venis kelnero, iu nova, nekonata, amikece rekomendis preni ostrojn, akceptis la mendon, svingis la tuketon super la tableto, kaj malproksimiĝis. Viktor demetis la ĵurnalojn, ekfumis, kaj, lokiĝinte pli oportune, komencis pensi pri la laboro... Post bona drinkado li ĉiam plezure pensis pri la laboro.

*Estus bone verki optimisman gajan novelon... Pri unu homo, pri tio kiel li vivas, ŝatas sian laboron, ne stultulo, ŝatas siajn amikojn, kaj la amikoj aprezas lin, kaj pri tio kiel bone estas al li – simpatia tia homo, strangeta, spritulo... Forestas temo. Kaj se forestas temo, do enue. Kaj, entute, se verki tiun ĉi novelon, necesas kompreni kial al tiu ĉi bona homo estas bone, kaj senevite tio venigos al konkludo ke estas bone al li nur pro tio ke ĉe li estas ŝatata laboro, kaj ĉio alia estas indiferenta al li. Sed tiam ĉu vere li estas bona homo se ĉio indiferentas al li krom la ŝatata laboro?... Eblas, certe, verki pri bona homo, vivsenco de kiu estas amo al la proksimuloj,*

*kaj tial estas bone al li ke li ŝatas la proksimulojn, kaj ŝatas sian laboron, sed pri tiu homo jam estas verkite antaŭ paro da miljaroj far sinjoroj Luko, Mateo, Johano, kaj ankoraŭ iu, entute kvaropo. Fakte ili estis signife pli multnombraj, sed nur tiu kvaropo verkis konforme, ceteraj estis senigitaj iu pri la nacia sinkonscio, iu pri korespondrajto... Kaj homo, pri kiu ili verkis, estis, bedaŭrinde, duonfreneza... Sed, entute, estus interese verki kiel Kristo venas sur la teron hodiaŭ. Ne tiel kiel verkis Dostojevskij, sed tiel kiel verkis tiuj Luko kaj la kompanio... Kristo venas en la ĝeneralan stabon, kaj proponas: amu vi proksimulojn. Kaj tie, certe, sidas iu judofobo...*

– Ĉu vi permesas, sinjoro Banev? – murmuris super li agrabla vira voĉo.

Tio estis sinjoro urbestro mem. Ne tiu apopleksie-purpura virporko, ronkanta pro la nesana plezuro sur vasta kuŝejo de sinjoro Rosŝeper, sed elegante-rondeta, ideale razita kaj senriproĉe vestita impona viro kun modesta ordena rubandeto, kaj kun ŝildeto de Legio de Libero sur la maldekstra ŝultro.

– Mi petas vin, – diris Viktor sen iu ajn ĝojo.

Sinjoro urbestro eksidis, ĉirkaŭrigardis, kaj metis la manojn sur la tablon.

– Mi penos ne pezigi vin longe per sia ĉeesto, sinjoro Banev, – diris li. – Kaj penos ne malplezurigi al vi la manĝadon; tamen la problemo, kiun mi intencas prezenti al vi, maturiĝis jam sufiĉe por ke ĉiuj ni, kaj grandaj kaj etaj, al kiuj estas karaj hon-

oro kaj prospero de nia urbo, estu pretaj prokrasti ĉiujn niajn aferojn por ĝia plej rapida kaj plej efektiva solvo.

– Mi aŭskultas vin, – diris Viktor.

– Ni renkontiĝas ĉi tie kun vi, sinjoro Banev, en medio pli proksima al neoficiala, ĉar mi, konsiderante vian okupitecon, ne riskas maltrankviligi vin en horoj de via laboro, precipe konsiderante specifaĵon de ĝi. Tamen mi rilatas nun al vi estiel persono oficiala, de mi persone, kaj de la urbo entute...

La kelnero alportis ostrojn kaj botelon da blanka vino. La urbestro per levo de la fingro haltis lin.

– Amiko mia, – diris li, – duonporcion da kitĉigana sturgo kaj pokaleton da menta. La sturgon sen saŭco... Do, mi daŭrigas, – diris li, denove turniĝinte al Viktor. – Mi timas, tamen, ke nian konversacion estos malfacile nomi ĉetabla, ĉar temos en ĝi pri aĵoj kaj cirkonstancoj ne nur malgajaj, sed eĉ, mi dirus, ne apetitaj. Mi intencis konversacii kun vi pri tiel nomataj malsekulaĉoj, pri tiu maligna tumoro kiu ne unuan jam jaron korodas nian malfeliĉan distrikton.

– Jes-jes, – diris Viktor. Al li ekestis interese.

La urbestro prononcis nelaŭtan, bone pripensitan kaj stilistike perfektan parolaĵon. Li rakontis pri tio ke antaŭ dudek jaroj, tuj post la okupacio, en Ĉevala valeto estis kreita leprulejo, karantena koncentrejo por personoj suferantaj pri tiel nomata flava lepro aŭ okulvitra malsano. Fakte tiu ĉi malsano, kio estas bone konata al sinjoro Banev, aperis en nia lando eĉ en nememorebla jam tempo, kaj dum tio, kion montras specialaj esploroj, precipe ofte ĝi

trafis ial loĝantojn de ĝuste nia distrikto. Tamen nur dank al penoj de sinjoro prezidento, sur tiun ĉi malsanon estis turnita atento plej serioza, kaj nur pro lia persona edikto la malfeliĉuloj, senigitaj pri medicina prizorgo, disĵetitaj antaŭe en la tuta regno, subiĝintaj nemalofte al nejustaj persekutoj de flanko de aliaj tavoloj de la loĝantaro, kaj de la okupantoj – eĉ al rekta ekstermo, tiuj malfeliĉuloj estis finfine kunveturigitaj en unu lokon, kaj ricevis eblecon de tolerebla ekzisto, koncerna al ilia stato. Ĉio tio elvokas neniujn oponojn, kaj la menciitaj rimedoj povas esti nur bonvenigitaj. Tamen, kio iam okazas ĉe ni, tiuj ĉi plej bonaj kaj noblaj agoj turniĝis kontraŭ ni. Ne serĉu ni nun kulpulojn. Ne esploru ni agadon de sinjoro Golem, agadon eble sinoferan, sed venigintan tamen, kiel nun evidentiĝis, plej malagrablajn rezultojn. Ne okupiĝu ni ankaŭ pri antaŭtempa kritikado, kvankam pozicio de iuj, sufiĉe altaj instancoj, persiste ignorantaj niajn protestojn, al ni persone prezentiĝas enigma. Transiru ni al faktoj.

La urbestro pe-drinkis pokaleton da menta, bonguste postmanĝis per la sturgo, kaj lia voĉo ekestis eĉ pli velura – estis tute neeble imagi ke li aplikas kontraŭhomajn kaptilojn. Li multvorte esprimis deziron ne atentigi sinjoron Banev pri la onidiroj, kaptintaj la urbon, kiuj, li devas rekte konfesi, estas rezulto de nesufiĉe unuanima kaj preciza plenumo de ediktoj de sinjoro prezidento per ĉiuj niveloj de la administraro: ni konsideras ekstreme disvastigitan opinion pri fatala rolo de tiel nomataj malsekulaĉoj en abrupta ŝanĝo de la klimato, pri ilia

respondeco en pligrandigita kvanto da abortaĵoj, kaj procento da sterilaj geedziĝoj, pri totala foriro de kelkaj hejmaj bestoj, kaj pri apero de aparta speco de hejma cimo, – pli precize, – de cimo fluganta...

– Sinjoro urbestro, – suspire diris Viktor. – Mi devas konfesi ke estas ekstreme malfacile al mi sekvi viajn longajn periodojn. Parolu ni simple, kiel bonaj filoj de la nacio. Ne parolu ni pri kio ni ne parolu, sed parolu pri kio ni jes parolu.

La urbestro ĉirkaŭrigardis lin per la rapida rigardo, ion prikalkulis, ion komparis, diablo scias kion li tie komparis, sed, verŝajne, utilis ĉio – kaj tio ke Viktor drinkadis kun Rosŝeper, kaj tio ke li entute drinkadis, brue kaj vaste, je la tuta regno, kaj tio ke Irma estas mirinfano, kaj tio ke ekzistas Diana, kaj, verŝajne, multajn aliajn aferojn, – do ĝentlemaneco ĉe sinjoro urbestro signife malpliiĝis, kaj li kriis doni pokaleton da konjako. Ankaŭ Viktor kriis doni pokaleton da konjako. La urbestro kurte elridis, ĉirkaŭrigardis la malpleniĝintan jam halon, leĝere frapetis la tablon per la pugno, kaj diris:

– Bone, kial ni zigzagu. Loĝi en nia urbo ekestis neeble, diru dankon al via Golem. Parenteze, ĉu vi scias ke Golem estas kaŝa komunisto?... Jes, jes, mi certigas vin, estas materialoj... Li sur fadeneto pendas, via Golem... Do mi diras: oni aperte malĉastigas infanojn. Tiuj infektuloj penetris la lernejon, kaj plene difektis la infanetojn... voĉdonantoj malkontentas, iuj lasas la urbon, disvastiĝas ekscitiĝo, povas okazi eĉ linĉoj. La distrikta administraro senagas, jen kia stato. – Li pe-drinkis la pokaleton. – Devas mi diri al vi ke mi tiel malamas

tiujn ĉi fiulojn ke eĉ per la dentoj ŝirus ilin, sed vomos mi. Vi ne kredos, sinjoro Banev, venis ĝis tio ke kaptilojn mi metas kontraŭ ili... Nu, malĉastigis ili la infanojn, bone. Infanoj estas infanoj, kiom oni malĉastigu ilin, – al ili ne sufiĉas. Sed komprenu vi mian staton. Tiuj ĉi pluvoj, malgraŭ ĉio, estas ilia laboro. Ne scias mi kiel tio okazas ĉe ili, sed estas tiel. Konstruis ni sanatorion, kuracaj akvoj, luksa klimato, monon oni per ŝovelilo amasigu. Ĉi tien oni eĉ el la ĉefurbo veturis, kaj per kio finiĝis tio? Pluvo, nebuloj, ĉe klientoj – nazkataro, poste eĉ pli malbone: venis ĉi tien konata fizikisto... forgesis mi lian nomon, sed vi verŝajne konas... Loĝis li ĉi tie du semajnoj – prete: okulvitra malsano, en leprulejon lin. Beleta reklamo por la sanatorio! Poste ankoraŭ unu okazo, poste alia, kaj fino – klientojn tio fortranĉis kiel per tranĉilo. La restoracio brulas, la hotelo brulas, la sanatorio apenaŭ spiras. – Dank al Dio eltroviĝis stultulo – trejnisto, venigis li ĉi tien siajn "Fratoj je racio". Trejnas li altkvalitan teamon por ludi en pluvaj landoj... Ankaŭ sinjoro Rosŝeper, certe, helpas iugrade... Ĉu vi kunsentas min? Penis mi interkonsenti kun tiu ĉi Golem – senrezulte, ruĝa estas ruĝa. Skribis mi supren – neniuj rezultoj. Pli alte – oni respondas ke akceptis la informon kaj transdonis soben, laŭ la instancoj... Malamas mi ilin, sed venkis mi min, ekveturis en la leprulejon. Enlasis. Petis mi, pruvis... Ĝis kiom aĉas la uloj! Palpebrumas ili per senharaj siaj palpebroj kiel sur iun paseron, kvazaŭ forestas mi ĉi tie.... – Li kliniĝis al Viktor kaj flustris: – Ribelon mi timas, sango verŝiĝos. Ĉu vi kunsentas min?

– Jes, – diris Viktor. – Sed kiel tio koncernas min?

La urbestro apogis sin je dorso de la brakseĝo, elprenis el aluminia ujo komencitan cigaredon. Ekfumis.

– En mia stato, – diris li, – restas nur tio: premi ĉiujn levilojn. Bezonatas publikeco. La urbestraro verkis peticion en departementon de sanprotekto. Sinjoro Rosŝeper subskribos; vi, mi esperas, ankaŭ, sed tio ne estas io decida. Bezonatas publikeco! Bezonatas bona artikolo en ĉefurba ĵurnalo, subskribita per konata nomo. Per via nomo, sinjoro Banev. Kaj la materialo estas aktualega – ĝuste por tia tribunuso estiel vi. Mi tre petas. Kaj de mi persone, kaj de la urbestraro, kaj de malfeliĉaj gepatroj... Ni devas obteni ke la leprulejon oni forprenu de ĉi tie al diabla avino. Kien ajn, por ke eĉ spuro de malsekulaĉoj forestu ĉi tie, de infektuloj ĉi tiuj. Jen kion mi intencis diri al vi.

– Jes-jes, mi komprenas, – diris Viktor malrapide. – Mi tre bone komprenas vin.

*«Kvankam vi estas bruto», – pensis li, – «Kvankam vi estas virporko, sed kompreni vin eblas. Tamen kio okazas pri malsekulaĉoj? Estis ili trankvilaj, kurbiĝintaj, kaŝiradis pretere, nenion tion oni ne diris pri ili, sed diris oni ke kvazaŭ odoraĉas ili, kvazaŭ infektuloj ili estas, kvazaŭ perfekte faras ili ludilojn kaj entute diversajn aĵojn el ligno... Patrino de Fred diris, memoras mi, ke malic-okulaj estas ili, ke lakto pro ili fermentiĝas, kaj ke venigos ili militon al ni, epidemion kaj malsaton... Kaj nun sidas ili*

*post pikdrato, kaj kion ili faras tie? Oĥ, ial tro multe ili faras. Kaj veteron ili faras, kaj infanojn ili forlogas (por kio?), kaj katojn ili elurbigis (ankaŭ – por kio?), kaj cimoj ĉe ili ekflugadis...»*

– Vi, verŝajne, opinias ke ni sidas farante nenion, – diris la urbestro. – Neniokaze. Sed kion ni povas? Mi preparas juĝaferon kontraŭ Golem. Sinjoro sanitara inspektisto Pavor Summan konsentas esti konsilisto. Ni insistos pri tio ke demando pri infekteco de la malsano ankoraŭ ne estas solvita, kaj Golem, estiel kaŝa komunisto, eluzas tion. Tio estas unue. Poste, ni penas respondi al la teroro per teroro. La urba Legio, nia fiero, buboj kolektiĝis fortegaj, agloj... Sed ial tio estas ne tio. Ja ne venas instrukcioj de supre... La polico okazas en malprivilegia situacio... kaj entute... Do ni kontraŭagas laŭeble. Prokrastas ni kargojn kiuj iras al ili... la privatajn certe, ne provianton kaj ne lit-tolaĵojn, sed librojn diversajn, ili mendas milte da ili... Jen ankaŭ hodiaŭ haltis ni kamionon, kaj iom malpeziĝis la animo. Sed tio estas malgravaĵoj, pro la angoro, sed bezonatas io pli radikala...

– Tiel, – diris Viktor. – Agloj, do, oraj. Kiel oni nomas lin... Ĉu Flamenda?... Ja tiu, nevo...

– Flamin Juventa, – diris la urbestro. – Ĝuste tiel – mia anstataŭanto pri la Legio, aglo! Ĉu vi jam konas lin?

– Konas iomete, – diris Viktor. – Sed por kio vi librojn haltigas?

– Kial por kio... Certe stultaĵo estas tio, sed ĉiuj ni estas ne pli ol homoj, – akumuliĝas ja. Kaj, krom

tio... – La urbestro ĝene eksmajlis. – Absurdo, certe, sed estas onidiroj kvazaŭ ili ne povas sen libroj... Kiel normalaj homoj sen manĝo kaj cetere.

Venis silento. Viktor sen apetito fosis la bifstekon kaj meditis:

*«Malmulte mi scias pri malsekulaĉoj, kaj tio kion mi scias elvokas en mi neniun simpation al ili. Eble pro tio ke mi ne tro ŝatis ilin de la infaneco. Sed la urbestron kaj lian bandon mi scias bone – graso kaj ŝinko de la nacio, prezidentaj proksimulaĉoj... pogromuloj... Jes, se vi kontraŭ malsekulaĉoj, do en ili estas io... Tamen, de alia flanko, eblas verki la artikolon, eĉ plej senbridan, ĉar tutegale neniu riskos publikigi min, sed la urbestro estus kontenta, kaj ricevus mi de li flokon da lano, kaj povus mi vivi ĉi tie tre prospere... Kiu el veraj verkistoj povas fanfaroni ke li vivas prospere? Eblus establiĝi ĉi tie, ricevi profitan loketon, ekesti iu inspektisto pri urbaj plaĝoj, kaj verki trankvilege... pri tio kiel bona estas vivo de bona homo, kiun entuziasmigas la ŝatata laboro... Kaj elpaŝi pri tiu ĉi temo antaŭ mirinfanoj... Temas fakte pri tio ke oni lernu viŝi sin. Oni kraĉis vian vizaĝaĉon, kaj vi viŝiĝas. Komence viŝiĝas vi honte, poste embarase, kaj poste, vidu, komencos vi viŝi vin digne, kaj eĉ ricevi plezuron de tiu ĉi procezo...»*

– Ni, certe, nenikaze rapidigas vin, – diris la urbestro. – Vi estas homo okupata kaj tiel plu. Ion en kadroj de semajno, ĉu? Ni prezentos al vi ĉiujn

materialojn, povas prezenti eĉ skemeton, planeton pri la deziraĵoj... Kaj vi tuŝos per la sperta mano, kaj ĉio ekludos. Kaj subskribus la artikolon tre elstaraj filoj de nia urbo: ano de la parlamento Rosŝeper Kant, fama verkisto Banev, kaj ŝtata laŭreato doktoro Rem Kvadriga...

*«Bonege laboras li», – pensis Viktor. – «Sed ĉe ni, ĉe maldekstruloj, tia persisto tute forestas. Oni balbutus, ĉirkaŭirus, – por ne ofendi la homon, ne apliki al li superfluan premon, por ke, gardu Dio, oni ne suspektu memprofitan celon... Elstaraj filoj!... Ja li, kanajlo, estas tute certa ke la artikolon mi verkos kaj subskribos, ke elturniĝi mi ne povas, kaj ke estos vi devigata, malfavora Banev, levi la manetojn, kaj ŝvite perlabori sian kvietan troviĝadon en la intima urbeto... Jen ankaŭ pri la skemeto li enigis... konas mi kio estas tiu skemeto, kaj kia devas esti tia skemeto por ke na Banev, ŝprucitan per la prezidenta salivo, ankaŭ nun oni publikigu. Je-es, sinjoro Banev... Ŝatas vi konjaketon, knabinojn, lampridojn marinitajn kun cepo, do ŝatu vi ankaŭ pripagi tion...».*

Mi pripensos vian proponon, – diris li smajlante. – La koncepto prezentiĝas al mi sufiĉe interesa, sed la plenumo postulos ioman streĉon de la konscienco. Vi ja scias ke ni, verkistoj, estas popolo ne subaĉetebla, agas ni ekskluzive laŭ postulo de la konscienco. – Li aĉe, maldece okulumis al la urbestro.

La urbestro kurte ekridis.

– Certe! "Konscienco de la nacio, preciza spegulo" kaj tiel plu... Ja memoras mi... – Li denove kliniĝis al Viktor kvazaŭ konspire. – Mi petas vin morgaŭ al mi, – elmurmuris li. – Ekskluzive niaj venos, sed, petas mi, sen edzinoj, ĉu?

– Sed ĉi tie, – diris Viktor, eкstarante, mi estas devigata rekte kaj decide deflankigi vian proponon. Min atendas la aferoj. – Li denove maldecece okulumis. – Sanatorio.

Ili disiĝis preskaŭ amike. Verkisto Banev estis enlistigita en anojn de la urba elito, kaj por ordigi la nervojn, skuitajn per tiu ĉi honoro, li devis lekdrinki pokalon da konjako tuj kiam dorso de la urbestro malaperis post la pordo.

*«Eblas, certe, forveturi al diabla patrino de ĉi tie» – pensis li. – «Eksterlanden oni min ne ellasos, kaj ne volas mi eksterlanden, kion mi faros tie – ĉie estas samo. Sed ankaŭ en nia lando troviĝas pli ol deko da lokoj kie eblas kaŝiĝi kaj ĝisatendi». Li imagis sunan lokon, fagajn boskojn, ebriigan aeron, silentemajn kamparanojn, odorojn de lakto kaj mielo... kaj de sterko, kaj kuloj... Kaj kiel fetoras elĉerpa kavo, kaj enuego, ĉiutaga enuego... Antikvaj televidiloj kaj loka intelektularo: vigleta pastro-inŝatanto, kaj drinkulo instruisto... Jes, estas, entute, kien veturi. Ja ili volas ĝuste tion... Por ke forveturu, malaperu, engrimpu mi teran neston, kaj mem, sen devigo, ĉar ekzili min estas klopode, aperos bruo, konversacioj... kaj jen kio prblemas: ili estos tre kontentaj – forveturis, ŝtopiĝis, ĉesis*

*tintadi...»*

Viktor kvitiĝis, leviĝis en sian ĉambron, vestis la pluvmantelon, kaj eliris sub la pluvon. Subite li tre ekvolis denove ekvidi na Irma, konversacii kun ŝi pri progreso, klarigi al ŝi kial li tiel multe drinkas, (kaj vere, kial mi tiel multe drinkas?), kaj, eble, Bol-Kunac okazos tie, sed Lola certe forestos...

La stratoj estis malsekaj, humidaj, malplenaj, en apuddomaj terenoj silente pereadis pomarboj, pro la humideco. Viktor unuan fojon rimarkis ke iuj domoj estas najlitaj. La urbeto, tamen, forte ŝanĝiĝis – kliniĝis bariloj, sub fenestroj elkreskis blanka ŝimo, senkoloriĝis farboj, kaj sur stratoj totale regis pluvo. Pluvo falis simple, pluvo kribriĝis de tegmentoj per eta akva polvo, pluvo kolektiĝis en trablovoj per blankaj nebulaj fostoj, treniĝantaj de muro al muro, pluvo kun muĝo fluegis el koroditaj pluvtuboj, pluvo disverŝiĝis sur pavimoj kaj kuris inter pavimŝtonoj, en tralavitaj fluejoj. Nigre-grizaj nuboj malrapide rampis super la tegmentoj mem. Homo estis nevokita gasto sur la stratoj, do pluvo ne indulgis lin.

Viktor venis sur la urban placon, kaj ekvidis homojn. Ili staris sub alero sur perono de la polica administrejo – du policistoj en uniformaj pluvmanteloj, kaj eta malpurigita bubo en oleigita kombineo. Antaŭ la perono, – per livaj radoj sur la trotuaro – staris malgracia kamiono kun tola kovraĵo. Unu el la policistoj estis policestro; eliginte la fortegan makzelon li rigardis flanken, kaj la bubeto, furioze gestante, pruvis al li ion per la plora voĉo. Alia policisto ankaŭ silentis kun malkontenta aspekto,

kaj suĉis la cigaredon. Viktor proksimiĝis al ili, kaj de distanco je malpli ol dudek paŝoj li komencis aŭdi kion diras la bubo. La bubo kriis:

– Sed kiel tio koncernas min? Ĉu mi rompis la regulojn? Ne, ne rompis. Ĉu paperoj ĉe mi enordas? Enordas. La ŝarĝo estas ĝusta, jen la fakturo. Kio ja, ĉu mi unuan fojon veturas ĉi tien?

La policestro rimarkis na Viktor, kaj lia vizaĝo akceptis ekstreme malsimpatian esprimon. Li deturniĝis kaj, kvazaŭ li ne vidas la bubeton, diris al la policisto:

– Tiel do, ĉi tie vi staru. Observu ke ĉio estu en ordo. En la kajuton ne engrimpu, alie oni disŝtelos ĉion. Kaj al neniu permesu proksimiĝi al la aŭto. Ĉu vi komprenis?

– Komprenis, – diris la policisto. Li estis tre malkontenta.

La policestro malleviĝis de la perono, ensidis sian aŭton, kaj forveturis. La malpurigita ŝofereto kraĉis kolere kaj rilatis al Viktor:

– Nu eĉ vi diru, kulpas mi aŭ ne?

Viktor haltetis, kaj la bubon tio entuziasmigis.

– Veturas mi normale. Transportas mi librojn en la zonon. Milfoje transportis mi. Sed nun, jen kiel, oni haltas min kaj ordonas veturi en policejon. Kial? Ĉu mi rompis trafikregulojn? Ne rompis. Ĉu la paperoj malordas? Enordas, jen la fakturo. La licencon oni forprenis, por ke mi ne forkuru. Sed kien mi forkuru?

– Sufiĉas kriaĉi, – diris la policisto.

La bubo vigle turniĝis al li.

– Do kion mi faris? Diru, ĉu mi superis la rapi-

decon? Ne superis. Ja estos monpunata mi pro la prokrasto. Kaj jen oni la dokumenton forprenis.

– Oni evidentigos, – diris la policisto. – Vere, kial vi ĉagrenas? Iru en la tavernon, ne vi estas respondeculo.

– Jen estrare-etoj! – kriis la bubo, svinge vestante la vizierĉapon sur sian vilan kapon. – Nenie estas vero! Memprofite veturas mi – oni haltas, laŭleĝe veturas, – oni denove haltas, – li intencis malleviĝi de la perono, sed haltis kaj diris pete al la policisto: – Eble vi monpunon prenu, aŭ iel alie?

– Iru, iru, – diris la policisto.

– Sed al mi oni premion promesis pro la urĝeco! La tutan nokton mi hastis.

– Iru, mi diras! – ripetis la policisto.

La bubo denove sputis, venis al sia aŭto, dufoje kalcitris la antaŭan pneŭon, poste subite ĝibetiĝis kaj, enŝovinte la manojn en la poŝojn, ekimpetis trans la placon.

La policisto rigardetis na Viktor, rigardetis la kamionon, rigardetis la ĉielon, lia cigaredo estingiĝis, li elsputis la stumpon kaj, demetante dum la iro la kapuĉon, foriris en la polican administrejon.

Viktor staris iome, poste malrapide ekmoviĝis ĉirkaŭ la kamiono. La kamiono estis grandega, potenca, sur tiaj oni veturigis ise motorizitan infanterion. Viktor ĉirkaŭrigardis.

Je kelkaj metroj antaŭ la kamiono staris kaj malsekiĝis sub la pluvo polica motorciklo, turninte flanken la antaŭan radon; aliaj maŝinoj forestis proksime.

*«Certe ili atingos min», – pensis Viktor, –*

*«sed halti min ili sendube ne sukcesos».*

Al li ekestis gaje.

*«Diable», – pensis li: – «fama verkisto Banev, denove ebriiĝinta, forveturigis, por distriĝi, malpropran aŭton. Feliĉe la okazaĵo pasis sen viktimoj...».*

Li komprenis ke ĉio statas ne tiel simple, ke tio estas li kiu prezentas al regantoj bonaspektan okazon enprizonigi la maltrankviligan homon, sed li ne volis pensi, li volis obei la impulson.

*«Ekstremokaze verkos mi la artikolon al la serpentaĉo», – pensis li.*

Li rapide malfermis la pordeton, kaj eksidis ĉe la stirilo. La ŝlosilo forestis, do ekestis necese forŝiri dratojn de la sparkado kaj kunigi ilin. Kiam la motoro jam ekfunkciis, Viktor, antaŭ ol fermi la pordeton, ekrigardis malantaŭen, sur peronon de la polica administrejo. Tie staris sama policisto kun same malkontenta mieno sur la vizaĝo, kaj kun cigaredo sur la lipo. Estis evidente ke li vidas ĉion, sed komprenas nenion.

Viktor frape fermis la pordeton, akurate surveturis la pavimon, ŝanĝis la rapidumon, kaj ĵetiĝis en plej proksiman straton. Estis tre bone hasti sur malplenaj, sendube malplenaj stratoj, suprenigante per la radoj akvofalojn de profundaj flakoj, turnadi tutkorpe la malfacilan stirilon, – preter la konservaĵa fabriko, preter la parko, preter la stadiono, kie "Fratoj je racio" kiel malsekaj mekanikaĵoj senĉese

piedbatis siajn pilkojn, kaj daŭre sur la ŝoseo, saltante sur la sidaĵo pro la kavoj, kaj aŭdante kiel ĉiufoje peze frapiĝas en la ŝarĝujo la malbone alligita ŝarĝo.

En speguleto de malantaŭa vido persekuto ne videblis, kaj malverŝajnis ke eblas tiel rapide rimarki ĝin post tia pluvo. Viktor sentis sin tre juna, tre bezonata al iu, kaj eĉ ebria. De plafono de la kajuto lin okulumis belulinoj, eltranĉitaj el revuoj, kaj en la gantujo li trovis paketon da cigaredoj, kaj estis al li tiel bone ke li preskaŭ preterveturis la vojkruciĝon, sed ĝustatempe bremsetis, kaj turniĝis laŭ montrilo "Leprulejo – 6 km". Ĉi tie li eksentis sin eltrovanto, ĉar neniam antaŭe li veturis aŭ paŝadis sur tiu ĉi vojo. Kaj la vojo okazis bona, ne simila al municipa ŝoseo: komence tre glata prizorgita asfalto, kaj poste eĉ betonaĵo, kaj kiam li ekvidis la betonaĵon, li tuj ekmemoris pikdraton kaj soldatojn, kaj post kvin minutoj li ekvidis ĉion ĉi tion.

Unu-linia pikdrata barilo tiriĝis ambaŭflanke de la betonaĵo, kaj malaperis post la pluvo. La vojon baris alta pordego kun garda budo, pordo de la budo estis ovrita, kaj sur la sojlo staris jam soldato en kasko, botoj kaj pluvmantelo, el kiu elŝoviĝis tubo de la mitraleto. Ankoraŭ unu soldato, sen kasko, rigardis el la fenestreto.

"Ĝis nun neniam estis mi en koncentrejoj" – kantis Viktor, – "sed vi ne diru vane: dank al Dio".

Viktor lasis la akcelilon, kaj bremsis antaŭ la pordego. La soldato eliris el la gardejo kaj alvenis lin – juneta tia soldateto, lentuga, ne pli ol dek-okjara.

– Saluton, – diris li. – kial vi malfruiĝis tiel?

– Tiaj jen cirkonstancoj, – diris Viktor, mirante al tia liberalismo.

La soldateto ĉirkaŭrigardis lin kaj subite streĉiĝis.

– Viajn dokumentojn, – diris li seke.

– Kiuj ja dokumentoj, – diris Viktor gaje. – Ja diras mi – cirkonstancoj!

La soldato kunpremis la lipojn.

– Kion vi altransportis? – demandis li.

– Librojn, – diris Viktor.

– Ĉu estas enirpermeso?

– Certe ne!

– Ha, – diris la soldato, kaj lia vizaĝo sereniĝis. – Jen kial, ja vidas mi... Tiam atendu. Tiam vi devos atendi.

– Sed sciu, – diris Viktor, levinte la montran fingron, – povas okazi ke mi estas persekutata.

– Ne gravas, mi rapide, – diris la soldato kaj, altenante sur la brusto la mitraleton, ekfrapis per la botoj al la gardejo.

Viktor elgrimpis el la kajuto kaj, starante sur la ŝtupeto, ekrigardis malantaŭen. Post la pluvo videblis nenio. Tiam li revenis al la stirilo, kaj ekfumis. Estis sufiĉe krepuske. Antaŭe, post la pikdrato kaj post la pordego, ankaŭ turniĝis nebulo, diveniĝis iuj malhelaj konstruaĵoj – ĉu domoj, ĉu barakoj, ne eblis distingi tion konkrete.

*«Ĉu vere ili ne invitos rigardi?» – pensis Viktor. – «Tio estos porkaĵo se ili ne invitos. Eblas, fakte, peti na Golem, nun li estas ie ĉi tie... Tiel mi faros», – pensis li. – «Ja ne vane*

*mi heroadis...»*

La soldateto denove eliris el la gardejo, kaj post li – malnova konatulo, alta akna knabo-nihilisto, en nura kalsoneto, tre gaja nun, sen iu ajn spuro de tutmonda angoro. Devancante la soldaton li sur-saltis la ŝtupeton, enrigardis la kajuton, rekonis, aĥis, ekridis.

– Saluton, sinjoro Banev! Ĉu tio estas vi? Jen kiel bone... Ja vi la librojn altransportis, ĉu? Sed ni atendas, atendas...

– Nu kio, ĉu ĉio estas en ordo? – demandis la alveninta soldateto.

– Jes, tio estas nia maŝino.

– Tiam enigu ĝin, – diris la soldateto. – Kaj vi, sinjoro, devos eliri kaj atendi.

– Mi volus vidi doktoron Golem, – diris Viktor.

– Eblas voki lin ĉi tien, – proponis la soldateto.

– Hm, – diris Viktor, kaj esprime alrigardis la knabon.

La knabo kulpe disigis la manojn.

– Ĉe vi enirpermesilo forestas, – klarigis li. – Kaj sen la permesilo ili enlasas neniun. Ni estus ja ĝojaj...

Restis nenio alia ol elgrimpi sub la pluvon. Vik-tor sursaltis la vojon kaj, levinte la kapuĉon, rigardis kiel ovriĝis la pordego, la kamiono ŝiriĝis, kaj puŝmove ekrampis post la barilon. Poste la pordego fermiĝis. Tra bruo de la pluvo Viktor iom da tempo aŭdis hurlon de la motoro, siblon de la brem-silo, poste ekaŭdeblis nenio krom susuro kaj plaŭ-dado.

*«Jen kiel» – pensis Viktor. – «Kaj mi?»*

Li eksentis disiluziiĝon. Nur nun li komprenis ke okazigis siajn heroaĵojn ne senprofite, ke li esperis multon ekvidi kaj multon kompreni... Penetri, tiel dirite, en epicentron.

*«Do al diablo ilin», – pensis li. Li rigardis la betonvojon. Ĝis la vojkruciĝo ses kilometroj, kaj de la vojkruciĝo ĝis la urbo preskaŭ dudek. Eblas, certe, de la vojkruciĝo ĝis la sanatorio – du kilometroj. Porkoj sendankaj... Sub la pluvo... Ĉi tie li rimarkis ke la pluvo malpliiĝis. «Ankaŭ pro tio dankon», – pensis li.*

– Do ĉu voki al vi sinjoron Golem? – demandis la soldato.

– Na Golem? – Viktor vigliĝis.

Entute estus nemalbone irigi la maljunulaĉon sub la pluvo ĉi tien kaj reen, krom tio ĉe li estas aŭto. Kaj la botelo.

– Kial ne, elvoku.

– Tio eblas, – diris la soldateto. – Elvoku ni. Sed malverŝajnas ke li eliros, nepre diros li ke estas okupata.

– Ne gravas, – diris Viktor. – Vi diru al li ke Banev vokas.

– Banev? Bone, mi diros. Tamen tutegale li ne eliros. Sed al mi ne estas malfacile. Banev do... – kaj la soldateto foriris, simpatia tia soldateto, karesema, tute lentuga sub la kasko.

Viktor ekfumis cigaredon, kaj tiam ekaŭdiĝis

krakado de motorcikla motoro. El la nebula vualo frenezrapide elsaltis motorciklo kun kromĉaro, alflugis kontakte la pordegon, kaj haltis. En la selo sidis sama policisto kun malkontenta vizaĝo, kaj en la kromĉaro sidis ankoraŭ unu, ĝis okuloj volvita en krudtolon.

*«Komenciĝas», – ekpensis Viktor, pli alŝovante la kapuĉon. Sed tio ne helpis.*

Policisto kun malkontenta vizaĝo degrimpis de la motorciklo, venis al Viktor kaj elbojis:

– Kie estas la kamiono?

– Kiu kamiono? – mire demandis Viktor, por gajni tempon.

– Sed vi ne ŝajnigu, – kriaĉis la policisto. – Mi vidis vin! Vi estos juĝata! Forveturigo de arestita maŝino!

– Vi ne kriaĉu min, – oponis Viktor digne. – Kial vi vulgaras? Mi plendos.

Dua policisto, devolvante dum la iro la krudtolaĵon, venis kaj demandis:

– Ĉu tiu?

– Certe tiu! – diris la policisto kun malkontenta vizaĝo, elprenante el la poŝo mankatenojn.

– No-no-no, diris Viktor, retropaŝante. – Tio estas arbitreco. Kial vi aŭdacas?

– Ne pligrandigu vian kulpon per la kontraŭstaro, – konsilis la dua policisto.

– Sed mi pri nenio kulpas, – impertinente deklaris Viktor, kaj ŝovis la manojn en la poŝojn. – Vi misdistingas min, knaboj.

– Vi forveturigis kamionon, – diris la dua poli-

cisto.

– Kiun kamionon? – kriis Viktor. – Pri kiu kamiono vi parolas? Mi venis ĉi tien gasti ĉe sinjoro Golem, ĉefkuracisto. Demandu la gardistojn. Kiel rilatas iu kamiono?

– Eble ne tiu? – dubis la dua policisto.

– Kial ne tiu? – oponis policisto kun malkontenta vizaĝo. Tenante la mankatenojn li iris al Viktor.

– Nu, donu la manojn! – diris li afereme.

Sammomente pordo de la gardejo frapiĝis, kaj alta penetra voĉo elkriis:

– Ĉesu la kuniĝon!

Viktor kaj la policistoj ektremis. Sur sojlo de la gardejo staris la lentuga soldateto, elŝovinte el sub la pluvmantelo sian mitraleton.

– Deiru de la pordego! – penetre elkriis li.

– Vi tie, silenton! – diris policisto kun malkontenta vizaĝo. – Ĉi tie estas polico.

– Kuniĝo ĉe pordego de la speciala zono je pli ol unu ekstera homo estas malpermesata! Post la tria averto mi pafas! Foriru de la pordego.

– Foriru, foriru, – zorgeme diris Viktor, puŝetante brustojn de la ambaŭ policistoj.

Policisto kun malkontenta vizaĝo konsterne rigardis lin, deigis lian manon, kaj paŝis al la soldato.

– Aŭskultu, bubo, ĉu vi freneziĝis? – diris li. – Tiu ĉi ulo ŝtele forveturigis kamionon...

– Neniuj kamionoj! – tire kaj orelbore elkriaĉis la simpatia karesema soldateto. – La-asta averto! Duopo foriru je cent metroj de la pordego!

– Aŭskultu, Roĥ, – diris la dua policisto. Deiru ni, je Dio. Nenien li malaperos de ni.

Policisto kun malkontenta vizaĝo, ruĝa pro la indigno, preskaŭ malfermis la buŝon, sed tiam en pordo de la gardejo aperis dika serĝento kun ĉirkaŭmordita sandviĉo en unu mano, kaj kun glaso en la alia.

– Soldato Ĝura, – diris li maĉante, – kial vi ne pafadas?

Sur la lentuga vizaĝo, sub la kasko, aperis esprimo de bestiĝo. La policistoj ĵetiĝis al la motorciklo, eksidis ĝin, turniĝis, kaj preter Viktor, kiu akceptis pozon de trafikregulisto, ĵetiĝis for. Ruĝvizaĝa policisto elkriis al li ion neaŭdeblan pro krakado de la motoro. Forveturinte je kvindek paŝoj ili haltis.

– Proksime, – diris la serĝento malaprobe. – Kial vi rigardas? Ja estas proksime.

– Pli malproksimen! – penetre kriaĉis la soldateto, svingante la mitraleton.

La policistoj forveturis plien, kaj ekestis nevideblaj.

– Kutimiĝis eksteruloj ĉe la pordego amasiĝi, – informis la serĝento la soldateton, rigardante na Viktor. – Nu, en ordo, daŭrigu la servadon.

Li revenis en la gardejon, kaj la lentuga soldateto, poiome malvarmiĝante, kelkfoje iris tienreen antaŭ la pordego. Atendinte kelkajn minutojn Viktor singarde informiĝis:

– Mi petas pardonon, kio pri doktoro Golem?

– Forestas li, – elgrumblis la soldateto.

– Tre bedaŭrinde, – diris Viktor. – Do tiam foriru mi, ĉu?

Li ekrigardis la nebulon kaj pluvon, kie kaŝiĝis la policistoj.

– Kiel tiel – foriru? – maltrankvile diris la soldateto.

– Kio, ĉu ne permesatas?

– Kial ne permesatas, – diris la soldateto. – Mi pri la kamiono. Se vi foriros, do kio pri la kamiono? Oni devas forveturigi kamionon de la pordego.

– Sed kiel mi rilatas al tio? – demandis Viktor, eĉ pli maltrankvile.

– Kiel tiel – rilatas? Vi alkondukis ĝin, do vi ĝin... tio. Ja ĉiam estas tiel, kiel alie?

*«Diable», – pensis Viktor. – «kion mi faru pri ĝi?»...*

De cent-metra distanco aŭdiĝis krakado de la motorcikla motoro, laboranta surloke.

– Ĉu vi vere elkaptis ĝin? – demandis la soldateto scivole.

– Jes, certe! Polico haltigis la ŝoforon, kaj mi, stultulo, decidis helpi...

– Je-es, – kunsente eltiris la soldateto. – Eĉ ne scias mi kion konsili al vi.

– Kaj kio se mi, ekzemple, ekiru nun? – flateme demandis Viktor. – Ĉu vi ne pafos?

– Ne scias mi, – honeste konfesis la soldateto. – Ŝajne ne estas devigo fari tion. Ĉu mi demandu?

– Demandu, – diris Viktor, – meditante ĉu sukcesos li forkuri al distanco de nevidebleco aŭ ne.

Ĉi-momente post la pordego ekaŭdiĝis hupo. La pordego vaste malfermiĝis, kaj el la zono malrapide elruliĝis la malbonŝanca tolkovrita kamiono. Ĝi

haltis apud Viktor. La pordeto malfermiĝis, kaj Viktor ekvidis ke ĉe la stirilo sidas jam ne knabo, kiel li atendis, sed kalva ĝibeta malsekulaĉo kiu rigardas lin. Viktor ne moviĝis de la loko, kaj tiam la malsekulaĉo demetis de la stirilo la manon en nigra ganto, kaj invite frapetadis la sidlokon apud si.

*«Bonvolis degni ili», – amare ekpensis Viktor.*

La soldateto ĝoje diris:

– Jen kiel bone, ordiĝis ja ĉio, do veturu vi, je Dio.

Ĉe Viktor preterbrilis penso ke se la malsekulaĉo intencas mem veturigi la kamionon en la urbon aŭ kien li volas, unuvorte se li intencas mem okupiĝi pri la polico, tial estus bone tuj adiaŭi kaj hasti rekte tra la kampo en la sanatorion, for de la embuskanta motorciklo.

– Tie antaŭe estas polico, – diris Viktor al la malsekulaĉo.

– Ne gravas, sidu, – diris la malsekulaĉo.

– Temas pri tio ke mi ŝtelis tiun ĉi arestitan kamionon.

– Mi scias, – tolere diris la malsekulaĉo. – Sidu.

La momento ekestis perdita. Viktor ĝentile kaj tutkore adiaŭis la soldateton, engrimpis la sidlokon, kaj batfermis la pordeton. La kamiono ekmoviĝis, kaj post minuto ili ekvidis la motorciklon. Ĝi staris transverse, la ambaŭ policistoj staris apude kaj faris gestojn. – al la vojrando. La malsekulaĉo bremsis, malŝaltis la motoron kaj, elŝoviĝinte el la kajuto, diris:

– Forprenu la motorciklon, vi baris la vojon.

– Ek al la vojrando! – ordonis policisto kun malkontenta vizaĝo. – Kaj prezentu la dokumentojn.

– Mi veturas en la polican administrejon, – diris la malsekulaĉo. – Eble ni konversaciu tie?

La policisto iom konsterniĝis kaj elgrumblis ion similan al "konas ni vin". La malsekulaĉo trankvile atendis.

– Bone, diris fine la policisto. – Sed aŭton stiros mi, kaj tiu transiru en la motorciklon.

– Bonvolu, sed, se eblas, en motorciklo veturu mi, – konsentis la malsekulaĉo.

– Eĉ pli bone, – elgrumblis policisto kun malkontenta vizaĝo. Lia vizaĝo eĉ sereniĝis. – El-grimpu.

Ili interŝanĝis la lokojn. La policisto, malice rigardinte na Viktor, komencis ŝoviĝi kaj kurbiĝi sur la sidloko, ordigante la pluvmantelon, kaj Viktor, strabe rigardante la policiston, spektis kiel la malsekulaĉo, eĉ pli ĝibetante kaj mispaŝante, simila de la dorso grandegan malgrasan simion, iras al la motorciklo kaj engrimpas la kromĉaron. La pluvo denove ekverŝegis kiel el sitelo, tial la policisto funkciigis la glac-viŝilon. La transportiloj ekmoviĝis.

*«Volus mi scii per kio tio ĉi finiĝos», – kun ioma maltrankvilo pensis Viktor.*

Neklaran esperon, tamen, donis intenco de la malsekulaĉo prezentiĝi en la polica administrejo.

*«Arogantiĝis nuna malsekulaĉaro, imperti-nentiĝis... Sed monpunon oni ĉiuokaze deŝiros*

*de mi, tion mi ne evitos. Ne povas okazi ke polico preterlasos eblecon deŝiri de homo monpunon. Tamen kraĉas mi pri tio, malgraŭ ĉio devas mi malaperi de ĉi tie. Ĉio statas bone. Almenaŭ plezurigis mi mian animon...»*

Li eltiris skatoleton da cigaredoj, kaj proponis ĝin al la policisto. La policisto indigne gruntis, sed prenis. La bruligilo ĉe li ne funkciis, do li devis ankoraŭfoje grunti, kiam Viktor proponis la sian.

*Entute oni povis kompreni lin, tiun ĉi nejunan viron, kvardek-kvin-jaran, verŝajne, kiu ĝis nun estas nur malaltranga policisto, eble el iamaj fi-kunlaborantoj: ne tiujn prizonigis kaj ne tiun pugon lekis, sed kiel li distingu la pugojn – ĉu tia ĝi estas aŭ ne tia...*

La policisto fumis, kaj lia aspekto ekestis jam ne tiel malkontenta: liaj aferoj iĝis pli bonaj.

*«Ho, se havus mi botelon ĉi tie», – pensis Viktor. – «Donus mi eldrinki, rakontus paron da irlandaj anekdotoj, insultus estrulojn, kiuj nur ŝatulaĉojn altigas, priridus studentojn, – kaj, certe, degelus la homo...»*

– Jen kiel pluvego frapas, – diris Viktor.

La policisto gruntis sufiĉe neŭtrale, sen malico.

– Sed kia ja antaŭe estis klimato ĉi tie, – daŭrigis Viktor. – Ĉi tie ĉe li ekbrilis ideo. – Kaj jen, rimarku, ĉe ili tie, en leprulejo, forestas pluvo, sed kiam alveturas homo la urbon, do tuj pluvegas.

– Kio ja, – diris la policisto. – Bone ili komfortiĝis tie, en la leprulejo.

La kontakto aranĝadis. – Ili konversaciis pri la vetero – kia ĝi estis, kaj kia, diable, ekestis. Trovis ili komunajn konatojn en la urbo. Paroladis pri ĉe-furba vivo, pri mini-jupoj, pri ulcero de samseksemo, pri importa brando kaj kontrabandaj narkotaĵoj. Nature menciis ke ekforestis ordo – ne tio kio estis ĝis la milito, aŭ, diru ni, tuj poste. Ke esti policisto – hunda profesio, kvankam oni skribas en ĵurnaloj: bonkoraj kaj severaj gardantoj de ordo, senŝanĝebla rado de la ŝtata mekanismo. Sed pensian aĝon oni pligrandigas, pensiojn malpliigas, pro dumserva vundo oni donas groŝojn, kaj nun eĉ armilojn forprenis – kiu do penados ĉe tiuj kondiĉoj... Unuvorte aperis tiaj cirkonstancoj ke, se aldoni paron da glutoj, la policisto dirus: "Jen kio, knabo, je Dio. Mi vin ne vidis, kaj vi min ne vidis". Tamen paro da glutoj forestis, kaj momento por prezenti ruĝan monbileteton ankoraŭ ne maturiĝis, tial kiam la kamiono alruliĝis al enirejo de la polica administrejo, la policisto denove malsereniĝis, kaj seke proponis al Viktor sekvi lin, kaj rapide.

La malsekulaĉo rifuzis konversacii kun la deĵoranto, kaj postulis ke oni tuj konduku ilin al la policestro. La deĵoranto respondis al li ke la policestro, verŝajne, akceptos lin, sed kio koncernas tiun ĉi sinjoron, do li estas akuzata pri aŭtoŝtelo, tial li ne havas kaŭzon iri al la estro, sed oni devas pridemandi kaj protokoli lin.

– Ne, – firme kaj trankvile diris la malsekulaĉo, – okazos nenio tio. Sinjoro Banev ne devos respondi

al iuj ajn demandoj kaj subskribi iujn ajn protokolojn, pri kio ekzistas cirkonstancoj, koncernantaj nur sinjoron policestron.

La deĵoranto, al kiu estis indiferente, levetis la ŝultrojn, kaj ekiris raporti. Dum li raportis, aperis la ŝofereto en la oleigita kombinvesto, kiu sciis nenion, kaj estis sufiĉe ebria, pro kio li tuj komencis krii pri justeco, nekulpo, kaj ceteraj teruraĵoj. La malsekulaĉo singarde prenis de li la fakturon, kiun tiu svingadis, lokiĝis ĉe la bariero kaj subskribis ĝin. La ŝoforo, pro la mirego, eksilentis, kaj tiam na Viktor kaj la malsekulaĉon oni invitis al la estro.

La policestro renkontis ilin severe. La malsekulaĉon li rigardis malplezure, kaj na Viktor li tute evitis rigardi.

– Kion vi bezonas? – demandis li.

– Ĉu vi permesos eksidi? – informiĝis la malsekulaĉo.

– Jes, mi petas, – devige diris la policestro post ioma paŭzo.

Ĉiuj eksidis.

– Sinjoro policestro, – diris la malsekulaĉo. – Mi estas rajtigita deklari al vi proteston kontraŭ dufoja neleĝa halto de transportaĵoj adresitaj al la leprulejo.

– Jes, mi aŭdis pri tio, – diris la policestro. – La ŝoforo estis ebria, do ni estis devigataj deteni lin. Mi opinias ke dum la proksimaj tagoj ĉio klariĝos.

– Vi detenis ne ŝoforon sed la transportaĵon, – oponis la malsekulaĉo. – Tamen tio ne estas tiel grava. Dank al afableco de sinjoro Banev la transportaĵo venis nur post negranda malfruiĝo, kaj vi

devas esti danka al troviĝanta ĉi tie sinjoro Banev, ĉar signifa malfruo de la transportaĵo pro via, sinjoro policestro, kulpo, povus okazi por vi fonto de gravaj malagrablaĵoj.

– Tio estas amuze, – diris la policestro. – Mi ne komprenas kaj ne deziras kompreni pri kio temas, ĉar estiel persono ofica mi ne toleros minacojn. Kio koncernas sinjoron Banev, do ekzistas krimleĝaro, en kiu estas antaŭviditaj tiuj ĉi okazoj.

Li evidente rifuzis rigardi na Viktor.

– Mi vidas ke vi vere ne komprenas vian staton, – diris la malsekulaĉo. – Sed mi estas rajtigita informi vin ke en okazo de nova haltigo de niaj transportaĵoj vi devos respondeci ĉe generalo Pferd.

Venis silento. Viktor ne sciis kio estas generalo Pferd, tamen al la policestro tiu ĉi nomo evidente estis konata.

– Al mi ŝajnas ke tio estas minaco, – diris li necerte.

– Jes, – konsentis la malsekulaĉo. – Kaj la minaco pli ol reala.

La policestro impete leviĝis. Viktor kaj la malsekulaĉo ankaŭ.

– Mi konsideros ĉion kion mi ekaŭdis ĉi tie, – deklaris la policestro. – Via tono, sinjoro, lasas deziron esti pli bona, tamen al personoj, rajtigintaj vin, mi promesas ke mi evidentigos la aferon kaj, se troviĝos kulpuloj, mi punos ilin. Tio tutplene koncernas ankaŭ sinjoron Banev.

– Sinjoro Banev, – diris la malsekulaĉo. – Se ĉe vi estos malagrablaĵoj kun polico okaze de tiu ĉi incidento, senprokraste informu sinjoron Golem... Ĝis

revido, – diris li al la policestro.

– Ĉion bonan, – respondis tiu.

## Ĉapitro oka

Je la oka vespere Viktor malleviĝis en la restoracion, kaj direktiĝis al sia tableto, kie sidis jam la kutima kompanio, kiam alvokis lin Teddi.

– Saluton, Teddi, – diris Viktor, premiĝinte al la vendobreto. – Kiel vi fartas? – Tiam li ekmemoris. – Ha! Kontresumo... Ĉu multon mi kulpas pro hieraŭ?

– Kontresumo, – elgrumblis Teddi, – ne estas tro granda: rompis vi spegulon kaj demovis lavabon. Sed jen la policestro, ĉu vi memoras lin?

– Sed kio okazis? – miris Viktor.

– Ĝuste tion mi sciis ke vi ne memoros, – diris Teddi. – Okuloj ĉe vi, frato, estis kiel ĉe kuirita porkido. Nenion vi komprenis... Do jen kiel, – li almetis al brusto de Viktor la montran fingron, – ŝlosis vi lin, bedaŭrindan, en neceseja ĉelo, kontraŭapogis la pordon per balailo, kaj ne ellasis lin. Sed ni ne sciis kiu estas tie, li ĵus alveturis, do ni opiniis ke tie estas Kvadriga. Nu, – pensis ni, – bone, iom sidu li... Sed poste vi eltiris lin de tie, kaj komencis krii: "Ho bedaŭrinda, tuta vi malpuriĝis!" – kaj puŝi lian kapon en la lavabon. Deŝovis vi la lavabon, kaj ni, frato, penadis detirante vin.

– Ĉu serioze? – diris Viktor. – Jen kial li la tutan tagon rigardas min lupe.

– Teddi kunsente klinadis la kapon.

– Jes, diable malagrablas, – diris Viktor. – Pardonpeti mi devus... Sed kiel li permesis al mi? Ja li estas ankoraŭ viro forta.

– Mi timas ke ili alkudros krimaferon al vi, – diris Teddi. – Hodiaŭ matene jam iradis ĉi tie unu policistaĉo, pridemandis li... Sesdek-tria artikolo estas garantiita al vi – ofendaj agoj ĉe plipezigaj cirkonstancoj. Kaj eble eĉ pli malbone. Terorisma ago. Ĉu vi komprenas per kio odoras? Mi, sur via loko... – Tedi balancis la kapon.

– Kio? – demandis Viktor.

– Onidire urbestro venis al vi hodiaŭ, – diris Teddi.

– Jes.

– Nu, kaj kion li?

– Stultaĵo. Li volas ke mi verku artikolon. Kontraŭ malsekulaĉoj.

– Ha! – diris Teddi, kaj vigliĝis. – Nu, tiam vere stultaĵo. Verku vi al li tiun ĉi artikolon, kaj ĉio estos en ordo. Se la urbestro estos kontenta, la policestro eĉ kviviti ne kuraĝos, vi povos eĉ ĉiutage enpuŝi lin en necesabon. La policestro estas ĉe la urbestro jen kie... – Teddi montris la grandegan ostecan pugnon. – Do ĉio enordas. Tial verŝu mi al vi je kosto de la entrepreno. Ĉu la rafinitan?

– Eblas rafinitan, – diris Viktor penseme.

La vizito de la urbestro prezentiĝis al li jam en tute alia lumo.

*«Jen kiel ili min», – pensis Viktor. – «Jes... Aŭ malaperu vi de ĉi tie, aŭ faru kion oni ordonas, alie ni ĉirkaŭligos vin. Fakte, ankaŭ malaperi ne estos facile. Terorisma ago, oni trovos. Kia estas vi, frateto, alkoholulo, eĉ rigardi aĉas. Kaj ne iun ajn, sed policestron. Se diri honeste, planite kaj plenumite estas ne*

*malbone».*

Li memoris nenion krom la kahela planko, verŝita per akvo, sed tre bone imagis tutan tiun ĉi scenon.

*«Jes, Viktor Banev, porkido vi mia kuirita, opoziciulo kuireja, kaj eĉ ne kuireja sed apudbaneja, ŝatato de sinjoro prezidento... Jes, ŝajnas ke venis al vi tempo, tiel dirite, vendi vin. Rec-Tusov, homo sperta, ĉi-okaze diras: vendiĝi oni devas leĝere kaj multekoste – ju pli honesta estas via plumo, des pli multe kostu ĝi al potenculoj, do ankaŭ vendante vin vi okazigas malprofiton al la kontraŭulo, kaj oni devas peni ke la malprofito estu maksimuma»*

Viktor unuglute eldrinkis pokaleton da rafinita, sentante ĉe tio neniun plezuron.

– Bone, Teddi, – diris li. – Dankon. Donu la kontresumon. Ĉu multe?

– Via poŝo eltenos, – smajletis Teddi.

Li prenis el la kaso paperfolion.

– Ŝuldas vi: pro la spegulo neceseja – sepdek sep, pro la lavabo fajenca granda – sesdek kvar, resume, vi ja komprenas, cent kvardek unu. La planklampon ni forskribis je tiun pugnobatalon... Sed jen kion mi ne komprenas, – daŭrigis li, observante kiel Viktor elkalkulas la monon. – Per kio vi la spegulon disrompis? Fortika spegulo, je du fingroj dika. Ĉu vi per la kapo batis ĝin?

– Per kies? – malgaje demandis Viktor.

– Bone, ne malĝoju, – diris Teddi, akceptante la

monon. – Verkos vi la artikoleton, rerajtiĝos, la honorarieton elkaptos, kaj ĉio profitiĝos... Ĉu verŝi ankoraŭfoje?

– Ne, sufiĉas, poste... Mi ankoraŭfoje alvenos, post la vespermanĝo, – diris Viktor kaj ekiris al sia loko.

En la restoracio ĉio estis kiel kutime – duonmallumo, odoroj, tintado de manĝilaro en la kuirejo, okulvitra juna homo kun la teko, kunulo, kaj botelo da minerala akvo; ĝibiĝinta doktoro R.Kvadriga; Pavor, rekta kaj ordigita, malgraŭ la nazkataro; Golem kun malkompakta nazo de profeto-alkoholulo, disfluiĝinta en la brakseĝo. Kelnero.

– Iampridojn, – diris Viktor. – Botelon da biero kaj ion viandan.

– Ĝisludis vi, – diris Pavor riproĉe. – Diris mi al vi – ĉesu drinkaĉi.

– Kiam vi diris tion? Mi ne memoras.

– Sed al kio vi ĝisludis? – informiĝis doktoro R.Kvadriga. – Ĉu murdis, finfine, iun?

– Ĉu ankaŭ vi memoras nenion? – demandis lin Viktor.

– Ĉu vi pri hieraŭo?

– Jes, pri hieraŭo... – Drinkis mi ĝis diabletoj en la okuloj, – diris Viktor, turniĝante al Golem, – enpelis mi sinjoron policestron en la necesejon...

– Ha-a! – diris R.Kvadriga. – Ĉio tio estas mensogo. – Ĝuste tion mi diris al la esploristo. Hodiaŭ matene vizitis min esploristo. Ĉu vi komprenas, pirozo besteca, la kapo doloregas, sidas mi, rigardas en fenestron, kaj jen aperas tiu ŝtipo kaj komencas kudri krimaferon...

– Kiel vi diris? – demandis Golem. – Ĉu kudri?

– Jes, kudri, – diris R.Kvadriga, – trapikante per imagita nadlo imagitan ŝtofon. – Tamen ne pantalonon sed krimaferon... Mi diris al li rekte: ĉio tio estas mensogo, hieraŭ mi tutan vesperon sidis en la restoracio, ĉio estis trankvila, deca, kiel ĉiam, neniuj skandaloj, unuvorte enuego... Elturniĝos vi, – kuraĝige diris li al Viktor. – Nenio terura. Sed pro kio vi faris tion? Ĉu vi ne ŝatas lin?

– Pli bone ni ne parolu pri tio, – proponis Viktor.

– Sed pri kio ni parolu? – demandis R.Kvadriga ofende. – Tiu ĉi duopo ĉiam disputas kiu kiun ne enlasas en la leprulejon. Jen, okazis finfine io interesa, kaj tuj – ne parolu.

Viktor formordis duonon de la porcio, maĉis, eldrinkis la bieron, kaj demandis:

– Kio estas generalo Pferd?

– Ĉevalo, – diris R.Kvadriga. – Virĉevalo. Der pferd. Aŭ das.

– Tamen, – diris Viktor. – Ĉu konas iu tiun ĉi generalon?

– Kiam mi servis en armeo, – diris doktoro R.Kvadriga, – nian divizion komandis infanteri-generalo Arŝmann.

– Kaj kio? – diris Viktor.

– Arŝ – germane – postaĵo, – informis silentanta ĝis tiam Golem. – La doktoro ŝercas.

– Sed kie vi aŭdis pri generalo Pferd? – demandis Pavor.

– En kabineto de la policestro – respondis Viktor.

– Kaj kio?

– Jen ĉio. Do neniu scias? Bone. Simple mi volis demandi.

– Kaj nomo de la serĝento estis Battoks, – deklaris R.Kvadriga. – Serĝento Battoks.

– Ĉu ankaŭ la anglan vi konas? – demandis Golem.

– Jes, en tiuj ĉi limoj, – respondis R.Kvadriga.

– Drinku ni, – proponis Viktor. – Kelnero, botelon da konjako.

– Sed por kio botelon? – demandis Pavor.

– Por sufiĉu al ĉiuj.

– Denove vi ordigos iun skandalon.

– Lasu vi, Pavor, – diris Viktor. – Jen kia abstinentulo.

– Mi ne estas abstinentulo, – oponis Pavor. – Mi ŝatas drinki, kaj neniam preterlasas okazon drinki, kiel decas al vera viro. Sed mi ne komprenas por kio perdi la racion. Kaj tute jam ne valoras, laŭ mi, perdi la racion ĉiuvespere.

– Denove li estas ĉi tie, – diris R.Kvadriga despere. – Sed kiam li sukcesis?

– Ni ne perdos la racion, – diris Viktor, disverŝante al ĉiuj la konjakon. – Ni simple drinkos. Same al duono de la nacio kiu faras tion nun. Alia duono drinkaĉas ĝis perdo de la racio, kaj Dio kun ĝi, sed ni simple drinku.

– Ĝuste tio problemas, – diris Pavor. – Kiam en la lando okazas totala drinkado, kaj ne nur en la lando, sed en tuta mondo, ĉiu deca persono devas konservi la prudenton.

– Ĉu vi sincere opinias nin prudentaj homoj? – demandis Golem.

– Ĉiuokaze civilizitaj.

– Laŭ mi, – diris Viktor, – ĉe civilizitaj homoj estas pli da kaŭzoj ebriiĝi ol ĉe necivilizitaj.

– Eble, – konsentis Pavor. – Tamen civilizita homo devas teni sin en kadroj. Civilizeco devigas... Jen sidas ni ĉi tie preskaŭ ĉiun vesperon, babilas, drinkas, ludas ĵetkubojn. Sed ĉu diris iu el ni dum tiu ĉi tempo ion, eĉ ne saĝan, sed almenaŭ seriozan... Sole hihioj kaj ŝercetoj...

– Sed kial – seriozan? – demandis Golem.

– Tial ke ĉio falas en abismon, sed ni hihias kaj ŝercas. Dum pesto festenas ni. Laŭ mi tio estas honte, sinjoroj.

– Nu bone, Pavor, – pacige diris Viktor, – diru vi ion seriozan. Eĉ ne saĝan sed seriozan.

– Ne deziras mi seriozan, – deklaris doktoro R.Kvadriga. – Hirudoj, terbuloj. Fi!

– Ĉit! – diris Viktor al li. – Dormaĉu vi... Ĝuste, Golem, konversaciu ni eĉ unufoje pri io serioza. Komencu, Pavor, rakontu al ni pri la abismo.

– Denove vi hihias? – diris Pavor amare.

– Ne, – diris Viktor. Honeste – ne. Mi estas ironia – eble. Sed tio okazas ĉar tutan vivon aŭdas mi babilaĉon pri abismoj. Ĉiuj certigas ke homaro ruliĝas en abismon, sed pruvi ili povas nenion. Kaj, se kontroli, ĉiam okazas ke tuta tiu ĉi filozofia pesimismo – rezulto de la familiaj problemoj aŭ de nesufiĉo da bankbiletoj...

– Ne, – diris Pavor. – Ne... Homaro ruliĝas en abismon ĉar homaro bankrotiĝis...

– Nesufiĉo da bankbiletoj, – elmurmuris Golem.

Pavor ne atentis lin. Li parolis ekskluzive al Vik-

tor, parolis, klininte la kapon kaj rigardante el sub la frunto.

– Homaro bankrotiĝis biologie – naskiĝoj malpliiĝas, disvastiĝas kancero, demenco, neŭritoj, homoj transformiĝis je narkomaniuloj. Ili ĉiutage englutas cent-tunojn da alkoholo, nikotino, da simple narkotaĵoj, ili komencis de haŝiŝo kaj kokaino, kaj finis per LSD. Ni simple degeneras. Naturon ni neniigis, kaj imita naturo neniigos nin. Daŭre, ni bankrotiĝis ideologie – ni elprovis jam ĉiujn filozofiajn sistemojn, kaj diskreditis ilin ĉiujn, ni elprovis ĉiujn eblajn sistemojn de moralo, sed restis samaj malmoralaj brutoj kiel troglodiτoj. Plej terura estas tio ke tuta griza homa biomaso restas en niaj tagoj sama kanajlaro kia ĝi estis ĉiam. Ĝi konstante postulas kaj deziregas diojn, gvidantojn, ordon, kaj ĉiufoje kiam ĝi ricevas diojn, gvidantojn kaj ordon, ĝi iĝas malkontenta, ĉar reale ĝi bezonas nenion, nek diojn, nek ordon, sed volas ĝi ĥaoson, anarĥion, panon kaj spektaĵojn; nun ĝi estas katenita per fera neceso ĉiusemajne ricevi koverteton kun la salajro, sed tiu ĉi neceso estas abomena al la biomaso, kaj ĝi ĉiuvespere foriras en alkoholon kaj narkotaĵojn... Sed diablo kun ĝi, kun tiu ĉi amaso da putranta fekaĵo, ĝi fetoras jam dek mil jaroj, kaj al nenio alia ĝi taŭgas, krom fetori. Teruras alio – la putro kaptas nin, homojn majuskle, personecojn. Ni vidas tiun ĉi malkomponadon kaj imagas kvazaŭ tio ne koncernas nin, sed ĝi, tamen, venenas nin per senespero, subfosas nian volforton, enmarĉigas... Kaj jen al vi ankaŭ tiu ĉi malbeno – demokratia eduko: *egalite*, *fraternite*, ĉiuj homoj – fratoj, ĉiuj –

el sama pasto... Ni konstante identigas nin kun plebo, kaj insultas nin se okazas al ni malkovri ke ni estas pli saĝaj ol ĝi, ke ĉe ni estas aliaj interesoj, aliaj celoj en vivo. Venis jam tempo kompreni tion kaj fari konkludojn – venis jam tempo saviĝi.

– Venis tempo drinki, – diris Viktor.

Li jam bedaŭris ke konsentis pri serioza konversacio kun la sanitara inspektisto. Estis malagrable rigardi na Pavor. Pavor tro ekscitiĝis, ĉe li eĉ la okuloj strabiĝis. Tio elfalis el lia personeco, sed parolis li, same al ĉiuj adeptoj de abismoj, terurajn banalaĵojn. Aperis eĉ deziro diri al li: ĉesu malhonoriĝi, Pavor, pli bone turniĝu vi profile, kaj eksmajlu ironie.

– Ĉu tio estas ĉio kion vi povas respondi? – Informiĝis Pavor.

– Mi povas ankaŭ konsili. Pli da ironio, Pavor. Ne ekscitiĝu tiel. Tutegale vi povas nenion. Kaj se povus, tiam ne scius kion.

Pavor ironie eksmajlis.

– Eraro. Mi scias, – diris li.

– Do?

– Estas nur unu rimedo ĉesi la diskomponiĝon...

– Konas ni, konas, – facilanime diris Viktor. – Vesti ĉiujn stultulojn je oraj ĉemizoj, kaj lasi ilin marŝi. Tuta Eŭropo sub niaj piedoj. Estis jam.

– Ne, – diris Pavor. – Tio estas nur prokrasto. Sed solvo estas unusola: neniigi la amason.

– Ĉe vi hodiaŭ estas bonega humoro, – diris Viktor.

– Neniigi naŭdek procentoj de loĝantaro, – diris Pavor. – Eble eĉ naŭdek kvin. Homa biomaso plen-

umis jam sian destinon – ĝi naskis el siaj profundoj eliton, kiu kreis civilizacion. Nun ĝi estas morta, kiel putra terpoma tubero, doninta vivon al nova vegetaĵo. Sed kiam mortinto komencas putri, venas tempo enterigi ĝin.

– Dio, – diris Viktor. – Kaj ĉio ĉi tio nur ĉar ĉe vi estas nazkataro, kaj forestas enirpermeso en la leprulejon, ĉu? Aŭ eble familiaj malagrablaĵoj?

– Ne ŝajnigu stultulon, – diris Pavor. – Kial vi ne volas primediti aĵojn kiuj estas perfekte konataj al vi? Kial oni perversas plej brilajn ideojn? Pro stulteco de griza homamaso. Pro kio militoj, ĥaoso, aĉaĵoj? Pro stulteco de griza homamaso, kiu promocias registarojn valorantajn ĝin. Kial ora epoko same senespere malproksimas de ni kiel en antikva tempo? Pro stulteco, inerteco kaj malklereco de griza homamaso. Principe Hitler estis prava, subkonscie prava, li sentis ke sur Tero estas tro multe da superfluaĵoj. Sed li estis naskita per griza homamaso, kaj difektigis ĉion. Iniciati neniigon laŭ rasa indico estis stultaĵo. Kaj, krome, li ne posedis verajn neniig-rimedojn.

– Kaj laŭ kiu indico intencas neniigi vi? – demandis Viktor.

– Laŭ indico de nerimarkeblo, – respondis Pavor. – Se homo estas griza, nerimarkebla, estas necese neniigi ĝin.

– Kaj kiu decidos pri la nerimarkebleco?

– Lasu, tio estas detaloj. Mi formulas principon, sed kiu, kio, kaj kiel – estas detaloj.

– Kaj por kio vi ligiĝis kun la urbestro? – demandis Viktor, al kiu Pavor jam tedis.

– Pri kio vi?

– Al kiu diablo por vi tiu ĉi juĝa proceso? Vi silentas, Pavor! Sed tio ĉiam okazas pri vi, pri superhomoj. Vi intencas replugi tutan mondon, ne konsentas vi pri malpli ol tri miliardo da kadavroj, tamen samtempe – jen maltrankviliĝas vi pri la rangoj, jen kuraciĝas de ŝankro, jen, pro eta profito, helpas al dubindaj homoj ordigi dubindajn aferojn.

– Vi, tamen, ne tiel forte, – diris Pavor. Videblis ke li furioziĝis. – Ja vi mem estas alkoholulo kaj nenifarulo...

– Ĉiuokaze mi ne iniciatas blufajn politikajn procesojn kaj ne iniciatas rekonstrui la mondon.

– Jes, – diris Pavor. – Vi eĉ al tio ne kapablas, Banev. Vi estas nura bohemiano, unuvorte ŝlimulo, ĉipa frazemulo kaj merdo. Vi mem ne scias kion vi volas, kaj faras nur tion, kion oni deziras de vi. Vi kontentigas dezirojn de samaj ŝlimuloj kiel vi, kaj tial imagas ke vi estas skuanto de bazoj kaj libera artisto. Sed vi simple estas merda rimisto, el tiuj kiuj surskribas publikajn necesejojn.

– Ĉio tio estas ĝusta, – konsentis Viktor. – Bedaŭrindas nur ke vi ne diris tion antaŭe. Ekestis necese ofendi vin por ke vi diru tion. Okazas do ke vi estas fieta personeco, Pavor! Nur unu el multaj aliaj. Kaj se oni komencos neniigi, ankaŭ vin oni neniigos. Laŭ principo de nerimarkebleco: filozofanta sanitara inspektisto, ĉu? En fornon lin!

*«Interese, kiel ni aspektas de ekstere» – pensis li. – «Pavor estas aĉa... Jen kia smajleto! Kio okazis al li hodiaŭ? Sed Kvadriga dormas, kio por li kvereloj, griza homamaso, kaj*

*ĉiu tiu ĉi filozofio... Kaj Golem duonkuŝas komforte, kiel en teatro, pokaleto en la fingroj, la mano post la brakseĝa dorso, atendas li kiu kiun frapos, kaj per kio. Ial Pavor longe silentas... Ĉu argumentojn li serĉas?»*

– Nu bone, – diris fine Pavor. – Konversaciis ni, kaj sufiĉas.

La smajleto ĉe li malaperis, la okuloj denove iĝis kiel ĉe ŝturmbandfjurer. Li ĵetis sur la tablon monbileton, ĝisdrinkis la konjakon kaj foriris, ne adiaŭante. Viktor eksentis agrablan disiluziiĝon.

– Tamen por verkisto vi tre malbone komprenas homojn, – diris Golem.

– Tio ne estas mia tasko, – diris Viktor facile. – Homojn komprenu psikologoj el departemento de sekureco. Mia tasko estas elsenti tendencojn per plialtigita intuicio de artisto... Sed por kio vi diras tion? Ĉu denove "Viktuar, ĉesu tintadi"?

– Mi avertis vin: ne tuŝu na Pavor.

– Diable, – diris Viktor. – Unue mi lin ne tuŝis. Li tuŝis min. Kaj due li estas porko. Ĉu vi scias ke li helpas al la urbestro ekjuĝi vin?

– Mi konjektas tion.

– Ĉu vin ne maltrankviligas tio?

– Ne maltrankviligas. Manoj iliaj estas mallongaj. Mi parolas pri la urbestro kaj pri la juĝistoj.

– Kaj ĉe Pavor?

– Sed ĉe Pavor ili estas longaj, – diris Golem. – Tial ĉesu tintadi ĉe li. Vi ja vidas ke mi ĉe li ne tintadas.

– Interese, ĉe kiu vi tintadas, – elgrumblis Viktor.

– Ĉe vi mi iam tintadas. Mi sentas simpation al vi. Verŝu al mi konjakon.

– Bonvolu, – Viktor enverŝis. – Eble ni vekos na Kvadriga? Vere, kial li ne defendis min de Pavor!

– Ne, ne veku lin. Eku ni konversacii. Por kio vi miksiĝas en tiujn ĉi aferojn? Kiu petis vin forkonduki la kamionon?

– Tio estis mia deziro, – diris Viktor. – Estas porkaĵo deteni librojn. Krom tio min misagordis la urbestro. Li atencis mian liberon. Ĉiufoje kiam oni atencas mian liberon, mi komencas huligani... Bonokaze, Golem, ĉu povas generalo Pferd protekti min de la urbestro?

– Ternis li pri vi kaj pri la urbestro, – diris Golem. – Al li sufiĉas siaj problemoj.

– Sed vi diru al li, ke li protektu. Se ne, mi verkos frakasan artikolon kontraŭ via leprulejo, pri tio ke vi uzas sangon de kristanaj beboj por kuraci okulvitran malsanon. Ĉu vi opinias ke mi ne scias por kio malsekulaĉoj allogas infanetojn? Ili, unue, suĉas sangon el ili, kaj, due, stupras ilin. Malhonorigos mi vin antaŭ tuta mondo. Sangsuĉisto kaj stupranto sub masko de kuracisto, – Viktor kaj Golem intertuŝis la pokaletojn kaj eldrinkis. – Parenteze, mi diras tion serioze. La urbestro igas min verki tian artikolon. Al vi, certe, ankaŭ tio estas sciata.

– Ne, – diris Golem. – Sed tio ne estas esenca.

– Mi vidas ke al vi ĉio ne estas esenca, – diris Viktor. – La tuta urbo estas kontraŭ vi – tio ne estas esenca. Oni intencas juĝi vin, – ne esenca. Sanitara inspektisto Pavor estas incitita per via konduto – ne

estas esenca. Moda verkisto Banev ankaŭ estas incitita, kaj pretigas la koleran plumon – ankaŭ ne estas esenca. Eble generalo Pferd – estas pseŭdonimo de sinjoro prezidento? Parenteze, ĉu tiu ĉi ĉiopova generalo scias ke vi estas komunisto?

– Sed kial estas incitita verkisto Banev? – trankvile demandis Golem. – Nur ne kriaĉu tiel, Teddi turniĝas.

– Teddi estas nia homo, – oponis Viktor. – Tamen ankaŭ li estas incitita – lin turmentas musoj. – Li kuntiris la brovojn kaj ekfumis. – Momenton, pri kio vi demandis min... Ha, jes. Mi estas incitita ĉar vi ne enlasis min en la leprulejon. Malgraŭ ĉio mi efektivigis honoran agon. Eĉ se ĝi estas stulta, ja ĉiuj honoraj agoj estas stultaj. Krom tio, pli frue, mi portis malsekulaĉon sur mia dorso.

– Kaj batalis pro li, – aldonis Golem.

– Ĝuste. Kaj batalis.

– Kun faŝistoj, – diris Golem.

– Ĝuste, kun faŝistoj.

– Sed ĉu vi havas enirpermeson? – demandis Golem.

– Enirpermeson... Jen ankaŭ na Pavor vi ne enlasas, do li, antaŭ niaj okuloj, iĝis homofobo.

– Jes, al Pavor ne prosperas ĉi tie, – diris Golem. – Entute li estas kapabla servanto, sed ĉi tie nenio prosperas al li. Mi daŭre atendas kiam li komencos fari stultaĵojn. Ŝajnas ke li komencas jam.

Doktoro R.Kvadriga levis la vilan kapon, kaj diris: – Fortike. Jen iru mi, kaj tie ni vidu. Animon for. – Lia kapo denove falis kun frapo sur la tablon.

– Tamen, Golem, – diris Viktor, mallaŭtiginte la voĉon. – Ĉu tio veras ke vi estas komunisto?

– Laŭ mia memoro komunista partio estas malpermesata ĉe ni, – rimarkis Golem.

– Dio mia, – diris Viktor. – Sed kiu partio estas ĉe ni permesata? Ja mi demandas ne pri partio, sed pri vi...

– Mi, – kiel vi vidas, estas permesata, – diris Golem.

– Laŭdezire, – diris Viktor. – Al mi tio indiferentas. Sed la urbestro... Tamen kraĉis vi je la urbestro. Sed kio se pri tio ekscios generalo Pferd...

– Sed ni ja nenion diros al li, – kredeme flustretis Golem. – Por kio la generalo okupiĝu pri tiuj malgravaĵoj? Li scias ke estas leprulejo, en la leprulejo – iu Golem, malsekulaĉoj iuj, do sufiĉas.

– Stranga generalo, – pripense diris Viktor. – Generalo de leprulejo... Tamen verŝajnas ke li, post nelonge, havos malagrablaĵojn pro la malsekulaĉoj. Mi sentas tion per plialtigita sentemo de artisto. En nia urbo ĉio akriĝis kontraŭ malsekulaĉoj.

– Se nur en nia urbo, – diris Golem.

– Sed kial? Ja tio estas simple malsanaj homoj, kaj eĉ, ŝajne, ne infektaj.

– Ne ruzadu, Viktor. Vi bonege scias ke tio estas ne simple malsanaj homoj. Eĉ infekteco ilia estas ne tute simpla.

– Kiusence?

– Teddi, ekzemple, ne povas infektiĝi de ili. Kaj la urbestro ne povas, mi ne diras eĉ pri la policestro. Sed iu alia povas.

– Vi, ekzemple, ĉu?

Golem prenis la botelon, plezure rigardis ĝin kontraŭ lumo, kaj disverŝis la konjakon. – Ankaŭ mi ne povas. Jam.

– Kaj mi?

– Mi ne scias. Ĉio tio, entute, estas hipotezo. Ne turnu la atenton.

– Mi ne turnas, – malgaje diris Viktor. Kaj per kio krom tio ili estas nekutimaj?

– Per kio ili estas nekutimaj? – ripetis Golem. – Vi povis mem rimarki, Viktor, ke ĉiuj homoj apartenas al tri grandaj grupoj. Pli ĝuste al du grandaj kaj unu malgranda... Estas homoj kiuj ne povas vivi sen estinto, ili plene troviĝas en estinto, pli-malpli malproksima. Ili vivas per tradicioj, kutimoj, sanktaĵoj, ili ĉerpas el estinto ĝojon kaj ekzemplon. Prenu ni sinjoron prezidenton. Kion li farus se ĉe ni forestus nia majesta estinto? Kion li citus kaj de kie li, entute, aperus. Krome estas homoj kiuj vivas per estanto, kaj ne deziras scii estonton kaj estinton. Jen vi, ekzemple. Tutan imagon pri estinto difektis al vi sinjoro prezidento, en kiu ajn estinto vi enrigardas, ĉiam ŝajniĝas al vi sama sinjoro prezidento. Kio koncernas estonton, vi havas pri ĝi tute neniun imagon kaj, laŭ mi, timas havi ĝin... Kaj, fine, estas homoj kiuj vivas per estonto. Signifaj kvantoj da ili aperis antaŭnelonge. De estinto ili, tute juste, atendas nenion bonan, kaj estanto por ili – tio estas nur materialo por konstrui estonton, krudmaterialo... Sed ili, fakte jam vivas en estonto... Sur insuletoj de estonto, kiuj aperis ĉirkaŭ ili en estanto... – Golem iel strange smajlante levis la okulojn al la plafono. – Ili estas

saĝaj, – diris li tenere, – ili estas diable saĝaj, – kontraste al plimulto da homoj. Ili ĉiuj, kvazaŭ elektite, estas talentaj, Viktor. Ĉe ili estas strangaj deziroj, kaj tute forestas deziroj ordinaraj.

– Ordinaraj deziroj – tio, ekzemple, virinoj...

– Iusence – jes.

– Vodko, spektaĵoj?

– Sendube.

– Terura malsano, – diris Viktor – Ne volas mi... Sed tutegale nekomprene... Nenion komprenas mi. Tion ke saĝajn homojn oni enigas post pikdrataron, – tion mi komprenas. Sed kial oni ellasas ilin, kaj al ili oni ne enlasas...

– Eble ne ili sidas post pikdrato sed vi.

– Viktor smajlis. – Momenton, – diris li. – Tio anoraŭ ne tute kompreneblas. Kiel rilatas al tio, ekzemple, Pavor? Nu bone, – oni ne enlasas min, mi estas eksterulo. Sed devas iu inspekti staton de lita tolaĵo kaj de necesejoj? Eble ĉe vi tie estas kontraŭsanitaraj kondiĉoj.

– Kaj kio se lin interesas ne sanitaraj kondiĉoj?

Viktor konsterne rigardis na Golem.

– Ĉu vi denove ŝercas? – demandis li.

– Denove ne, – respondis Golem.

– Kio do, ĉu li, laŭ vi, estas spiono?

– Spiono estas tro voluma koncepto, – oponis Golem.

– Momenton, – diris Viktor. – Parolu ni rekte. Kiu metis la pikdraton kaj la gardantojn?

– Ho tiu ĉi drato, – suspiris Golem. – Kiom da vestaĵoj estas ŝiritaj pro ĝi, kaj tiuj ĉi soldatoj konstante suferas pro diareo. Ĉu vi konas plej bonan

rimedon kontraŭ lakso? Tabako kun portovino. Pli ĝuste, portovino kun tabako.

– Bone, – diris Viktor. – Do generalo Pferd. Aha!.. – diris li. – Kaj tiu juna homo kun la teko... Jen kio! Do tio estas simple milita labo. Kompreneble... Kaj Pavor, do, ne estas militisto. El alia do departemento. Aŭ, eble, spiono li estas ne nia sed alilanda?

– Gardu dio! – diris Golem kun teruro. – Nur tio mankas al ni.

– Jen kiel... Ĉu scias li kio estas tiu bubo kun teko?

– Mi opinias ke jes, – diris Golem.

– Kaj tiu bubo, ĉu li scias kio estas Pavor?

– Mi opinias ke ne.

– Ĉu vi nenion diris al li?

– Kiel tio koncernas min?

– Kaj al generalo Pferd vi ne diris?

– Eĉ ne pensis pri tio.

– Tio ne estas juste, – diris Viktor. Oni devas diri.

– Aŭskultu, Viktor, – diris Golem. – Mi permesis al vi babili pri tiu ĉi temo nur por ke vi ektimu kaj ne ŝoviĝu en malpropran ludon. Por vi tio tute ne estas bezonate. Sen tio vi estas jam rimarkita, oni povas estingi vin, kaj vi eĉ kviviti ne sukcesos.

– Ne estas problemo timigi min, – diris Viktor suspire. – Mi de infaneco estas timigita. Tamen mi neniel povas kompreni: kion ili ĉiuj bezonas de la malsekulaĉoj?

– Kiu – ili? – lace kaj riproĉe demandis Golem.

– Pavor. Pferd. Bubo kun la teko. Ĉiuj tiuj ĉi

krokodiloj.

– Dio mia, – diris Golem. – Nu kion, en nia tempo, bezonas krokodiloj de saĝaj kaj talentaj homoj? Sed mi ne komprenas kion volas de ili vi. Kial vi enŝoviĝas en tiujn ĉi aferojn? Ĉu ne sufiĉas al vi viaj propraj malagrablaĵoj? Ĉu ne sufiĉas al vi sinjoro prezidento?

– Sufiĉas, – konsentis Viktor. – Mi estas sata ĝis la gorĝo.

– Do bonege. Veturu vi en la sanatorion, prenu kun vi paketon da papero... Ĉu vi volas ke mi donacu al vi tajpilon?

– Mi verkas laŭ malnova sistemo, – diris Viktor – Kiel Heminguej (Hemingway).

– Jen kiel bone. Mi donacos al vi stumpon da krajono. Laboru, amu na Diana. Eble mi donu al vi ankaŭ temon? Eble vi jam elĉerpiĝis?

– Temoj naskiĝas el cirkonstancoj, – digne diris Viktor. – Mi pristudas vivon.

– Je Dio, – diris Golem. Pristudu vi vivon kiom vi volas. Nur ne enmiksiĝu en procezojn.

– Tio ne eblas, – oponis Viktor. – Aparato senevite influas rezultojn de la eksperimento. Ĉu vi forgesis fizikon? Ja ni observas ne mondon, kia ĝi estas, sed mondon plus influon de la observanto.

– Oni jam frapis vin unufoje per pugna kaprompilo, sed alifoje oni povas vin simple pafmortigi.

– Nu, – diris Viktor. – Unue povas esti ke tute ne per kaprompilo sed per briko, kaj due, ĉu malmultas lokoj kie oni povas frapi min je la kranio? Oni ĉiumomente povas pendigi min, kio do, – ne

eliru mi nun el la ĉambro?

Golem mordetis la suban lipon. Ĉe li estis flavaj ĉevalaj dentoj.

– Aŭskultu vi, aparato, – diris li. – Tiam vi enmiksiĝis en la eksperimenton hazarde, kaj senprokraste ricevis je la kapaĉo. Sed nun vi enmiksiĝas konscie...

– Mi enmiksiĝis neniun eksperimenton, – diris Viktor. – Mi trankvile iris de Lola, kaj subite vidas...

– Idioto, – diris Golem. – Li iras kaj vidas. Vi devis transiri sur alian flankon, korvo vi sencerba.

– Kial mi transiru alian flankon?

– Tial, ke unu via bona konato okupiĝis tiam per plenumo de siaj rektaj devoj, sed vi enrompiĝis tien kiel virŝafo.

Viktor rektiĝis. – Kiu tiu bona konato? Tie estis neniu konato.

– La konato alrapidis de malantaŭe kun la kaprompilo. Ĉu estas ĉe vi konato kun kaprompilo?

– Viktor unuglute ĝisdrinkis sian konjakon. Kun mirinda klareco li ekmemoris: Pavor kun ruĝiĝinta pro la gripo vizaĝo eltiras el la poŝo la naztukon, kaj la kaprompilo kun bruo falas sur la plankon – peza, nebrila, oportuna.

– Ĉesu vi, – diris Viktor, kaj detusis. – Absurdo. Ne povis Pavor...

– Mi nomis neniun, – oponis Golem.

Viktor metis la manojn sur la tablon kaj pririgardis siajn streĉitajn pugnojn.

– Kiel koncernas ĉi tie liaj devoj? – demandis li.

– Al iu, ŝajne, ekestis bezonata viva malsekulaĉo. Kidneping.

– Kaj mi malhelpis?

– Penis malhelpi.

– Do, malgraŭ ĉio, ili kaptis lin?

– Kaj forveturigis. Diru dankon ke ankaŭ vin oni ne prenis – por evito de informa liko. Sorto de literaturo ja ne interesas ilin.

– Do Pavor, – malrapide diris Viktor.

– Neniujn nomojn, – memorigis Golem severe.

– Hunda filo, – diris Viktor. – Bone, rigardu ni... Sed por kio al ili la malsekulaĉo?

– Nu kial – por kio? Informo... Kie preni la informon? Vi ja mem scias – drato, soldatoj, generalo Pferd...

– Do oni nun pridemandas lin tie? – diris Viktor.

Golem silentis longe. Poste li diris:

– Li mortis.

– Ĉu oni pe-batis lin?

– Ne. Inverse. – Golem denove silentadis. – Ili, ŝtipoj, ne donis al li legi, kaj li mortis pro la malsato.

Viktor rapide alrigardis lin. Golem malgaje smajlis. Aŭ ploris pro la ĉagreno. Viktor eksentis subite teruron kaj angoron, sufokan angoron. Lumo de la surplanka lampo paliĝis. Tio similis koratakon. Viktor sufokiĝis, kaj pene detiris nodon de sia kravato.

*«Dio mia», – pensis li, – «kia do fiaĵo li estas, kia aĉaĵo, bandito, malvarma murdisto... Kaj post horo lavis li la manojn, parfumis sin, prikalkulis kiujn dankojn ricevos li de la estroj, kaj eksidis apude, intertuŝis la pokalojn, smajlis al mi, konversaciis, malnoblulo, kun mi, kiel kun kamarado, kaj mensogis, smajlis*

*kaj mensogis, delice mensogis, plezuriĝis, mokis min, hihiis li en la pugnon kiam mi deturniĝis, okulumis al si mem, kaj poste kunsente demandis kio ĉe mi pri la kapo...»*

Kiel tra nigra nebulo Viktor vidis kiel doktoro R.Kvadriga malrapide levis la kapon, malfermegis en neaŭdebla krio la sekiĝintan buŝon, kaj komencis konvulsie palpi sur la tablotuko per la tremantaj manoj kiel blinda, kaj okuloj liaj estis kiel ĉe blindulo kiam li turnadis la kapon, kaj ĉiam li kriis, kriis, sed Viktor aŭdis nenion...

*Kaj vere, mi mem estas merdo, al neniu bezonata hometo, je vizaĝaĉo min per la boto, kaj teni je la manoj, kaj ne doni al mi viŝi min, kaj al kiu, diable, mi estas bezonata, oni devis bati pli forte, por ke mi ne leviĝu, sed mi kiel en sonĝo kun vataj pugnoj, kaj Dio mia, je kiu diablo mi vivas, kaj je kiu diablo vivas ĉiuj! Ja tio estas tiel simple, veni de malantaŭe kaj frapi per fero la kapon, kaj nenio ŝanĝiĝos, je mil kilometroj de ĉi tie samsekunde naskiĝos alia bastardo...*

Grasa vizaĝo de Golem malsanete ŝveliĝis eĉ pli, kaj ekestis nigra pro la ekvidiĝinta hirtaĵo, la okuloj tute graskovriĝis, kaj li kuŝis en la brakseĝo senmove kiel felsako kun difektiĝinta oleo, ĉe li moviĝis nur fingroj kiam li malrapide prenis pokaleton post pokaleto, sensone derompis la piedeton, ellasis, kaj denove prenis, kaj denove rompis kaj ellasis.

*«Kaj neniun mi amas, ne povas mi ami na Diana, ĉu gravas kun kiu mi dormas, ja dormi ĉiuj scipovas, sed ĉu oni povas ami virinon kiu ne amas vin, ankaŭ virino ne povas ami kiam vi ne amas ŝin, kaj tiel ĉio turniĝas en damnita senhomeca rondo, turniĝas kiel serpento kiu postkuras sian voston, kiel animaloj kiuj kuniĝas kaj diskuras... Sed animaloj ne elpensas vortojn kaj ne verkas versaĵojn, ili nur kuniĝas kaj diskuras...»*

Kio koncernas Teddi do li ploris, metinte la kubutojn sur la vendobreton, metinte la ostecan mentonon sur la ostecajn pugnojn, lia kalva frunto safrane brilis sub la lampo, kaj sur la eniĝintaj vangoj senhalte fluis larmoj, kaj ankaŭ ili brilis sub la lampo...

*«Kaj ĉio pro tio ke mi estas ne verkisto sed merdo, kia el mi, al diablo, verkisto, se mi ne toleras verki, se verkado – tio estas okupo turmenta, honta, aĉa, simila al malsaneca fiziologia funkcio, simila al lakso, simila al elpremo de puso el furunko, malamas mi, timigas eĉ pensi ke mi devos okupiĝi pri tio la tutan vivon, ke mi estas kondamnita, ke oni jam ne ellasos, sed postulos: donu, donu, kaj mi donos, sed nun mi ne povas, eĉ pensi mi ne povas pri tio. Dio, faru ke mi ne pensu pri tio...»*

Bol-Kunac staris post dorso de R.Kvadriga kaj rigardis la horloĝon, svelteta, malseka, kun malseka

freŝa vizaĝo, kun mirindaj malhelaj okuloj, kaj de li, disŝirante la densan sufokecon, disvastiĝis freŝa odoro – odoro de herbo kaj fonta akvo, odoro de nimfeoj, de suno kaj libeloj super lago...

Kaj mondo revenis. Nur iu neklara memoro aŭ sento, aŭ rememoro pri sento ĵetiĝis post la angulon: ies senespera ŝiriĝinta krio, nekomprena grinco, sonoro, krako de vitro...

Viktor lekis la lipojn kaj etendiĝis al la botelo. Doktoro R.Kvadriga, metinte la kapon sur la tablotukon, raŭke murmuris: "Nenio bezonatas. Kaŝu min. Foriru ili..." Golem zorgeme forbalais de la tablo la vitrajn rompaĵojn.

Bol-Kunac diris:

– Sinjoro Golem, bonvolu pardoni min. Jen letero al vi, – li metis antaŭ Golem koverton kaj denove enrigardis la horloĝon. – Bonan vesperon, sinjoro Banev, – diris li.

– Bonan vesperon, – diris Viktor, verŝante al si konjakon.

Golem atente legis la leteron. Post la vendobreto Teddi brue purigis la nazon per la naztuko.

– Aŭskultu, Bol-Kunac, – diris Viktor. – Ĉu vi vidis kiu frapis min tiam?

– Ne, – diris Bol-Kunac, rigardante liajn okulojn.

– Kiel tiel – ne? – diris Viktor, kuntirante la brovojn.

– Li staris al mi per la dorso, – klarigis Bol-Kunac.

– Vi konas lin, – diris Viktor. – Kiu estis tio?

Golem eligis nedifinitan sonon. Viktor rapide

ekrigardis lin. Atentante neniun, Golem pripense disŝiris la skribaĵon je etaj pecetoj. La ŝiraĵojn li kaŝis en la poŝon.

– Vi eraras, – diris Bol-Kunac. – Mi ne konas lin.

– Banev, – elmurmuris R.Kvadriga. – Mi petas vin... Mi ne povas troviĝi tie sola... Iru kun mi... Tre time...

Golem leviĝis, serĉis per la fingro en poŝo de la veŝto, poste kriis:

– Teddi! Enskribu al mi... Kaj konsideru ke mi rompis kvar pokaletojn... – Nu, mi iras, – diris li al Viktor. – Pripensu kaj akceptu saĝan decidon. Eblas eĉ ke pli bone estas por vi forveturi.

– Ĝis revido, sinjoro Banev, – ĝentile diris Bol-Kunac. Al Viktor ŝajnis ke la knabo apenaŭ rimarke balancis nee la kapon.

– Ĝis revido, Bol-Kunac, – diris li. – Ĝis revido.

Ili foriris. Viktor pripense ĝisdrinkis la konjakon. Venis kelnero, lia vizaĝo estis ŝvelita, tute kovrita per ruĝaj makuloj. Li komencis purigi la tablon, kaj liaj movoj estis nekutime mallertaj kaj necertaj.

– Ĉu vi estas ĉi tie antaŭ nelonge? – demandis Viktor.

– Jes, sinjoro Banev. De hodiaŭa mateno.

– Kaj Peter, ĉu li malsaniĝis?

– Ne, sinjoro Banev. Li forveturis. Ne eltenis li. Ankaŭ mi, verŝajne, forveturos...

Viktor rigardis na R.Kvadriga.

– Forkonduku vi lin poste en la ĉambron, – diris li.

– Jes, certe, sinjoro Banev, – respondis la kel-

nero per necerta voĉo.

Viktor kvitiĝis, adiaŭe svingis la manon al Teddi, kaj eliris el la restoracio en la vestiblon. Li leviĝis sur la duan etaĝon, venis al pordo de Pavor, levis la manon por ekfrapi, staris iome, kaj, ne frapinte, denove malleviĝis.

La akceptisto, post sia pupitro, kun mirego pririgardis siajn manojn. Liaj manoj estis malsekaj, al ili algluiĝis tufoj da haroj, lia uniforma surtuto estis superŝutita per la haroj, kaj sur la vizaĝo, sur la ambaŭ vangoj, ŝvelis freŝaj grataĵoj. Li ekrigardis na Viktor – liaj okuloj estis konsternitaj. Sed nun ne eblis rimarki ĉiujn tiujn ĉi strangaĵojn, tio estus sentakte kaj kruele, kaj des pli ne eblis paroli pri tio, estis bezonate aspektigi ke okazis nenio, ĉion tion oni devas prokrasti al poste, al morgaŭ aŭ, eble, eĉ al postmorgaŭ. Viktor demandis:

– Kie loĝas tiu... Vi ja scias, juna, kun okulvitroj, ĉiam iras kun la teko.

La akceptisto ekprokrastis. Kvazaŭ serĉante eliron li alrigardis la ŝlosiltabulon, tamen iom poste li respondis:

– En tricent-dek-dua, sinjoro Banev.

– Dankon, – diris Viktor, metante monereton sur la pupitron.

– Sed ili ne ŝatas kiam oni maltrankvilas ilin, – nedecide avertis la akceptisto.

– Mi scias, – diris Viktor. – Mi ne intencis maltrankvili ilin. Mi simple demandis... mi volis diveni estonton. Ĉu vi komprenas: se en la para, tiam ĉio iros bone.

La akceptisto pale smajlis.

– Kiuj ja malagrablaĵoj povas esti ĉe vi, sinjoro Banev? – ĝentile demandis li.

– Ĉiuj povas esti, – suspiris Viktor. – La grandaj kaj la etaj. Bonan nokton.

Li leviĝis sur trian etaĝon moviĝante nehaste, speciale nehaste, kvazaŭ por ĉion pripensi kaj pesi, kaj primediti eblajn sekvojn, kaj konsideri ĉion, je tri jaroj antaŭen sed, verdire, pensis li nur pri tio ke tapiŝon sur la ŝtuparo delonge jam oni devas ŝanĝi, senhariĝis la tapiŝo, elfrotiĝis. Kaj antaŭ frapi pordon de tricent-dek-dua ĉambro – (lukso: du dormoĉambroj kaj gastsalono, televidilo, radioricevilo de alta klaso, fridujo kaj vinŝranko), li preskaŭ voĉe diris:

*«Vi estas krokodiloj, sinjoroj! Tre agrable. Tial mi igos vin manĝegi unu la alian».*

Li devis frapi sufiĉe longe: komence delikate, per ostetoj de la fingroj, kaj kiam oni ne respondis – pli decide – per la pugno, kaj kiam oni ne reagis ankaŭ al tio – sed nur knaris sub iu la plank-breto, kaj oni ekspiris en la serurtruon, – tiam, turniĝinte, per la kalkanumo, jam tute malĝentile.

– Kiu estas tie? – demantis finfine voĉo post la pordo.

– Najbaro, – respondis Viktor. – Malfermu por minuteto.

– Kion vi bezonas?

– Mi devas diri al vi kelkajn vortojn.

– Venu matene, – diris voĉo el post la pordo. – Ni jam dormas.

– Diablo vin prenu, – diris Viktor, koleriĝinte. –

Ĉu vi volas ke oni ekvidu min ĉi tie? Malfermu, kion vi timas?

Klakis la ŝlosilo, kaj la pordo iomete malfermiĝis. En la fendo aperis malbrila okulo de la longa profesiulo. Viktor montris al li malfermitajn manplatojn.

– Kelkajn vortojn, – diris li.

– Eniru, – diris la longa. – Nur sen stultaĵoj.

Viktor venis en la enirĉambron, la longa fermis post li la pordon, kaj ŝaltis lumon. La enirĉambro estis malvasta, duope ili malfacile lokiĝis tie.

– Nu, parolu, – diris la longa.

Li estis en piĵamo, per io malpurigita antaŭe. Mirigita Viktor eksentis ke de la altstatura disvastiĝas alkohola odoro. La dekstran manon li, kiel decas, tenis en la poŝo.

– Do ni konversacios ĉi tie? – informiĝis Viktor.

– Jes.

– Ne, – diris Viktor. – Ĉi tie mi ne konversacios.

– Laŭdezire, – diris la altstatura.

– Laŭdezire, – diris Viktor. – Ja tio estas ne mia afero.

Ili silentis. La altstatura jam senkaŝe priserĉis na Viktor per la okuloj.

– Ŝajnas ke via familnomo estas Banev? – diris li.

– Ŝajnas.

– Aha! – diris la altstatura malserene. – Do kia ja najbaro vi estas? Vi loĝas en dua etaĝo.

– Najbaro laŭ la hotelo, – klarigis Viktor.

– Aha... Do kion vi volas, mi ne komprenas.

– Mi intencas informi vin pri io, – diris Viktor. –

Ekzistas iu ajn informo. Sed mi jam komencas pripensi, ĉu valoras.

– Nu, bone, – diris la altstatura. – Iru ni en la banĉambron.

– Ĉu vi scias, – diris Viktor. – prefere mi foriru.

– Sed kial vi ne volas en la banĉambron? Kial vi kapricas?

– Ĉu vi scias, – diris Viktor, – mi ŝanĝis la decidon. Prefere foriru mi. Finfine tio estas ne mia afero. – Li faris movon.

La altstatura eĉ elgrakis pro disŝirantaj lin kontraŭsentoj.

– Vi, ŝajne, estas verkisto, – diris li. – Aŭ mi misdistingas vin?

– Verkisto, verkisto, – diris Viktor. – Ĝis revido.

– Sed ne, atendu. Kial vi tuj ne diris tion. Iru ni. Jen ĉi tien.

Ili eniris la gastsalonon kun tre multaj kurtenoj – dekstre kurtenoj, maldekstre kurtenoj, rekte, sur la grandega fenestro, kurtenoj. Grandega televidilo en la angulo brilis per la kolora ekrano, la sono estis malŝaltita. El alia angulo na Viktor rigardis, super malfermita ĵurnalo, la okulvitra juna homo, sidanta en mola brakseĝo sub la planklampo. Ankaŭ li estis en piĵamo kaj pantofloj. Apud li sur la gazeta tableto leviĝis kvarangula botelo kaj sifono. La teko videblis nenie.

– Bonan vesperon, – diris Viktor.

La juna homo silente klinis la kapon.

– Tio al mi, – diris la altstatura. – Ne turnu la atenton.

La juna homo silente klinis la kapon, kaj fer-

miĝs per la ĵurnalo.

– Bonvolu ĉi tien, – diris la altstatura. Ili eniris la dekstran dormoĉambron, kaj la altstatura eksidis sur la liton. – Jen brakseĝo, – diris li. – Sidu kaj parolu.

Viktor eksidis. En la dormoĉambro dense odoris tabakfumo kaj oficira parfumo. La altstatura sidis sur la lito kaj rigardis na Viktor, ne elprenante la manon el la poŝo. En la gastsalono kraketis la ĵurnalo.

– Bone, – diris Viktor.

Li ankoraŭ ne plene sukcesis venki la abomenon, sed se li venis ĉi tien, necesis paroli.

– Mi proksimume imagas kio vi estas. Eblas ke mi eraras, kaj tiam ĉio estas en ordo. Sed se mi ne eraras, do al vi estos utile scii ke oni observas vin, kaj penas malhelpi al vi.

– Supozu ni, – diris la altstatura. – Kaj kiu observas nin?

– Pri vi tre interesiĝas homo, nomo de kiu estas Pavor Summan.

– Kio? – diris la altstatura. – Ĉu la sanitara inspektisto?

– Li ne estas sanitara inspektisto. – Jen, fakte, ĉio kion mi volis diri al vi. – Viktor leviĝis, sed la altstatura eĉ ne moviĝetis.

– Supozu ni, – ripetis li. – Sed de kie vi, fakte, scias tion?

– Ĉu tio gravas? – demandis Viktor.

Iom da tempo la altstatura meditis.

– Supozu ni ke ne gravas, – diris li.

– Tio estas via devo – kontroli, – diris Viktor. –

Kaj mi scias nenion pli. Ĝis revido.

– Ja kien vi, atendu, – diris la altstatura. Li kliniĝis al la apudlita tableto, eltiris botelon kaj glason. – Vi tiel volis eniri, kaj jam foriras... Vi ne kontraŭas se el sama glaso?

– Tio depende de kion – respondis Viktor kaj denove eksidis.

– Skotan, – diris la altstatura. – Ĉu taŭgas?

– Ĉu vera skota?

– Vera. Ricevu, – li etendis la glason al Viktor.

– Jen kiel homoj vivas, – diris Viktor kaj el-drinkis.

– Nu, kio ni estas kompare al verkistoj, – diris la altstatura kaj ankaŭ eldrinkis. – Pli bone vi rakontus detale.

– Lasu, – diris Viktor. – Al vi pro tio oni salajron pagas. Mi donis al vi nomon, la adreson vi scias mem, jen okupiĝu vi. Des pli ke mi vere scias ne-nion. Tamen... – Viktor haltis kaj aspektigis ke ĉe li aperis ideo. La altstatura senprokraste kaptiĝis je la hoko.

– Nu, diris li. – Nu?

– Mi scias ke li ŝtelis malsekulaĉon, kaj ke li agis kune kun urbaj legianoj. Kio li estas... Flaman-ta... Juventa...

– Flamin Juventa, – sugestis la altstatura.

– Jen-jen.

– Pri la malsekulaĉo – ĉu tio estas certe? – de-mandis la altstatura.

– Jes. Mi penis malhelpi, sed sinjoro sanitara inspektisto frapis mian kapon per kaprompilo. Kaj poste, dum mi kuŝaĉis tie, ili forveturigis lin per

ĵipo.

– Jen kiel, – prononcis la altstatura. – Do tio estis Summan. Aŭskultu, ja vi estas bravulo, Banev! Ĉu vi volas ankoraŭ da viskio?

– Volas, – diris Viktor.

Kion ajn li diris al si, kiel ajn li admonis kaj agordis sin, al li estis aĉe.

*«Nu, bone», – pensis li. – «Ankaŭ pro tio dankon ke skota, almenaŭ ne turmentiĝos mi. Neniu plezuro, kvankam ili komencos nun vori unu la alian. Golem estis prava: vane mi enmiksiĝis tiun ĉi aferon... Aŭ Golem estas pli ruza ol mi opinias?»*

– Mi petas, – diris la altstatura, etendante al li plenan glason.

## Ĉapitro naŭa

– Kioma horo? – dorme demandis Diana.

Viktor akurate forrazis strion da sapo de la liva zigomo, enrigardis la spegulon kaj poste diris:

– Dormu, etulo, dormu. Fruas ankoraŭ.

– Vere, – diris Diana. Knaretis la kanapo. – La naŭa. Sed kion vi faras tie?

– Mi razas min, – respondis Viktor, derazante sekvan strion da sapo. – Ekvolis mi subite razi min. Razu mi min, ekpensis mi.

– Frenezulo, – diris Diana tra la oscedo. – Vespere vi devis raziĝi. Tutan min gratis vi per viaj pikaĵoj. Kaktuso.

En la spegulo al li estis videble kiel ŝi leviĝis, venis al la brakseĝo, surgrimpis ĝin kun la piedoj, kaj ekis rigardi lin. Viktor palpebrumis al ŝi. Denove ŝi estis alia, tenera-tenera, mola-mola, karesema-karesema, volviĝis kiel sata katino, prizorgita, prikaresita, bonkora. Tute ne tia kia ŝi leviĝis vespere en lian ĉambron.

– Hodiaŭ vi similas katinon, – diris li. – Kaj eĉ ne katinon, sed katineton... Kial vi smajlas?

– Tio ne pri vi. Simple ekmemoris mi ial...

Ŝi oscedis kaj dolĉe etendiĝis. Ŝi dronis en piĵamo de Viktor, el la brakseĝo, el senforma amaso da silko elrigardis nur ŝia mirinda vizaĝo kaj la maldikaj manoj. Kiel el ondo. Viktor ekrazis sin pli rapide.

– Ne rapidu, – diris ŝi. – Trančvundetos vi vin, tutegale mi devas jam veturi.

– Ĝuste tial mi rapidas, – oponis Viktor.

– Nu ne, mi ne ŝatas tiel. Tiel nur gekatoj... Kio pri miaj vestaĵoj?

Viktor etendis la manon kaj tuŝis ŝiajn robon kaj la ŝtrumpojn, dispendigitajn sur la varmiga krado. Ĉio estis seka.

– Kien vi rapidas? – demandis li.

– Sed mi diris al vi. Al Rosŝeper.

– Ial mi memoras nenion. Kio okazis pri Rosŝeper?

– Ja traŭmatiĝis li, – dirs Diana.

– Ha, jes! – diris Viktor. – Jes-jes, vi diris ion. Li elfalis el io. Ĉu forte li difektiĝis?

– Tiu ĉi stultulo, – diris Diana, – decidis subite pri suicido, kaj elĵetiĝis el la fenestro. Ĵetiĝis li kiel

bovo, per la kapo antaŭen, trarompis la framon, sed ĉe tio forgesis li ke troviĝas sur teretaĝo. Difektis li la genuon, ekkriaĉis, kaj kuŝas nun.

– Kial li? – indiferente demandis Viktor. – Ĉu alkohola deliro?

– Io simila.

– Momenton, – diris Viktor, – ĉu tio pro li, pro tiu ĉi kastrita bovo vi du tagoj ne venis al mi?

– Ĝuste! La ĉefkuracisto ordonis al mi sidi apud li, ĉar li, tio estas Rosŝeper, ne povis sen mi. Nenion povis. Eĉ urini. Mi devis imiti lirlon de akvo, kaj rakonti al li pri pisujoj.

– Kion vi komprenas pri tio? – elmurmuris Viktor. – Dum vi rakontis al li pri pisujoj, mi turmentis ĉi tie sola, kaj ankaŭ scipovis nenion, eĉ ne linion mi verkis. Vi ja scias, mi entute ne ŝatas verki, sed dum lasta tempo... Entute mia vivo, lastatempe... – Li haltis.

*«Ĉu tio koncernas ŝin?» – pensis li. – «Kuniĝis ni kaj diskuris»*

– Ha, aŭskultu... Kiam, vi diras, Rosŝeper difektiĝis?

– Antaŭhieraŭ, – respondis Diana.

– Ĉu vespere?

– Jes, – diris Diana, ronĝante biskviton.

– Je la deka vespere, – diris Viktor. – Inter la deka kaj dek-unua.

Diana ĉesis maĉi.

–Ĝuste, – diris ŝi. – Sed de kie vi scias? Ĉu vi akceptis lian telepatian krion?

– Momenton, – diris Viktor. – Mi rakontos al vi

ion interesan. Sed komence – kion vi faris tiam?

– Kion mi faris?... Ha, jen. Tiuvespere, memoras mi, atakis min psiĥozo. Kunvolvis mi la pansbendojn, kaj subite tia angoro ekpremis min, kiel kapdoloro, suicida angoro. Enŝovis mi la vizaĝon en tiujn ĉi pansbendojn kaj ploregas, sed kiel! – multlarme, de la infaneco mi ne ploris tiel...

– Kaj subite ĉio pasis, – diris Viktor.

Diana enpensiĝis.

– Jes... Ne... Tiam subite Rosŝeper ekkriaĉis ekstere, mi ektimis kaj elsaltis...

Ŝi volis diri ankoraŭ ion, sed oni ekfrapis la pordon, ekŝiris la manilon, kaj voĉo de Teddi elraŭkis el la koridoro:

– Viktor! Viktor, vekiĝu! Malfermu Viktor!

Viktor rigidiĝis kun la razilo en la mano.

– Viktor! – raŭkis Teddi, – malfermu! – kaj li freneze turnadis la manilon.

Diana eksaltis, kaj turnis la ŝlosilon. La pordo vaste malfermiĝis, kaj enrompiĝis Teddi, malseka, fuŝvestita, en la mano li tenis fusilon.

– Kie estas Viktor? – raŭke elbojis li.

Viktor eliris el la banĉambro.

– Kio okazis? – demandis li. Ĉe li ekfrapis la koro... – Aresto... Milito...

– Infanoj foriris, – peze spirante diris Teddi. – Vestiĝu, infanoj foriris!

– Momenton, – diris Viktor. – Kiuj infanoj?

Teddi ĵetis la fusilon sur la tablon, sur amason da skribita, strekita papero.

– Forlogis ili la infanojn, bastardoj! – ekkriaĉis li. – Forlogis, serpentaĉoj! Nu, fino! Sufiĉas, toleris

ni... Sed nun fino!

Viktor komprenis ankoraŭ nenion, li vidis nur ke Teddi estas furioza. Tian li vidis Teddi nur unufoje, kiam dum granda skandalo en la restoracio oni, dum la tumulto, rompis la kason. Viktor konsterne palpebrumis, Diana kaptis de la brakseĝo la vestaĵojn, englitis la banĉambron, kaj fermis post si la pordon. Kaj ĉi-momente akre kaj nerve ekknaris la telefono. Viktor kaptis la aŭskultilon. Tio estis Lola.

– Viktor, – lamentis ŝi. – Mi komprenas nenion, Irma malaperis ien, lasis skribaĵon ke ŝi neniam revenos, kaj ĉirkaŭe oni diras ke infanoj foriris el la urbo... Mi timas! Faru ion... – Ŝi preskaŭ ploris.

– Bone, bone, momenton, – diris Viktor. – Donu la pantalonon vesti.

Li ĵetis la aŭskultilon kaj turniĝis al Teddi. La koktelisto sidis sur la malordigita lito, kaj murmurante terurajn vortojn verŝis en glason restaĵojn el ĉiuj boteloj.

– Momenton, – diris Viktor. – Sen paniko. Mi tuj...

Li revenis en la banĉambron, kaj ekis haste ĝisrazi la sapumitan mentonon. Li tuj kelkfoje tranĉvundetis sin, al li forestis tempo akrigi la razilon, kaj Diana dum tio elsaltis el sub la duŝo, kaj eksusuris post lia dorso per la vestaĵoj; ŝia vizaĝo estis kruda kaj decida, kvazaŭ ŝi prepariĝis al pugnobatalo, sed ŝi estis tute trankvila...

*...Kaj infanoj iris per senfina griza kolono sur grizaj disfluitaj vojoj, iris stumblante, glitiĝante kaj falante sub la pluvego, iris kliniĝinte, malsekiĝintaj ĝisoste, enpremante en la*

*bluiĝintaj manetoj kompatindajn malsekiĝintajn pakaĵetojn, iris etaj, senhelpaj, nekomprenantaj, iris plore, iris silente, retrorigardante, iris intertenante la manojn, sed sur flankoj de la vojo paŝadis morozaj nigraj figuroj sen vizaĝoj, kaj anstataŭ la vizaĝoj estis nigraj tukoj, kaj super la tukoj senkompate kaj fride rigards nehomaj okuloj; kaj manoj, vestitaj en nigrajn gantojn, kunpremis mitraletojn, kaj la pluvo verŝiĝis sur la nigran ŝtalon, kaj gutoj tremis kaj ruliĝis sur la ŝtalo... «Stultaĵo», – ekpensis Viktor, – «stultaĵo, tio estas tute ne tio, tute ne nun, jes, mi vidis tion, tio estis tre delonge, sed nun tute ne tiel...»*

*... Ili foriris gaje, kaj la pluvo estis amiko por ili, ili gaje plaŭdis sur la flakoj per la varmegaj nudaj piedoj, ili gaje babilis kaj kantis, kaj ne retrorigardis, ĉar ili forgesis jam ĉion, ĉar ĉe ili estis nur estonto, ĉar ili por ĉiam forgesis sian ronkantan kaj snufantan antaŭmatenan urbon, kuniĝon da cimaj kavoj, neston da etaj pasioj kaj etaj deziroj, ventregon gravedan per teruraj krimoj, senĉese eliganta krimojn kaj krimajn intencojn, same al formika reĝino kiu senĉese eligas la ovojn; ili foriris pepante kaj babilante, kaj malaperis en nebulo, dum ni, ebriaj, sufokiĝis en la premita aero, trafitaj per aĉaj koŝmaroj kiujn ili neniam vidis kaj neniam vidos...*

Li vestis la pantalonon, saltante sur unu piedo kiam la vitroj ektintadis, kaj densa mekanika muĝo penetris la ĉambron. Teddi haste ĵetiĝis al la fene-

stro, ankaŭ Viktor alkuris la fenestron, sed post la fenestro estis sama ĉiama pluvo, malplena malseka strato, kaj nur preterveturis iu per biciklo, malseka krudtola sako, pene movanta la piedojn. Kaj la vitroj daŭre tintadis kaj sonoretis, kaj la malalta angora muĝo daŭriĝis, kaj post minuto al ĝi aldoniĝis abruptaj plendaj fajfegoj.

– Iru ni, – diris Diana. Ŝi estis jam en la pluvmantelo.

– Ne, atendu, – diris Teddi. – Viktor, ĉu vi havas armilon? Pistolon iun, aŭ mitraleton... ĉu?

Viktor ne respondis, li kaptis sian pluvmantelon, kaj ili triope enkuris per la ŝtuparo la vestiblon, tute jam malplenan, sen la pordisto kaj la akceptisto. Ŝajnis ke en la hotelo restis neniu, nur en la restoracio sidis ĉe la tablo R.Kvadriga, nekomprene turnanta la kapon kaj, ŝajne, delonge jam atendanta la matenmanĝon. Ili elsaltis sur la straton, kaj engrimpis ŝarĝaŭton de Diana – ĉiuj tri en la ŝoforan kupeon. Diana eksidis ĉe la stirilo, kaj ili ekhastis en la urbo. Diana silentis, Viktor fumis, penante kolekti la pensojn, kaj Teddi daŭre eligis neverŝajnajn sakraĵojn, kaj eĉ Viktor ne komprenis signifon de multaj vortoj, ĉar tiujn vortojn povis scii nur Teddi – orfeja rato, edukito de havenaj mizerkvartaloj, poste spekulisto pri narkotaĵoj, poste elĵetisto en bordelo, poste soldato de entombiga brigado, poste bandito kaj marodisto, kaj poste bufedisto, bufedisto, bufedisto kaj denove bufedisto.

En la urbo homoj preskaŭ ne videblis, nur sur angulo de Suna strato Diana haltis por preni en la

ŝarĝujon konsternitan geedzan paron. Basa muĝo de alarm-sirenoj kaj altsonaj fabrikaj fajfilegoj ne ĉesiĝis, kaj estis io apokalipsa en tiu ĉi ĝemo de la mekanikaj voĉoj super la senhoma urbo. Ĉio premiĝis interne, estis deziro kuri ien kaj ĉu kaŝiĝi, ĉu pafadi, kaj eĉ "Fratoj je racio", sur la stadiono, puŝadis la pilkon sen kutima entuziasmo, kaj kelkaj el ili, malferminte la buŝojn, ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ penante kompreni ion.

Sur la ŝoseo, post la limkvartaloj, estis pli kaj pli multe da homoj. Iuj el ili iris piede, sufokiĝante en la pluvo, bedaŭrindaj, timigitaj, malbone komprenantaj kion ili faras kaj por kio. Aliaj ruliĝis per bicikloj, kaj ankaŭ ili perdis jam la fortojn, ĉar ili devis veturi kontraŭ la vento. Kelkfoje la kamiono preterveturis lasitajn aŭtojn, ĉu difektiĝintajn, ĉu senkarburaĵajn pro la hasto, kaj unu aŭto enveturis defluejon. Diana haltadis kaj prenis ĉiujn, do, post nelonge, la ŝarĝujo ekestis ŝtopita komplete. Viktor kaj Teddi ankaŭ relokiĝis en la ŝarĝujon, lasinte lokojn al virino kun eta bebo kaj al iu duonfreneza maljunulino. Poste restis neniu loko ankaŭ en la ŝarĝujo, kaj Diana jam ne haltis, kaj la kamiono hastis antaŭen, devancante kaj superverŝante per torentoj da akvo dekojn kaj centojn da homoj, tiriĝantaj al la leprulejo. Kelkfoje la kamionon devancis leĝeraj aŭtoj, ŝtopitaj per homoj, motorcikloj, kaj ankoraŭ unu ŝarĝaŭto atingis ilin, kaj ekveturis post ili. Diana kutimiĝis veturigi konjakon por Rosŝeper aŭ peli la malplenan aŭton en ĉirkaŭaĵoj por propra plezuro, tial en la ŝarĝujo estis time. Sidi povis ne ĉiuj, ne estis loko, kaj la starantoj kroĉiĝis

unu je alia, kaj je kapoj de la sidantoj, kaj ĉiu penis ne esti proksima al la rando, kaj oni diris nenion – ĉiuj nur spiregis kaj sakris, kaj unu virino senĉese ploris, kaj iris pluvo – tia, kiun Viktor vidis neniam en sia vivo, li eĉ ne imagis ke en mondo okazas tiaj pluvoj – densa tropika pluvego, tamen ne varma sed frida, miksita kun hajlo, kaj forta vento pelis ĝin oblikve kontraŭ la trafiko. Videbleco estis aĉa – dek kvin metroj antaŭe kaj la dek kvin malantaŭe, kaj Viktor tre timis ke Diana, aldone al ĉio, renversos iun sur la ŝoseo aŭ frapiĝos je bremsintan aŭton. Sed ĉio pasis bonorde, nur oni forte premis piedon de Viktor, kiam ĉiuj en la ŝarĝujo lastfoje falis unu sur alian, kaj la kamiono haltis abrupte antaŭ grandega kuniĝo da aŭtoj kontraŭ pordego de la leprulejo.

Verŝajne tuta urbo kolektiĝis ĉi tie. Pluvo forestis, kaj ŝajnis ke la urbo fuĝis ĉi tien saviĝante de diluvo. Dekstre kaj maldekstre de la ŝoseo, ĝis kiom estis videble, distiriĝis laŭ la pikdrato milhoma amaso, en kiu dronis disĵetitaj, senorde starantaj malplenaj aŭtoj – luksaj longaj limuzinoj, eluzitaj personaŭtoj kun krudtolaj suproj, kamionoj, busoj, kaj eĉ unu aŭtogruo, sur levstango de kiu sidis kelkaj homoj. Super la homamaso pendis obtuza bruo, iam aŭdiĝis penetraj krioj.

Ĉiuj elsaltis el la ŝarĝujo, kaj Viktor tuj perdis el la vido na Diana kaj na Teddi, ĉirkaŭe estis nur nekonataj vizaĝoj, mornaj, senkompataj, embarasitaj, plorantaj, kriantaj, kun suprenĵetitaj pro sveno okuloj, nuddentaj... Viktor penis trabatiĝi al la pordego, sed post kelkaj paŝoj li senespere

ŝtopiĝis. Homoj staris per densa muro, kaj neniu deziris cedi sian lokon, oni povis puŝi ilin, piedbati, ili eĉ ne retrorigardis, ili nur entiris la kapojn en la ŝultrojn, kaj ĉiam penis ŝoviĝi antaŭen, pli proksimen al la pordego, pli proksimen al siaj infanoj. Ili leviĝis sur la piedfingroj, ili eltiris la kolojn, sed post la ondiĝanta amaso da kapuĉoj kaj ĉapeloj videblis nenio.

– Dio, pro kio? Pri kio ni pekis, Dio?

– Kanajloj! Delonge oni devis fortranĉi ilin. Ja diris saĝaj homoj...

– Sed kie estas la urbestro? Pri kio, diable, li okupiĝas? Kie estas polico? Kie estas ĉiuj tiuj ĉi grandventruloj?

– Sim, oni pe-premos min... Sim, mi sufokiĝas! Ho Sim...

– Kion ni rifuzis al ili? Pri kio avaris? De ni deŝiris ni pecon, vivis kiel trampoj por vesti ilin...

– Premu ni ĉiuj samtempe – kaj la pordego al diablo...

– Sed mi lin neniam eĉ per la fingro tuŝis. Mi vidis kiel vi la vian vergis, sed ĉe ni en la domo tio ne okazis...

– Ĉu vi vidis la mitralojn? Kion tio signifas, ĉu en propran popolon ili pafos? Pro niaj ja infanoj?

– Munĉjo! Munĉjo! Munĉjo! Munĉjo mia! Munĉjo!

– Sed kio estas tio, Dio? Ja tio estas frenezaĵo! Kie oni vidis tion?

– Ne gravas, la legianoj montros al ili... Ili de malantaŭe, ĉu vi komprenas? Malfermos ili la pordegon, kaj tiam ni ekpremos...

– Sed ĉu vi vidis la mitralojn? Jen kia afero...

– Enlasu! Ja enlasu vi min! Mia filino estas tie!

– Ili delonge intencis, ja vidis mi, sed time estis demandi.

– Sed eble tio ne estas terura? Kio, ĉu ili vere estas bestoj? Ja malgraŭ ĉio ili ne estas okupantoj, ja ne por mortpafi oni kondukis la infanojn, ne por en fornojn...

– S-sangon! Per la dentoj ŝiros mi!

– Jes, ŝajne ni vere merdiĝis, se niaj propraj infanoj foriris de ni al la infektuloj...

– Ĉesu, ili memvole foriris, neniu pelis ilin perforte...

– Hej, ĉe kiu estas fusiloj? Eliru! Ĉe kiu fusiloj estas, mi diras? – Eliru al mi, ĉi tien, jen mi estas!

– Tio estas miaj infanoj, estimata sinjoro, mi ilin naskis, do mi komandos pri ili laŭ mia deziro!

– Sed kie estas polico, ho Dio!

– Oni devas sendi telegramon al sinjoro prezidento! Kvin mil subskriboj – tio ne estas ŝerco!..

– Virinon vi premis! Deŝoviĝu, bastardo! Ĉu ne vidas vi?

– Munĉjo mia! Munĉjo, Munĉjo!

– De tiuj peticioj, diable, estas tute neniu utilo. Ĉe ni oni ne ŝatas peticiojn. Frapos ili per tiu peticio la cerbojn...

– Malfermu je kukolo la pordegon!.. Malsekulaĉoj favaj, serpentaĉoj!

– Pordego!

– Malfermu la pordegon!

Viktor ekgrimpis malantaŭen. Tio estis malfacile, kelkfoje oni lin batis, tamen li elgrimpis, penetris al la kamiono, kaj denove engrimpis la

ŝarĝujon.

Super la leprulejo staris nebulo, je dek metroj trans la barilo videblis jam nenio. La pordego estis fortike fermita. Antaŭ ĝi restis malplenejo, kaj en tiu ĉi malplenejo staris ĉirkaŭ deko da soldatoj de interna servo en la kaskoj, ŝovitaj sur la okulojn. Ili dismetis la piedojn, kaj celis la mitraletojn en la homamason.

Sur perono de la gardeja budo staris oficiro. Leviĝante pro la streĉiĝo sur la piedfingrojn li plenvoĉe kriis ion en la homamason, sed li ne estis aŭdebla. Super tegmento de la gardeja budo altiĝis en la nebulon ligna turo, kiel grandega etaĝero. Sur ĝia supra placeto staris mitralo kaj moviĝis homoj vestitaj grize. Poste tie, trans la pikdrato, preterruliĝis laŭ la barilo duonraŭpa blendaŭto, preskaŭ neaŭdeble tintante per la fero; ĝi saltetis kelkfoje sur la terbuloj, kaj malaperis en la nebulo. Ĉe vido de la blendaŭto la homamaso silentiĝis ĝis tiom ke ekestis eĉ aŭdeblaj penaj kriaĉoj de la oficiro: "...Trankvilo... Mi havas ordonon... En la hejmojn...", poste la homamaso denove ekzumis, ekgrumblis, ekmuĝis.

Antaŭ la pordego komenciĝis moviĝo. Inter malhelaj, bluaj, grizaj pluvmanteloj ekbrilis konataj ĝis naŭzo kupraj kaskoj kaj oraj ĉemizoj. Ili aperadis en la homamaso kiel makuloj da lumo, trapuŝiĝis en la malplenejon, kaj tie kunverŝiĝis en flav-oran amason. Fortegaj buboj en oraj ĝis-lagenuaj ĉemizoj, zonigitaj per armeaj oficiraj pezbukaj zonoj, en la poluritaj kupraj kaskoj, pro kiuj la legiulojn oni nomis simple fajrobrigadistoj, kun

kurtaj masivaj klaboj, kaj ĉiu estas makulita per emblemoj de la Legio – emblemo sur la buko, emblemo sur la liva maniko, emblemo sur la brusto, emblemo sur la klabo, emblemo sur la vizaĝaĉo, sur sporteca muskola muzelo kun lupaj okuloj... kaj ĵetonoj, konstelacioj da ĵetonoj, ĵetono de Avangarda Pafanto, ĵetono de Avangarda Paraŝutisto kaj Avangarda Subakvisto, kaj ankoraŭ ĵetonoj kun portretoj de sinjoro prezidento kaj de lia bofilo, fondanto de la Legio, kaj de lia filo, superĉefo de la Legio... Kaj en ĉies poŝo – bombo kun larmiga gaso, kaj se eĉ unu el tiuj ĉi ŝtipoj ĵetos la bombon, pro impeto de huligana entuziasmo, – ekfrapos mitralo sur la turo, ekfrapos mitraloj de la blendaŭto, ekfrapos mitraletoj de la soldatoj, kaj ĉiuj sur la homamason, sed ne sur la orajn ĉemizojn. Legiuloj liniiĝis spalire antaŭ la soldatoj, kaj antaŭ la spaliro impetis Flamin Juventa, la neveto, kaj Viktor komencis jam malespere ĉirkaŭrigardi, ne sciante kion fari, sed tiam al la oficiro oni elportis el la gardejo megafonon, kaj la oficiro ege ekĝojis, eksmajlis eĉ, kaj ekmuĝis per tondra voĉo, sed li sukcesis elmuĝi nur: "Mi petas atenton! Mi petas la kuniĝintojn..." Sed poste la megafono, ŝajne, denove difektiĝis; la oficiro, paliĝante, komencis kun duobla fervoro kuradi kaj svingadi per la megafono, sed subite la homamaso minace ekmuĝis – ŝajnis ke ekkriis ĉiuj kune, kaj tiuj kiuj jam kriis antaŭe, kaj tiuj kiuj antaŭe silentis aŭ simple konversaciis aŭ ploris, aŭ preĝis, kaj ankaŭ Viktor ekkriis, teruriĝinta pro penso kio okazos.

– Forigu la ŝtipojn! – kriis li. – Forigu la fajro-

brigadistojn! Tio estas morto! Ne faru tion! Diana!

Ne estis sciate kiu kaj kion kriis en la homamaso, sed la homamaso ĝis tiam senmova, komencis egalritme balanciĝi, kaj la oficiro, ellasinte la megafonon, blanka, kun ruĝaj makuloj, ekis retroiri al pordo de la gardejo; vizaĝoj de la soldatoj sub la kaskoj hirtiĝis kaj bestiĝis, kaj supre, sur la turo, oni ne moviĝis plu, tie oni rigidiĝis kaj celis. Kaj tiam ekaŭdiĝis **V**oĉo.

Ĝi estis kiel tondro, ĝi venis de ĉiuj flankoj samtempe kaj ĝi tuj superis ĉiujn aliajn sonojn. Ĝi estis trankvila, eĉ melankolia, iu senmezura enuo aŭdiĝis en ĝi, senmezura indulgemo, kvazaŭ parolis iu grandega, malestimanta, tromemfida, staranta dorse al la bruanta homamaso, parolis trans la ŝultro, deŝiriĝinte por momento de siaj gravaj okupoj al tiu ĉi malgravaĵo, finfine incitinta lin.

– Ja ĉesu vi kriaĉi, – diris la **V**oĉo. – Ĉesu svingi la manojn kaj minacadi. Ĉu vere estas tiel malfacile ĉesi la babiladon kaj dum kelkaj minutoj trankvile mediti? Ja vi perfekte scias ke viaj infanoj foriris de vi laŭ propra deziro, neniu devigis ilin, neniu tiris ilin je la kolumoj. Ili foriris ĉar vi ekestis netolereble malagrablaj al ili. Ne volas ili vivi plu tiel kiel vivas vi, kaj vivis viaj antaŭuloj. Vi tre ŝatas imiti la antaŭulojn, kaj opinias tion homa avantaĝo, sed ili – ne. Ne volas ili elkreski drinkuloj kaj malĉastuloj, ekesti hometoj, sklavoj, konformeculoj, ne volas ke oni faru el ili krimulojn, ne volas ili viajn familiojn kaj vian regnon.

La voĉo eksilentis por minuto. Kaj dum tuta tiu ĉi minuto oni aŭdis neniun sonon, – nur iun

susuron, kvazaŭ susuris la nebulo, rampanta super la tero. Poste la voĉo ekparolis denove:

– Vi povas esti tute trankvilaj pri viaj infanoj. Al ili estos bone – pli bone ol ĉe vi, kaj multe pli bone ol al vi mem. Hodiaŭ ili ne povas akcepti vin, sed de morgaŭa tago venu. En Ĉevala valeto estos ordigita domo por renkontoj, post dek-kvina horo venu eĉ ĉiutage. Ĉiutage de la urba placo deiros tri grandaj busoj. Tio estos malmulte, almenaŭ morgaŭ; via urbestro prizorgu la aldonajn transportilojn.

La voĉo denove eksilentis. La homamaso staris senmove kiel muro. Homoj kvazaŭ timis moviĝi.

– Sed konsideru, – daŭrigis la voĉo. – De vi mem dependas ĉu volos la infanoj renkontiĝi kun vi. Dum unuaj tagoj ni ankoraŭ povos devigi la infanojn venadi por la renkontoj, eĉ se ili ne volos, sed poste... Do pripensu. Kaj nun disiru. Vi malhelpas kaj al ni, kaj al la infanoj, kaj al vi mem. Kaj mi tre rekomendas al vi: pensu, penu pripensi kion vi povas doni al la infanoj. Rigardu vin mem. Vi naskis kaj kripligas ilin, farante ilin konformaj al vi. Pripensu tion, kaj nun disiru.

La homamaso restis senmova, eblas ke ĝi penis pensi. Viktor ekpenis. Tio estis pensŝiraĵoj. Ne pensoj eĉ, sed simple ŝiraĵoj de elmemoroj, pecoj de iuj konversacioj, stulte kolorigita vizaĝo de Lola...

*Sed eble pli bone estos abortigi? Por kio nun tio al ni... La patro kun tremantaj pro la furiozo lipoj... Mi faros el vi homon, hundido vi aĉa, mi haŭton de vi deŝiru... Ĉe mi aperis dek-du-jara filino, ĉu vi povas ŝin lokigi ien dece?... Irma scivole rigardas duonvestitan*

*Rosŝeper... Ne na Rosŝeper, sed min... al mi, fakte, estas honte, sed kion ŝi komprenas, nazmukulino?.. Huŝ sur sian lokon!.. Jen pupo al vi, bona pupo!.. Ankoraŭ estas frue, elkreskos – komprenos vi...*

– Nu, kial vi staras? – diris la tondra **V**oĉo. – Disiru!

Atakis rigida malvarma vento, ĝi frapis la vizaĝon kaj trankviliĝis.

– Iru ja! – diris la **V**oĉo.

Kaj denove atakis vento, jam tute kompakta, kiel peza malseka manplato – ĝi apogis la vizaĝon, ekpuŝis kaj malaperis. Viktor sekigis la vangojn, kaj ekvidis ke la homamaso ekis retroiri. Iu vokis laŭte, ekaŭdiĝis krioj, sonantaj nekonvinke, ĉirkaŭ aŭtoj kaj busoj aperis etaj vorticoj. En ŝarĝujon de la kamiono oni ekgrimpis de ĉiuj flankoj, kaj ĉiuj ekrapidis, depuŝante unu la alian, grimpis en pordetojn de la aŭtoj, netolereme distiris biciklojn, kunkroĉitajn per la stiriloj; ekkrakadis la motoroj, kaj multaj foriris piede, ofte retrorigardante, sed ne la soldatojn, ne mitralon sur la turo, ne la blendaŭ-ton, kiu alruliĝis kun fera klakado kaj ekstaris videbla al ĉiuj. Viktor sciis kial ili retrorigardas kaj kial rapidas, ĉe li brulis la vangoj, kaj se li timis ion, do tion ke la **V**oĉo denove diros: "Iru!" kaj denove la malseka peza manplato abomenmaniere puŝos lian vizaĝon. Grupeto da stultuloj en la oraj ĉemizoj ĝis nun nedecide tretiĝis surloke antaŭ la pordego, sed ili ekestis jam malpli multaj, kaj al la restintoj venis la oficiro kaj bojis sur ilin, impona, decida, plenu-manta sian devon, kaj ankaŭ ili ekretroiris, poste

turniĝis kaj ektiriĝis for, dum la iro levante de la tero la grizajn, bluajn, malhelajn pluvmantelojn, kaj jen restis jam eĉ ne unu ora makulo, kaj pretere ruliĝis busoj, leĝeraj aŭtoj, kaj homoj en la ŝarĝujo, maltrankvile-senpacience ĉirkaŭrigardis, demandis unu la alian: "Sed kie estas la ŝoforo?"

Poste de ie elplonĝis Diana, Diana Furioza. Ŝi leviĝis sur la ŝtupeton, enrigardis la ŝarĝujon, ekkriis kolere:

– Nur ĝis la vojkruciĝo! La aŭto iras en la sanatorion! – kaj neniu kuraĝis oponi, ĉiuj estis nekutime kvietaj kaj konsentaj pri ĉio. Teddi ne aperis. Verŝajne lin prenis alia aŭto. Diana turnis la kamionon, kaj ili ekveturis sur la konata betona ŝoseo, devancante grupojn da piedirantoj kaj biciklistojn, kaj ilin devancis troŝarĝitaj personaŭtoj, peze kaŭrantaj sur la amortiziloj. Pluvo forestis, estis nur nebulo kaj ŝutiĝis etetaj gutoj. Pluvo komenciĝis nur kiam Diana venigis la kamionon al la vojkruciĝo; la homoj elgrimpis el la ŝarĝujo, kaj Viktor residis en la kajuton.

Ili silentis ĝis la sanatorio mem. Diana tuj foriris, laŭ ŝiaj vortoj al Rosŝeper, kaj Viktor, liberiĝinte de la pluvmantelo, falis en sia ĉambo sur la liton, ekfumis, kaj ekrigardis la plafonon. Dum horo aŭ du li senĉese fumis, turniĝis, leviĝis, vagadis en la ĉambro, sensence transrigardis la fenestron, kunŝovis kaj denove disŝovis la kurtenojn, trinkis akvon el la krano, ĉar lin turmentis soifo, kaj denove falis sur la liton.

*«... Humiligo», – pensis li. – «Jes, certe. Oni vangofrapis, nomis ŝlimulo, forpelis kiel*

*tedan almozulon; tamen tio estis patroj kaj patrinoj, kaj ili amis siajn infanojn, batis ilin, sed estis pretaj fordoni la vovojn por ili, malĉastigis ilin per sia ekzemplo, tamen ne speciale, sed pro la malklereco... La patrinoj naskis ilin en turmentoj, kaj la patroj nutris kaj vestis ilin, kaj fieris pri siaj idoj, fanfaronis pri ili, ofte malbenante ilin, sed ne imagante sian vivon sen ili... kaj vere ilia vivo tute malpleniĝis nun, restis tute nenio. Do ĉu decas rilati ilin tiel kruele, tiel malestime, tiel malvarme, tiel racie, kaj eĉ bati, adiaŭe, la vizaĝaĉojn...*

*Ĉu veras, al diablo, ke ĉio animal-devena estas aĉa? Eĉ patrineco, eĉ smajlo de madonoj, iliaj karesaj molaj manoj, prezentantaj mamon al la bebo... Jes, certe, instinkto, kaj tuta religio, konstruita sur instinkto... verŝajne problemas tio ke tiun ĉi religion oni penas disvastigi ankaŭ pluen, sur edukon, kie laboras jam neniuj instinktoj, kaj se laboras, do nur por malutili... ĉar lupino diras al siaj lupidoj: «Mordu kiel mi», kaj tio sufiĉas, kaj leporino instruas la leporidojn: «Forkuru kiel mi», kaj ankaŭ tio sufiĉas, tamen homo instruas homidon: «Pensu kiel mi», sed tio estas jam krimo... Sed tiuj ĉi – malsekulaĉoj, infektuloj, serpentaĉoj, kio ajn sed ne homoj, minimume superhomoj – kiel ĉe ili? Komence: «Rirgardu kiel oni pensis antaŭ vi, rigardu kio okazis pro tio, ja tio malbonas ĉar tio kaj tio, dum devis esti tiel kaj tiel. Ĉu rigardis vi? Kaj*

*nun komencu pensi mem, pensu kiel fari por ke ne okazu tio kaj tio sed okazu tiel kaj tiel. Sed mi ne scias kio estas tiuj ĉi "tio-tio" kaj "tiel-tiel" kaj, entute, ĉio tio jam estis, ĉion tion oni jam elprovis; jes, rezultiĝis apartaj bonaj homoj, sed ĉefa amaso marŝaĉis malnovan vojon, turniĝante nenien, niamaniere, simplamaniere... sed kiel li eduku sian idon se lia patro ne edukis lin sed instruaĉis: «Mordu kiel mi, kaŝiĝu kiel mi», kaj same instruaĉis avo de lia patro, kaj la avon – la praavo, kaj tiel ĝis profundo de kavernoj, ĝis harkovritaj pikileg-portantoj kiuj voris mamutojn. Jes, mi kompatas ilin, tiujn ĉi senharajn posteulojn, kompatas ilin ĉar mi kompatas min mem. Sed al tiuj, – al tiuj ni estas indiferentaj, tute ne estas ni bezonataj al ili, kaj ne intencas ili reeduki nin, ne intencas ili eĉ eksplodi malnovan mondon, ne interesiĝas ili pri la malnova mondo, ĉe ili estas siaj problemoj, kaj de malnova mondo ili postulas nur tion – ke oni ne tedu ilin. Nun tio ekeblis, nun oni povas komerci ideojn, nun estas potencegaj aĉetantoj de ideoj, kaj ili gardos vin, tutan mondon enpelos ili post pikdraton, por ke ne malhelpu al vi malnova mondo, oni nutros vin, oni prizorgos vin... Oni per plej antaŭvida maniero akrigos la hakilon, per kiu vi hakas branĉon sur kiu ili pompe sidaĉas, brilante per la pasamentoj kaj ordenoj...*

*...Kaj, diablo prenu, tio estas si-maniere grandioze – oni provis jam ĉion, nur tion oni*

*ne provis: malvarman edukon sen rozaj nazmukoj, sen larmoj... kvankam kion mi balbutas, de kie mi scias kiu eduko estas tie ĉe ili... tamen tutegale – krueleco, malestimo... ja videblas tio. Nenion ili sukcesos, ĉar bone, – racio, meditu, lernu, analizu, sed kio pri patrinaj manoj, karesaj manoj kiuj forigas doloron kaj faras mondon varma? Kaj pika hararo de patro, kiu ludas pri milito kaj tigro, instruas bokson kaj estas plej forta, kaj scias plej multe en la mondo? Ja ankaŭ tio estis! Ne nur akutkriaj (aŭ silentaj) kvereloj de la gepatroj, ne nur leda zono kaj ebria balbuto, ne nur senorda orelŝirado, kiun subite kaj nekomprene anstataŭas konvulsia donacado de bombonoj kaj kupro por kino... Tamen de kie mi scias – eble ĉe ili estas ekvivalento al ĉio bona kio estas en patrineco kaj patreco... Kiel Irma rigardis tiun malsekulaĉon!.. Kia do oni devas esti por ke oni rigardu onin tiel... Tamen ĉiuokaze nek Bol-Kunac, nek Irma, nek la akna nihilisto-akuzanto vestos iam orajn ĉemizojn. Ĉu tio estas malmulte? Ne, diablo prenu, – de homoj mi bezonas nenion pli!..»*

*«Momenton», – diris li al si. – «Trovu vi plej gravan. Ĉu vi pro aŭ kontraŭ ili? Ekzistas ankaŭ tria eliro: indiferento, sed mi ne indiferentas. Ho kiel mi volus esti cinikulo, kiel simple kaj lukse vivi cinike!.. Kaj jen kio – tutan vivon oni faras el mi cinikulon, oni penas, elspezas gigantajn rimedojn, elspezas kuglojn, florojn da elokvento, paperon, ne avaras pug-*

*nojn, ne avaras homojn, nenion avaras, nur por ke mi ekestu cinikulo, – sed mi neniel... Nu bone, bone. Tamen: pro aŭ kontraŭ? Certe kontraŭ, ĉar mi ne toleras neglekton, malamas ĉiujn elitojn, malamas ĉiun netoleremon, kaj ne ŝatas, ho kiel mi ne ŝatas kiam oni batas mian vizaĝaĉon kaj pelas for... Kaj mi – pro, ĉar mi ŝatas homojn saĝajn, talentajn, kaj malamas stultulojn, malamas senintelektulojn, malamas orajn ĉemizojn, malamas faŝistojn... Kaj estas klare, certe, ke tiel mi difinos nenion, mi tro malmulte scias pri ili, kaj el tio kion mi scias, el tio kion mi vidis mem, plej bone videblas flankoj malbonaj – krueleco, malestimo, senhomeco, kaj fizika kripleco, kio ankaŭ gravas... Kaj jen kio okazas: pro ili – Diana, kiun mi amas, kaj Golem, kiun mi ŝatas, Irma, kiun mi amas, kaj Bol-Kunac, kaj la akna nihilisto... Kaj kiu kontraŭ? La urbestro estas kontraŭ, olda kanajlo, faŝisto kaj demagogo, kaj la policestro, koruptulo, kaj Rosŝeper Kant, kaj stultulino Lola, kaj bando da oraj ĉemizoj, kaj Pavor... Tamen, de alia flanko, pro ili – altstatura profesiulo kaj ankaŭ iu generalo Pferd – ne toleras mi generalojn, sed kontraŭ – Teddi kaj, verŝajne, multaj aliaj samaj al Teddi. Jes, per plimulto da voĉoj oni ĉi tie decidos nenion. Tio similas demokratiajn balotojn: plimulto ĉiam pro bastardoj...»*

Je la dua venis Diana, Diana Gaja Ordinara, en strikte zonigita blanka robo, kosmetigita kaj hararanĝita.

– Kiel la laboro? – demandis ŝi.

– Brulas, – respondis li. – Forbrulas mi, lumante al aliaj.

– Jes, fumo multegas. Kial vi ne malfermis la fenestron... Ĉu vi volas vori?

– Jes, diablo prenu! – diris Viktor. Li ekmemoris ke ne matenmanĝis.

– Tiam, diablo prenu, iru ni!

Ili malleviĝis en la sanatorian manĝejon. "Fratoj je racio", malhelaj pro la fizika laciĝo, dece kaj silente glutis ĉe longaj tabloj la dietan supon. La dika trejnisto, vestita en striktan bluan ĵerzon, iradis post iliaj dorsoj, frapetis la ŝultrojn, taŭzis la hararojn, kaj atente enrigardis la telerojn.

– Nun mi konatigos vin kun unu homo, – diris Diana. – Li tagmanĝos kune kun ni.

– Kio li estas? – malplezure informiĝis Viktor. Li preferus silenti dum la manĝado.

– Mia edzo, – diris Diana. – Mia estinta edzo.

– Kio ja, – diris Viktor. – Kio ja... tre agrablas.

*«Kial tio venis al ŝi», – pensis li malgaje. – «Kaj kiu bezonas tion».*

Li plende ekrigardis na Diana, sed ŝi jam rapide kondukis lin al ofica tableto en la malproksima angulo. La edzo leviĝis renkonten al ili – flavvizaĝa, ĝibnaza, en malhela kostumo kaj en nigraj gantoj. Li ne donis al Viktor la manon, sed simple kliniĝis kaj nelaŭte diris:

– Saluton, mi estas ĝoja vidi vin.

– Banev, – prezentiĝis Viktor kun falsa bonkoreco, kiu atakis lin ĉe vido de edzoj.

– Ni, fakte, estas jam konataj, – diris la edzo. – Mi estas Zurzmansor.

– Ha jes! – eksklamaciis Viktor. Jes, certe. Mia memoro, devas mi diri al vi... – Li eksilentis. – Momenton, – diris li. – Kiu Zurzmansor?

– Pablo Zurzmansor. Vi, verŝajne, legis min, kaj antaŭnelonge vi eĉ sufiĉe energie defendis min en la restoracio. Krom tio ni ankoraŭfoje renkontiĝis en unu loko, ankaŭ ĉe malfeliĉaj cirkonstancoj... Sidu ni. Viktor eksidis.

*«Nu, bone», – pensis li. – «Estu tiel. Do sen la tuko ili aspektas tiel. Kiu povis imagi? Pardonu, sed kie estas la "okulvitroj"? Ĉe Zurzmansor, kiu estas ial edzo de Diana, kaj ankaŭ ĝibnaza dancisto, ludanta danciston kiu ludas danciston, kiu efektive estas malsekulaĉo, aŭ eĉ kvar malsekulaĉoj, aŭ eĉ kvin, enkalkulante la restoracian, – ne estas ĉe Zurzmansor "okulvitroj", ili kvazaŭ disfluis sur la tuta vizaĝo kaj farbis la haŭton en flavetan sudamerikan koloron.*

Diana kun stranga, iel patrina smajlo rigardis jen lin, jen sian edzon. La estintan edzon. Kaj tio estis malagrable, Viktor eksentis ion, kvazaŭ ĵaluzon, kion li neniam sentis antaŭe, renkontante edzojn. Kelnerino alportis supon.

– Irma transdonas saluton al vi, – diris Zurzmansor, rompante pecon da pano. – Ŝi petas ne maltrankviliĝi.

– Dankon, – reeĥis Viktor aŭtomate.

Li prenis la kuleron kaj komencis manĝi, ne

sentante guston. Zurzmansor ankaŭ manĝis, rigardetante na Viktor el sub la frunto – sen smajlo, sed kun iu humura esprimo. La gantojn li ne deprenis, sed en tio kiel li agis per la kulero, kiel elegante rompis la panon, kiel uzis la buŝtukon, sentiĝis bona eduko.

– Do vi estas, tamen, sama Zurzmansor, – diris Viktor. – Filozofo...

– Mi timas ke ne, – diris Zurzmansor, viŝante la lipojn per la buŝtuko. – Mi timas ke al tiu fama filozofo mi havas nun sufiĉe malproksiman rilaton.

Viktor ne trovis kion diri, kaj decidis prokrasti la konversacion.

*«Ja ne mi estas inicianto de la renkonto, tio estas li kiu volis min vidi, do li komencu...»*

Oni alportis duan pladon. Penante konduti sin digne Viktor komencis atente tranĉi la viandon. Ĉe la longaj tabloj akorde kaj simpleanime ŝmacis "Fratoj je racio", tondrante per la tranĉiloj kaj forkoj.

*«Sed mi estas ĉi tie stulta stultulo», – pensis Viktor. – «Frateto je racio. Ŝi, verŝajne, ĝis nun amas lin. Li ekmalsanis, do ili devis disiĝi, sed ŝi ne volis disiĝi, alie por kio ŝi alvenaĉus tiun ĉi truon, kaj elportus fekujojn post Rosŝeper... Kaj ili renkontiĝas ofte, li enpenetras la sanatorion, demetas la tukon, kaj dancas kun ŝi...» – Li ekmemoris kiel ili dancis – intime... – «Ne gravas. Ŝi amas lin. Kaj kiel tio koncernas min? Tamen iel ajn koncernas.*

*Certe koncernas. Sed kio okazas? Ili forprenis de mi la filinon, sed mi ĵaluzas pri tio ne kiel patro. Ili forprenis de mi virinon, sed mi ĵaluzas pri Diana ne kiel viro... Diable, kiuj vortoj! Forprenis virinon, forprenis filinon... Filinon kiu ekvidis min unuafoje post dek du jaroj da vivo... Aŭ ŝi estas jam dek-tri-jara? Virinon, kiun mi konas kelkajn tagojn... Tamen, rimarku, ĵaluzas mi, – sed ne estiel patro aŭ viro. Jes, estus multe pli simple se li dirus nun: «Estimata sinjoro, mi scias ĉion, vi makulis mian honoron. Kio pri la satisfakcio?»*

– Kiel statas laboro pri la artikolo? – demandis Zurzmansor.

Viktor malserene ekrigardis lin. Ne, tio ne estis moko. Kaj ne monduma babilado por komenci konversacion. Ŝajnis ke tiu ĉi malsekulaĉo vere volas scii kiel progresas laboro pri la artikolo.

– Neniel – diris li.

– Estus interese legi ĝin, – informis Zurzmansor.

– Ĉu vi scias kia ĝi, tiu ĉi artikolo, devas esti?

– Jes, ni imagas. Sed vi ne verkos tian.

– Kaj kio se oni igos min? Min generalo Pferd ne defendos.

– Ĉu vi scias, – diris Zurzmansor, – artikolo kiun atendas sinjoro urbestro tutegale ne sukcesos al vi. Eĉ se vi tre penos. Ekzistas homoj kiuj aŭtomate, sendepende de siaj deziroj transformas laŭ si iun ajn taskon kiun oni donas al ili. Vi apartenas al tiaj homoj.

– Ĉu tio estas bone aŭ malbone? – demandis

Viktor.

– De nia vidpunkto – bone. Pri homa personeco estas sciate tre malmulte, se ne prikalkuli tiun parton de ĝi kiu prezentas kolekton da refleksoj. Fakte amasa personeco enhavas en si preskaŭ nenion alian. Do des pli valoras tiel nomataj kreemaj personecoj, prilaborantaj informojn pri la estanto individue. Komparante konatan kaj bone pristuditan fenomenon kun respegulo de tiu fenomeno en kreaĵoj de tiu ĉi personeco ni povas multe ekscii pri la psika aparato, kiu prilaboris la informon.

– Ĉu ne ŝajnas al vi ke tio sonas ofende? – diris Viktor.

Zurzmansor ekrigardis lin, strange grimacinte la vizaĝon.

– Ha, mi komprenas, – diris li. – Kreanto, sed ne eksperimenta kuniklo... Sed vidu, mi informis vin nur pri unu cirkonstanco, kiu valorigas vin en niaj okuloj. Aliaj cirkonstancoj estas vaste konataj – tio estas vereca informo pri objektiva realo, aparato da emocioj, rimedo por eksciti fantazion, kontentigi bezonojn pri kunsento... Fakte mi volis flati al vi.

– Tiuokaze mi estas flatita, – diris Viktor. – Tamen ĉiuj ĉi paroloj havas neniun rilaton al skribo de pamfletoj. Oni prenas lastan paroladon de sinjoro prezidento kaj reskribas ĝin tutan, anstataŭante vortojn "Malamikoj de libero" per "Tiel nomataj malsekulaĉoj", aŭ "Pacientoj de sanga doktoro", aŭ "Vampiroj el sanatorio"... do mia psika aparato ne partoprenos en tiu ĉi afero.

– Tio nur ŝajnas al vi, – oponis Zurzmansor. Vi legos tiun ĉi artikolon, kaj antaŭ ĉio trovos ke ĝi es-

tas malbela. Stilistike malbela, mi konsideras. Vi komencos korekti la stilon, serĉos pli precizajn esprimojn, eklaboros la fantazio, naŭzigos la mucidaj vortoj, venos deziro fari la vortojn vivaj, ŝanĝi la fiskan mensogon per aktualaj faktoj, kaj vi mem ne rimarkos ke komencis verki veron.

– Povas esti, – diris Viktor. – Ĉiuokaze mi ne volas nun skribi tiun ĉi artikolon.

– Sed verki ion alian – ĉu vi volas?

– Jes, – diris Viktor, rigardante okulojn de Zurzmansor. – Mi plezure verkus kiel infanoj foriris el la urbo. Pri nova Gammel-urba ratkaptisto.

Zurzmansor kontentiĝe klinis la kapon.

– Bonega ideo. Verku.

*«Verku», – pensis Viktor amare. – «Sed kiu publikigos tion? Ĉu vi publikigos?»*

– Diana, – diris Viktor. – Ĉu eblas ĉi tie drinki ion?

Diana silente leviĝis kaj foriris.

– Krom tio mi plezure verkus pri kondamnita urbo, – diris Viktor. – Kaj pri la nekomprena baraktado ĉirkaŭ la leprulejo. Kaj pri malicaj sorĉistoj.

– Ĉu ĉe vi forestas mono? – demandis Zurzmansor.

– Dume estas.

– Konsideru ke vi, verŝajne, estos laŭreato de literatura premio de la leprulejo por pasinta jaro. Vi venis en lastan rondon kune kun Tusov, sed ĉe Tusov estas malpli da ŝancoj, tio estas evidente. Do vi havos monon.

– Jen kiel, – diris Viktor. – Tio ankoraŭ ne

okazis al mi. Ĉu multe da mono?

– Proksimume tri mil... Mi ne memoras ĝuste...

Revenis Diana, kaj same silente metis sur la tablon botelon kaj unu glason.

– Ankoraŭ unu glason, – petis Viktor.

– Mi, fakte... Hm... – diris Zurzmansor.

– Ankaŭ mi ne drinkos, – diris Diana.

– Ĉu tio pro "Plago"? – demandis Viktor, verŝante.

– Jes. Kaj pro "Katino". Do por ĉirkaŭ tri monatoj vi estos provizita. Aŭ malpli?

– Por ĉirkaŭ du monatoj, – diris Viktor. – Sed mi ne pri tio... Jen kio: mi volus viziti la leprulejon.

– Nepre, – diris Zurzmansor. – La premion oni enmanigos al vi ĝuste tie. Sed vi disiluziiĝos. Mirakloj forestos. Estos libertago. Deko da dometoj kaj kuraceja konstruaĵo.

– Kuraceja konstruaĵo, – ripetis Viktor. – Sed kiun oni kuracas tie?

– Homojn, – diris Zurzmansor kun stranga voĉmodulado.

Li eksmajlis, kaj subite io terura okazis pri lia vizaĝo. La dekstra okulo malleviĝis ĝis la mentono, la buŝo ekestis triangula, kaj liva vango kun la orelo departiĝis de la kranio kaj ekpendis. Tio daŭriĝis nur momenton. Diana ellasis la teleron, Viktor aŭtomate retrorigardis, kaj kiam li denove ekis fiksrigardi na Zurzmansor, tiu estis jam kiel antaŭe – flava kaj ĝentila.

*«Kio okazis?» – pensis Viktor. – «Aŭ nur ekŝajnis al mi?..»*

Li haste elpoŝigis paketon da cigaredoj, ekfumis kaj komencis rigardi en la glason.

"Fratoj je racio" kun granda bruo leviĝis de ĉe la tabloj, kaj ektiriĝis al la eliro laŭte interkriante. Zurzmansor diris:

– Entute ni volus ke vi sentu vin trankvile. Vi devas timi nenion. Vi verŝajne konjektas ke nia organizaĵo havas konkretan staton kaj disponas konkretajn privilegiojn. Ni faras multon, kaj pro tio oni multon permesas al ni: estas permesataj eksperimentoj pri klimato, permesatas preparo de la anstataŭanta generacio... kaj tiel plu. Ne valoras tro multe paroli pri tio. Kelkaj sinjoroj imagas kvazaŭ ni laboras por ili, kaj ni ne penas ŝanĝi ilian opinion. – Li silentetis. – Verku pri kio vi volas kaj kiel vi volas, Banev, ne turnu la atenton sur hundojn bojantajn. Se ĉe vi estos malfacilaĵoj pri eldonejoj, aŭ monaj malfacilaĵoj, ni subtenos vin. Ekstremokaze ni mem eldonados vin. Por ni, certe. Do viaj lampridoj estos por vi garantiitaj.

Viktor eldrinkis kaj balancis la kapon.

– Estas klare, – diris li. – Denove oni aĉetas min.

– Vi estas libera opinii tiel, – diris Zurzmansor. – Gravas ke vi konsciu: estas aro da legantoj, dume ne tro multnombra, kiu estas sufiĉe interesata pri via laboro. Vi estas bezonata al ni, Banev. Kaj vi estas bezonata al ni tia kia vi estas. Ni ne bezonas na Banev kiu estas nia aliancano kaj nia kantisto, tial ne meditu sur kies flanko vi estas. Estu sur via flanko, kiel decas al ĉiu kreema persono. Jen estas ĉio kion ni bezonas de vi.

– Tre-e, tre favoraj kondiĉoj, – diris Viktor. – Blanketa pag-ordono kaj stakoj da marinitaj libroj en perspektivo. En perspektivo kaj en mustarda saŭco. "Ĉu ekzistas vidvin' kiu neus al li?"... Aŭskultu Zurzmansor, ĉu iam okazis al vi vendi la animon kaj la plumon?

– Jes, certe, – diris Zurzmansor. – Kaj, ĉu vi scias, oni pagis aĉe malmulte. Sed tio estis antaŭ mil jaroj, kaj sur alia planedo. – Li denove silentetis. – Vi ne pravas, Banev, – diris li. – Ni ne aĉetas vin. Ni simple volas ke vi restu vi mem, ni timas ke oni ĉifos vin. Ja multaj jam estas ĉifitaj... Moralaj valoraĵoj ne estas vendataj, Banev. Oni povas ruinigi ilin, aĉeti ilin ne eblas. Ĉiu konkreta morala valoraĵo estas bezonata nur al unu flanko, ŝteli aŭ aĉeti ĝin ne havas sencon. Sinjoro prezidento opinias ke li aĉetis pentriston R.Kvadriga. Tio estas eraro. Li aĉetis fuŝulon R.Kvadriga, sed la pentristo trafluis inter la fingroj kaj mortis. Sed ni ne volas ke verkisto Banev trafluu inter ies fingroj, eĉ inter niaj, kaj mortu. Ni bezonas artistojn, sed ne propagandistojn.

Li leviĝis. Ankaŭ Viktor leviĝis, sentante embarason kaj fieron, nekredemon kaj humiliĝon, disiluziiĝon kaj respondecon, kaj ankoraŭ ion, kion li ankoraŭ ne povis kompreni.

– Estis tre agrable konversacii, – diris Zurzmansor. – Mi deziras al vi sukcesan laboron.

– Ĝis revido, – diris Viktor.

Zurzmansor kurte kliniĝis kaj foriris, suprenĵetinte la kapon, larĝe kaj firme paŝante. Viktor rigardis lin forirantan.

– Ĝuste pro tio mi amas vin, – diris Diana.

Viktor falis sur la seĝon kaj etendiĝis al la botelo.

– Pro kio? – distriĝe demandis li.

– Pro tio ke vi estas bezonata al ili. Pro tio ke vi, virhundo, alkoholulo, malpuremulo, skandalulo, ŝlimulo, estas tamen bezonata al tiaj homoj.

Ŝi kliniĝis trans la tablon kaj kisis lin je la vango. Tio estis ankoraŭ unu Diana. Diana Enamiĝinta – kun grandegaj sekaj okuloj. Maria el Magdala, Diana Rigardanta de Supre Malsupren.

– Jen kiel, – elbalbutis Viktor. – Intelektuloj... Novaj kalifoj por horo…

Tamen tio estis nur vortoj. Efektive ĉio estis ne tiel simpla.

## Ĉapitro deka

Viktor revenis en la hotelon sekvonttage, post matenmanĝo. Por ke li nutru sin Diana enŝovis en lian manon ujon: oni alsendis al Rosŝeper, el ĉefurba oranĝerio, dudek kilogramojn da frago, kaj Diana rezone decidis ke Rosŝeper, malgraŭ sia anomala voremo, ne sukcesos memstare venki tiun amason da beroj.

Moroza pordisto malfermis antaŭ Viktor la pordon. Viktor regalis lin per la frago. La pordisto prenis kelkajn berojn, metis ilin en la buŝon, maĉis kiel panon kaj diris:

– Okazis ja ke mia hundido estis inicianto ĉe ili.

– Nu, kial vi tiel, – diris Viktor. – Li estas simpatia knabeto. Saĝulo, kaj edukita li estas bone.

– Ja ne unufoje vergaĉis mi lin! – diris la

pordisto, vigliĝinte. – Penis mi... – Li denove moroziĝis. – La najbaroj tedaĉas, – informis li. – Sed mi kio? Mi ja sciis nenion...

– Kraĉu vi pri la najbaroj, – konsilis Viktor. – Tion ili pro envio. Knabeto ĉe vi estas ĉarmulo. Mi, ekzemple, tre ĝojas ke mia filino amikadas kun li.

– Ha! – diris la pordisto, denove vigliĝinte. Do povas okazi ke iam parenciĝos ni, ĉu?

– Kio ja, – diris Viktor. – Tre povas okazi. – Li imagis na Bol-Kunac. – Kial ne...

Ili ridis pri tiu ĉi ebleco, ŝercis.

– Ĉu vi aŭdis hieraŭ pafadon? – demandis la pordisto.

– Ne, – diris Viktor, strečinte la atenton. – Sed kio?

– Tiel do okazis, – diris la pordisto, – ke post kiam ĉiuj ni disiris de tie, iu ja ne disiris, troviĝis ja kuraĝeguloj, ili tranĉis la pikdraton, kaj – internen. Kaj sur ilin el mitraloj.

– Jen diablaĵo, – diris Viktor.

– Mi mem ne vidis, – diris la pordisto. – Homoj rakontas. – Li singarde ĉirkaŭrigardis, logis al si na Viktor kaj diris al li flustre en la orelon: – Teddi nia okazis tie, oni vundis lin. Tamen neniu danĝero. Hejme li nun kuŝadas.

– Bedaŭrinde, – balbutis Viktor, ĉagreniĝinte.

Li regalis per la frago la akceptiston, prenis la ŝlosilon, kaj leviĝis al si. Antaŭ senvestiĝi li telefonis al Teddi. Bofilino de Teddi informis ke ĉio entute ordiĝis, oni trapafis al li molaĵon, kuŝas li sur la ventro, sakras kaj suĉas vodkon. Kaj ŝi mem intencas veni nun en domon de la renkontoj, viziti la

filon. Viktor petis transdoni al Teddi saluton, promesis veni, kaj metis la aŭskultilon. Estis necese telefoni ankaŭ al Lola, sed li imagis tiun ĉi konversacion, riproĉojn, ekkriojn, kaj ne telefonis. Li demetis la pluvmantelon, rigardis la fragon, malleviĝis en la kuirejon kaj elpetis boteleton da kremo. Kiam li revenis, en la ĉambro sidis Pavor.

– Bonan tagon, – diris Pavor, blindige smajlante.

Viktor venis al la tablo, enŝutis la fragon en vazon, superverŝis ĝin per la kemo, surŝutis la sukerpulvoron, kaj eksidis.

– Nu saluton, saluton, – diris li morne. – Kion vi diros?

Li ne volis rigardi na Pavor. Unue Pavor estis fatraso, kaj, due, okazis ke estas malagrable rigardi homon kiun vi denuncis. Eĉ se il estas fatraso, eĉ se vi denuncis pro plej senriproĉaj kaŭzoj.

– Aŭskultu, Viktor, – diris Pavor. – Mi estas preta peti pardonon. Ni ambaŭ kondutis sin stulte, sed mi – aparte. Ĉio tio pro la oficaj malagrablaĵoj. Mi sincere petas pardonon. Al mi estus diable malagrable se ni diskverelus pro tiu ĉi stultaĵo.

Viktor miksetis la fragon per kulereto kaj komencis manĝi.

– Je Dio, ĝis tiom mi lastatempe malsukcesas, – daŭrigis Pavor, – tutan mondon mi sakrus. Kaj neniu kunsento de iu ajn, kaj neniu subteno... urbestro tiu, bruto, enlogis min en la malpuran historion...

– Sinjoro Summan, – diris Viktor. – Ĉesu vi mensogadi. Ŝajnigi vi scipovas bone, sed mi, feliĉe, komprenis vin, tial mi havas neniun plezuron ob-

servi viajn aktorajn talentojn. Ne difektu al mi la apetiton, iru vi.

– Viktor, – diris Pavor riproĉe. – Ni estas ja adoltaj homoj. Ne atribuu ni tian signifon al la ĉetabla babilado. Ĉu vere vi imagis ke mi predikas tiun stultaĵon kiun mi elbuŝigis? Kapdoloro, malagrablaĵoj, nazkataro... Ja kion vi volas de homo?

– Mi volus ke la homo ne batu mian kranion de la dorso per kaprompilo, – klarigis Viktor. – Sed se li batas – okazas la cirkonstancoj, – tiam li ne ludu poste amikon-kamaradon.

– Ha, jen vi pri kio, – diris Pavor pripense. Lia vizaĝo kvazaŭ griziĝis. – Aŭskultu, Viktor, mi ĉion klarigos. Tio estis pura hazardaĵo... Mi tute ne sciis ke tio estas vi. Kaj krom tio... Ja vi mem diras ke okazas cirkonstancoj.

– Sinjoro Summan, – diris Viktor, ĉirkaŭlekante la kulereton. – Mi ĉiam ne ŝatis homojn de via profesio. Unun mi eĉ pafmortigis – li estis tre kuraĝa en la stabo, kiam akuzis oficirojn pri nelojaleco, sed kiam oni sendis lin al la fronto... Entute iru vi for.

Tamen Pavor ne ekiris for. Li ekfumis cigaredon, metis piedon sur la piedo kaj komfortiĝis en la brakseĝo.

*«Kompreneblas ja – fortega viro, ĵudon verŝajne konas, kaj kaprompilon li havas... Estus bone ekkoleriĝi nun. Vere, kial li malagrabligas al mi la frandaĵon...»*

– Mi vidas ke vi scias multe, – diris Pavor. – Tio malbonas. Mi konsideras – por vi. Tamen bone. Ĉiuokaze vi ne scias ke mi plej sincere estimas kaj

ŝatas vin. Nu ne ŝiriĝu kaj ne faru aspekton ke tio naŭzas vin. Mi diras serioze. Mi plezure pretas esprimi bedaŭron pro la incidento kun la kaprompilo. Mi eĉ konfesu ke sciis kiun mi frapas, sed mi ne havis alian eblecon. Post angulo kuŝaĉas unu atestanto, poste vi alvenaĉis... Do, entute, sola afero kiun mi povis fari estis frapi vin laŭeble delikate, kaj mi faris ĝuste tion. Akceptu plej sincerajn pardonpetojn. – Pavor faris aristokratan geston.

Viktor rigardis lin kun iu eĉ scivolo. Io en tiu ĉi situacio estis freŝa, neelprovita kaj mafacile imagata.

– Tamen peti pardonon pro tio ke mi estas ano de konata al vi departemento, – daŭrigis Pavor, – mi ne povas kaj, fakte, ne volas. Bonvolu ne imagi ke tie, ĉe ni, kolektiĝis nur sufokantoj de libera pensado kaj ŝlimuloj-karieristoj. Jes, mi estas kontraŭspionulo. Jes, laboro ĉe mi estas malpura. Tamen laboro ĉiam estas malpura, pura laboro ne ekzistas. Vi, en viaj romanoj, elverŝas subkonscion, tiel nomatan libidon vian, sed mi – alimaniere... Detalojn mi ne povas rakonti al vi, sed vi, verŝajne, mem konjektas ĉion ĉi tion. Jes, observas mi la leprulejon, malamas mi tiujn ĉi malsekulaĉojn, timas mi ilin, kaj timas mi ne nur pri mi, pri ĉiuj mi timas, kiuj eĉ ion valoras. Pri vi, ekzemple. Ja vi komprenas nenion. Vi estas libera artisto, emociulo... aĥ, oĥ, – kaj nur konversacioj. Sed temas pri sorto de la sistemo. Se vi volas, – pri sorto de homaro. Jen insultas vi sinjoron prezidenton – diktatoro, tirano, stultulo... Sed alŝoviĝas tia diktatoreco pri kiu vi, liberaj artistoj, eĉ ne sonĝis. Tiam, en la restoracio,

mi multe da stultaĵoj elparoladis, sed ĉefa grajno estas ĝusta: homo estas besto anarkia, kaj anarkio pe-voros ĝin se la sistemo ne estos sufiĉe kruda. Do jen kio: viaj ŝatataj malsekulaĉoj promesas tian kruelecon, ke por ordinara homo jam ne restos loko. Vi ne komprenas tion. Vi opinias ke se homo citas na Zurzmansor aŭ na Gegel, do tio estas – ho! Sed tiu homo rigardas vin kaj vidas amason da merdo. Li ne kompatas vin, ĉar vi estas merdo kiel laŭ Zurzmansor, tiel laŭ Gegel. Merdo laŭ difino. Kaj tio kio estas preter limoj de tiu ĉi difino – lin ne interesas. Sinjoro prezidento, pro sia natura limigeco – nu, bojos sur vin, nu, ekstremokaze, ordonos prizonigi, kaj poste, antaŭ festo, amnestios vin pro pleneco da sentoj, kaj eĉ invitos al si tagmanĝi. Sed Zurzmansor rigardos vin per lupeo, kaj klasifikos: fekaĵo hunda, por nenio taŭga, kaj pripense, pro la grandega menso, pro komuna filozofio, forsvingos vin en rubujon kaj forgesos pri tio ke vi ekzistis...

Viktor eĉ ĉesis manĝi. Stranga spektaĵo estis tio, neatendita. Pavor nervoziĝis, liaj lipoj ŝiriĝetis, la vizaĝon lasis la sango, li eĉ sufokiĝis. Li sendube kredis tion pri kio parolis, en liaj okuloj fiksiĝis timega vidaĵo de la terura mondo.

*«Nu, nu», – diris al si Viktor. – «Ja tio estas malamiko, aĉulo. Aktoro li estas, aĉetas li vin...» – Subite li komprenis ke li perforte depuŝiĝas de Pavor. – «Ne forgesu ke tio estas burokrato. Ĉe li ne povas esti ideaj konsideroj – la estraro ordonis, do perlaboras li sian kompoton. Se oni ordonos al li defendi malsekulaĉojn – li defendos ilin. Konas mi tiun*

*ĉi kanajlaron, vidis jam...»*

Pavor ekposedis sin kaj smajlis.

– Scias mi kion vi pensas, – diris li. – Laŭ vizaĝo via videblas ke vi penas diveni: kial tiu ĉi ulaĉo algluiĝis, kion li bezonas de mi; sed imagu, nenion mi bezonas de vi. Mi sincere volas averti vin, mi sincere volas ke vi komprenu, por ke elektu vi ĝustan flankon... – Li malsane nudigis la dentojn – Mi ne volas ke vi estu perfidulo de homaro. Poste vi bedaŭros, sed estos malfrue... Mi jam ne diras pri tio ke entute vi devas malaperi de ĉi tie, fakte mi venis por insisti pri tio. Proksimiĝas malfacila tempo, ĉe estraro – atako da servemo, al iu oni aludis jam ke malbone vi laboras, sinjoroj, ke forestas ja ordo... Sed tio ne tiel gravas, tio estas malgravaĵo, pri tio ni ankoraŭ konversacios. Mi volas ke vi komprenu plej gravan. Sed gravas ne tio kio okazos morgaŭ. Morgaŭ ili ankoraŭ sidos ĉe si post la pikdrato sub gardo de tiuj kretenoj... – Li denove nudigis la dentojn. – Sed kiam pasos deko da jaroj...

Viktor ne sukcesis ekscii kio okazos post deko da jaroj. Pordo de la ĉambro malfermiĝis sen frapado, kaj eniris duopo en samaj grizaj pluvmanteloj, kaj Viktor tuj komprenis kio estas ili. Ĉe li kutime premiĝis interne, kaj li obeeme leviĝis, sentante naŭzon kaj senfortecon. Sed ili diris al li "sidu", kaj al Pavor diris "leviĝu".

– Pavor Summan, vi estas arestita.

Pavor blanka, kaj eĉ ia bluete-blanka, kiel lakta separaĵo, leviĝis kaj raŭke diris:

– Mandaton.

Ili donis al li rigardi iun paperon, kaj dum li rigardis ĝin per nevidantaj okuloj, ili prenis lin je la brakoj, elkondukis, kaj fermis post si la pordon. Viktor restis sidi, tuta moliĝinta, rigardanta la tablon kaj ripetanta mense: ili manĝegu unu la alian, ili manĝegu unu la alian... Li atendis ke sur la strato ekbruos aŭto, frapiĝos la pordetoj, sed ne ĝisatendis. Poste li ekfumis, kaj, sentante ke ne povas plu sidi ĉi tie, sentante ke necesas konversacii kun iu, iel malstreĉiĝi aŭ, almenaŭ, drinki kun iu vodkon, li eliris en la koridoron.

*«Interese, kiel ili eksciis ke li estas ĉe mi. Ne, tute ne estas interese...»*

Sur la ŝtupara placeto promenadis la altstatura profesiulo. Estis tiel nekutime vidi lin sola, ke Viktor ĉirkaŭrigardis – kaj vere: en angulo, sur divano, sidis la juna homo kun la teko kaj malfermadis ĵurnalon.

– Ha, kaj jen li mem, – diris la altstatura. La juna homo ekrigardis na Viktor kaj komencis faldi la ĵurnalon. – Ni ĝuste al vi, – diris la altstatura. – Sed se okazis tiel, iru al ni, tie estas pli trankvile...

Al Viktor estis indiferente kien iri, kaj li obeeme ektiriĝis sur trian etaĝon. La altstatura longe malŝlosis pordon de tricent-dek-dua ĉambro. Ĉe li estis ligaĵo da ŝlosiloj kaj li, ŝajne, provis ilin ĉiujn; dume Viktor kaj la juna homo kun la okulvitroj staris apude, kaj la juna homo havis enuantan vizaĝesprimon, kaj Viktor pensis kio okazus se li frapus nun lian kapaĉon, elkaptus la tekon, kaj ekhastus sur la koridoro. Poste ili eniris la ĉambrojn, kaj la

juna homo tuj foriris en dormoĉambron maldekstran, kaj la altstatura diris al Viktor: "Momenton", kaj foriris en dormoĉambron dekstan. Viktor eksidis ĉe la ruĝligna tablo kaj komencis movi la fingrojn sur raspetaj ringoj, kiujn lasis glasoj kaj pokaloj sur ĝia polurita surfaco. Tiuj ĉi ringoj estis multegaj, oni ne ceremoniis pri la tablo, kaj ne aprezis ke la ligno estas ruĝa, sur lin oni metis brulantajn cigaredojn kaj, almenaŭ unufoje, deskuis la fontoplumon. Poste el la dormoĉambro denove eliris la juna homo, ĉi- foje sen la teko kaj sen la jako, en hejmaj pantofloj, kun ĵurnalo en unu mano kaj kun plena glaso en la alia. Li eksidis sian brakseĝon sub la planka lampo, kaj tuj, el sia dormoĉambro, aperis la altstatura kun pleto kiun li tuj metis sur la tablon. Sur la pleto staris komencita jam botelo da viskio, glaso, kaj kuŝis granda kvadrata skatolo, tegita per blua marokeno.

– Komence formalaĵojn, – diris la altstatura. – Kvankam ne, atendu, komence dua glaso. – Li ĉirkaŭrigardis, prenis de la skribtablo glaseton por krajonoj, enrigardis ĝin, enblovis, kaj metis sur la pleton. – Do, formalaĵoj, – diris li.

Li rektiĝis, soldate mallevis la manojn kaj severe elstreĉis la okulojn. La juna homo demetis la ĵurnalon, kaj leviĝis, enue rigardante muron. Tiam ankaŭ Viktor leviĝis.

– Viktor Banev! – deklaris la altstatura per fiske-multsignifa voĉo. – Estimata sinjoro! De nomo kaj laŭ speciala ordono de sinjoro prezidento mi havas honoron enmanigi al vi medalon "Arĝenta Trifolio de Dua Grado" estiel rekompencon pro spe-

cialaj meritoj okazigitaj per vi al departemento, kiun mi havas honoron prezenti ĉi tie!

Li malfermis la bluan skatolon, solene elprenis el ĝi medalon sur blanka muara rubando, kaj komencis alpingli ĝin al brusto de Viktor. La juna homo ĝentile ekaplaŭdis. Poste la altstatura enmanigis al Viktor la atestilon kaj la skatoleton, premis manon de Viktor, repaŝis, admiris, kaj ankaŭ ekaplaŭdis. Aplaŭdetis ankaŭ Viktor, sentante sin idioto.

– Kaj nun ni pridrinku tion, – diris la altstatura.

Ĉiuj eksidis. La altstatura disverŝis viskion kaj prenis al si glaseton por krajonoj.

– Je la kavaliro de "Trifolio"! – deklaris li.

Ĉiuj denove ekstaris, interŝanĝis la smajlojn, eldirnkis kaj denove eksidis. La juna homo kun okulvitroj tuj prenis la ĵurnalon kaj ŝirmiĝis per ĝi.

– La trian gradon vi, ŝajne, jam havas, – diris la altstatura. – Nun se vi havos ankaŭ la unuan, do esos vi plena kavaliro. Senpaga veturado kaj tiel plu. Pro kio vi kaptis la trian?

– Mi ne memoras, – diris Viktor. – Estis io tia, verŝajne murdis mi iun... Ha, memoras. Tio pro Kitĉigana atakejo.

– Ho! – diris la altstatura, kaj denove disverŝis viskion. – Sed mi ne militis. Ne sukcesis mi.

– Vi prosperis – diris Viktor. Ili eldrinkis. – Inter ni parolate mi ne komprenas pro kio oni donis al mi tiun ĉi aĵon.

– Ja mi diris: pro apartaj servoj.

– Ĉu pro Summan? – prononcis Viktor, ĉagrene smajlante.

– Ĉesu vi! – diris la altstatura. – Ja vi estas grava persono. Ja vi estas tie, en rondoj... – li nekonkrete svingis la fingron ĉe la orelo.

– En kiuj ja rondoj... – diris Viktor.

– Scias ni, scias! – ruzete kriis la altstatura. – Ĉion ni scias! Generalo Pferd, generalo Pukki, kolonelo Bambarĥa... Vi estas bravulo.

– Unuafoje mi aŭdas, – diris Viktor nervoze.

– Komencis tiun ĉi aferon la kolonelo. Neniu, vi mem komprenas, kontraŭis – ja ne eblis! Nu, kaj poste generalo Pferd estis kun raporto ĉe la prezidento kaj alŝovis al li dokumenton pri vi... – La longstatura ekridis. – Amuzaĵo, onidire, okazis. La maljunulo ekkriaĉis: "Kiu Banev? Ĉu la versaĵisto? Neniam!" Sed la generalo diris al li tiel strikte: "necesas, via ekscelenco!". Unuvorte ordiĝis ĉio. La maljunulo kortuŝiĝis, bone, diras, pardonas mi. Kio okazis inter vi??

– Tiel ja, – nevolonte diris Viktor. – Pri literaturo disputis ni.

– Ĉu vi vere verkas librojn? – demandis la altstatura.

– Jes. Kiel kolonelo Lourens (Lawrence).

– Ĉu oni bone pagas?

– Ne malbone. Eblas vivi.

– Ankaŭ mi devus provi, – diris la altstatura. – Sed forestas libera tempo. Ĉu tio, ĉu alio...

– Jes, forestas tempo, – konsentis Viktor. Ĉe ĉiu lia movo la medalo balanciĝis kaj frapis la ripojn. Li sentis ke ĝi kvazaŭ bruligas la haŭton. Estis deziro demeti, kaj tiam tuj venos faciliĝo.

– Ĉu vi scias, mi iru, – diris li leviĝante. – Venis

jam tempo.

La longstatura tuj saltleviĝis.

– Certe, – diris li.

– Ĝis revido.

– Adiaŭ, – diris la altstatura.

La juna homo kun la okulvitroj mallevetis la ĵurnalon kaj klinis la kapon.

Viktor eliris en la koridoron kaj tuj deŝiris de si la medalon. Ĉe li estis forta deziro ĵeti ĝin en bal-aaĵujon, sed li katenis sin, kaj enŝovis ĝin en la poŝon. Li sobiĝis en la kuirejon, prenis botelon da ĝino, kaj kiam li iris reen, lin vokis la akceptisto:

– Sinjoro Banev, sinjoro urbestro telefonis al vi. Jam dufoje. En via ĉambro vi forestis, do mi...

– Kion li deziras? – malserene demandis Viktor.

– Li petis ke vi tuj telefonu al li. Ĉu vi iras al vi? Se li telefonos ankoraŭfoje...

– Sendu lin en pugon, – diris Viktor. – Mi nun malŝaltos la telefonon, kaj se li telefonos al vi, do transdonu ĝuste tion: sinjoro Banev, kavaliro de "Trifolio de Dua Grado" sendas vin, sinjoro urbestro, en pugon.

Li ŝlosiĝis en la ĉambro, malŝaltis la telefonon kaj, ial kovris ĝin per kuseno. Poste li eksidis ĉe la tablo, enverŝis ĝinon, kaj, ne diluante, eldrinkis un-uglute la tutan glason. La ĝino bruligis la gorĝon kaj la ezofagon. Tiam li kaptis la kuleron, kaj komencis vori fragon kun la kremo, ne rimarkante la guston, ne rimarkante kion li faras.

*«Ŝufiĉas, sufiĉas por mi», – pensis li. – «Nenion mi volas, nek ordenojn, nek generalo-jn, nek honorariojn, nek donacaĉojn viajn,*

*vian atenton, vian koleron, kaj nek ŝaton vian. Lasu min sola, ĝis gorĝo mi estas sata per mi mem, kaj ne enmiksigu vi min en viajn aferojn...»*

Li kaptis la kapon per la manoj por ne vidi antaŭ si blank-bluan vizaĝon de Pavor, kaj tiujn senkolorajn senkompatajn muzelojn en samaj pluvmanteloj.

*«Generalo Pferd estas kun vi, generalo Battoks. Generalo Arŝmann kun siaj ordenportantaj brakumoj, kaj Zurzmansor kun degluanta vizaĝo...» Li daŭre penis kompreni al kio tio ĉi similas. Li elsuĉis ankoraŭ duonglason, kaj komprenis ke li kaŝiĝas konvulsiante sur fundo de tranĉeo, kaj sub li turniĝadas tero, tutaj geologiaj tavoloj, gigantaj masoj da granito, bazalto, lafo, ili fleksas unu la alian, rompas unu la alian, ĝemante pro la streĉiĝo, ŝveliĝas, elĝibiĝas, kaj, interalie, elpremas lin supren, pli kaj pli alten, elpremas lin el la tranĉeo, levas sur pli altan ĝian randon, sed la tempo estas malfacila, ĉe la estraro estas atako de servemo, oni aludis al iu ke malbone laboras vi, sed li – jen li estas, sur la tranĉea rando, nudeta, la okulojn li kovris per la manoj, sed tuta li estas videbla.*

*«Ho se mi povus fundiĝi», – pensis li. – «Ekkuŝi sur fundo mem, por ke oni ne aŭdu kaj ne vidu min. Kuŝus mi kiel submara ŝipo» – ekpensis li, kaj iu sugestis al li: – «kuŝus silente, sen signalad». Jes, jes, kuŝus mi kiel*

*ŝipo submara, sen kri' pri helpo, sen signalad'. Kaj neniun mi informu pri mia lokiĝo. Forestas, forestas mi. Silentas. Penu vi mem kompreni kio okazas kaj kion fari. Dio, kial mi neniel povas ekesti cinikulo?.. «Kuŝus mi kiel ŝipo submara, kuŝus silente, sen signalad'. Kuŝus mi kiel ŝipo submara» – ripetadis li, – «sen kri' pri helpo, sen signalad'». Li jam eksentis la ritmon, kaj tuj aperis: «Sata mi estas ĝis la mentono... Eĉ por kantado venis blokad'...»*

Li enverŝis ĝinon, kaj drinkis.

«Ne volas mi kanti kaj skribi. Kie estas la banĝo», – ekpensis li. – «Kien mi enŝovis la banĝon?» – Li grimpis sub la liton, kaj eltiris la banĝon. – «Kraĉas mi pri vi ĉiuj», – pensis li. – «Ho, ĝis kiu grado indiferentas al mi ĉio! Kuŝus mi kiel ŝipo submara, kuŝus silente sen signalad'».

Li ritme batis la kordojn, kaj dum tio komence la tablo, poste la tuta ĉambro, kaj poste ankaŭ tuta mondo komencis pied-bati akorde kaj moveti la ŝultrojn. Ĉiuj generaloj kaj koloneloj, ĉiuj malsekaj homoj kun defalantaj vizaĝoj, ĉiuj departementoj pri sekureco, ĉiuj prezidentoj, kaj Pavor Summan, al kiu oni tordas la brakojn kaj batas la muzelon...

«Sata mi estas ĝis la mentono, tedis drinkaĵoj, tedis kantad'». Ne tedis, fakte, sed tedas, sed "tedis" – tio estas bone, do estas tiel... «Kuŝus mi kiel ŝipo submara, kuŝus silente, sen dissendad'». Ŝipo submara... vodko amara... Estu ĉi tie iu virino... Kaj

koncentrejo ne estas onklino... Jen kiel, jen kiel...

En la pordon oni jam delonge frapis, pli kaj pli laŭte, kaj Viktor finfine ekaŭdis, sed li ne ektimis, ĉar tio estis ne **tia** frapo. Tio estis ordinara gajiga frapado de paca homo, kiu koleras ĉar oni ne malfermas al li. Viktor malfermis la pordon. Tio estis Golem.

– Gaju vi! – diris li. – Oni arestis na Pavor.

– Scias mi, scias, – diris Viktor gaje. – Sidu, aŭskultu...

Golem ne eksidis, sed Viktor tutegale ekfrapis la kordojn kaj ekkantis:

**Sata mi estas ĝis la mentono**
**Tedis drinkaĵoj, tedis kantad'**
**Kuŝus mi kiel ŝipo submara**
**Kuŝus surfunde, sen signalad'**

Daŭrigon mi ankoraŭ ne verkis, – kriis li. – Poste estos vodko, juna virino... Koncentrejo ne estas onklino... Kaj poste – aŭskultu:

**Inoj, drinkaĵoj, tute ne helpas:**
**Postebriiĝo, kaj degradad'...**
**Kuŝus mi kiel ŝipo submara**
**Sen kri' pri helpo, sen signalad'**

**Satas mi plene, ĝis la laringo**
**Ho kiel tedis drinka tornad'**
**Funde mi kuŝus, funde kaŝiĝus**

– Ĉio, – kriis li kaj ĵetis la banĝon sur la liton. Li eksentis grandegan faciliĝon, kvazaŭ io ŝanĝiĝis, kvazaŭ li ekestis subite ege bezonata tie, sur la tranĉea rando, videbla al ĉiuj, – deŝiris li siajn manojn de la fermitaj okuloj, kaj ĉirkaŭrigardis la ŝliman kampon, rustan pikdraton, grizajn sakojn, kiuj antaŭe estis homoj, enuegan malhonoran agadaĉon, kiu antaŭe estis vivo, kaj de ĉiuj flankoj sur la tranĉeajn randojn leviĝis homoj kaj ankaŭ ĉirkaŭrigardis, kaj iu demetis la fingron de la ellasilo...

– Envias mi, – diris Golem. – Sed ĉu ne venis tempo verki la artikolon?

– Neniokaze, – diris Viktor. – Vi ne konas min, Golem, – kraĉas mi pri ĉiuj. Ja sidu vi, diablo vin prenu! Mi estas ebria, kaj ankaŭ vi ebriiĝu! Demetu la pluvmantelon... Demetu, mi diras al vi! – ekkriaĉis li. – Kaj sidu. Jen la glaso, drinku! Vi nenion komprenas, Golem, kvankam vi estas profeto. Kaj mi ne permesos al vi. Ne kompreni – tio estas mia prerogativo. En tiu ĉi mondo ĉiuj tro bone komprenas kio devas esti, kio estas kaj kio estos. Kaj ege mankas homoj kiuj ne komprenas. Kial, laŭ vi, mi estas valoraĵo? Nur tial ke mi ne komprenas. Antaŭ mi oni disvolvas perspektivojn – sed mi diras: ne,

---

**11.** Aŭtoro de la kanto estas Vladimir Visotskij (ruse: Высоцкий; angle: Vysotsky 1938 – 1980), ne tro permesata sed tre populara soveti-tempa kanzonisto. La kanton provu aŭdi en:
<http://www.youtube.com/watch?v=-aZrfze6JDo>

mi ne komprenas. Oni stultigas min per teorioj ekstreme simplaj – sed mi diras: ne, nenion mi komprenas... Ĝuste tial mi estas bezonata... Ĉu vi volas fragon? Tamen mi formanĝis ĉion. Tial fumu ni...

Li leviĝis, kaj promenis en la ĉambro. Golem kun glaso en la mano rigardis lin, ne turnante la kapon.

– Tio estas mirinda paradokso, Golem. Estis tempo kiam mi komprenis ĉion. Mi estis dek-ses-jara, mi estis supra kavaliro de Legio, mi komprenis absolute ĉion, kaj mi estis bezonata al neniu. En unu pugnobatalo oni trarompis al mi kapon, dum monato kuŝis mi en malsanulejo, kaj ĉio iris siavice – Legio venke iris antaŭen sen mi, sinjoro prezidento senkompate iĝis sinjoro prezidento ankaŭ sen mi. Ĉiuj bonege kontentiĝis sen mi. Poste ĝuste samo ripetiĝis en la milito. Mi oficiris, kaptis ordenojn, kaj dum tio, nature, komprenis ĉion. Oni trapafis mian bruston, mi trafis hospitalon, kaj kio – ĉu iu maltrankviliĝis kie estas Banev, nia kuraĝa, ĉion komprenanta Banev? Diable, nenio simila! Tamen kiam mi ĉesis kompreni ion ajn – ho, tiam ĉio ŝanĝiĝis. Ĉiuj ĵurnaloj rimarkis min. Amaso da departementoj rimarkis min. Sinjoro prezidento persone honorigis... Ha? Ĉu vi imagas kia maloftaĵo estas tio – nekomprenanta homo! Oni konas lin, lin prizorgas generaloj kaj mortint... E-e... koloneloj, li estas treege bezonata al malsekulaĉoj, oni opinias lin personeco, koŝmaro! Pro kio? Pro tio, gesinjoroj, ke li komprenas nenion. – Viktor eksidis. – Ĉu mi estas tre ebria? – demandis li.

– Ne sen tio, – diris Golem. – Sed tio ne gravas,

daŭrigu.

Viktor disigis la brakojn.

– Ĉio, – diris li kulpe. – Mi elĉerpiĝis... Ĉu mi kantu al vi?

– Kantu, – konsentis Golem.

Viktor prenis la banĝon, kaj komencis kanti. Li pe-kantis "Ni – kuraĝaj buboj", poste "Uraniaj homoj", poste "Pri paŝtisto, al kiu bovo elpikis unu okulon kaj kiu rompis ŝtatan limon pro tio", poste "Sata mi estas", poste "Indiferenta urbo", poste "Pri vero kaj mensogo", poste denove "Sata mi estas", poste li ekkantis la ŝtatan himnon per melodio "Kiajn piedetojn havas la bubino!", sed forgesis la vortojn, konfuzis la strofojn kaj demetis la banĝon.

– Denove elĉerpiĝis mi, – diris li malgaje. – Do, diras vi, oni arestis na Pavor?... Sed mi scias tion. Li sidis ĉe mi, ĝuste kie vi sidas... Ĉu vi scias kion li volis diri, sed ne sukcesis? Ke post dek jaroj la malsekulaĉoj ekposedos tutan terglobon, kaj ĉiujn nin sufokos. Kion vi opinias?

– Malverŝajnas, – diris Golem. – Por kio oni sufoku nin? Ni mem pe-sufokos unu la alian.

– Kaj malsekulaĉoj?

– Eble ili ne donos al ni pe-sufoki unu la alian... Malfacilas diri.

– Ĉu eble ili helpos? – diris Viktor kun ebria rido... – Ĉar ni eĉ sufoki ne scipovas. Dek mil jaroj sufokas ni kaj ne venas la fino... Aŭskultu, Golem, sed kial vi mensogis al mi ke vi kuracas ilin? Ili tute ne estas malsanaj, ili ĉiuj estas samaj al vi kaj mi, sed ial flavaj...

– Hm, – diris Holem. – De kie ĉe vi tiu informo?

Mi ne sciis tion.

– Bone, bone, vi ne trompos min plu. Mi konversaciis kun Zur... kun Zu... kun Zurzmansor. Li rakontis al mi ĉion: sekreta instituto... Ili volviĝis per la tukoj por konservi... Ĉu vi scias, Golem, ili imagas tie ke povos uzadi generalon Pferd senfine. Sed en realo – nur kalifoj por horo. Voros li ilin kune kun la tukoj kaj gantoj, kiam ekmalsatos... Uf, diable, ĝis kiom mi estas ebria – ĉio naĝas...

Sed li ruzetis. Li bone vidis antaŭ si la dikan ruĝetan vizaĝon kaj etajn, nekutime atentajn okuletojn.

– Kaj Zurzmansor diris al vi ke li estas sana?

– Jes, – diris Viktor. – Fakte ne, ne memoras mi... Plej verŝajne ne. Sed videblas ja...

Golem gratetis la mentonon per rando de la glaso.

– Bedaŭrindas ke vi estas ebria, – diris li. – Tamen eblas ke tio estas bone. Ĉe mi hodiaŭ estas bona humoro. Ĉu vi volas ke mi rakontu al vi ĉion kion mi konjektas kaj kion mi pensas pri la malsekulaĉoj?

– Agu, – konsentis Viktor. – Sed ne mensogu plu.

– La okulvitra malsano, – diris Golem, – tio estas tre kurioza afero. Ĉu vi scias kiun trafas la okulvitra malsano? – Li eksilentis. – Ne, nenion mi rakontu al vi.

– Lasu, – diris Viktor. – Vi jam komencis.

– Do stultulo mi estas ke komencis, – oponis Golem. Li alrigardis na Viktor kaj eksmajletis. – Demandu, – diris li. – Se la demandoj estos stultaj,

mi volonte respondos... Demandu, demandu, se ne, mi denove ŝanĝos la opinion.

Oni frapis la pordon.

– Iru al diablo! – elkrieĝis Viktor. – Mi estas okupata!

– Pardonu, sinjoro Banev, – diris timema voĉo de la akceptisto. – Al vi telefonas la edzino.

– Mensogo! Mi havas neniun edzinon... Tamen, pardonon. Mi forgesis. Bone, mi tuj telefonos al ŝi, dankon. – Li kaptis glason, plenigis ĝisrande, ŝovis al Golem kaj diris: – drinku kaj pensu pri nenio. Mi tuj.

Li ŝaltis la telefonon, kaj kunmetis numeron de Lola. Lola parolis tre seke:

– Pardonu ke mi malhelpis, sed mi intencas veturi al Irma, ĉu vi bonvolos partopreni?

– Ne! – diris Viktor. – Ne bonvolos. Mi estas okupata.

– Tamen tio estas via filino! Ĉu vere vi falis ĝis tiu grado...

– Mi estas okupata! – elbojis Viktor.

– Kaj ĉu vin ne maltrankvilas kio okazas pri via filino?

– Ĉesu aspektigi, – diris Viktor. – Vi, ŝajne, volis liberiĝi de Irma. Vi liberiĝis. Kion ankoraŭ vi bezonas?

Lola komencis plori.

– Ĉesu, – diris Viktor, grimacante. – Al Irma estas bone tie. Pli bone ol en plej bona edukpensiono. Veturu vi kaj konvinkiĝu...

– Vi estas kruda senanima egoisma virporko, – deklaris Lola kaj metis la aŭskultilon.

Viktor sakris flustre, denove malŝaltis la telefonon, kaj revenis al la tablo.

– Aŭskultu, Golem, – diris li, – kion vi faras tie pri miaj infanoj? Se vi preparas tie alternaron, do mi ne konsentas.

– Kiun alternaron?

Nu, kiun... Ankaŭ mi demandas: kiun?

– Ĝis kiom mi estas informita, – diris Golem, – la infanoj estas tre kontentaj.

– Ne tio gravas... Ankaŭ sen vi mi scias ke ili estas kontentaj. Sed kion ili faras tie?

– Ĉu ili ne diris al vi?

– Kiu?

– Infanoj.

– Kiel ili povis diri al mi se mi estas ĉi tie, kaj ili – tie?

– Ili konstruas novan mondon... – diris Golem.

– Ha... Jes, tion ili diris al mi. Sed tio estas nur vortoj, filozofio... Kial vi denove mensogas al mi, Golem? Kiu nova mondo povas esti post pika drato? Ĉu nova mondo sub komando de generalo Pferd?.. Kaj kio se ili infektiĝos tie?

– Per kio? – demandis Golem.

– Per okulvitra malsano, nature!

– Mi jam sesan fojon ripetas ke genetikaj malsanoj ne estas infektaj.

– Sesan, sesan... – grumblis Viktor, perdinte fadenon de la konversacio. – Kaj kio ĝi estas entute, tiu ĉi okulvitra malsano?

– Malsano.

– Kio doloras pro ĝi? Aŭ, eble, tio estas sekreto?

– Ne, tio estas ĉie publikita.

– Do rakontu, – diris Viktor. Nur sen terminoj.

– Komence – ŝanĝoj de haŭto. Aknoj, vezikoj, precipe sur brakoj kaj gamboj, iam – pusaj ulceroj...

– Aŭskultu, Golem, ĉu tio gravas?

– Por kio?

– Por la esenco.

– Por esenco – ne, – diris Golem. – Mi opiniis ke tio interesas vin.

– Mi volas kompreni la esencon! – diris Viktor plensente.

– Sed la esencon vi ne komprenos, – diris Golem, iom laŭtiginte la voĉon.

– Kial?

– Unue ĉar vi estas ebria...

– Tio ankoraŭ ne estas kaŭzo, – diris Viktor.

– Kaj due ĉar tion tute ne eblas klarigi.

– Tio ne povas okazi, – deklaris Viktor. – Vi simple ne volas diri. Sed mi ne ofendiĝas. Subskribo, diskonigo, milita tribunalo... Jen Pavor estas arestita... Dio kun vi. Sed mi ne komprenas kial infano devas konstrui novan mondon en leprulejo. Ĉu oni ne trovis alian lokon?

– Oni ne trovis, – respondis Golem. – En la leprulejo loĝas konstrukciistoj. Kaj entreprenistoj.

– Kun mitraletoj, – diris Viktor. – Vidis mi. Nenion mi komprenas. Iu el vi mensogas. Aŭ vi aŭ Zurzmansor.

– Certe Zurzmansor, – senpasiece diris Golem.

– Kaj eblas ke vi ambaŭ mensogas. Sed mi kredas al vi ambaŭ, ĉar estas en vi io... Vi nur diru

al mi, Golem, kion ili volas? Nur honeste.

– Feliĉon, – diris Golem.

– Por kiu? Por si?

– Ne nur.

– Sed je kies konto?

– Por ili tiu ĉi demando ne havas sencon, – malhaste diris Golem. – Je konto de herboj, je konto de nuboj, je konto de fluanta akvo... Je konto de steloj.

– Ĝuste kiel ĉe ni, – diris Viktor.

– Tute ne, – oponis Golem. – Tute ne tiel.

– Kial? Ankaŭ ni...

– Ne tiel, ĉar ni eltretas herbojn, dispelas nubojn, bremsas akvon... Vi komprenis min senmetafore, sed tio estas analogio.

– Mi ne komprenas, – diris Viktor.

– Mi avertis vin. Mi mem ne komprenas multon, sed mi konjektas.

– Ĉu estas iu kiu komprenas?

– Ne scias mi. Malverŝajnas. Eble la infanoj... Sed eĉ se ili komprenas, do si-maniere. Tre si-maniere.

Viktor prenis la banĝon kaj tuŝis la kordojn. La fingroj ne obeis lin. Li metis la banĝon sur la tablon.

– Golem, – diris li. – Jen vi estas komunisto. Kion, diable, faras vi en la leprulejo? Kial vi ne sur barikado? Kial vi ne ĉe mitingo? Moskvo ne laŭdos vin.

– Mi estas konstrukciisto, – trankvile diris Golem.

– Kia konstrukciisto vi estas, se vi, diable, komprenas nenion? Kaj entute, kial vi miskondukas

min? Ni penadas jam pli ol horo, kaj kion vi diris al mi? Voras vi ĝinon kaj venigas nebulon. Hontu, Golem. Kaj mensogas vi senhalte.

– Ne tiom senhalte, kvankam ne sen tio. Ne okazas ĉe ili pusaj ulceroj.

– Redonu la glason, – diris Viktor. – Jam ebriiĝis vi. – Li plaŭdis el la botelo, kaj pe-drinkis. – Diablo vin komprenu, Golem. Ja por kio al vi tio ĉi? Se vi povas rakonti, – rakontu, sed se tio estas sekreto, – vi ne devis komenci.

– Estas tre simple klarigi tion, – bonanime diris Golem, etendante la gambojn, – Ja mi estas profeto, vi mem nomis min tia. Sed ĉiuj profetoj estas en tia situo: ili scias multe, kaj ili volas rakonti – informi agrablan konversacianton, fanfaroni por altigi sian staton. Sed kiam ili komencas rakonti, aperas iu sento de maloportuneco, embaraso, – do ili zumadas kiel Dio, kiam oni demandis lin pri la ŝtono.

– Laŭdezire, – diris Viktor. – Veturos mi en la leprulejon kaj ekscios ĉion sen vi... Sed jen kio, profetu vi ion.

Li kun intereso observis kiel la manoj kaj la piedoj perdas sentemon, kaj pensis ke estus bone drinki ankoraŭ glason por kompleto, ekkuŝi dormi, kaj poste vekiĝi kaj veturi al Diana. Ĉio okazos ne tiel malbone. Kaj entute ĉio estas ne tiel malbona. Li imagis kiel li kantos al Diana pri la submara ŝipo, kaj al li ekestis tute bone. Li prenis malsekan remilon, kiu kuŝis sur la poŭpo, kaj depuŝiĝis de la bordo, kaj la boato tuj ekbalanciĝis. Estis neniu pluvo, eĉ nuboj forestis, estis ruĝa sunsubiro, kaj li ekremis rekte al la sunsubiro, kaj la remiloj deŝir-

iĝis de la ondaj suproj. Kuŝus mi sur la fundo... Kaj li ekkuŝus, sed estis maloportune, ĉar super la orelo maldiligente zumis voĉo de Golem:

– ...Ili estas tre junaj, ĉio ĉe ili estas antaŭe, sed ĉe ni antaŭe – nur ili. Certe homo ekposedos kosmon, sed tio ne estos ruĝvanga atleto kun muskoloj, kaj certe homo venkos sin mem, sed komence li ŝanĝos sin mem... Naturo ne trompas, ĝi plenumas la promesojn, sed ne tiel kiel ni opiniis, kaj ofte ne tiel kiel ni volus...

Zurzmansor, kiu sidis sur la pruo, turnis la kapon, kaj ekestis videble ke li ne havas vizaĝon, la vizaĝon li tenis en la manoj, kaj la vizaĝo rigardis na Viktor – bona vizaĝo, honesta, sed ĝi venigis naŭzon, sed Golem daŭre ne ĉesis, kaj daŭre zumis...

– Kuŝu vi dormi, – elbalbutis Viktor, etendiĝante sur fundo de la boato. La boatripoj dolorigis liajn flankojn, kaj estis maloportune, sed li tre volis dormi. – Kuŝu vi dormi, Golem...

## Ĉapitro dek-unua

Vekiĝinte li trovis ke kuŝas en lito. Estis mallume, en la fenestron kun tambura krakado torentis pluvo. Li pene levis la manon kaj etendiĝis al la noktolampo, sed la fingroj stumblis je malvarman glatan muron.

*«Strange» – pensis li. – «sed kie estas Diana? Aŭ ĉu tio ne estas sanatorio?»*

*Li penis leki la lipojn, sed la dika raspa lango ne obeis lin. Li tre volis fumi, sed fumi*

*eblis neniokaze... «Ha, fakte, mi volas trinki».*

– Diana, – vokis li.

*«Sed tio ne estas sanatorio. En la sanatorio nokta lampo estas dekstre, sed ĉi tie dekstre estas muro... Ja tio estas mia hotelĉambro!» – ekpensis li jubile. – «Kiel mi trafis ĉi tien?» – Li kuŝis sub litkovrilo, kaj estis senvestita ĝis la tolaĵoj. – «Ial ne memoras mi ke mi senvestiĝis», – pensis li. – «Iu senvestigis min. Tamen eblas ke mi senvestiĝis mem... Se sur mi estas la botetoj, do mi senvestiĝis mem... Li frotis piedon je piedo. Aha, nudpieda. Diable, la manoj jukas, vezikoj iuj, bredis oni cimojn en la hotelĉambroj. Ŝanĝu mi la hotelon. Kien mi veturis en la boato... Ha, tio Pavor bredadis ĉi tie cimojn...»*

Subite li ekmemoris pri Pavor kaj eksidis, sed eksentis vomemon, kaj denove ekkuŝis sur la dorson.

*«Tamen delonge mi ne drinkaĉis tiel. Pavor... "Arĝenta trifolio"... Kiam okazis tio? Ĉu hieraŭ?»*

Li grimaciĝis, kaj komencis grati per la ungoj la maldekstran manon.

*«Kio estas nun – mateno aŭ vespero? Verŝajne mateno... sed povas esti ke vespero. Golem!» – elmemoris li. – «Mi kaj Golem elsuĉis plenan botelon. Kaj ne diluis. Kaj ĝis tio*

*– duonbotelon kun la altstatura. Kaj ĝis tio mi ankoraŭ ie suĉis... Aŭ tio estis hieraŭ? Momenton, sed nun – hodiaŭ aŭ hieraŭ? Leviĝi mi devus, trinki, kaj tiel plu... Ne», – pensis li obstine. – «Komence mi evidentigu. Golem rakontis al mi ion interesan, li decidis ke mi estas ebria kaj komprenas nenion, do eblas paroli kun mi sincere. Jes, mi vere estis ebria, sed, laŭmemore, komprenis ĉion. Kion mi komprenis?»*

Li furioze ekfrotis dorsan flankon de la dekstra mano je la lana litkovrilo.

*«Malfacilaj tempoj proksimiĝas…» Ne, tio el Pavor... Ha, tio el Golem: «ĉe ili ĉio estas antaŭe, kaj ĉe ni antaŭe estas nur ili». Kaj genetika malsano... Kio ja, tute eblas. Iam tio devis okazi. Eblas ke delonge okazis jam. Ene de speco naskiĝas nova speco, sed ni nomas tion genetika malsano. Malnova speco – por ĝisnunaj kondiĉoj, nova speco – por aliaj. Antaŭe estis bezonataj potencaj muskoloj, fekundeco, frostrezisteco, agresemo kaj, tiel dirite, praktika inĝenieco... Fakte ankaŭ nun tio bezonatas, sed precipe pro inercio... Oni povas neniigi milionon kun praktika inĝenieco, kaj okazos nenio esenca. Tio ja ĝustas, multfoje elprovite. Kiu diris ke se oni elprenus el historio kelkajn dekojn... Nu kelkajn centojn da homoj, tiam ni tuj okazus en ŝtona epoko. Nu, estu tio kelkaj miloj... Kio ili estas, tiuj ĉi homoj? Tio, frato, estas tute aliaj homoj. Kaj*

*tute eblas: Njuton (Newton), Ejnŝtejn (Einstein), Aristotel – ili estis mutantoj. Kondiĉoj, certe, estis ne tro favoraj, kaj tre eblas ke amaso da tiaj mutantoj pereis, ne elmontrante sin, kiel tiu knabeto el rakonto de Ĉapek... Ili certe estis specifaj: ili havis nek praktikan sagacon, nek normalajn homajn bezonojn... Aŭ, eble, tio nur ŝajnas? Simple spirita flanko estas tiel hipertrofiita ĉe ili, ke ĉio cetera ne rimarkeblas. – Nu, tion vi vane, – diris li. – Ejnŝtejn diris ke plej bone estas labori prizorgante lumturon. – Tio ja mem montras multon... Kaj entute, interese estus imagi kiel en niaj tagoj naskiĝas homo supera. Bona temo... Diable, la brakoj jukas netolereble... Estus bone verki tian utopion en stilo de Orvel (Orwell) aŭ Bernard Volf (Wolff). Tamen estas malfacile imagi tiun superhomon: grandega kalva kranio, malfortaj manetoj-piedetoj, impotento... banalaĵo. Sed, entute, devas esti io simila al tio. Entute – deŝoviĝo de bezonoj. Vodko ne bezonatas, voraĵo ne devas esti iel specifa, neniu lukso, ankaŭ inoj, entute... Tiel nur, por la trankvilo kaj pli bona koncentriĝo. Ideala objekto por ekspluatado: apartan kabineton al li, tablon, paperon, amason da libroj... Aleeton por altaj meditoj, kaj kontraŭ tio li produktas ideojn... Ne, neniu utopio okazos – kaptos lin militistoj, jen tuta utopio. Faros ili sekretan instituton, ĉiujn tiujn superhomojn alveturigos tien, metos la gardiston, kaj jen la fino.»*

Viktor leviĝis ĝemetante, paŝante per la nudaj piedoj sur la malvarma planko. Li venis en la banĉambron, malfermis la kranon, kaj kun plezurego sattrinkis, ne ŝaltante la lumon. Timigis eĉ penso – ŝalti la lumon. Poste li denove revenis sur la liton, kaj iom da tempo gratiĝis, sakrante cimojn.

*«Entute por la temo tio estas eĉ bone: sekreta instituto, gardistoj, spionoj... Patrio-tismo de patrioteca purigistino Klara... Malica fuŝaĵo. Malfacilas imagi ilian laboron, ideojn, eblecojn – ne taŭgas mi por tio... Tio tute ne eblas. Ĉimpanzo ne povas verki romanon pri homoj. Kiel mi povas verki romanon pri homo ĉe kiu estas neniuj bezonoj krom la spiritaj? Certe ion ajn mi povas imagi. Atmosferon, sta-ton de senĉesa krea ekstazo. Sento de sia ĉiopoveco, independeco... foresto de komplek-soj, absoluta sentimeco. Jes, por verki tian aĵon oni devas leki LSD. Entute emocia sfero de superhomo imagiĝus, al ordinara homo, kiel patologio. Malsano... Vivo – malsano de mate-rio, racio – malsano de vivo. Okulvitra mal-sano», – pensis li.*

Kaj subite ĉio prenis siajn lokojn.

*«Do jen kion li konsideris!» – ekpensis Vik-tor pri Golem. – «Saĝaj kaj ĉiuj senescepte talentaj. Kio do okazas? Okazas ke ili jam ne estas homoj. Zurzmansor simple mensogis al mi. Do komenciĝis jam... Nenion oni eblas*

*kaŝi», – pensis li kun kontentiĝo. – «Kaj tiun ĉi aferon – des pli. Iru mi al Golem, sufiĉas al li aspektigi profeton. Ili verŝajne multe rakontis al li... Diable, ja tio estas estonto, tiu sama estonto kiu enigas siajn palpilojn en koron de hodiaŭa tago! Ĉe ni antaŭe – nur ili...»*

Lin kaptis febra ekscitiĝo. Ĉiu sekundo estis historia, kaj bedaurindas ke li ne sciis tion hieraŭ, ĉar hieraŭ, antaŭhieraŭ, kaj antaŭ semajno ĉiu sekundo ankaŭ estis historia.

Li saltleviĝis, ŝaltis lumon kaj, grimacante pro ĝi, komencis palpe serĉi siajn vestaĵojn. La vestaĵoj forestis, sed poste la okuloj kutimiĝis al la lumo, li kaptis la pantalonon, pendantan sur la litokapo, kaj subite ekvidis sian brakon. La brako ĝis la kubuto estis kovrita per ruĝa ekzantemo kun morte-blankaj tuberetoj. Kelkaj tuberetoj sangis pro la gratado. Sur alia mano estis samo.

«Diable», – pensis li, malvarmiĝante, ĉar li jam sciis kio estas tio. Li ekmemoris: ŝanĝoj de la haŭto, ekzantemo, vezikoj, iam pusaj ulceroj... Pusaj ulceroj ankoraŭ forestis, sed li kovriĝis per malvarma ŝvito kaj, ellasinte la pantalonon, eksidis sur la liton.

«Ne povas esti», – pensis li. – «Ankaŭ mi. Ĉu vere ankaŭ mi?»

Li singarde karesis per la manplato la haŭton kovritan per la buletoj, poste fermis la okulojn kaj, detenante la spiron, ekaŭskultis sin. Brue kaj malofte batis la koro, en la oreloj alte sonoris la sango, la kapo ŝajnis grandega, malplena, estis neniu doloro, forestis vata pezeco en la cerbo.

*«Stultulo», – pensis li smajlante. – «Kion mi esperas rimarki? Tio devas esti kiel morto – antaŭ sekundo vi estis homo, preterbrilis kvanto da tempo – kaj ekestas vi dio, sed vi ne scias tion kaj scios neniam, same kiel stultulo ne scias ke li estas stultulo, kiel saĝulo, se li vere estas saĝa, ne scias ke li estas saĝulo... Tio verŝajne okazis kiam mi dormis. Ĉiuokaze, ĝis kiam mi ekdormis, esenco de malsekulaĉoj estis por mi ekstreme nebula, sed nun mi vidas ĉion kun ega precizeco, kaj atingis tion per pura logiko, eĉ nerimarke...»*

Li feliĉe ekridis, surpaŝis la plankon, kaj, krakante per la muskoloj, venis al la fenestro.

*«Mia mondo», – pensis li, rigardante tra la verŝita per la akvo vitro, kaj la vitro malaperis. En malproksima subo dronis en la pluvo la urbo, rigidiĝinta en la teruro, kaj la grandega malseka lando, kaj poste ĉio demoviĝis, forflosis, kaj restis nur eta blua globeto kun longa blua vosto, kaj li ekvidis grandegan lentsimilan galaksion, oblikve kaj morte pendantan en pulsanta senfundaĵo, ŝiraĵojn da lumanta materio, torditajn de fort-kampoj, kaj senfundaĵojn kie forestis lumo; tiam li etendis la manon kaj enigis ĝin en pufan blankan kernon, kaj eksentis malpezan varmon, kaj kiam li streĉis la pugnon, la materio trairis inter la fingroj kiel sapa vezikaro.*

Li denove ekridis, klakis perfingre sian respegu-

lon en la vitro, kaj karese movis la manplaton sur tuberetoj de sia haŭto.

– Pro tiu okazo necesas drinki! – diris li laŭte.

En la botelo restis ankoraŭ iom da ĝino, bedaŭrinda olda Golem ne sukcesis ĝisdrinki, bedaŭrinda olda misprofeto...

*«Ne pro tio li estas misprofeto ke profetaĵoj liaj ne estas veraj, sed ĉar li estas ne pli ol parolanta marioneto. – Mi ĉiam ŝatos vin, Golem», – pensis Viktor, – «vi estas bona homo, vi estas saĝa homo, sed vi estas nur homo...»*

Li verŝis la restaĵon en la glason, per kutima movo enverŝis la alkoholaĵon en la gorĝon kaj, ankoraŭ ne sukcesinte pe-gluti, ĵetiĝis en la banĉambron. Li vomis.

*«Diable», – pensis li, – «kia aĉaĵo».*

En la spegulo li ekvidis sian vizaĝon – ĉifitan, iom velke ŝvelintan, kun nenature grandaj kaj nenature nigraj okuloj.

*«Do venis la fino», – pensis li, – «do venis la fino, Viktor Banev, drinkulo kaj fanfaronulo. Ne drinkos vi plu kaj ne kriaĉos kantojn, ne ridegos pro stultaĵoj kaj ne balbutos vi gajajn sensignifaĵojn per la ligna lango, ne pugnobatalos, ne diboĉos kaj ne huliganos, ne timigos pasantojn, ne konfliktos kun polico, ne malpaciĝos kun sinjoro prezidento, ne enrompiĝos en noktajn drinkejojn kun bruanta akompanaro*

*da junaj admirantoj...»*

Li revenis sur la liton. Deziro fumi forestis. Li volis nenion, ĉio naŭzis, kaj venis melankolio. Sento de perdo, komence malpeza, nur iomete rimarkinda, kiel tuŝo de araneaĵo, diskreskis, morozaj vicoj da pika drataro ekstaris inter li kaj la mondo, kiun li tiel amis.

*«Ĉion oni devas pripagi», – pensis li, – «nenion oni akceptas senpage, kaj ju pli vi ricevis, des pli oni devas pagi, pro nova vivo oni devas pagi per malnova vivo...»*

Li furioze gratis la manojn, kaj ne rimarkis tion.

Diana eniris ne frapante, deĵetis la pluvmantelon, kaj haltis apud li, ridanta, alloga, kaj levis la manojn, ordigante la harojn.

– Malvarmas mi, – diris ŝi. – Ĉu vi enlasos varmiĝi?

– Jes, – diris li, malbone komprenante kion ŝi diras.

Ŝi malŝaltis la lumon, kaj nun li ne vidis ŝin, nur aŭdis kiel la ŝlosilo turniĝis en la serurtruo, krakadon da disiĝantaj butonoj, susuron de la vestaĵoj, kaj kiel la ŝuo falis sur la plankon, kaj poste ŝi okazis apude, varma, glata, bonodora.

*Sed li daŭre pensis pri tio ke al ĉio venis nun fino – ĉiama pluvo, morozaj domoj kun truigitaj tegmentoj, fremdaj nekonataj homoj en malseka nigra vestaĵo, kun malsekaj tukoj sur la vizaĝoj. Kaj jen ili demetas la tukojn, demetas la gantojn, demetas la vizaĝojn, kaj*

*metas ilin en specialajn ŝranketojn; kaj brakoj iliaj estas kovritaj per pusaj ulceroj – angoro, teruro, soleco...*

Diana premiĝis al li, kaj li per kutima movo brakumis ŝin. Ŝi estis sama, sed li, li jam ne estis sama, li nenion scipovis plu, ĉar li bezonis nenion.

– Kio pri vi, karulo? – karese demandis Diana. – Ĉu vi drinkis tro multe?

Li singarde deprenis ŝiajn manojn de sia kolo. Nun li eksentis teruron.

– Atendu, – diris li. – Atendu.

Li leviĝis, pe-palpis ŝaltilon, ŝaltis lumon, kaj kelkajn sekundoj staris dorse al ŝi, ne decidante turniĝi, tamen li turniĝis. En ordo, ŝi estis belega. Ŝi estis verŝajne eĉ pli bela ol kutime, sed tio estis kiel pentraĵo. Tio ekscitis fieron pri homo, ravon pri homa perfekteco, sed tio ekscitis nenion alian. Ŝi rigardis lin, mire levante la brovojn, kaj poste ŝi ŝa-jne ektimis, ĉar subite ŝi eksidis rapide, kaj li ek-vidis ke ŝiaj lipoj moviĝas. Ŝi diris ion, sed li ne aŭdis.

– Atendu, – ripetis li. – Tio ne povas esti. Aten-du.

Li vestiĝis kun febra hasto, kaj daŭre diris: atendu, atendu, sed li ne pensis pri ŝi, temis ne nur pri ŝi. Li elsaltis en koridoron, stumblis je ĉambro de Golem, je la fermitan pordon, ne tuj komprenis kien nun, kaj poste deŝiriĝis kaj ekkuris soben, en la restoracion.

– Ne volas, – ripetadis li, – ne volas mi tion, ne petis mi.

Dank al Dio, Golem troviĝis sur sia kutima loko.

Li sidis, metinte la manon post dorson de la brakseĝo, pririgardante kontraŭ lumo pokaleton da konjako. Sed doktoro R.Kvadriga estis ruĝa, agresema, kaj, ekvidinte na Viktor, diris laŭte je la tuta halo:

– Tio estas malsekulaĉoj. Merduloj. For!

Viktor falis en sian brakseĝon, kaj Golem, dirante eĉ ne vorton, verŝis al li konjakon.

– Golem, – diris Viktor. – Aĥ, Golem, mi infektiĝis!

– Ŝprucado! – deklaris R.Kvadriga. – Ankaŭ al mi.

– Drinku la konjaketon, Viktor, – diris Golem. – Ne nerveziĝu vi tiel.

– Iru al diablo, – diris Viktor, kun teruro rigardante lin. – Ĉe mi estas okulvitra malsano. Kion fari?

– Bone, bone, – diris Golem. – Vi tamen drinku. – Li levis la fingron kaj kriis al kelnero: – Sodan akvon! Kaj ankoraŭ konjakon.

– Golem, – diris Viktor malespere. – Vi ne komprenas. Mi ne povas. Mi ekmalsanis, diras mi al vi! Tio estas malhoneste... Mi ne volis... Ja vi diris – ne infekte...

Li teruriĝis pro penso ke parolas tro senlige, ke Golem ne komprenas lin kaj opinias ke li estas simple ebria. Tiam li ŝovis sub nazon de Golem siajn manojn. La pokaleto renversiĝis, ruliĝis sur la tablo, kaj falis planken.

Golem komence haste retrokliniĝis, poste ekrigardis, kliniĝis antaŭen, prenis manon de Viktor per finaĵoj de la fingroj, kaj komencis pririgardi la gratitan tuberetan haŭton. Liaj fingroj estis malvarmaj

kaj firmaj.

*«Jen estas la fino», – pensis Viktor, – «Jen estas unua medicina ririgardo, kaj poste estos aliaj pririgardoj kaj mensogaj promesoj ke estas ankoraŭ espero, kaj trankviligaj mikstur oj, kaj poste mi kutimiĝos, kaj estos jam neniaj pririgardoj, kaj oni transportos min en la leprulejon, kovros la buŝon per nigra tuko, kaj ĉio estos finita.»*

– Ĉu vi manĝis sovaĝan fragon? – demandis Golem.

– Jes, obeeme diris Viktor. – La ĝardenan.

– Voris, ŝajne, ĉirkaŭ du kilogramojn, – diris Golem.

– Kiel rilatas la frago? – ekkriaĉis Viktor, elŝirante la manon. – Faru ion! Ne povas esti ke estas malfrue. Ja ĵus komenciĝis.

– Ĉesu kriaĉi. Ĉe vi estas alergio. Ne estas rekomendinde al vi vori tiom da frago.

Viktor ankoraŭ ne komprenis. Pririgardante la manojn li balbutis: "Ja vi mem diris... Veziketoj... Ekzantemo..."

– Veziketoj ankaŭ pro cimoj okazas, – diris Golem edife. – Vi estas sentema al kelkaj substancoj. Kaj imago via ne konformas al la racio. Same kiel ĉe plimulto da verkistoj. Ankaŭ vi tien – en malsekulaĉojn...

Viktor eksentis ke li reviviĝas.

*«Preterpasis», – frapiĝis en lia kapo. – «Preterpasis, ŝajne. Se preterpasis, mi ne*

*scias kion mi faros... Fumi ĉesos...»*

– Ĉu vi ne mensogas? – diris li plende.

Golem smajletis.

– Ja drinku vi la konjaketon, – proponis li. – Ĉe alergio estas malpermesate drinku konjakon, sed vi drinku. Ĉar tro bedaŭrindas via aspekto.

Viktor prenis lian pokaleton, fermis la okulojn kaj drinkis.

*«Nenio! Iom naŭzetas, sed tio, oni devas kompreni, pro la postebriiĝo. Tuj pasos».*

Kaj ĉio pasis.

– Kara verkisto, – diris Golem. – Por ekesti konstrukciisto veziketoj ne sufiĉas.

Venis la kelnero kaj metis sur la tablon konjakon kaj sodan akvon. Viktor profunde kaj liberiĝe suspiris, enspiris la konatan restoracian aeron, kaj eksentis belegajn odorojn de tabaka fumo, de marinita cepo, de iom bruligita oleo kaj de rostita viando. La vivo revenis.

– Amikego, – diris li al la kelnero. – Botelon da ĝino, limonan sukon, glacion, kaj kvar porciojn da lamprido en la ducent-dek-sesan. Kaj rapide!..

– Alkoholuloj, – diris li al Golem kaj R.Kvadriga. – Aĉaj restoraciaj ratoj. Drinkaĉu vi ĉi tie ĝis perdo de la konscio, sed mi iros al Diana. – Li estis preta kisadi ilin.

Golem diris, rilatante al neniu:

– Bedaŭrinda belega anasido!

Por unu sekundo Viktor eksentis bedaŭron. Aperis kaj malaperis rememoroj pri iuj gigantaj

neefektiviĝintaj eblecoj. Sed li nur ekridis, deŝovis la brakseĝon, kaj ekpaŝadis al la eliro.

## Ĉapitro dek-dua

*Pasis jaro post la milito. Leŭtenanto Bo estis malmobilizita pro la vundiĝo. Sur lin oni pendis medalon "Viktorio", enŝovis en la dentojn unumonatan monprovizon kaj kartonan keston kun donaco de sinjoro prezidento: botelon da trofea ŝnapso, du ladskatoletojn da strasburga pasteĉo, du rondojn da fumaĵita ĉevala kolbaso, kaj trofeajn silkajn kalsonojn por ordigo de familia vivo.*

*Reveninte en la ĉefurbon la leŭtenanto ne senkuraĝiĝas. Li estas bona mekanikisto, lin oni ĉiumomente prenos labori en universitatajn metiejojn, de kie li foriris volontule, sed li ne rapidas – li restarigas malnovajn konatecojn, ordigas la novajn, kaj inter tio fordrinkas la fatrason, elprenitan de la malamiko je konto de la reparacioj. En unu festeneto li renkontas virinon nomo de kiu estas Nora, tre similan al Diana. Priskribo de la festeneto: eluzitaj antaŭmilitaj gramofondiskoj, brulalkoholo de hejma purigo, usonaj viandkonservaĵoj, silkaj ĉemizetoj sur nuda korpo, kaj ĉiuforme preparita karoto. La leŭtenanto, tintante per la medaloj, momente dispelas diversajn civilulojn, senlace almetantaj al Nora kuiritan karoton, kaj komencas regulan sieĝon. Nora kondutas strange. De unu flanko ŝi videble ne kontraŭas, sed de dua flanko ŝi donas al li*

*kompreni ke ligiĝi kun ŝi estas danĝere. Tamen la eksleŭtenanto, varmigita per la brulalkoholo volas scii nenion. Ili lasas la festeneton, kaj iras al Nora. La postmilita ĉefurbo nokte: maloftaj lanternoj, la pavimo estas kavetita, ĉirkaŭbaritaj ruinoj, ne pe-konstruita cirko, en kiu putras ses-milo da militkaptitoj sub gardo de du invalidoj, en tute jam malluma interstrateto oni rabas iun. Nora loĝas en antikva trietaĝa domo, la ŝtuparejo estas abomenigita, sur unu el la pordoj – kreta surskribo: "Ĉi tie loĝas ŝafhundo". En longa koridoro, amasigita per diversa fatraso, deflankiĝas en ombron mucidaj personoj. Nora, bruante per multnombraj ŝlosiloj, malŝlosas sian pordon kun mirakle konserviĝinta brila leda tegaĵo. En la enirĉambro ŝi faras ankoraŭ unu averton, sed Bo, opiniante ke temas nur pri iu krimaĵo, respondas ke li iradis en ĉevalaj linioj kontraŭ tankoj. La loĝejeto estas ne laŭtempe purta kaj komforta, grandega sofo, Nora rigardas la leŭtenanton kun iu bedaŭro, foriras por neloge kaj revenas kun komencita botelo da konjako, vestita plejgrade alloge. Okazas ke en ilia dispono estas nur duonhoro. Post la duonhoro kontentiĝinta leŭtenanto foriras kun espero renkontiĝi denove. En fino de la korodoro oni jam atendas lin – du mucidaj homoj en ombro. Malagrable smajlante ili baras la vojon, kaj proponas konversacii. La leŭtenanto sen superfluaj paroloj komencas bati ilin, kaj akiras neatendite*

*facilan venkon. La faligitaj mucidaj homoj plorante kaj aĉe hihiante klarigas al leŭtenanto Bo ties situacion. Eksleŭtenanto batis siajn. Ili ĉiuj estas nun siaj. Nora estas ne simple alloga virino, Nora estas reĝino de ĉefurbaj cimoj. "Venis fino al vi, sinjoro oficiro, ni renkontiĝos en 'Atakam', ni ĉiuj renkontiĝas tie ĉiunokte. Iru vi hejmen, kaj kiam vi ne povos jam toleri, venu, ĉe ni estas malfermite ĝis mateno..."*

*En okcidenta limkvartalo en luant-loĝeja domo apud kemia fabriko loĝas multinfana konsiliano Bo. Speciale detala kaj speciale enua priskribo de cirkonstancoj de la heroo: tri ĉambretoj, kuirejo, enirĉambro, eluzita edzino, kvino da verdetaj infanoj, forta maljuna bopatrino, veninta el vilaĝo. La kemia fabriko fetoras, tage kaj nokte super ĝi staras fostoj da diverskolora fumo, pro la venena fetoro mortas arboj, flaviĝas herboj, sovaĝe kaj strange mutacias muŝoj. La konsiliano dum kelkaj jaroj gvidas batalon por malsovaĝigi la fabrikon: koleraj postuloj adresitaj al la administraro, larmaj peticioj en ĉiujn instancojn, frakasaj felietonoj en ĉiujn ĵurnalojn, senfruktaj penoj organizi strikpostenojn ĉe la fabrikenirejo. Tamen la fabriko staras kiel bastiono. Sur bordostrato antaŭ la fabriko falas mortvenenitaj gardistoj; mortas hejmaj bestoj; tutaj familioj lasas la loĝejojn kaj foriras vagadi; en ĵurnaloj aperas nekrologoj pri frua morto de direktoro de la fabriko. Ĉe konsiliano Bo mortas edzino, infanoj unu post la alia ekmal-*

*sanas pri bronka astmo. Foje vespere, sobiĝinte en la kelon por preni hejtlignon, li malkovras tie grenadĵetilon kaj grandegan kvanton da grenadoj, restintaj de tempo de la Rezistmovado. Samnokte li transportas ĉion tion en la subtegmentejon, kaj malfermas la fenestreton. La fabriko kuŝas antaŭ li videbla bonege: en tranĉa lumo de lumĵetiloj svarmas laboristoj, kuradas vagonetoj, flosas flav-verdaj buloj da venenaj vaporoj.*

*"Mi murdos vin", – flustras la konsiliano kaj komencas pafadi. Ĉi tage li ne iras en la oficejon, ankaŭ sekvonttage. Li ne dormas, ne manĝas, li sidas kaŭre ĉe la fenestreto, kaj pafadas. Tempo de tempo li faras paŭzojn por malvarmiĝu tubo de la grenadĵetilo. Li surdiĝis pro la pafoj kaj blindiĝis pro la pulvora fumo. Iam ŝajnas al li ke la kemia fetoro malpliiĝas, kaj tiam li smajlas, lekas la lipojn kaj flustras: «Mi murdos vin». Poste li falas senforta kaj ekdormas, sed vekiĝinte li vidas ke la grenadoj finiĝis – restis nur tri pecoj. Li elpafas ilin, kaj elŝoviĝas el la fenestreto. Vasta korto de la fabriko estas dissemita per la grenadfuneloj, faŭkas elrompitaj vitroj, sur flankoj de gigantaj gasujoj malhelas enpremaĵoj, la korto estas fosita per komplika sistemo da tranĉeoj, en la tranĉeoj, per mallongaj kuroj, moviĝas laboristoj, pli rapide ol antaŭe ruliĝas vagonetoj, ŝoforoj de la elektrotransportiloj estas gardataj per feraj platoj, kaj kiam vento forŝovas nubojn da venenaj vaporoj, sur brika*

*muro de la fabrikadministrejo videblas freŝa blanka surskribo: "Atenton! Dum pafado tiu ĉi flanko estas plej danĝera"...*

Viktor pe-legis la lastan paĝon, ekfumis, kaj ekrigardis folion, troviĝantan en la tajpilo. Tie estis nur unu kaj duono da linioj:

*«Elirinte el la redakcio ĵurnalisto Bo volis jam preni taksion, sed ŝanĝis la intencon, kaj sobiĝis en la metroon».*

Viktor tute precize sciis kio okazis poste pri ĵurnalisto Bo, sed li ne scipovis skribi plu. La horloĝo montris la duan kvardek kvin. Viktor leviĝis, kaj vaste malfermis la fenestron. Sur la strato estis tre mallume, kaj ene de la mallumo brilis pluvo. Viktor ĝisfumis ĉe la fenestro la cigaredon, forĵetis la stumpon en la malsekan nokton, kaj telefonis al la akceptisto. Resonis nekonata voĉo. Viktor informiĝis kiu tago de la semajno estas hodiaŭ. La nekonata voĉo, prokrastinte, informis ke nun estas nokto de vendredo al sabato.

Viktor palpebrumadis, metis la aŭskultilon, kaj decide elŝiris la folion el la tajpmaŝino. Sufiĉas. Du noktotagoj seninterrompe, ne rektiĝinte, vidinte neniun, parolante kun neniu, malŝaltinte la telefonon, ne respondante al frapadoj sur la pordon, sen Diana, sen drinkaĵoj, ŝajne eĉ sen manĝo, nur tempo de tempo grimpante sur la liton, por ekvidi sonĝe reĝinon de cimoj, kiel ŝi sidas super la pordo kaj movas la nigrajn lipharetojn... Sufiĉas.

*«Ĵurnalisto Bo atendos sur la kajo kiam*

*venos trajno kun surskribo "Envagoniĝo malpermesatas". Nenio okazos al li. Kaj mi dume manĝetos, meritas mi tion, je Dio...»*

Viktor demetis la tajpilon, metis la manuskripton en la tablokeston, kaj palpis en la malplena ŝranketo. Poste li maĉis malfreŝan bulkon kun marmelado, kaj tre bedaŭris ke forverŝis duonbotelon da brando en la lavabon, por eviti la tenton, kaj ĝojis ke rakontaro "Post kulisoj de granda urbo" malgraŭ ĉio estas komencita, kaj komencita ne malbone, bonege komencita. Kvankam, verŝajne, bezonatos reskribi ĉion.

*«Strange tamen», – pensis li, – «kial tiuj ĉi rakontoj efektiviĝis ĝuste nun? Kial ne antaŭ jaro, antaŭ du jaroj, kiam mi elpensis ilin? Nun mi devus verki pri malfortulo, imaginta sin superhomo, jen pri kio. Ja mi komencis de tio. Cetere tio okazas pri mi ne unuafoje. Sed se mi ekpensu kaj detale ekmemoru, tio okazas ĉiam. Kaj ĝuste tial ne eblas verki laŭ mendo. Komencas mi verki romanon pri junaj jaroj de sinjoro prezidento, kaj rezultiĝas – pri insulo kie loĝas strangaj simioj kiuj nutras sin ne per bananoj, sed per pensoj de suferintoj pro ŝiprompiĝo... Tamen ĉi tie la ligo estas videbla. He, kio ja, ĝi ĉiam ekzistas. Oni devas nur serĉi, sed kiu volas serĉi nun post dutaga abstinado. Sobiĝu mi, ĉe la akceptisto ĉiam troviĝas drinkaĵo. Jen pe-maĉos mi nun kaj sobiĝos...»*

Viktor ektremis kaj ĉesis maĉi. El nigra abismo post la fenestro, tra plaŭdo de pluvo, ekaŭdiĝis sono: kvazaŭ oni batis tabulon per martelo.

"Oni pafas" – mire ekpensis Viktor.

Iom da tempo li streĉe aŭskultis...

*«Nu bone, sed kion la aŭtoro volis diri per tiu ĉi sia verkaĵo? Por kio li decidis revivigi malfacilan postmilitan tempon, kiam ie-tie ankoraŭ renkontiĝis cimoj kaj ventkapaj virinoj? Eble la aŭtoro volis montri heroecon kaj rezistemon de la ĉefurbo, kiu sub gvido de lia ekscelenco... Ne okazos tio, sinjoro Banev! Ne permesos ni! Tuta mondo scias ke laŭ rekta ordono de la sinjoro prezidento posedantoj de kemiaj entreprenoj malpurigantaj aeron en la ĉefurbo estis punataj je sumoj... Ke dank al persona kaj senĉesa zorgo de sinjoro prezidento pli ol cent mil infanoj de la ĉefurbo ĉiujare elveturas en eksterurbajn ripozejojn... Kaj ke laŭ tabelo de rangoj ranguloj malpli altaj ol 7-klasaj ne havas rajton kolekti subskribojn sub peticioj...»*

Kaj tiam la lumo estingiĝis.

– Ha! – diris Viktor voĉe, kaj la lampo ekfunkciis denove, sed duonarde.

– Kio estas tio? – diris Viktor, sed pli lume ne ekestis.

Viktor atendis iomete, kaj poste telefonis al la akceptisto. Neniu reagis.

*«Eblas telefoni en elektrostacion, sed por*

*tio oni devas trovi telefonan libron, sed kie ĝin serĉi, kaj tutegale venis tempo enlitiĝi. Sed antaŭe necesas drinki.»*

Viktor leviĝis, kaj subite ekaŭdis iun susuron. Iu movadis sur la pordo siajn manojn. Poste oni komencis puŝiĝi je la pordo.

– Kiu estas tie? – demandis Viktor, sed oni ne respondis al li, aŭdiĝis nur ke oni enpuŝiĝas kaj nazosiblas.

Viktor eksentis teruron. La muroj, ruĝetaj pro la duonlumo ŝajnis fremdaj kaj nekutimaj, en la anguloj densiĝis tro multe da ombro, kaj post la pordo moviĝis io granda, stulta kaj sensenca...

– Per kio mi ĝin – ekpensis Viktor, ĉirkaŭrigardante, sed tiam post la pordo oni diris per raŭka flustro:

– Banev, he, Banev, ĉu vi estas ĉi tie?

Dirinte duonvoĉe "idioto", Viktor venis en la enirĉambron kaj turnis la ŝlosilon. En la ĉambron enrompiĝis R.Kvadriga. Li estis en negliĝa mantelo, liaj haroj estis viligitaj, la okuloj vigle moviĝis.

– Dank al Dio ke apenaŭ vi estas surloke, – tuj ekparolis li. – Ĉar mi tute freneziĝis pro la timo... Aŭskultu, Banev, necesas forkuri... Iru, ĉu? Iru ni de ĉi tie, Banev... – Li kaptis na Viktor je la ĉemizo, kaj ektiris lin en la koridoron. – Iru ni, ne eblas plu...

– Stultiĝis vi, – diris Viktor, elŝiriĝante. – Iru dormi, strangulo. Estas la tria nokte.

Sed Kvadriga denove kaptis lin lerte je la ĉemizo, kaj Viktor mire evidentiĝis ke la doktoro honoris kauza estas tute sobra kaj eĉ senodora.

– Oni ne povas dormi, – diris Kvadriga. – Oni devas forkuri el tiu ĉi malbenita domo. Ĉu vi vidas kio pri la lumo? Pereos ni ĉi tie... Kaj entute oni devas fuĝi el la urbo. Ĉe mi en la vilao staras aŭto. Iru ni. Mi forveturus sola, sed mi timas eliri...

– Ĉesu, ne kaptiĝu vi, – diris Viktor.– Trankviliĝu antaŭe.

Li entiris na Kvadriga en la ĉambron, sidigis lin en la brakseĝon, kaj ekiris en la banĉambron por glaso da akvo. Kvadriga tuj saltleviĝis kaj postkuris lin.

– Ni estas solaj ĉi tie, neniu restis, – diris li. – Golem forestas, la pordisto forestas, la direktoro forestas...

Viktor malfermis la kranon. En la tuboj ekaŭdiĝis grumblo, elverŝis kelkaj gutoj.

– Kio, – diris Kvadriga, – ĉu vi akvon bezonas? Iru, ĉe mi estas plena botelo. Nur rapide. Kaj kune.

Viktor skuis la kranon. Elverŝis ankoraŭ kelkaj gutoj, kaj la grumblo ĉesiĝis.

– Kio okazis? – demandis Viktor fridiĝante. – Ĉu milito?

Kvadriga svingis la manon.

– Kiu ja milito... Oni devas forkuri dum ne estas malfue, sed li – milito...

Viktor deŝovis lin per la kubuto, eliris el la ĉambro kaj direktiĝis soben, al la akceptisto. Kvadriga etpaŝe sekvis lin.

– Aŭskultu, – balbutis li. – Iru ni tra la rezerva eliro... Nur foriri, sed tie ĉe mi estas aŭto. Jam pretigita, ŝarĝita... Mi kvazaŭ antaŭsentis, je Dio... Vodketon drinku ni kaj ekveturu, ĉar ne restis ĉi tie

vodketo...

En la koridoro nehele, kiel ruĝaj steletoj lumiĝis plafonlampoj, sur la ŝtuparo tute forestis lumo, ankaŭ en la vestiblo, nur super skrib-pupitro de la akceptisto lumetis lampo. Tie sidis iu, sed tio ne estis akceptisto.

– Iru ni, iru, – diris Kvadriga kaj ektiris na Viktor al la eliro. – Tien ne iru, tie estas malbone...

Viktor liberiĝis, kaj venis al la skrib-pupitro.

– Kial ĉe vi tiu ĉi malordaĉo... – komencis li, kaj eksilentis.

Ĉe la skrib-pupitro sidis Zurzmansor kaj rapide skribis en dikan kajeron.

– Banev, – diris li ne levante la kapon. – Jen estas fino, Banev. Adiaŭ. Kaj ne forgesu nian konversacion.

– Sed mi ne intencas forveturi, – refutis Viktor. Lia voĉo deŝiriĝis. – Mi intencas ekscii kio okazas pri la elektro kaj akvo. Ĉu tio estas via laboro?

Zurzmansor levis la flavan vizaĝon.

– Ne, – diris li. – Ni ne laboras plu. Adiaŭ, Banev. – Li etendis trans la skrib-pupitro la manon en la ganto.

Viktor aŭtomate prenis tiun ĉi manon, eksentis manpremon kaj premis mem.

– Tia estas vivo, – diris Zurzmansor. – Ni kreas estonton, sed ne por ni. Vi, ŝajne, jam komprenis tion. Aŭ komprenos post nelonge. Tio koncernas vin pli ol nin. Adiaŭ. Li kapklinis kaj denove ekskribis.

– Iru ni! – siblis Kvadriga super la orelo.

– Nenion mi komprenas, – laŭte, je la tuta vestiblo diris Viktor. – Kio okazas ĉi tie?

Li ne volis ke en la vestiblo estu silente. Li ne volis senti sin eksterulo ĉi tie. Ne li estas ĉi tie eksterulo, kaj ne sidu ĉi tie Zurzmansor je la tria nokte ĉe skrib-pupitro de akceptisto. Kaj ne timigu min, ja mi ne estas al vi Kvadriga...

Sed Zurzmansor ne aŭdis aŭ ne volis aŭdi. Tiam Viktor demonstre levis la ŝultrojn kaj direktiĝis en la restoracion. Ĉe la pordo li haltis.

En la halo duonlumis la planklampoj, duonlumis la lustro, duonlumis la murlampoj, kaj la halo estis plena. Ĉe la tabletoj sidis malsekulaĉoj. Ili ĉiuj estis samaj, sed sidis en diversaj pozoj. Iuj el ili legis, aliaj dormis, kaj multaj, kvazaŭ rigidiĝinte, senmove rigardis nenien. Heliĝis nudaj kranioj, staris odoro de malsekeco kaj medikamentoj. La fenestroj estis vaste malfermitaj, sur la planko malhelis akvo. Aŭdeblis neniu sono, nur de ekstere aŭdiĝis plaŭdo de pluvo...

Poste antaŭ Viktor aperis Golem, streĉita, zorgigita, tute maljuna.

– Kial vi ĝis nun estas ĉi tie? – demandis li duonvoĉe. – Foriru, ne estu ĉi tie.

– Kion signifas – ne estu? – diris Viktor denove incitiĝinte. – Mi volas drinki.

– Pli mallaŭte, – diris Golem. – Mi opiniis ke vi jam forveturis. Mi frapis vian pordon. Kien vi nun?

– En mian ĉambron. Prenu mi botelon kaj iru en la ĉambron.

– Ĉi tie forestas alkoholaĵoj, – diris Golem.

Viktor silente montris per la fingro la ŝrankon, kie duonlume brilis vicoj da boteloj. Golem retrorigardis.

– Ne, – diris li. – Ho ve!

– Mi volas drinki! – ripetis Viktor obstinvoĉe.

Sed li ne sentis en si obstinecon. Li kuraĝaĉis. La malsekulaĉoj rigardis lin. La legantoj mallevis la librojn, la rigidiĝintoj turnis la kraniojn, kaj nur dormantoj daŭrigis dormi. Dekoj da brilantaj okuloj, kvazaŭ pendantaj en la ruĝeta mallumo, rigardis lin.

– Ne iru vi en la ĉambron, – diris Golem. – Foriru el la hotelo. Al Lola... Aŭ al la doktoro en la vilaon... Sed mi devas sciu kie vi troviĝas. Mi alveturos preni vin... Aŭskultu, Viktor, ne kontraŭu, faru kion mi diras. Forestas nun tempo rakonti, kaj maldecas tio. Bedaŭrindas ke Diana forestas, ŝi konfirmus.

– Sed kie estas Diana?

Golem denove retrorigardis, kaj rigardis la horloĝon.

– Je la kvara... Aŭ kvina... Ŝi estos apud aŭtbusa stacio ĉe Suna pordego.

– Kaj kie ŝi estas nun?

– Nun ŝi estas okupata.

– Tiel do, – diris Viktor, kaj ankaŭ ekrigardis la horloĝon. – Je la kvara aŭ kvina ĉe Suna pordego. – Li tre volis foriri. Estis netolereble stari tiel, en atent-fokuso de tiu ĉi kvieta kuniĝo.

– Eblas ke je la sesa, – diris Golem. Iru vi en la vilaon kaj atendu tie.

– Ŝajnas ke vi simple volas forigi min, – diris Viktor.

– Jes, – diris Golem. Subite li kun intereso fiksis la okulojn sur vizaĝon de Viktor. – Viktuar, ĉu vere vi tute-tute ne volas malaperi de ĉi tie?

– Mi volas dormi, – malzorge diris Viktor. – Mi ne dormis du noktojn. – Li prenis na Golem je la butonon kaj elkondukis lin en la vestiblon.

– Bone, mi foriros, – diris li. – Sed kiu ja panoptiko estas ĉi tie? Ĉu ĉe vi estas kongreso?

– Jes, – diris Golem.

– Aŭ vi ekribelis?

– Jes, – diris Golem.

– Ĉu eble komenciĝis milito?

– Jes, – diris Golem. – Jes, jes, jes, jes. Malaperu de ĉi tie.

– Bone, – diris Viktor. Li turniĝis por iri, sed haltis. – Kaj Diana? – demandis li.

– Al ŝi minacas nenio, – diris Golem. – Ankaŭ al mi. Al neniu el ni minacas io. Ĉiuokaze ĝis la sesa. Eble ĝis la sepa.

– Vi respondecas al mi pri Diana, – diris Viktor mallaŭte.

– Golem elprenis la naztukon kaj viŝis la kolon.

– Mi respondecas pri ĉio, – diris li.

– Ĉu? Mi preferus ke vi respondecu nur pri Diana.

– Vi tedis al mi, – diris Golem. – Ho kiel vi tedis al mi, belega anasido. Diana estas kun la infanoj. Al Diana minacas tute nenio. Foriru do. Mi devas labori.

Viktor turniĝis kaj ekiris al la ŝtuparo. Zurzmansor forestis ĉe la skrib-prupitro, restis nur lampo, duonlumanta super la dika laktole bindita kajero.

– Banev, – vokis R.Kvadriga el iu malluma angulo. – Kien vi? Iru ni!

– Ja ne povas mi tiriĝi sub la pluvo en la pantofloj! – kolere reeĥis Viktor, ne turniĝante.

*«Forĵetis», – pensis li, – «Ili forĵetis nin el la hotelo. Eblas ke ankaŭ el la urbestraro ili forĵetis nin. Kaj eble el la urbo... Kaj kio poste?»*

En sia ĉambro li rapide revestiĝis, kaj surmetis la pluvmantelon. Kvadriga senevite malhelpis moviĝi

– Ĉu vi iros tiel, en la negliĝa mantelo? – demandis Viktor.

– Ĝi estas varmiga, – diris Kvadriga. – Kaj hejme estas ankoraŭ unu.

– Ŝtipo, iru vestiĝi.

– Ne iros mi, – firme diris Kvadriga.

– Iru ni kune, – proponis Viktor.

– Ne. Ankaŭ kune mi ne volas. Ja ne timu vi, mi tiel... Mi kutimiĝis...

Kvadriga estis kiel pudelo, ŝiriĝanta promeni. Li saltis surloke, enrigardante la okulojn, laŭte spiris, tiris je la vestoj, alkuris la pordon kaj revenis. Estis senutile konvinki lin. Viktor ŝovis al li sian malnovan pluvmantelon, kaj enpensiĝis. Li prenis el la tablo dokumentojn kaj monon, disŝovis ilin en la poŝojn, fermis la fenestron, kaj malŝaltis la lumon. Poste li fordonis sin al volo de Kvadriga.

Doktoro honoris kauza, klininte la kapon, impete tiris lin sur la koridoro al serva ŝtuparo, preter malluma malvarma kuirejo, elpuŝis lin tra la pordo sub torentan pluvon, en plenan mallumon, kaj elsaltis post li.

– Dank al Dio, eskapis, – diris li. – Kuru ni!

Sed kuri li ne scipovis. Lin turmentis anhelo, kaj mallume estis tiel ke ili devis iri preskaŭ palpe, tenante sin je la muroj. Komunan direkton ili povis diveni nur laŭ la noktaj lanternoj, lumantaj duonarde, kaj laŭ spacetoj en fenestaj kurtenoj, tra kiuj en kelkaj lokoj penetretis ruĝeta lumo.

La pluvo batis senhalte, sed la stratoj estis ne tute dezertaj; iu konversaciis duonvoĉe, miaŭis suĉinfano, dufoje preterveturis pezaj kamionoj, iu ĉaro pretertondris sur la asfalto per la feraj radbendoj.

– Ĉiuj kuras, – balbutis Kvadriga. – Ĉiuj fuĝas. Nur ni tiriĝas.

Viktor silentis. Sub la piedoj plaŭdis, la ŝuoj malsekiĝis, sur la vizaĝo rampis malklareta akvo. Kvadriga kroĉiĝis kiel iksodo, ĉio tio estis aĉa, senvalora, kaj ili devis tiriĝi tra la tuta urbo, kaj fino al tio ne videblis. Li stumblis je pluvtubo, io krakis, Kvadriga deŝiriĝis, kaj tuj plore ekkriaĉis je la tuta urbo: – Banev! Kie vi estas? – Dum ili palpis en malseka mallumo, serĉante unu la alian, super la kapoj frapis fenestreto, kaj sufokita voĉo informiĝis:

– Nu, kio nova?

– Mallume, tiel kaj ne tiel... – respondis Viktor.

– Ĝuste! – entusiasme respondis la voĉo. – Kaj akvo forestas... Bone ke ni sukcesis la kuvon plenigi.

– Sed kio estos? – demandis Viktor, haltigante na Kvadriga kiu ŝiriĝis antaŭen.

Post ioma silento la voĉo prononcis:

– Oni evakuon deklaros, ne povas alie... Ho,

vivo nia!

Kaj la fenestreto frape fermiĝis.

Ili ektiriĝis pluen. Kvadriga, tenante je Viktor per la ambaŭ manoj, komencis senorde rakonti kiel li vekiĝis pro teruro, sobiĝis, kaj ekvidis tie tiun ĉi teruran kuniĝon... Ili stumblis je kamiono, palpe preteriris ĝin, kaj trafis homon kun iu ŝarĝo. Kvadriga denove ekkriaĉis.

– Kio okazis? – furioze demandis Viktor.

– Batas li, – ofende informis Kvadriga. – Je la hepaton. Per kesto.

Sur trotuaroj troviĝis malorde metitaj aŭtoj, fridujoj, ŝrankoj, densejo da enpotaj kreskaĵoj. Kvadriga trafis en malfermitan spegulan ŝrankon, poste li komplikiĝis en biciklo. Viktor poiome bestiĝis. Sur iu angulo oni haltis ilin lumigante per lanterneto. Briletis malsekaj soldataj kaskoj, kruda voĉo kun suda prononco deklaris:

– Milita patrolo. Prezentu la dokumentojn.

Ĉe Kvadriga dokumentoj, nature, forestis, kaj li tuj komencis krii ke li estas doktoro, ke li estas laŭreato, ke li persone estas konato de... La kruda voĉo diris malestime:

– Civiluloj. Tralasu ilin.

Ili trairis la urban placon. Antaŭ la polica administrejo amasiĝis aŭtoj kun lumantaj lumĵetiloj. Sensence tumultis or-ĉemizuloj, brilante per kupro de siaj estingistaj kaskoj, aŭdiĝis laŭtaj nekomprenaj ordonoj. Videblis ke centro de la paniko estas ĉi tie. Iom da tempo la vojon lumigis relumo de la lumĵetiloj, poste denove ekestis mallume.

Kvadriga ne balbutis plu, sed nur anhelis kaj

ĝemetis. Kelkfoje li falis, tirante kun si na Viktor. Ili malpuriĝis kiel porkoj. Viktor tute stultiĝis kaj jam ne malbenis, vualo de humila apatio tegis la cerbon, estis necese iri, forpuŝi nevideblajn renkontulojn, denove kaj denove levi na Kvadriga je kolumo de lia ŝveliĝinta negliĝa mantelo, ne eblis nur halti, kaj neniokaze eblis iri reen. Io memoriĝis al li, io estinta jam delonge, malhonora, amara, nereala, tamen tiam estis fajrorebrilo kaj homa kaĉo sur stratoj, kaj malproksime aŭdiĝis pafegoj kaj eksplodoj, malantaŭe estis teruro, kaj ĉirkaŭe estis malpleniĝintaj domoj kun fenestroj, surgluitaj per kruc-strioj, kaj en la vizaĝon flugis cindro kaj fetoro de brulanta papero, kaj sur peronon de bela aparta domo kun giganta nacia flago eliris alta kolonelo en luksa reĝ-husara uniformo, demetis la kaskedon, kaj mort-pafis sin, kaj ni, ŝirvestitaj, sangantaj, venditaj, perfiditaj, ankaŭ en husara uniformo, sed jam ne husaroj sed preskaŭ dizertintoj, ekfajfis, ekridegis, ekkriaĉis, kaj iu ĵetis en kadavron de la kolonelo rompaĵon de sia sabro.

– Halt! – oni diris flustre el la mallumo, kaj apogis en la bruston ion konatan.

Viktor aŭtomate levis la manojn.

– Kiel vi aŭdacas! – ekjelpis Kvadriga post lia dorso.

– Silenton! – diris la voĉo.

– Polico! – elkriaĉis Kvadriga.

– Silentu, stultulo, – diris al li Viktor. – Kapitulacias mi kapitulacias, – diris li en la mallumon, de kie oni peze spiris kaj apogis en lian bruston mitraleton.

– Mi pafos! – time avertis la voĉo.

– Ne valoras, – diris Viktor. – Ja ni kapitulacias. – Lia gorĝo sekiĝis.

– Nu, senvestiĝu! – ordonis la voĉo.

– En kiu senco?

– La botetojn demetu, la pluvmantelon demetu, la pantalonon...

– Por kio?

– Rapide, rapide, – siblis la voĉo.

Viktor pririgardis, mallevis la manojn, paŝis flanken kaj, kaptinte la mitraleton, turnis la tubon supren. La rabisto elpepis, ŝiriĝis, sed ial ne pafis. La ambaŭ pene ĝemis, elturnante unu de alia la armilon.

– Banev! – kie vi estas? – senespere kriaĉis Kvadriga.

Laŭpalpe kaj laŭodore homo kun la mitraleto estis soldato. Iom da tempo li ankoraŭ ŝiriĝis, sed Viktor estis multe pli forta.

– Ĉio, – diris Viktor tra la dentoj. – Ĉio... Ne ŝiriĝu vi, alie je muzelaĉon ricevos.

– Sed vi ellasu! – siblis la soldato malforte rezistante.

– Por kio al vi mia pantalono? Kio vi estas?

La soldato nur spiregis.

– Viktor! – kriegis Kvadriga jam de malproksime. – A-a-a!

El post angulo elturniĝis aŭto, porsekunde lumigis per la lumĵetiloj konatan lentugan vizaĝon, rondajn pro la timo okulojn sub la kasko, kaj forimpetis.

– He, sed mi konas vin, – diris Viktor. – Kial vi

homojn rabas? Fordonu la mitraleton.

La soldato humile elgrimpis el la rimeno, kroĉiĝante je la kasko,.

– Do por kio al vi mia pantalono? – demandis Viktor. – Ĉu vi dizertas?

La soldato nazosiblis. Simpatia tia soldateto, lentuga.

– Nu, kial vi silentas?

La soldato ekploris – malalte, kun hurletoj.

– Tutegale al mi nun... – ekbalbutis li. – Tutegale mortpuno. De la posteno mi foriris. Forkuris mi de la posteno, lasis mi la postenon, kien mi ŝoviĝos nun... Liberigu vi min, sinjoro, ĉu? Ja mi ne pro malico, ne estas mi iu krimulo, ne transdonu vi min, ĉu?

Li ploris kaj purigis la nazon, kaj en la mallumo, verŝajne, li viŝis la nazmukojn per maniko de la uniforma palto, – mizera, kiel ĉiuj dizertuloj, timigita kiel ĉiuj dizertuloj, preta je ĉio.

– Bone, – diris Viktor. – Iru kun ni. Ne transdonos ni vin. Vestaĵoj troviĝos. Iru, sed ne postrestadu.

Li ekiris antaŭen, kaj la soldateto ektiriĝis post li, daŭre plorĝemante.

Laŭ hunda hurlo ili trovis na Kvadriga. Nun sur kolo de Viktor pendis mitraleto, je liva lia mano konvulsie kroĉiĝis la plorĝemanta soldateto, je la dekstra – mallaŭte hurlanta Kvadriga. Deliro.

*«Eblas, certe, redoni la senkugligitan mitraleton al tiu ĉi knabaĉo, kaj doni al la nazmukulo piedbaton. Ne, bedaŭrindas. La nazmukulon bedaŭras mi, kaj la mitraleto eble*

*utilos... "Ni konsiliĝis ĉi tie kun la popolo, kaj estas opinio ke ne venis tempo senarmiĝi. La mitraleto povas ekesti utila en atendantaj nin bataloj..."»*

– Vi, ambaŭ, ĉesu hurli, – diris Viktor. – Patroloj alkuros.

Ili eksilentis, kaj post kvin minutoj, kiam antaŭe ekvideblis neklaraj lumetoj de la aŭtobusa stacio, Kvadriga ektiris na Viktor dekstren, ĝoje balbutante:

– Dankon al vi, Dio, venis ni...

Ŝlosilon de la pordeto Kvadriga, certe, forgesis en la hotelo, en la pantalono. Damnante ili transgrimpis la barilon, damnante ili komplikiĝis iom da tempo en la malseka siringo; preskaŭ falis en la fontanon; atingis, fine, la eniron, forbatis la pordon, kaj enrompiĝis en la halon. Klakis la ŝaltilo, kaj la halo duonlumiĝis malhelruĝe. Viktor falis en plej proksiman brakseĝon. Dum Kvadriga kuradis en la domo, serĉante bantukojn kaj sekajn vestaĵojn, la soldateto vigle senvestiĝis ĝis la subvesto, kunvolvis la uniformon kaj ŝovis ĝin sub la kanapon. Post tio li iom trankviliĝis, kaj ĉesis plorĝemeti. Poste revenis Kvadriga, kaj ili longe kaj furioze viŝis sin per la bantukoj, kaj alivestiĝis.

En la halo regis kaoso. Ĉio estis renversita, disĵetita, malpurigita. Libroj kuŝaĉis mikse kun polva tolaĵo kaj volvitaj toloj. Sub piedoj krakis vitro, senorde kuŝaĉis elpremitaj tubetoj de farboj, televidilo rigardis per malplena kvadrato de la ekrano, kaj la tablo estis okupata per malpura manĝilaro kaj per putraj manĝrestaĵoj. Ne videblis nur tio kio

amasiĝis, aŭ ne amasiĝis en la mallumaj anguloj. Fetoro en la domo estis tia ke Viktor ne eltenis, kaj vaste malfermis la fenestron.

Kvadriga ekmastrumis. Komence li prenis angulon de la tablo, klinis ĝin, kaj kun tintado deŝutis ĉion sur la plankon. Poste li viŝis la tablon per la malseka negliĝa mantelo, kuris ien, alportis tri kristalajn pokalojn de antikvaĵa beleco, kaj du kvadratajn botelojn. Palpebrumante pro la senpacienco li eltiris la korkojn kaj plenigis la pokalojn.

– Estu ni sanaj, – nedistingeble elbalbutis li, kaptis sian pokalon, kaj avide premiĝis al ĝi, antaŭlevante la okulojn pro la delico.

Viktor rigardis lin, indulgeme smajlante, preparante la nesekan cigaredon. Sur vizaĝo de Kvadriga figuriĝis subite nepriskribebla mirego duone kun ofendo.

– Ankaŭ ĉi tie... – diris li kun abomeno.

– Kio okazis? – demandis Viktor.

– Akvo, – timide eksonis la soldateto. – Nura akvo. Malvarma.

Viktor glutis el sia pokalo. Jes, tio estis akvo, pura, malvarma, eble eĉ distilita.

– Per kio vi drinkigas nin, Kvadriga? – demandis li.

Kvadriga, parolante nenion, kaptis la duan botelon kaj ekglutis. Lia vizaĝo tordiĝis. Li kraĉis, diris: "Dio mia!", kliniĝis, kaj sur la piedfingroj eliris el la ĉambro. La soldateto denove ekis plorĝemeti. Viktor pririgardis surbotelajn etikedojn: rumo, viskio. Li denove elglutis el la pokalo: akvo. Ekodoris per ordinara diablaĵo, memstare ekknaris

la plankaj tabuloj, haŭto sur la dorso kuntiriĝis sub atenta rigardo de ies okuloj. La soldateto kun la kapo foriris en kolumon de grandega ĵerzo de Kvadriga, kaj enŝovis la manojn profunde en la manikojn. Liaj okuloj estis rondaj, li senĉese rigardis na Viktor.

Viktor demandis raŭke:

– Nu, kial vi fiksrigardas?

– Kaj vi kial? – flustre demandis la soldateto.

– Ja mi nenial, sed kial vi elstreĉigis la okulojn?

– Sed kial vi... Time ial, ne faru vi tiel...

*«Trankvilon», diris Viktor al si – «nenio timiga. Ja superhomoj ili estas. Superhomoj eĉ ne tion scipovas. Ili, frato, ĉion povas. Akvon je vinon, kaj vinon je akvon. Sidadas ili en la restoracio kaj transformas. La bazon ili sub-fosas, fundamentan ŝtonon... Abstinuloj, pan-jon ilian...*

– Ĉu ektimis vi? – diris li al la soldateto. – Fekulo vi estas.

– Ja estas time! – diris la soldateto vigliĝinte. – Vi ne konas tion, sed mi tie multe suferis... Staras mi nokte sur la posteno, kaj jen elflugas li el la zono, rigardas min de supre kaj – pluen... Unu ka-poralo ĉe ni eĉ malpuriĝis... La kapitano ĉiam diris: kutimiĝos vi, la servo kaj la ĵuro... Sed neniel eblas kutimiĝi. Jen, antaŭhieraŭ, alflugis unu, eksidis sur tegmenton de la gardejo kaj rigardas... Sed la oku-loj ne estas ja homaj, ruĝaj ili estas, lumiĝas, kaj odoro de sulfuro disvastiĝas de li... – La soldateto elprenis la manojn el la maniko, kaj krucsignis sin.

El profundoj de la vilao denove aperis Kvadriga, same kliniĝinte kaj sur piedfingroj.

– Nur akvo, – diris li. – Fuĝu ni, Viktor. La aŭto staras en la remizo, provizita, sidu ni kaj – hej! Ĉu?

– Ne paniku, – diris Viktor. – Fuĝi ni ĉiam povos... Tamen laŭdezire. Mi ne veturos nun, sed vi agu, kaj la bubeton kunprenu.

– Ne, – diris Kvadriga. – Sen vi mi ne veturos.

– Do ĉesu tremadi kaj alportu ion voreblan, – ordonis Viktor. – Ĉu pano ĉe vi ne konvertiĝis ankoraŭ je ŝtono?

La pano ne konvertiĝis. Ankaŭ konservaĵoj restis konservaĵoj, kaj ne malbonaj konservaĵoj. Ili manĝis, kaj la soldateto rakontis kiujn timojn toleris li dum lastaj du tagoj, pri flugantaj malsekulaĉoj, pri invado da lumbrikoj, pri knabetoj, kiuj dum du tagoj iĝis adoltoj, pri sia amiko Krupman, dudekjara bubeto kiu pro la timo pafe difektigis sin... Kaj ankaŭ pri tagmanĝo kiun oni alporits en la gardejon kaj metis varmigi. Du horoj staris la tagmanĝo sur la forno, sed ne varmiĝis, malvarman oni pe-manĝis ĝin...

– Kaj ĉi-vespere, je la oka, ekgardis mi, torenta pluvo kun hajlo, super la zono – malpermesataj lumoj, muziko aŭdiĝas nehoma, kaj iu voĉo paroladas, paroladas, sed kion paroladas – kompreneblas eĉ ne vorto. Kaj poste el la stepo eliris turniĝantaj turoj, fostoj, – kaj en la zonon. Kaj tuj kiam ili eniris la zonon, malfermiĝas la pordego, kaj el la zono elflugas sinjoro kapitano en sia aŭto. Mi ne sukcesis eĉ saluti lin kiel decas, vidas mi nur ke sinjoro kapitano – sur la malantaŭa sidloko, sen la

kaskedo, sen la pluvmantelo – batas li la ŝoforon je la kolo kaj kriaĉas: "Rapidu, hundina filo!". – "Rapidu!" Ŝiriĝis io ene de mi, kaj kvazaŭ diris iu: "fuĝu", – diras, – "saviĝu, alie eĉ ostojn oni ne trovos". Do ekfuĝis mi. Kaj ne sur la vojo, sed rekte, tra la stepo, trans ravinoj, preskaŭ enŝlimiĝis mi en marĉon, la burnuson ie tie lasis mi, novan, hieraŭ oni eldonis, sed venis mi en la urbon, kaj en la urbo – patroloj. Apenaŭ foriris mi de ili, ankaŭ duan fojon foriris, atingis mi tiun ĉi aŭtostacion, rigardas, – kuradas homoj, civilulojn oni tralasas, sed ne nin, permesilon oni postulas. Do decidiĝis mi...

Rakontinte sian historion la soldateto volviĝis sur la brakseĝo, kaj tuj ekdormis. Turmente sobra Kvadriga denove komencis insisti ke necesas fuĝi, kaj tuj.

– Jen homo, – ripetis li, montrante per la forko la endormiĝintan militiston. – Ja komprenas la homo... Sed vi estas ŝtipo, Banev, nesentebla ŝtipo. Kial vi ne sentas, mi eĉ fizike sentas kiel io de nordo min premas... Kredu al mi... Mi scias, vi ne kredas al mi, sed nun kredu, ja mi delonge diras al vi: ne decas resti ĉi tie... Tio estas Golem kiu ŝtopigis al vi la kapon, alkoholulo grandnaza... Komprenu vi, nun la vojo estas libera, ĉiuj atendas mateniĝon, kaj poste ĉiuj pontoj ekestos ŝtopitaj, kiel en la kvardeka... Ŝtipo vi estas obstina, Banev, kaj ĉiam vi estis tia, kaj en la gimnazio estis vi tia...

Viktor postulis ke li aŭ dormu aŭ iru al diablo. Kvadriga ofendiĝis, pe-manĝis la konservaĵojn, kaj surgrimpis la divanon, volviĝinte en litkovrilon. Iom

da tempo li turniĝadis, grakĝemis, balbutis apokalipsajn avertojn, poste eksilentis. Estis la kvara.

Je la kvara kaj dek la lumo palpebrumis kaj estingiĝis definitive. Viktor etendiĝis en la brakseĝo, kovriĝis per iuj sekaj ĉifonoj, kaj kuŝis silente, rigardante en la malluman fenestron kaj aŭskultante. Ĝemetis dormante la soldateto, plorĝemetis laciĝinta doktoro honoris kauza. Ie, verŝajne en la aŭtostacio, ekhurladis motoroj, nekomprene kriis voĉoj. Viktor penis kompreni kio okazas, kaj venis al konkludo ke malsekulaĉoj malpaciĝis kun generalo Pferd, elpremis lin el la leprulejo, facilanime transigis sian rezidejon en la urbon, kaj imagas ke se ili scipovas transformi vinon je akvon kaj terurigi homojn, do ili kapablas kontraŭstari nuntempan armeon... Kio ja – nuntempan policon.

*«Idiotoj. Ruinigos ili la urbon, mem pereos, lasos homojn sen loĝejoj. Kaj infanoj... Ja pereigos ili la infanojn, kanajloj! Sed por kio? Kion ili bezonas? Ĉu denove batalo pro potenco? Ho vi, superhomoj. Jen kiaj – saĝaj, talentaj... Sama aĉaĵo kiel ni. Ankoraŭ unu nova ordo, kaj ju pli nova estas la ordo, des pli malbone, tio jam konatas. Irma, Diana...»*

Li vigliĝis, alpalpis en la mallumo la telefonon, prenis la aŭskultilon. La telefono silentis.

*«Denove ili ne dividis ion, kaj ni, kiuj bezonas nek tiujn nek aliajn, sed bezonas ke oni lasu nin trankvilaj, denove ni devas ŝiriĝi de la*

*lokoj, treti unu alian, kuri, saviĝi, aŭ eĉ pli malbone – elekti la flankon, nenion komprenante, nenion sciante, kredante al vorto, kaj eĉ ne al vorto, sed diablo scias al kio... Pafi unu alian, ronĝi unu alian...»*

*«Kutimaj pensoj en kutima fluejo. Milfoje mi pensis jam tiel. Kutimigitaj ni estas. De infaneco. Aŭ hura-hura, aŭ iru vi al diablo, al neniu mi kredas. Ne scipovas vi pensi, sinjoro Banev, jen kio. Kaj tial simpligas vi. Renkontinte sur la vojo kiom ajn komplikan socian movadon vi strebas, antaŭ ĉio, simpligi ĝin. Ĉu per kredo, ĉu per nekredo. Kaj se kredas vi, tiam eĉ ĝis sindono, ĝis fidelega hundida jelpo. Kaj se vi ne kredas, tiam kraĉas vi volupteme per la bruliga galo sur ĉiujn idealojn, kaj misajn kaj verajn. Perri Mejson (Perry Mason) diradis: Krimpruvoj ne estas timigaj, timigas malĝusta interpreto de ili. Same pri politiko: friponoj interpretas tiel kiel estas profite al ili, kaj ni, simpluloj, subkaptas la pretan interpreton. Ĉar ne scipovas kaj ne volas ni pensi memstare. Kaj kiam simplulo Banev, vidinta en la vivo nenion krom politika friponaro, komencas interpreti mem, tiam denove li fuŝas, ĉar ne estas li legoscia, ne estas instruita pensi kiel decas kaj, nature, komprenas neniun terminologion krom la fripona. Nova mondo, malnova mondo... Kaj tuj asocioj: noje ordnung, alte ordnung... Bone, sed simplulo Banev ekzistas ne unuan jam tagon, ion ajn vidis li, ion ellernis. Ne estas li plena marasmulo. Ja*

*ekzistas Diana, Zurzmansor, Golem. Kial mi devas kredi al tiu faŝisto Pavor, al iu ajn nazmuka vilaĝa junulaĉo, aŭ al sobra Kvadriga? Kial nepre sango, puso, koto? Ĉu malsekulaĉoj elpaŝis kontraŭ Pferd? Bonege! Pelu lin for. Delonge jam tempas... Kaj ne permesos ili ofendi la infanojn, ne similas ke ili kapablas al tio... Kaj ne ŝiras ili veŝtojn sur si, ne vokas al nacia sinkompreno, ne malligas antikvajn instinktojn... Kio estas plej natura, tio malplej decas al homo – ĝuste, Bol-Kunac, bravulo... Kaj tute eblas ke tio vere estas nova mondo sen nova ordo. Time? Nekomforte? Sed ĝuste tiel devas esti. "Estonton kreas ni, sed ne por ni". Jen kiel mi ekemociiĝis kiam mi ekestis kovrita per makuloj de estonto! Kiel mi ekpetegis reen, al lampridoj, al vodko... Aĉas rememori, sed ĝuste tiel devis esti... Jes, malamas mi malnovan mondon. Stultecon ĝian malamas mi, indiferentecon, kovardecon, faŝismon... Tamen kio mi estas sen ĉio tio? Tio estas pano mia kaj akvo mia. Purigu oni la mondon ĉirkaŭ mi, faru ĝin tia kia mi volas ĝin vidi, kaj venos fino al mi. Laŭdi mi ne scipovas, malamas mi laŭdadon, sed estos nenio por insulti, estos nenio por malami – angoro, morto... Nova mondo, – severa, justa, saĝa, sterile pura – ne estas mi bezonata al ĝi, en ĝi mi estas nulo. Mi estis bezonata nur kiam mi batalis por ĝi... kaj se mi ne estas bezonata al ĝi, do ankaŭ ĝi ne estas al mi bezonata, sed se ĝi ne estas al mi bezonata, do kial mi batalas*

*por ĝi?.. Ho, malnova bona tempo, kiam eblis fordoni sian vivon por konstruo de nova mondo, sed morti en la malnova. Akcelado, ĉie la akcelado... Sed ne eblas batali kontraŭ, ne batalante pro! Do tio signifas ke kiam vi hakas arbaron, plej multe toleras la branĉo sur kiu sidas vi mem...»*

*…Ie, en grandega malplena mondo ploris knabino, plende ripetante: «Ne volas, ne volas mi, maljuste, kruele, ĉu gravas ke estos pli bone, tiam ne estu pli bone, sed restu ili; ĉu vere ne eblas fari tiel ke ili restu kun ni, kiel stulte, kiel sensence… Ja tio estas Irma», – pensis li.*

– Irma! – kriis Viktor, kaj vekiĝis.

Ronkis Kvadriga, pluvo post la fenestro ĉesiĝis, kaj, ŝajne, ekestis pli lume. Viktor alportis la horloĝon al la okuloj. La lumiĝantaj montriloj montris kvaronon antaŭ la kvina. Sentiĝis malseka malvarmo, estis necese leviĝi kaj fermi la fenestron, sed li envarmiĝis, forestis deziro moviĝi, kaj la palpebroj memvole surrampis la okulojn.

*Ĉu en sonĝo, ĉu en realo, ie apude preteriris aŭtoj, la aŭtoj tiriĝis sur kota vojo, tra senfina kota kampo, sub griza malpura ĉielo, preter oblikviĝintaj telegrafaj fostoj kun disŝiritaj dratoj, preter dispremita kanono kun suprenigita tubo, preter ĉirkaŭbruligita forna tubo, sur kiu sidis sataj korvoj, kaj malsekeco penetris sub la krudtolon, sub la uniforman palton, kaj estis terura deziro dormi, sed dor-*

*mi ne decas, ĉar devas preterveturi Diana, sed pordeto de la pordego estas ŝlosita, en la fenestroj mallume, ŝi pensis ke mi ne estas ĉi tie, kaj ekveturis pluen, do li elsaltis el la fenestro, kaj ĉiuforte ekkuris post la aŭto, kaj kriis tiel ke ŝiriĝis la tendenoj, sed ĝuste tiam iris apude tankoj, ili tondris kaj bruegis, li aŭdis eĉ ne sin mem, kaj Diana forruliĝis tien, al la vadejo, kie ĉio brulas, kie oni mortigos ŝin, kaj li restos sola, kaj tiam aperis kruela penetra jelpo de bombo, rekte en la kapon, rekte en la cerbon... Viktor ĵetiĝis en la vojdefluejon, kaj elfalis el la brakseĝo.*

Jelpis R.Kvadriga. Li staraĉis antaŭ malfermita fenestro, rigardis ĉielon kaj jelpis kiel virinaĉo. Estis lume, sed tio ne estis taga lumo. Sur la fatrasita planko kuŝis diversaj klaraj rektanguloj. Viktor alkuris la fenestron, kaj elrigardis. Tio estis luno – glacia, eta, blindige hela. En ĝi estis io netolereble terura. Viktor ne tuj komprenis – kio. Ĉielo estis kiel antaŭe tegita per nuboj, sed en tiuj nuboj iu eltranĉis ĝustan akuratan kvadrateton, kaj en centro de la kvadrateto estis luno.

Kvadriga jam perdis eblecon jelpi, kaj eligis nur malfortajn knarajn sonojn. Viktor malfacile kaptis la spiron, kaj subite eksentis koleron.

*«Kio ja estas ĉi tie por ili, ĉu cirko? Je kiu ili misopinias min?..»*

Kvadriga daŭre knaris.

– Ĉesu! – ekbojis Viktor malame. – Ĉu vi

kvadratojn ne vidis? Pentristaĉo merda! Servutulo!

Li kaptis na Kvadriga je la litkovrilo kaj skuis tutforte. Kvadriga falis sur la plankon, kaj rigidiĝis.

– Bone, – diris li neatendite per tre klara voĉo. – Por mi sufiĉas.

Li kvarpiediĝis, kaj de tiu ĉi pozicio, kiel sprintulo, ĵetiĝis for. Viktor denove ekrigardis el la fenestro. En profundo de la animo li esperis ke tio nur ŝajnis al li, sed ĉio restis sama, kaj li eĉ distingis en la deksta suba angulo etan steleton, preskaŭ dronintan en la luna brilo. Bonege videblis malsekaj arbustoj de siringo, kaj nefunkcianta fontano kun alegoria marmora fiŝo, kaj ornamaĵe plektita pordego, kaj post la pordego – nigra strio de la ŝoseo. Viktor eksidis sur la fenestran breton, kaj ekfumis, zorgante ke la fingroj ne tremu. Pretere li rimarkis ke la soldateto forestas en la halo – ĉu fuĝis la soldateto, ĉu kaŝiĝis sub la divanon kaj mortis pro la timo. La mitraleto, tamen, kuŝis sur la sama loko, kaj Viktor histerie hihiis, komparante tiun ĉi feraĉon kun fortoj kiuj faris kvadratan puton en la nuboj.

*«Jen kiaj trukuloj. Ne-e, eĉ se la nova mondo pereos, al la malnova ankaŭ tute ne estos simple... Tamen estas bone ke ekzistas la mitraleto. Stulte, sed kun ĝi estas iel pli trankvile. Kaj se pripensi, – tute ne stulte. Klaras ja – antaŭvideblas majesta fuĝo, tio ja pendas en la aero, kaj kiam okazas majesta fuĝo, ĉiam estas pli bone stari flanke, kaj havi ĉe si armilon...*

En la korto ekmuĝis motoro, el post la angulo

elĵetiĝis grandega, senfine longa limuzino de Kvadriga (persona donaco de sinjoro prezidento pro la neprofitema servo per la sindona peniko), kaj, ne elektante vojon, ekimpetis al la pordego, forbatis ĝin kun krakado, elflugis sur la ŝoseon, turniĝis kaj ĉesis esti videbla.

– Do fuĝis la bruto, – elbalbutis Viktor ne sen envio.

Li degrimpis de sur la fenestra breto, pendigis sur la ŝultron la mitraleton, supren surĵetis la pluvmantelon, kaj vokis la soldateton. La soldateto ne respondis. Viktor rigardis sub la divanon, sed tie estis nur griza volvaĵo de uniformo. Viktor ekfumis ankoraŭ unu cigaredon, kaj eliris en la korton. En arbustoj de siringo, apud la forbatita pordego li trovis benkon de stranga formo, sed tre oportunan kaj, grave, – kun bona vido sur la ŝoseon. Li eksidis, metinte gambon sur gambo, kaj pli strikte volviĝis en la mantelon. Komence la ŝoseo estis malplena, sed poste preteriris aŭto, dua, tria – kaj li komprenis ke la fuĝo komenciĝis.

La urbo kreviĝis kiel absceso. Antaŭe fuĝis elito, fuĝis urbestraro kaj polico, fuĝis industrio kaj komerco, fuĝis juĝo kaj akcizo, financoj kaj popolklerigo, poŝto kaj telegrafo, fuĝis oraj ĉemizoj – ĉiuj, ĉiuj en nuboj da benzina fetoro, en krakado de eksplodoj, taŭzitaj, agresaj, malicaj, stultaj, koruptuloj, akaparuloj, servistoj de la popolo, patroj de la popolo, kun hurlo de aŭtaj sirenoj, kun histeria ĝemo de signaloj – hurlego regis sur la ŝoseo, kaj la kolosa furunko daŭre elpremiĝis kaj elpremiĝis, kaj kiam eliris la puso, ekfluis sango: popolo mem – sur

plenŝtopitaj kamionoj, en kliniĝintaj aŭtobusoj, en plenpakaĵitaj etaj aŭtoj, en motorcikloj, sur bicikloj, sur ĉaregoj, piede, puŝante manĉarojn, piede, kliniĝante sub pezo da ligaĵoj, piede kun malplenaj manoj, malserenaj, silentemaj, perdiĝintaj, lasantaj post si la domojn, siajn cimojn, sian neabundan feliĉon, la aranĝitan vivon, sian pasinton kaj sian estonton. Post popolo ekretiriĝis la armeo. Malrapide preterrampis ĉieira aŭto kun oficiroj, kirasigita transportilo, preterveturis du kamionoj kun soldatoj, niaj plej bonaj en mondo transpoteblaj kuiriloj, kaj plej lasta moviĝis duonraŭpa kirasaŭto kun mitraloj, turnataj malantaŭen.

Mateniĝis, paliĝis luno, la terura kvadrato disnaĝis, nuboj degelis; venadis mateno. Viktor atendis kvaronhoron, ĝisatendis neniun plu, kaj eliris el la pordego. Sur la asfalto kuŝaĉis malpuraj ĉifonoj, iu dispremita valizo – bona valizo, laŭ ĉio videblis ke iu el estroj ellasis, rado de ĉaro, kaj sur la vojrando, iom malpli proksime, ankaŭ la ĉaro mem, kun malnova ŝirita divano kaj fikuso. Ĉirkaŭe estis malplene. Viktor ekrigardis flankon de la aŭtostacio. Ankaŭ tie estis jam eĉ ne unu aŭto, eĉ ne unu homo. En ĝardenoj ekfajfis birdoj, leviĝis suno, kiun Viktor ne vidis jam dum duonmonato, kaj la urbo – kelkajn jarojn. Sed nun ĉi tie estis neniu por rigardi ĝin. Denove ekaŭdiĝis zumo de motoro, kaj el post vojturniĝo elplonĝis aŭtobuso. Viktor deiris sur la vojrandon. Tio estis "Fratoj je racio" – ili preterflosis, sammaniere turninte al li la indiferentajn sensencajn vizaĝojn.

*«Jen ĉio», – pensis Viktor. – «Bone estus*

*drinki. Sed kie estas Diana?»*

Li malrapide ekiris reen en la urbon.

Suno staris dekstre, iam ĝi kaŝiĝis post tegmentoj de apartaj domoj, iam elrigardis el inter ili, iam ĝi aspergis la varman lumon tra branĉoj de duonputriĝintaj arboj. Nuboj malaperis, kaj ĉielo estis mirinde pura. De tero leviĝis malpeza nebulo. Estis tute silente, kaj Viktor turnis la atenton al strangaj, apenaŭ aŭdeblaj sonoj, venintaj kvazaŭ el sub tero – iun malfortan kraketadon, murmuron, susurojn. Sed poste li kutimiĝis kaj forgesis pri ili. Mirinda sento de trankvilo kaj sendanĝero kaptis lin. Li iris kiel ebria, kaj preskaŭ ĉiam rigardis ĉielon. Sur avenuo de prezidento apud li haltis ĝipo.

– Sidu, – diris Golem.

Golem estis griza pro laciĝo, kaj ia premigita, kaj apud li sidis Diana, ankaŭ laca, tamen malgraŭ ĉio bela, plej bela el ĉiuj laciĝintaj virinoj.

– Suno, – diris Viktor, smajlante al ŝi. – Rigardu kia suno!

– Li ne veturos, – diris Diana. – Mi avertis vin, Golem.

– Kial ne veturos? – miris Viktor. – Veturos mi. Sed por kio hasti? – Li ne eltenis kaj denove alrigadis ĉielon. Poste li ekrigardis malantaŭen, la malplenan straton, ekrigardis antaŭen la malplenan straton. Ĉio estis verŝita per suno.

Ie en kampo tiriĝis rifuĝintoj, bruegis retiriĝanta armeo, fuĝis estruloj, tie estis ŝtopiĝoj, tie pendis damnado, oni kriaĉis sensencajn ordonojn kaj minacojn, kaj de nordo sur la urbon alŝoviĝis venkintoj, sed ĉi tie estis malplena strio da trankvi-

lo kaj sendanĝero, kelkaj kilometroj da malpleno, kaj en la malpleno la aŭto kaj la tri homoj.

– Golem, ĉu tio venas nova mondo?

– Jes, – diris Golem. Li fiksrigardis na Viktor el sub la ŝvelitaj palpebroj.

– Kaj kie estas viaj malsekulaĉoj? Ĉu ili iras piede?

– Malsekulaĉoj forestas, – diris Golem.

– Kiel tiel forestas? – demandis Viktor. Li ekrigardis na Diana. Diana silente deturniĝis.

– Malsekulaĉoj forestas, – ripetis Golem. Lia voĉo estis premita, kaj al Viktor subite ekŝajnis ke li tuj ekploros. – Vi povas opinii ke ili ne estis. Kaj ne estos.

– Bonege, – diris Viktor. – Iru, promenu ni.

– Ĉu vi veturos aŭ ne? – senemocie diris Golem.

– Mi veturus, – diris Viktor, smajlante, – sed mi devas eniri la hotelon, preni la malneton... Kaj entute rigardi... Ĉu vi scias, Golem, al mi plaĉas ĉi tie.

– Ankaŭ mi restas, – diris subite Diana, kaj elgrimpis el la aŭto. – Kion mi faros tie?

– Kaj kion vi faros ĉi tie? – demandis Golem.

– Mi ne scias, – diris Diana. – Ja ĉe mi estas jam neniu krom tiu ĉi homo.

– Nu bone, – diris Golem. – Li ne komprenas. Sed vi komprenas...

– Sed li devas rigardi, – oponis Diana. – Ja ne povas li forveturi ne rigardinte...

– Ĝuste tiel, – subkaptis Viktor. – Al kiu diablo estas mi bezonata se mi ne rigardos? Ja tio estas mia profesio – rigardi.

– Aŭskultu, infanoj, – diris Golem. – Ĉu vi kom-

prenas al kio vi iras? Viktor, ja oni diris al vi: restu sur via flanko, se vi volas esti utila. Sur via flanko!

– Mi tutan vivon estas sur mia flanko, – diris Viktor.

– Ĉi tie tio ne eblos.

– Vidos ni, – diris Viktor.

– Dio, – diris Golem. – Kvazaŭ mi ne volas resti! Sed oni devas mediti eĉ iomete! Oni devas kompreni, diable, kion oni volas kaj kion oni devas... – Li kvazaŭ konvinkis sin mem. – Ho vi... Restu do. Mi deziras al vi agrable pasigi la tempon. – Li enŝaltis la rapidumon. – Kie estas la kajero, Diana? Ha, jen ĝi estas. Do mi prenas ĝin al mi. Vi ne bezonas ĝin.

– Jes, – diris Diana. – Ĝuste tion li volis.

– Golem, – diris Viktor. – Sed kial vi fuĝas? Vi ja volis tiun ĉi mondon.

– Mi ne fuĝas, – severe diris Golem. – Mi veturas. De tie kie mi ne estas jam bezonata tien kie mi ankoraŭ estas bezonata. Ne kiel vi. Adiaŭ.

Kaj li forveturis. Diana kaj Viktor interprenis la manojn, kaj ekiris supren sur avenuo de sinjoro prezidento en la malplenan urbon, renkonten al proksimiĝantaj venkintoj. Ili ne konversaciis, ili plenbruste enspiris nekutime puran freŝan aeron, duonfermis la okulojn rigardante la sunon, smajlis unu al la alia kaj timis nenion. La urbo rigardis ilin per la malplenaj fenestroj, ĝi estis miriga, tiu ĉi urbo – kovrita per ŝimo, per iuj malignaj glitaj makuloj, putra, kvazaŭ trafita per ekzemo, kvazaŭ ĝi multe da jaroj troviĝis sur mara fundo, kaj jen, fine, oni elakvigis ĝin por ke suno primoku ĝin, kaj

suno, satmokinte, komencis detrui la urbon.

Digelis kaj vaporiĝis tegmentoj, lado kaj tegoloj fumis per koroda vaporo, kaj malaperis antaŭ la okuloj. En muroj kreskis degelaĵoj, ili disvastiĝis, malfermante eluzitajn tapetojn, litojn kun multloke defalinta farbo, meblaron sur kriplaj piedetoj, paliĝintajn fotografaĵojn. Mole rompiĝinte kliniĝis stratlanternoj, dissolvis en aero kioskoj kaj reklamtabuloj – ĉio ĉirkaŭe kraketis, mallaŭte siblis, susuris, iĝis poreca, travidebla, transformiĝis en dunojn da ŝlimo, kaj malaperis. Malproksima turo de la urbestraro ŝanĝis la trajtojn, iĝis ŝancela, kaj kunfluiĝis kun bluo de ĉielo. Iom da tempo en ĉielo, aparte de ĉio, pendis antikva tura horloĝo, poste malaperis ankaŭ ĝi...

*«Malaperis miaj manuskriptoj», – gaje pensis Viktor.*

Ĉirkaŭe jam forestis la urbo – elstaris ie-tie sensukaj arbustoj, restis malsanaj arboj kaj makuloj da verda herbo, nur malproksime, post nebulo, diveniĝis ankoraŭ iuj konstruaĵoj, restaĵoj de konstruaĵoj, fantomoj de konstruaĵoj, kaj proksime al iama pavimo sidis Teddi, sur ŝtona perono kiu gvidis nenien, sidis etendinte la vunditan kruron kaj metinte apud si la lambastonojn.

– Saluton, Teddi! – diris Viktor. – Do restis vi, ĉu?

– Jes, – diris Teddi.

– Kial?

– Tiel ja, – diris Teddi. – Ŝtopiĝis ili kiel haringoj en barelon, ne restis loko por etendi la

kruron, mi diras al la bofilino, nu por kio al vi, stultulino tiu ĉi ŝranko? – Kaj ŝi min insultadas... Kraĉis mi pri ili kaj restis.

– Ĉu vi iros kun ni?

– Ne, iru vi, – diris Teddi. – Mi sidos. Malbona paŝanto mi estas nun, kaj mia min ne preteriros...

Ili ekiris pluen. Iĝis varmege, kaj Viktor deĵetis sur la teron la pluvmantelon, forskuis de si karoditajn restaĵojn de la mitraleto, kaj ekridis pro la malpeziĝo. Diana kisis lin kaj diris "Bone!". Li ne kontraŭis. Ili iris kaj iris sub la blua ĉielo, sub varmaj sunradioj, sur tero kiu ekverdis jam per juna herbo, kaj ili venis al loko kie estis la hotelo. La hotelo tute ne malaperis – ĝi staris estiel giganta griza kubo el kruda raspa betono, kaj Viktor ekpensis ke tio estas monumento, aŭ eble limsigno inter malnova kaj nova mondoj. Kaj apenaŭ li ekpensis tion, el post la betona bloko senbrue elglitis ĉasavio kun ŝildo de Legio sur la fuzelaĝo, ĝi sensone preterbrilis super la kapo, same sensone ekturniĝis ie apud suno, kaj malaperis, kaj nur tiam atakis infera fajfanta hurlo; ĝi batis la orelojn, vizaĝon, animon...

Sed kontraŭe iris jam Bol-Kunac, adoltiĝinta, vastŝultra, kun paliĝintaj lipharetoj sur la sunbrunigita vizaĝo, kaj iom poste iris Irma, ankaŭ preskaŭ adolta, nudpieda, en simpla malpeza robo, kun vergeto en la mano. Ŝi ekrigardis post la ĉasavio, levis la vergeton, kvazaŭ celante, kaj diris: "kĥ-ĥ!".

Diana ekridis. Viktor ekrigardis ŝin, kaj ekvidis ke tio estas ankoraŭ unu Diana, tute nova, kia ŝi

neniam estis antaŭe, li eĉ ne antaŭvidis ke tia Diana eblas – Diana Feliĉa. Kaj tiam li minacis al si per la fingro kaj ekpensis:

*«Ĉio ĉi tio estas belega, sed jen kio, ne forgesu ja mi reveni».*

1967.